

孟子

MENGZI

Esperantigita de Sasaki Teruhiro

2020

Zaozhuang
Saitama

La traduko estas dediĉita
al Semio, revigliginta la Esperantujon
kun granda fervoro.

目錄 ĈAPITROJ

卷 1	梁惠王上	LA REĜO HUI DE LIANG (I)	5
卷 2	梁惠王下	LA REĜO HUI DE LIANG (II)	17
卷 3	公孫丑上	GONGSUN CHOU (I)	32
卷 4	公孫丑下	GONGSUN CHOU (II)	44
卷 5	滕文公上	LA DUKO WEN DE TENG-LANDO (I)	56
卷 6	滕文公下	LA DUKO WEN DE TENG-LANDO (II)	67
卷 7	離婁上	LI LOU (I)	79
卷 8	離婁下	LI LOU (II)	92
卷 9	萬章上	WANG ZHANG (I)	106
卷 10	萬章下	WANG ZHANG (II)	117
卷 11	告子上	GAO ZI (I)	129
卷 12	告子下	GAO ZI (II)	141
卷 13	盡心上	EL TUTA KORO (I)	154
卷 14	盡心下	EL TUTA KORO (II)	169
后記	POSTPAROLO		183

梁惠王上:

LA REĜO HUI DE LIANG (I)

1 [1A1]

孟子見梁惠王。王曰：「叟不遠千里而來，亦將有以利吾國乎？」

孟子對曰：「王何必曰利？亦有仁義而已矣。王曰『何以利吾國』？大夫曰『何以利吾家』？士庶人曰『何以利吾身』？上下交征利而國危矣。萬乘之國弑其君者，必千乘之家；千乘之國弑其君者，必百乘之家。萬取千焉，千取百焉，不為不多矣。苟為後義而先利，不奪不饜。未有仁而遺其親者也，未有義而後其君者也。王亦曰仁義而已矣，何必曰利？」

Mengzi ricevis aŭdiencon ĉe reĝo Hui de Liang.¹ La reĝo diris: “Vi, maljuna Majstro, degnis ĉi tien veni de malproksime je apenaŭ mil lioj, ĉu vi konsilos ion profitodonan al nia lando?”

Mengzi respondis: “Kian profiton Via Moŝto atendus? Estas nur bonvoleco kaj justo por atendi kaj nenio alia. Se iu reĝo ekdirus: ‘Kio profitodona estas al nia lando?’, tiam liaj grandoficistoj dirus: ‘Kio profitodona estas al nia klano?’ kaj oficistoj kaj popolanoj dirus: ‘Kio profitodona estas al ni mem?’. Kiam la supro kaj la subo konkure sekvos sian propran profiton, tiuokaze la lando estos endanĝerigita. Lando de dekmil militĉaroj, se la reĝo estu atencita, neeviteble disfalos en klanojn de mil militĉaroj.² Lando de mil militĉaroj, se estu atencita la estro, neeviteble falos en klanojn de cent militĉaroj. Se el dekmil ĉiu prenas mil, el mil prenas cent, tiuokaze da akiritaĵo ne estus nemulte. Kiu preferas profiton al justo, tiu ne povas esti kontenta sen rabadi. Neniam okazas, ke kun bonvoleco estu malzorgataj la gepatroj, nek okazas, ke kun justo estu forlasita la reĝo. La reĝo devas paroli nur pri la bonvoleco kaj la justo. Kial povus nepre paroli pri profito?”

2 [1A2]

孟子見梁惠王，王立於沼上，顧鴻鴈麋鹿，曰：「賢者亦樂此乎？」

¹ 魏惠王 reĝo Hui de Wei-regno(370-319 a. K.) surtroniĝis en la urbo An Yi 安邑 kaj 9 jarojn poste ekloĝis en la urbo Da Liang 大梁. Do li nomiĝis Liang Hui-wang. 1 aŭ 2 jarojn antaŭe ol lia morto vizitis lin Mengzi (ĉ. 53 jaraĝa).

² La potenco de regno estis mezurata per la nombro de militĉaroj. Unu militĉaro konsistas el kvar ĉevaloj, tri kondukistoj, 72 piedsoldatoj kaj 25 trajnsoldatoj. Mia traduko de sekvantaj frazoj 萬乘之國弑其君者，必千乘之家 estas diferenca ol la aliaj antaŭaj tradukintoj: “One who murders the ruler over a state of ten thousand chariots surely will be from a house of a thousand chariots.[Irene Bloom, p.1] Mi prenas la ideogramon 者 kiel konjunkcion “se”, sed ne kiel relativon “tiu, kiu”. Itala traduko estas jena: In un regno di diecimila carri colui che uccide il re apparterrà certamente ad una famiglia di mille carri. [Il Libro de Mencio, tradotto da Carlo Ou, Milano, 1959, p.15]

孟子對曰：「賢者而後樂此，不賢者雖有此，不樂也。《詩》云：『經始靈臺，經之營之，庶民攻之，不日成之。經始勿亟，庶民子來。王在靈囿，麀鹿攸伏，麀鹿濯濯，白鳥鶴鶴。王在靈沼，於物魚躍。』文王以民力為臺為沼。而民歡樂之，謂其臺曰靈臺，謂其沼曰靈沼，樂其有麀鹿魚鼈。古之人與民偕樂，故能樂也。《湯誓》曰：『時日害喪？予及女偕亡。』民欲與之偕亡，雖有臺池鳥獸，豈能獨樂哉？」

Mengzi vidis la reĝon Hui de Liang staranta ĉe lageto, kie svarmas amase da egretoj, ardeoj, anseroj, alkoj kaj cervoj. La reĝo diris: “Ĉu ankaŭ saĝuloj povas ĝui tian pejzaĝon?”

Mengzi respondis: “Nur estante saĝa, oni povas ĝui tion. Ne estante saĝa, eĉ se estu io ajn, oni ne povas ĝui tion. En *Poezio* estas dirite:

‘Spirita turo, se ekplanite, estis laŭ la plano konstruata. Popolanoj diligente laboris kaj subite elfaris ĝin. Kvankam en la komenco de la plano ne estis postulate tiel urĝe finkonstrui, tamen la popolanoj kvazaŭ filoj memvole plenumis la taskon rapide. La reĝo vidas en la Spirita ĝardeno kiel sidas aplombe inaj cervoj, grasaj kaj dikaj, kaj vagadas blankaj birdoj kaj grupoj. Antaŭ la reĝo en la Spirita lago fiŝoj svarme naĝas kaj saltadas.’³

La reĝo Wen konstruis la turon kaj la lagon per la forto de popolo. La popolo ĝoje ĝuis tion, nomante la turon Spirita kaj la lageton Spirita, kaj ĝuis, vidante alkojn, cervojn, fiŝojn kaj testudojn. Antikvuloj dividis ĝuon kune kun la popolo, kaj tiel povis vere ĝui. Estas dirite en *Juro de Tang*:

‘Tirano Jie veis, ‘Kia tempo, kia suno, pereiga kaj morna? Mi pereu kune kun vi.’⁴

Se la popolo volus, ke prefere ĉiuj pereu kune, en tiu okazo kiaj ajn estu turoj, lagoj, birdoj aŭ bestoj, kiel eblus al nura solulo ĝui tiujn?”

3 [1A3]

梁惠王曰：「寡人之於國也，盡心焉耳矣。河內凶，則移其民於河東，移其粟於河內。河東凶亦然。察鄰國之政，無如寡人之用心者。鄰國之民不加少，寡人之民不加多，何也？」

孟子對曰：「王好戰，請以戰喻。填然鼓之，兵刃既接，棄甲曳兵而走。或百步而後止，或五十步而後止。以五十步笑百步，則何如？」

³ Citaĵo el 诗经, 大雅, 灵台. Laŭ Yoshida Shoin, – Ĝuas la reĝo Wen, ne ĝardenon mem, sed tion, ke la popolo ĝojas, kaj la popolo ĝojas je tio, ke la reĝo ĝojas. 吉田松陰、講孟餘話、全集 3:25]

⁴ Citaĵo el 尚书, 汤誓. ‘Suno’ signifas la tiranon Jie. Plendo de la popolo sub Xia-dinastio pri lia tiraneco. La popolo volus, ke ĉiuj, rilataj al Jie, pereu kune. Zhu Xi skribis: Se reĝo, unu sola ĝuante, ne kompatas la popolon, la popolo rankoras kaj ne povas ĝoji.[朱熹、四書集注下:77]

曰：「不可，直不百步耳，是亦走也。」

曰：「王如知此，則無望民之多於鄰國也。不違農時，穀不可勝食也；數罟不入洿池，魚鼈不可勝食也；斧斤以時入山林，材木不可勝用也。穀與魚鼈不可勝食，材木不可勝用，是使民養生喪死無憾也。養生喪死無憾，王道之始也。五畝之宅，樹之以桑，五十者可以衣帛矣；雞豚狗彘之畜，無失其時，七十者可以食肉矣；百畝之田，勿奪其時，數口之家可以無飢矣；謹庠序之教，申之以孝悌之義，頒白者不負戴於道路矣。七十者衣帛食肉，黎民不飢不寒，然而不王者，未之有也。」

狗彘食人食而不知檢，塗有餓莩而不知發；人死，則曰：『非我也，歲也。』是何異於刺人而殺之，曰：『非我也，兵也。』王無罪歲，斯天下之民至焉。」

La reĝo Hui de Liang diris: “Rilate al mia lando, mi dediĉas min elkore. Kiam okazas plago en la interna distrikto laŭ la Flava rivero, mi tuj translokigas la popolon al la orienta distrikto aŭ provizas grenojn al la interna distrikto. Se plago okazas en la orienta distrikto, mi faras samon por savi. Mi vidas, kiel estas regate en najbaraj landoj, kaj trovas neniun zorganta sian landon tiel atenteme, kiel mi. Sed neniom malmultiĝas la popolnombro de najbaraj landoj, kaj neniom plimultiĝas mia popolnombro. Kial?”

Mengzi respondis: “Via Moŝto estas militema, do lasu min paroli per la parabolo de milito. Ektondris la tamburo, ektuŝegis sin armiloj kaj glavoj. Batite, oni retiriĝas, forĵetante armaĵojn aŭ trenante armilojn. Je la retiriĝo malantaŭen iuj haltis en cent paŝoj, la aliaj en 50 paŝoj. Ĉi tiuj de 50 paŝoj mokridas tiujn de 100 paŝoj. Kiel vi opinias?”

La reĝo diris: “Ne eblas. Ankaŭ fuĝis nur malpli ol 100 paŝoj.”

Mengzi diris: “Tio estas same, kiel vi. Ne esperu, ke da via popolo iĝu pli multe ol en najbaraj landoj. Se oni ne eraras je la tempo de agrokulturado, cerealoj pliiĝos tiom multe ke ne eblus formanĝi. Se oni ne uzas retegon kun maŝetoj, fiŝoj kaj testudoj pliiĝos tiom multe ke ne eblus formanĝi. Se oni ne hakadas ekscese en arbaro malĝustatempe, lignoj pliiĝos tiom multe ke ne eblus forkonsumi. Se estas sufiĉe da grenoj, fiŝoj, testudoj kaj multe da lignoj por uzi, tiam la popolo povas nutri al si la vivon kaj funebri la morton, havante nenian rankoron. Ebligi nutri la vivon kaj funebri la morton sen ajna rankoro – tio estas ja la komenco de la Reĝa Vojo. Se ĉirkaŭ la loĝloko de kvin *muoj* estas morusarbaro, kvindek homoj povas vesti sin per silkaĵo. Se senerare je la tempo kreskas la dombestoj, kiel kortobirdoj, porkoj, hundoj, aproj, tiam sepdek homoj povas manĝi viandojn. Se estas terkulturita la kampo je cent *muoj* sen perdo de la ĝustatempe, kelke da familioj povas eviti la malsaton. Se oni serioze instruadas en lernejoj disciplinon je justo de la fila pietato kaj la respektado de pliaĝuloj, ne okazos, ke blankharuloj portus pezan ŝarĝon surstrate. Sepdek homoj vestiĝas je silkaĵo kaj

manĝas viandojn, laboremaj popolanoj ne malsatiĝintaj nek frostiĝintaj tie, kie la reĝo neniam povas esti nekompetenta.

Se iu estro, dum hundoj kaj aproj manĝas kion homoj manĝas, ne povoscias ŝpari por urĝo, nek povoscias ellasi la rezervon urĝe por ŝirmi malsategon, kaj kiam homoj mortas, dirus: “Kulpas ne mi, sed la tempo”, – tio estas nenio alia ol diri, pikmortiginte homon: “Kulpas ne mi, sed la armilo”. La reĝo ne imputas kulpon al tempo, do venas al li la popolo de la mondo.

4 [1A4]

梁惠王曰：「寡人願安承教。」

孟子對曰：「殺人以梃與刃，有以異乎？」

曰：「無以異也。」

「以刃與政，有以異乎？」

曰：「無以異也。」

曰：「庖有肥肉，廄有肥馬，民有飢色，野有餓莩，此率獸而食人也。獸相食，且人惡之。為民父母，行政不免於率獸而食人。惡在其為民父母也？仲尼曰：『始作俑者，其無後乎！』為其象人而用之也。如之何其使斯民飢而死也？」

La reĝo Hui de Liang diris: “Mi petas de vi instrui min tute senĝene.”

Mengzi demandis: “Ĉu estas iu diferenco inter la mortigo de homo per klabo kaj per glavo?”

La reĝo diris: “Neniu diferenco.”

Demandis plu: “Ĉu estas iu diferenco inter la mortigo per glavo kaj per politiko?”

La reĝo diris: “Neniu diferenco.”

Mengzi diris: “Dum en ies kuirejo estas grasaj viandoj kaj en ies stalo estas grasaj ĉevaloj, la popolanoj tamen mienas malsataj kaj sur kampoj kuŝas malsatmortintoj, – tio egalas, kvazaŭ oni lasus bestojn manĝi homojn. Okazas, ke bestoj manĝas bestojn, unuj la aliajn. Sed homoj malamas tion. Se la administrantoj, dezirante esti kiel gepatroj por la popolo, ne povas haltigi bestojn manĝi homojn, kial ili povus nomiĝi la gepatroj por la popolo? Zhong Ni diris: ‘Oni komencis fabriki pupojn de homaj figuroj por entombigi kune, ke ne ĉesiĝu postvivantoj!’⁵ Tiel do la bildoj de terakoto estas uzataj anstataŭ homoj. Kiel do oni povus lasi popolanojn malsatmorti?”

⁵ 始作俑者、其無後乎 Zhu Xi 朱熹 prenas tiun frazon: “Kiu komencis pupojn por kuna entombigo, tiu perdos la posteulojn”. Kaj li komentis, ke Konfuceo malamis malbonvolecon de la pupo-fabrikinto. [集注:83] Mi ne povas konsenti kun li.

5 [1A5]

梁惠王曰：「晉國，天下莫強焉，叟之所知也。及寡人之身，東敗於齊，長子死焉；西喪地於秦七百里；南辱於楚。寡人恥之，願比死者一洒之，如之何則可？」

孟子對曰：「地方百里而可以王。王如施仁政於民，省刑罰，薄稅斂，深耕易耨。壯者以暇日修其孝悌忠信，入以事其父兄，出以事其長上，可使制梃以撻秦楚之堅甲利兵矣。彼奪其民時，使不得耕耨以養其父母，父母凍餓，兄弟妻子離散。彼陷溺其民，王往而征之，夫誰與王敵？故曰：『仁者無敵。』王請勿疑！」

La reĝo Hui de Liang diris: “En la mondo neniu estis pli forta ol mia praa regno Jin, kiel vi, Sinjoro, bone scias. Sed post kiam mi surtroniĝis, oriente mia regno estas venkita de Qi-regno kaj mia unua filo mortis, okcidente estas perdita de Qin-regno la teritorio je sepcent *li*oj kvadrato, sude mi estas senhonorigita de Chu-regno.⁶ Mi hontas je tio. Mi deziras forviŝi la honton per unu fojo ĝis mia morto. Kion al mi estas preferinde fari?”

Mengzi respondis: “Kiu posedas la teritorion grandan je cent *li*oj kvadrato, tiu povas fariĝi reĝo. La reĝo devas fari bonvolecan regadon por la popolo, reduktante la punadon, malpliigante imposton kaj servuton, stimulante profundan plugadon kaj sarkadon. Plenaĝuloj dum ripozsezono okupu sin per la lernado de devoj je fila pitato kaj respekto de pliaĝuloj, je lojaleco kaj fideleco, hejme oni servas al patro kaj pliaĝaj fratoj, ekstere servas al pliaĝuloj kaj superuloj. Se tiel farate, pere de tiu disciplino oni povas disbati eĉ kun ligno bastono la firmajn kirasojn kaj la akrajn armilojn de Qin kaj Chu-regnoj. Dum ili forprenas por la militservo siajn popolanojn, al kiuj jam ne eblas terkulturi nek nutri gepatrojn, kaj la gepatroj frostiĝas kaj malsatiĝas, fratoj kaj edzinoj kun gefiloj disiĝas, tiel do ili estas dronigantaj sian propran popolon. Se vi, la reĝa Moŝto, ekiros en tiu momento militi por puni, tiam neniu povos kontraŭi al vi, ĉu ne? Do estas dirite: ‘Neniu povas kontraŭi al bonvoleculo.’ Ne dubu tion, via Moŝto!”

6 [1A6]

孟子見梁襄王。出，語人曰：「望之不似人君，就之而不見所畏焉。卒然問曰：『天下惡乎定？』吾對曰：『定于一。』」

『孰能一之？』對曰：『不嗜殺人者能一之。』

『孰能與之？』對曰：『天下莫不與也。王知夫苗乎？七八月之間旱，則苗槁矣。天油然作雲，

⁶ Jin-regno 晉 estis disfendita en tri regnoj – Han 韓, Zhao 趙, Wei 魏. En 30-jaro post la surtroniĝo Hui, Wei estis venkita de Qi-regno en la kampo de Maling 馬陵, la filo de Hui estis kaptita; en 17-a jaro Qin forprenis de Wei la teritorion Shaoliang 少梁 kaj poste prenadis pliajn lokojn, Wei perdis 7 provincojn rezulte de malvenko kontraŭ Chu-regno.

沛然下雨，則苗浚然興之矣。其如是，孰能禦之？今夫天下之人牧，未有不嗜殺人者也，如有不嗜殺人者，則天下之民皆引領而望之矣。誠如是也，民歸之，由水之就下，沛然誰能禦之？』

Mengzi ricevis aŭdiencon de la reĝo Xiang de Liang.⁷ Forlasinte la palacon, Mengzi diris al iu: “Observante, mi vidis lin malsimila al la reĝo de homoj, t.e., al mi ne videblas lia majesteco. Li abrupte demandis, dirante: ‘Kiel la mondo stabiliĝos?’”

Mi respondis: “Ĝi estos stabila, unuigite.”

Demandis: “Kiu povos unuigi ĝin?”

Respondis: “Povos unuigi ĝin tiu, kiu ne ŝatas mortigi homojn.”

Demandis: “Kiel povos okazi tio?”

Respondis: “En la mondo ne okazas nenio ajn. Via Moŝto, ĉu vi scias plantidojn? Se estiĝas sekeco en la sepa-oka monato, ili ŝrumpas. Sed la ĉielo iam ekfaras nubojn kaj ekpluvas torente, la plantaĵoj tuj vigle erektiĝas. Tial do, kial povus haltigi tion? Nun, inter paŝtistoj de la mondo, troviĝas neniuj, kiu malŝatus mortigi homojn. Se estus iu, kiu ne ŝatas hommortigon, al tiu kolektiĝus kune ĉiuj popoloj de la mondo por vidi. Se tio okazus vere, tiam la popolo sekvus lin por submetiĝi kiel akvo, fluanta suben. Kiu do povus haltigi tion?”

7 [1A7]

齊宣王問曰：「齊桓、晉文之事可得聞乎？」

孟子對曰：「仲尼之徒無道桓、文之事者，是以後世無傳焉。臣未之聞也。無以，則王乎？」

曰：「德何如，則可以王矣？」

曰：「保民而王，莫之能禦也。」

曰：「若寡人者，可以保民乎哉？」

曰：「可。」

曰：「何由知吾可也？」

曰：「臣聞之胡齷曰，王坐於堂上，有牽牛而過堂下者，王見之，曰：『牛何之？』對曰：『將以爨鐘。』王曰：『舍之！吾不忍其觶觶，若無罪而就死地。』對曰：『然則廢爨鐘與？』曰：『何可廢也？以羊易之！』不識有諸？」

曰：「有之。」

曰：「是心足以王矣。百姓皆以王為愛也，臣固知王之不忍也。」

王曰：「然。誠有百姓者。齊國雖褊小，吾何愛一牛？即不忍其觶觶，若無罪而就死地，故以羊易之也。」

⁷ La reĝo Hui de Liang mortis en 319 a. K. La heredinto, la reĝo Xiang estis surtrone 318-296 a. K.

曰：「王無異於百姓之以王為愛也。以小易大，彼惡知之？王若隱其無罪而就死地，則牛羊何擇焉？」

王笑曰：「是誠何心哉？我非愛其財。而易之以羊也，宜乎百姓之謂我愛也。」

曰：「無傷也，是乃仁術也，見牛未見羊也。君子之於禽獸也，見其生，不忍見其死；聞其聲，不忍食其肉。是以君子遠庖廚也。」

王說曰：「《詩》云：『他人有心，予忖度之。』夫子之謂也。夫我乃行之，反而求之，不得吾心。夫子言之，於我心有戚戚焉。此心之所以合於王者，何也？」

曰：「有復於王者曰：『吾力足以舉百鈞』，而不足以舉一羽；『明足以察秋毫之末』，而不見輿薪，則王許之乎？」

曰：「否。」

「今恩足以及禽獸，而功不至於百姓者，獨何與？然則一羽之不舉，為不用力焉；輿薪之不見，為不用明焉，百姓之不見保，為不用恩焉。故王之不王，不為也，非不能也。」

曰：「不為者與不能者之形何以異？」

曰：「挾太山以超北海，語人曰『我不能』，是誠不能也。為長者折枝，語人曰『我不能』，是不為也，非不能也。故王之不王，非挾太山以超北海之類也；王之不王，是折枝之類也。老吾老，以及人之老；幼吾幼，以及人之幼。天下可運於掌。《詩》云：『刑于寡妻，至于兄弟，以御于家邦。』言舉斯心加諸彼而已。故推恩足以保四海，不推恩無以保妻子。古之人所以大過人者無他焉，善推其所為而已矣。今恩足以及禽獸，而功不至於百姓者，獨何與？權，然後知輕重；度，然後知長短。物皆然，心為甚。王請度之！抑王興甲兵，危士臣，構怨於諸侯，然後快於心與？」

王曰：「否。吾何快於是？將以求吾所大欲也。」

曰：「王之所大欲可得聞與？」王笑而不言。

曰：「為肥甘不足於口與？輕煖不足於體與？抑為采色不足視於目與？聲音不足聽於耳與？便嬖不足使令於前與？王之諸臣皆足以供之，而王豈為是哉？」

曰：「否。吾不為是也。」

曰：「然則王之所大欲可知已。欲辟土地，朝秦楚，莅中國而撫四夷也。以若所為求若所欲，猶緣木而求魚也。」

王曰：「若是其甚與？」

曰：「殆有甚焉。緣木求魚，雖不得魚，無後災。以若所為，求若所欲，盡心力而為之，後必有災。」

曰：「可得聞與？」

曰：「鄒人與楚人戰，則王以為孰勝？」

曰：「楚人勝。」

曰：「然則小固不可以敵大，寡固不可以敵眾，弱固不可以敵彊。海內之地方千里者九，齊集有其一。以一服八，何以異於鄒敵楚哉？蓋亦反其本矣。今王發政施仁，使天下仕者皆欲立於王之朝，耕者皆欲耕於王之野，商賈皆欲藏於王之市，行旅皆欲出於王之塗，天下之欲疾

其君者皆欲赴愬於王。其若是，孰能禦之？」

王曰：「吾慙，不能進於是矣。願夫子輔吾志，明以教我。我雖不敏，請嘗試之。」

曰：「無恆產而有恆心者，惟士為能。若民，則無恆產，因無恆心。苟無恆心，放辟，邪侈，無不為已。及陷於罪，然後從而刑之，是罔民也。焉有仁人在位，罔民而可為也？是故明君制民之產，必使仰足以事父母，俯足以畜妻子，樂歲終身飽，凶年免於死亡。然後驅而之善，故民之從之也輕。今也制民之產，仰不足以事父母，俯不足以畜妻子，樂歲終身苦，凶年不免於死亡。此惟救死而恐不贍，奚暇治禮義哉？王欲行之，則盍反其本矣。五畝之宅，樹之以桑，五十者可以衣帛矣；雞豚狗彘之畜，無失其時，七十者可以食肉矣；百畝之田，勿奪其時，八口之家可以無飢矣；謹庠序之教，申之以孝悌之義，頒白者不負戴於道路矣。老者衣帛食肉，黎民不飢不寒，然而不王者，未之有也。」

La reĝo Xuan de Qi-regno demandis, dirante: “Ĉu mi povus aŭdi pri la aferoj far dukoj, Huan de Qi-regno kaj Wen de Jin-regno?”⁸

Mengzi respondis: “Lernintoj de Zhong Ni ne parolis pri la aferoj de Huan kaj Wen, do nenio estas transdonita al la postaj generacioj. Ankaŭ mi ne aŭdis. Ĉar mi havas nenion diri rilate ilin, ni parolu pri tio, kio devas esti la reĝo, ĉu bone.”

Xuan demandis: “Kia virto bezonatas por ke iu povu esti la reĝo?”

Respondis: “Kiu protektas la popolon, tiu estas la reĝo. Neniu povas haltigi lin esti reĝo.”

Demandis: “Ĉu mi povus protekti la popolon?”

Respondis: “Povas.”

Demandis: “Kial vi scias, ke mi povas?”

Respondis: “Mi aŭdis s-ron Hu He diranta jenon. Via Moŝto sidis sur la balkono de halo kaj, vidante iun tiranta unu bovon sub la halo, demandis: ‘Por kio do la bovo?’ Li respondis: ‘Por sanktigi novan sonorilon per la oferado.’ Via Moŝto diris: ‘Lasu ĝin viva! Mi ne povas elteni vidi ĝin horortremanta ĉe la morto sen ajna kulpo.’ Li respondis: ‘Se tiel, ĉu ni nuligu la ceremonion de la oferado al sonorilo?’ Via Moŝto diris: ‘Kial do nuligi? Preferinde anstataŭigi ĝin per ŝafo!’ Ĉu vi ne memoras, ke okazis tio?”

La reĝo diris: “Estis tio.”

Mengzi diris: “Vi sufiĉe rajtas esti reĝo pro tio. Ĉiuj popolanoj rigardas la reĝon plena filantropo.⁹ Mi certe komprenas, ke la reĝo ne eltenas la buĉadon.”

La reĝo diris: “Vi pravas. Vere honestaj estas la popolanoj. Kvankam malgranda estas la Qi-regno, kial mi bedaŭrus ununuran bovon? Al mi estis ne elteneble vidi ĝin timida,

⁸ La reĝo Xuan de Qi estis surtrone 319-301 a. K. La duko Huan de Qi (surtrone 685-643 a. K.) kaj La duko Wen de Jin (surtrone 636-628 a. K.) estis du el kvin hegemoniuloj 五霸.

⁹ Esploristoj prenas la ideogramon 愛 por “avari” kaj interpretas: “Ĉiuj popolanoj rigardas la reĝon avarulo.”

kiu devintus morti sen ajna kulpo. Do mi anstataŭigis ĝin per ŝafo.”

Mengzi diris: “La reĝo neniom aliĝis, dum la popolanoj rigardas la reĝon plena. Ke vi anstataŭigis la grandan per la malgranda, kiel do ili komprenas tion? Se Via Moŝto kompatis, ke iu mortas pro nenio kulpa, kial okazis la elektado inter bovo kaj ŝafo?”

La reĝo ridis, dirante: “Kia koro aperis al mi vere? Mi faris tion ne pro amo al profito. Nur oportune ĝi estis anstataŭigita per ŝafo. La popolanoj tamen nomis min homo de amo.”

Mengzi diris: “Ne gravas. Tio estas ja apero de bonvoleco. Vi fiksas rigardon al la bovo, sed ŝafon ankoraŭ okule ne vidis. Koncerne animalojn, nobluloj povas vidi ilin vivantajn, sed ne eltenas vidi ilian morton, povas aŭdi ilian voĉon, sed ne eltenas la manĝadon de iliaj viandoj. Tial do nobluloj tenas sin for de la kuirejo.”

La reĝo ekĝojis, dirante: “En la *Poezio* estas dirite: ‘Kion la alia havas en sia koro, tion mi anticipe divenas.’¹⁰ Tio estas dirita pri vi, Majstro. Mi mem kondukis tiel, kaj reflektante serĉis la kialon, tamen mi ne komprenis mian motivon. Kion diris vi, Majstro, tio estas familiara al mia koro. Tia koro laŭ vi estas konforma al la reĝa, kial?”

Mengzi diris: “Se temas denove pri la reĝeco, ĉu por vi estus allaseble diri jenon – ‘Mi havas forton, sufiĉan por levi ion pezan je cent *junoj*’,¹¹ sed ne povas levi eĉ unu plumon, aŭ dirante ‘Mi povas klare distingi la pinton de aŭtunaj bestaj haroj’, sed ne povas vidi lignojn sur ĉaro?”

La reĝo diris: “Ne.”

Mengzi diris daŭre: “Nun iu povas favori eĉ animalon, sed ne atingas lia favoro popolanojn, kiel tio estus allasebla? Tio estas sama, kiel ne levi unu plumon sen uzi forton, kaj sama, kiel ne vidi lignojn sen uzi vidpovon, kaj sama, kiel ne zorgi je protektado de popolanoj sen uzi povon favori. Do tia reĝo ne estas reĝo, ĉar li nur ne volas fari sed tute ne nekapablas fari.”

La reĝo demandis: “En kio estas diferenco inter tiu, kiu ne volas fari, kaj tiu, kiu ne kapablas fari?”

Mengzi respondis: “Ke portante la Monton Tai per mano transiri la Nordan Maron, pri tio oni diras – ‘Mi ne povas.’ Ĉar vere ne fareblas tio. Ke helpi al grandaĝuloj rompi branĉojn, se je tio iu diras – ‘Mi ne povas.’ – tio signifas, ke li ne volas fari, sed ne signifas, ke li ne kapablas fari. Do tia reĝo ne estas tiu speco de la reĝo, kiu ne povas porti la Monton Tai trans la Nordan Maron. Tia reĝo ne estas eĉ tiu reĝo, kiu helpas al aĝuloj rompi branĉojn. Kiu respektas sian maljunulon, tiu povas etendi al alies maljunuloj. Kiu kompatas siajn infanojn, tiu povas etendi al alies infanoj. Tiel do la

¹⁰ Citaĵo el 詩經, 小雅, 巧言.

¹¹ 鈞 *jun* estas mezurunuo de pezo, unu *jun* egalas al 18-19 kg.

mondo povas rotacii kiel sur la mano. En *Poezio* estas dirite: ‘Mia regula etiketo por mia edzino etendiĝas al miaj fratoj, kaj atingas la regadon de mia klano kaj mia lando.’¹² Tio signifas, ke oni devas nur etendi tian koron al la aliuloj. Se ekhavi dankeman koron repagi al la aliaj per bonfarado, tiam la tuta mondo kun kvar maroj estos tenata en paco. Sen tia koro oni ne povas protekti eĉ sian edzinon kaj infanojn. Antikvuloj multe superis nur pro tio, ke ili aktive etendis la bonfaradon. Nun vi sufiĉe havas la koron favori animalojn, sed la merito ankoraŭ ne atingas la popolanojn. Kial? Havante pesilon, oni ekscias la pezan kaj la malpezan; havante mezurilon, oni ekscias longecon kaj mallongecon. Ĉiuj aĵoj estas tiaj, des pli la koro. Reĝa Moŝto, mi petas vin mezuri tion! Se la reĝo akcelos kirason kaj armilojn, tiam oficiroj-ministroj estos endanĝerigitaj kaj alvokos venĝemon al si inter landestroj. Ĉu tio estus plezuriga al vi?”

La reĝo diris: “Ne. Kial mi ĝojus je tio? Mi postulas tion, ĉar mi havas iun grandan deziron.”

Mengzi diris: “Via Moŝto, ĉu mi rajtas aŭdi, kio estas via granda deziro?”

La reĝo ridis sed ne diris.

Mengzi diris: “Ĉu por via buŝo ne sufiĉus grasa viando kaj dolĉaĵo? Ĉu por via korpo ne sufiĉus vestaĵoj malpeza kaj varma? Ĉu por viaj okuloj ne sufiĉus belaj koloroj vidindaj? Ĉu por viaj oreloj ne sufiĉus voĉoj kaj sonoj aŭdindaj? Ĉu al vi mankus obeema sekvantaro por alkomandi? Al la Reĝa Moŝto sufiĉas subuloj-ministroj servantaj vin per tiuj. Ĉu Via Moŝto dezirus tiujn?”

La reĝo diris: “Ne. Mi ne dezirus tiujn.”

Mengzi diris: “Se tiel, povas esti sciata, kio estas la granda deziro de Via Moŝto. Vi deziras etendaĉi la teron, igi regnojn de Qin kaj Chu tributaj al vi, reĝi super la Centra Imperio kaj subigi barbarojn de kvar direktoj. Se vi dezirus ĉasi tian celon, tio estas same, kiel ĉasi fiŝon sur arbo.”

La reĝo diris: “Ĉu tiel ekscesa?”

Mengzi diris: “Pli ol ekscesa. Je la ĉasado de fiŝo sur arbo, eĉ se ne akireblas la fiŝo, nenia plago estiĝus poste. Sed, se estos farata serioze, tutanime kaj tutforte, tia agado por realigi vian deziron, tiam nepre postsekvos katastrofo.”

La reĝo diris: “Ĉu mi povas aŭdi plu?”

Mengzi diris: “Se Zou-landanoj ekmilitus kontraŭ Chu-regnanoj, kiu do laŭ via opinio venkos?”

La reĝo diris: “Chu-regnanoj venkos.”

Mengzi diris: “Tiel do la malgranda certe ne povas rivali kun la granda, la malmulto certe ne povas rivali kun la multo, la malforta ne povas rivali kun la forta.

¹² Citaĵo el 詩經, 大雅, 思齊

Ene de la maroj troviĝas naŭ grandaj kun teritorio je pli ol mil *li*oj kvadrate, kaj Qi-regno estas unu el ili. Submeti ok al unu estas neniom alie ol tio, ke Zhou rivalus kun Chu, tute kontraŭas al la baza rezono. Se nun Via Moŝto ekadministrus per bonvoleca politiko, tio instigus ĉiujn aspirantojn de la mondo ekstari por la registaro de Via Moŝto. Farmistoj ĉiuj ekdezirus terkulturadi en la kampo de Via Moŝto, komercistoj ĉiuj ekdezirus negocadi sur la merkato de Via Moŝto, turistoj ĉiuj ekdezirus alvojaĝi la stratojn de Via Moŝto, kaj ĉiuj, havantaj plendon pri siaj estroj en la mondo, ekdezirus alveni por peti protekton de Via Moŝto. Se tiel, kiu povus haltigi tiun fluon?”

La reĝo diris: “Mi, obskuranto, ne kapablas antaŭeniri plu je tio. Majstro, mi petas vin, ke vi asistu min je aspiro, klarigu kaj instruu min. Spite ke mi ne estas sprita, mi provu kion vi rekomendos.”

Mengzi diris: “Kapablas teni sekuran koron eĉ sen sia sekura proprietaĵo nur elstaraj personoj. Popolanoj, se ne posedante la sekuran proprietaĵon, ne povas havigi al si iun ajn sekuran koron.¹³ Sen la sekura koro ili diboĉadus, disipadus, nenion farante. Kiam ili foje ekpekas kaj ekkulpas, ili estas punataj – tio estas same, kiel faligi popolanojn en maŝkaptilon. Ĉu la bonvoleculo, estante surtrone, povus igi la popolon fali en tian maŝkaptilon?¹⁴ Do klera reĝo gvidas la popolon produktadi kaj fabrikadi, nepre tenas la popolon sekura sufiĉe por la servado al gepatroj kaj por la nutrado de edzinoj kaj infanoj, por ke en la jaro de bona rikolto la popolo povu vivi sate ĝis la maljuniĝo kaj en la jaro de malsatego povu eviti la morton. Poste estos al ili farebla la bono kaj iĝos facile obeemaj. Sed nun, se temas pri la stimulado de la popolo produktadi kaj fabrikadi, estas provizate nek sufiĉe supre por la servado al gepatroj nek sufiĉe sube por la nutrado de edzinoj kaj infanoj. Ili suferas ĝis maljuniĝo eĉ en la jaro de bona rikolto, kaj ne povas eviti la morton en la jaro de malsatego. Ne povante eĉ savi sin el morto, kiel ili povus havi liberan tempon por posedi decregulojn kaj juston? Tiuokaze, eĉ se la reĝo dezirus igi la popolon kondukti ĝuste, tio rezultus nur kontraŭ la baza rezono.

Kun loĝejo granda je kvin *muoj*, se planti morusarbojn, kvindeka jaraĝulo povas vestiĝi je silkaĵo; se bredi dombestojn kiel kortobirdojn, porkojn, hundojn, aprojn, sen perdi la ĝustan tempon, homoj de sepdek-jara povas manĝi viandon; kun kampo granda je cent *muoj*, sen perdi laborforton en la ĝusta tempo, ok familianoj povas vivi sen

¹³無恆產而有恆心者，惟士為能。若民，則無恆產，因無恆心。Jen en kio kuŝas la kerno de Mencia ideologio, por ke estu sufiĉa al popolo la sekura proprietaĵo, kaj samtempe, por ke kresku la forta persono 士 rezistebla al adversa medio, al malfavora vivkondiĉo. Tiu devizo instigis japanan pensulon Yoshida Shoin fondi la lernejon por kreskigi “fortajn personojn, nekompareblajn sub la ĉielo.” 荻下之人才天下無比。[講孟餘話 40-41]

¹⁴ Tiu opinio de Mencio estas kontraŭ la tendenco de legalistoj 法家, kiuj havos influon poste.

malsate; se en lernejoj skrupule instrui la decan ordon kaj ripete disciplini pri la justo de fila pietato kaj de la respektado de pliaĝuloj, blankharuloj ne bezonus portadi pezan ŝarĝon laŭ strato. Maljunuloj vestas sin per silkaĵoj kaj manĝas viandon, laboremaj popolanoj ne malsatas nek frostiĝas, tiam tiu reĝo estas nepre taŭga je la nomo de vera reĝo.”

梁惠王下:

LA REĜO HUI DE LIANG (II)

8 [1B1]

莊暴見孟子，曰：「暴見於王，王語暴以好樂，暴未有以對也。」曰：「好樂何如？」

孟子曰：「王之好樂甚，則齊國其庶幾乎！」

他日，見於王曰：「王嘗語莊子以好樂，有諸？」王變乎色，曰：「寡人非能好先王之樂也，直好世俗之樂耳。」

曰：「王之好樂甚，則齊其庶幾乎！今之樂猶古之樂也。」曰：「可得聞與？」

曰：「獨樂樂，與人樂樂，孰樂？」曰：「不若與人。」

曰：「與少樂樂，與眾樂樂，孰樂？」曰：「不若與眾。」

「臣請為王言樂：今王鼓樂於此，百姓聞王鐘鼓之聲，管籥之音，舉疾首蹙頰而相告曰：『吾王之好鼓樂，夫何使我至於此極也？父子不相見，兄弟妻子離散。』今王田獵於此，百姓聞王車馬之音，見羽旄之美，舉疾首蹙頰而相告曰：『吾王之好田獵，夫何使我至於此極也？父子不相見，兄弟妻子離散。』此無他，不與民同樂也。」

「今王鼓樂於此，百姓聞王鐘鼓之聲，管籥之音，舉欣欣然有喜色而相告曰：『吾王庶幾無疾病與？何以能鼓樂也？』今王田獵於此，百姓聞王車馬之音，見羽旄之美，舉欣欣然有喜色而相告曰：『吾王庶幾無疾病與？何以能田獵也？』此無他，與民同樂也。今王與百姓同樂，則王矣。」

Zhuang Bao renkontis Mengzi kaj diris: “Mi vidis la reĝon. Lia Moŝto parolis al mi pri sia ŝato de muziko. Mi havis nenion respondi al li pri tio. Li diris: ‘Kiel vi opinias pri la ŝato de muziko?’

Mengzi diris: “Ke la reĝo ege ŝatas muzikon, estas ne malbone por la Qi-regno.”

En la alia tago Mengzi, vidante la reĝon, diris: “Via Moŝto parolis al s-ro Zhuang pri via ŝato de muziko, ĉu ne?”

La reĝo ŝanĝis la mienon, dirante: “Mi ne povas ĝui la muzikon de antikvaj reĝoj, sed ŝatas nur la muzikon de nuna mondo.”

Mengzi diris: “Estas ne malbone por Qi-regno, ke Via Moŝto ŝategas muzikon! Ankaŭ la nuntempa muziko estas tiel bona, kiel la antikva.”

La reĝo diris: “Ĉu mi povas aŭdi vian opinion plu?”

Mengzi diris: “Kio estas pli ĝoje al vi, ĝui muzikon sole aŭ kune kun aliaj homoj?”

La reĝo respondis: “Kune kun aliaj homoj.”

Mengzi demandis: “Kio estas pli ĝojiga, kun da homoj malmulte aŭ multe?”

La reĝo respondis: “Kun multe da homoj.”

Mengzi daŭre diris: “Permesu min diri al Via Moŝto pri ĝuo. Nun ĉi tie muzikas por

la reĝo, kaj popolanoj aŭdas la sonon ludata por la reĝo per sonoriloj kaj tamburoj, diversaj blovinstrumentoj. Tiam popolanoj, kun kapoj dolore klinitaj, sulkigante brovojn, diradus unuj al aliaj reciproke: ‘Nia reĝo ŝatas la muzikon de perkut-instrumentoj, dum li lasas min fali en tian ekstreman mizeron, ke gepatroj kaj gefiloj ne povas vidi unuj la aliajn kaj disiĝis fratoj, edzinoj kaj infanoj unuj de la aliaj.’ Se nun la reĝo ĉi tie ĝuas ĉasadon sur kampo, tiam la popolanoj, aŭdante la sonon de ĉevaloj kaj ĉaroj, vidante belajn plumojn kaj flagojn, dirus unuj al aliaj: ‘Nia reĝo ŝatas la ĉasadon sur kampo, dum li lasas min fali en tian ekstreman mizeron, ke gepatroj kaj gefiloj ne povas vidi unuj la aliajn kaj disiĝis fratoj, edzinoj kaj infanoj unuj de la aliaj.’ Kialo de tiu plendo estas nenio alia, ol ĉar li ne dividas ĝojon kun la popolanoj.

Kontraŭe, kiel do estos, se jene. Kiam la reĝo ĝuas muzikon, popolanoj, aŭdante la sonon de reĝaj sonoriloj kaj tamburoj, blovinstrumentoj, kun ĝojo kaj kun mieno ĝojplena diradas unuj al aliaj: ‘Nia reĝo ŝajnas ne malsana, ĉar li povas ĝui muzikon de perkut-instrumentoj, ĉu ne?’ Kaj kiam la reĝo ĝuas la ĉasadon, la popolanoj, aŭdante bruon de reĝaj ĉaroj kaj ĉevaloj, vidante belecon de plumoj kaj rubandoj, vikle kun ĝojplena mieno diradas unuj al aliaj: ‘Nia reĝo ŝajnas ne malsana, ĉar li povas ĝui la ĉasadon, ĉu ne?’ La kialo estas nenio alia, ol ĉar li dividas la plezuron kun la popolanoj. Reĝo, kiu dividas la plezuron kune kun la popolanoj, estas ja vera reĝo.”¹⁵

9 [1B2]

齊宣王問曰：「文王之囿方七十里，有諸？」

孟子對曰：「於傳有之。」

曰：「若是其大乎？」

曰：「民猶以為小也。」

曰：「寡人之囿方四十里，民猶以為大，何也？」

曰：「文王之囿方七十里，芻蕘者往焉，雉兔者往焉，與民同之。民以為小，不亦宜乎？臣始至於境，問國之大禁，然後敢入。臣聞郊關之內有囿方四十里，殺其麋鹿者如殺人之罪。則是方四十里，為阱於國中。民以為大，不亦宜乎？」

La reĝo Xuan de Qi-regno demandis, dirante: “La parko de la reĝo Wen estis granda je 70 *li*oj kvadrato, ĉu vere?”

Mengzi diris: “Tiel estis skribite en historio.”

La reĝo diris: “Ĉu ĝi estis tiom granda?”

¹⁵ Mozi kritikis muzikon per sama kialo. Diferenco estas en tio, ke Mozi vidas nenion valoran en la reĝa ĝuado de muziko, sed Mengzi taksas tion, nur se eblas dividi la reĝan plezuron kun la popolanoj.

Mengzi diris: “Popolo tamen konsideris ĝin malgranda.”

La reĝo diris: “Mia parko estas granda je 40 *li*oj kvadrate, sed la popolo rigardas ĝin tro granda, kial?”

Mengzi diris: “Kvankam la parko de la reĝo Wen estis granda je 70 *li*oj kvadrate, tamen tien eniradis kolektantoj de herboj kaj lignetoj, ĉasantoj de fazanoj kaj leporoj. Tiel do same uzis ĝin la popolanoj. Do, ke la popolo konsideris ĝin malgranda, estas nature. Kiam mi estis eniranta unuafoje la landlimon, oni demandadis ekzamenante, ĉu mi ne rompus regnan leĝaron aŭ ne, kaj poste mi povis eniri. Mi aŭdis, ke la limgarda zono havas ĝardenon je 40 *li*oj kvadrate, kie oni mortpunas mortiginton de alkoj kaj cervoj pro la sama krimo de hommortigo. Do, estas nature, ke la grandecon je 40 *li*oj kvadrate kun kaptiloj la popolo en via lando konsideras tro granda.

10 [1B3]

齊宣王問曰：「交鄰國有道乎？」

孟子對曰：「有。惟仁者為能以大事小，是故湯事葛，文王事昆夷；惟智者為能以小事大，故大王事獯鬻，句踐事吳。以大事小者，樂天者也；以小事大者，畏天者也。樂天者保天下，畏天者保其國。《詩》云：『畏天之威，于時保之。』」

王曰：「大哉言矣！寡人有疾，寡人好勇。」

對曰：「王請無好小勇。夫撫劍疾視曰，『彼惡敢當我哉』！此匹夫之勇，敵一人者也。王請大之！《詩》云：『王赫斯怒，爰整其旅，以遏徂莒，以篤周祜，以對于天下。』此文王之勇也。文王一怒而安天下之民。《書》曰：『天降下民，作之君，作之師。惟曰其助上帝，寵之四方。有罪無罪，惟我在，天下曷敢有越厥志？』一人衡行於天下，武王恥之。此武王之勇也。而武王亦一怒而安天下之民。今王亦一怒而安天下之民，民惟恐王之不好勇也。」

La reĝo Xuan de Qi-regno demandis, dirante: “Ĉu estas iu Vojo por interrilati kun najbaraj landoj?”

Mengzi respondis: “Jes, estas. Kapablas nur bonvoleculo, estante mem pli granda, servi al la malpli granda, por ekzemplo, Tang servis al Ge-lando, la reĝo Wen servis al la barbara Kun.¹⁶ Kapablas nur saĝulo, estante mem malpli granda, servi al la pli granda, ekz-le, Granda Reĝo, avo de la reĝo Wen, servis al la tribo Xun Yu,¹⁷ kaj Gou Jiang servis al Wu-regno. Kiu, estante pli granda, povas servi al la malpli granda, tiu ĝojigas la Ĉielon; kiu, estante malpli granda, povas servi al la pli granda, tiu timas la Ĉielon.

¹⁶ Ge situis najbare al Shang-regno de la reĝo Tang. Kun estis nomo de unu el okcidentaj triboj.

¹⁷ Xun Yu estis unu el nordaj triboj. Granda Reĝo estas Gugong Danfu, avo de la reĝo Wen. Gou Jiang estis la reĝo de Yue-regno, foje venkite de Wu-regno, obeis dume al la reĝo Fu Chai de Wu, kaj finfine disbatis la lastan.

Kiu ĝojigas la Ĉielon, tiu tenas la mondon; kiu timas la Ĉielon, tiu tenas la regnon. Estas dirite en *Poezio*: “Timante la majestecon de la Ĉielo, oni povas teni la landon.”¹⁸

La reĝo diris: “Granda estas la diritaĵo! Sed mi havas iun mankon, ke mi ŝatas kuraĝon.”

Mengzi respondis: “Mi petas vin, ke vi ŝatu ne kuraĝeton. Iu kun glavo en mano minace rigardas, dirante: ‘Kiu aŭdacus kontraŭi min!’, tio estas ja nur kuraĝo de vulgarulo, kiu povus batali nur kontraŭ unu malamiko. Mi petas de Via Moŝto la grandan. Estas dirite en *Poezio*: ‘La reĝo ekkoleregis, kaj la militiro estas preta bonorde por repuŝi malamikon, por montri la bonfaron de Zhou al la tuta mondo.’¹⁹ Tio signifas, ke la reĝo Wen, ekkolerante, donis pacon al la popolo en la mondo. Ankaŭ en *Libro* estas skribite: ‘La Ĉielo estigis sube la popolon, por kiu kreis la reĝon, kreis instruistojn. dirante, ke tiuj helpu al la supra Dio, favoranto de kvar direktoj. Kiu kulpas aŭ ne kulpas, tiu estas nur mi. Kiu en la mondo aŭdacus transpaŝi la permesatan de nobla aspiro?’²⁰ Ke unu homo iam despotis en la mondo, tion hontis la reĝo Wen. Tia estas la kuraĝo de la reĝo Wu. Unu ekkolero de la reĝo Wu alportis pacon al la popolo en la mondo. Nun, ankaŭ unu ekkolero de Via Moŝto alportu pacon al la popolo en la mondo. Aliokaze la popolo timus, ke Via Moŝto ne ŝatus la kuraĝon.”

11 [1B4]

齊宣王見孟子於雪宮。王曰：「賢者亦有此樂乎？」

孟子對曰：「有。人不得，則非其上矣。不得而非其上者，非也；為民上而不與民同樂者，亦非也。樂民之樂者，民亦樂其樂；憂民之憂者，民亦憂其憂。樂以天下，憂以天下，然而不王者，未之有也。」

「昔者齊景公問於晏子曰：『吾欲觀於轉附、朝儻，遵海而南，放于琅邪。吾何脩而可以比於先王觀也？』晏子對曰：『善哉問也！天子適諸侯曰巡狩，巡狩者巡所守也；諸侯朝於天子曰述職，述職者述所職也。無非事者。春省耕而補不足，秋省斂而助不給。夏諺曰：「吾王不遊，吾何以休？吾王不豫，吾何以助？一遊一豫，為諸侯度。」今也不然：師行而糧食，飢者弗食，勞者弗息。睚眦胥讒，民乃作慝。方命虐民，飲食若流。流連荒亡，為諸侯憂。從流下而忘反謂之流，從流上而忘反謂之連，從獸無厭謂之荒，樂酒無厭謂之亡。先王無流連之樂，荒亡之行。惟君所行也。』景公說，大戒於國，出舍於郊。於是始興發補不足。召大師曰：『為我作君臣相說之樂！』蓋徵招角招是也。其詩曰：『畜君何尤？』畜君者，好君也。」

¹⁸ Citaĵo el 詩經, 周頌, 我將.

¹⁹ Citaĵo el 詩經, 大雅, 皇矣. En *Poezio* estas skribita ‘旅’ anstataŭ 莒 Ju.

²⁰ Citaĵo el 尚書, 周書, 泰誓上. Zhu Xi prenas la frazon 有罪無罪, 惟我在 alie: “Mi punas tiun, kiu kulpas, kaj gardas tiun, kiu ne kulpas.” [集注 103]

La reĝo Xuan de Qi-regno akceptis Mengzi en la Neĝa palaco.

La reĝo diris: “Ĉu saĝuloj havas tian plezuron?”

Mengzi respondis: “Jes. Homoj kritikis la supron, se ili ne havus tion. Estas malbone, se nehavantoj kritikis la supron. Estas ankaŭ malbone, ke se iu kiel la supro por la popolo ne dividas la plezuron kun la popolo. Kiu ĝojas je la ĝojo de la popolo, je ties ĝojo ĝojas ankaŭ la popolo; kiu malĝojas je la malĝojo de la popolo, je ties malĝojo malĝojas ankaŭ la popolo. Kiu ĝojas je la ĝojo de la mondo kaj malĝojas je la malĝojo de la mondo, tiu estas ja la vera reĝo.

Antikve, la duko Jing de Qi-regno demandis al la ministro Yanzi, dirante: ‘Mi volus rondvojaĝi kiel reĝo por inspekti al montoj Zhuangfu kaj Chaowu, kaj laŭ la maro suden al Langye.²¹ Kiamaniere mi povus fari la vojaĝon tiom taŭga, kiom komparebla kun antaŭaj reĝoj?’

Yanzi respondis: “Bona demando! La irado de la Ĉiela Filo al landestroj estas nomata *Rondĉasado* (Xunshou), t. e. rondirado por gardi sian influferon. La vojaĝo por la tributo, pagata de landestroj al la Ĉiela Filo, estas nomata *Raporto pri la okupo* (Shushi), t. e. ili raportas kiel ili plenumis la devon. Neniu vojaĝo estis farata sen rilato al la aferoj. En printempo oni observas la terkulturadon kaj kompletigas, se troviĝas ia manko, en autuno oni observas la rikoltadon kaj helpas, se troviĝas ia sterilego. Popolo sub Xia-dinastio kantis: ‘Se nia reĝo ne rondiras, kiel do ni povas ripozi? Se nia reĝo ne antaŭpretigas la rezervon, kiel do ni povas esti helpata? La rondiro kaj la rezervado estas farata por kontroli landestrojn.’ Nun estas ne tiel. Reĝo militiradas kun proviantoj, kaj la malsataj ne havas ion manĝi, la laboruloj ne havas tempon por ripozi. Ili rigardas kun rankoro kaj plendas, en la popolo amasiĝas kaŝita kolero. Reĝo, forlasinte ordonon de antikvuloj, turmentas la popolon, dum mem manĝadas-trinkadas devore kvazaŭ forfluo, lasante ĉion laŭ fluoj kaj ondoj dezertiĝi kaj ruiniĝi. Tio ĉagrenas landestrojn. Ĉe la flosado suben laŭ rivero, forgesi reveni, tio estas nomata “droni en fluo”, kaj ĉe la flosado supren, forgesi reveni, tio estas nomata “droni en ondoj”, kaj ke ĉe la ĉasado de animaloj ne satĉasas, tio estas nomata “dezertiĝo”, kaj ke ĉe la drinkado ne satdrinkas, tio estas nomata “ruiniĝo”. La antaŭaj reĝoj havigis al si ne tian plezuron, kiel droni en fluo kaj ondoj, nek tian konduton, kiel dezertiĝo kaj ruiniĝo. Ili kondukis nur kiel nobluloj.’ La duko Jing estis tre ĝoja, kaj faris tion granda disciplino por la regno, kaj foriris eksterurbon por loĝi en barako. Li komencis malfermi grenejojn por helpi suferantojn pro manko. Li invitis grandan majstron de muziko, kaj diris: ‘Komponu por mi tiel, ke estroj kaj subuloj kune povu ĝui la muzikon!’ Tiele estis muzikigitaj la pecoj,

²¹ Zhuangfu(nuna 芝罘) , Chaowu(nuna 成山) kaj Langye estas lokonomoj de la montoj en Shangdong.

nomataj *Zhishao* kaj *Jueshao*, kie estas jenaj versoj: ‘Ĉu punende estus eduki-bredi reĝon? Kiu eduki-bredas la reĝon, amas la reĝon.’”

12 [1B5]

齊宣王問曰：「人皆謂我毀明堂。毀諸？已乎？」

孟子對曰：「夫明堂者，王者之堂也。王欲行王政，則勿毀之矣。」

王曰：「王政可得聞與？」

對曰：「昔者文王之治岐也，耕者九一，仕者世祿，關市譏而不征，澤梁無禁，罪人不孥。老而無妻曰鰥。老而無夫曰寡。老而無子曰獨。幼而無父曰孤。此四者，天下之窮民而無告者。」

文王發政施仁，必先斯四者。《詩》云：『哿矣富人，哀此癯獨。』」

王曰：「善哉言乎！」

曰：「王如善之，則何為不行？」

王曰：「寡人有疾，寡人好貨。」

對曰：「昔者公劉好貨，《詩》云：『乃積乃倉，乃裹餼糧，于橐于囊。思戢用光。弓矢斯張，干戈戚揚，爰方啟行。』」故居者有積倉，行者有裹糧也，然後可以爰方啟行。王如好貨，與百姓同之，於王何有？」

王曰：「寡人有疾，寡人好色。」

對曰：「昔者大王好色，愛厥妃。《詩》云：『古公亶甫，來朝走馬，率西水滸，至于岐下。爰及姜女，聿來胥宇。』」當是時也，內無怨女，外無曠夫。王如好色，與百姓同之，於王何有？」

La reĝo Xuan de Qi-regno demandis, dirante: Ĉiuj diradas al mi, ke mi malmuntu la Halon de Lumo, Ming Tang.²² Ĉu mi devas malmunti ĝin aŭ ne?”

Mengzi respondis: “La Halo de Lumo estas la Imperiestra Halo. Se Via Moŝto dezirus la reĝan regadon, ne malmuntu ĝin.”

La reĝo demadis: “Ĉu mi povus aŭdi, kio estas la reĝa regado?”

Mengzi respondis: “Antikve, kiam la reĝo Wen regis la lokon de Zhi, li adoptis la impostan sistemon de Naŭona reĝimo²³ por terkulturistoj, oficistoj ricevis salajron kaj pension, ĉe doganejo kaj merkato oni inspektis prohibaĵon sed ne taksis, en marĉo oni ne malpermesis nason, oni ne kulpigis familianojn de krimulo. La oldulo sen edzino nomiĝas vidvo, la oldulino sen edzo nomiĝas vidvino, la oldulo sen gefiloj nomiĝas

²² Ming Tang estis la halo de ceremonio por adorkulti la Ĉielon, kie la Ĉiela Filo de Zhou dinastio preĝis ĉe la Monto Tai 泰山, kaj donis dekreton al landestroj. Do ĝi estis simbolo de la potenco de Zhou-dinastio, kiu en la tempo de Mencio jam perdis la potencon. Do oni proponas malmunton.

²³ 井田法 Unu naŭona terpeco de kulturata kampo estis asignita por la pagado de imposto. Kampo-skvaro dividita en naŭ terpecoj similas al la ideogramo 田, kaj la centra skvaro estas kultivata por la pagado de imposto.

soleculo, la infano sen patro nomiĝas orfo – tiu kvaropo estas mizeruloj en la mondo, restanta sen apogo, – jen la reĝo Wen ekfaris la bonvolecan regadon por savi unue antaŭ ĉio tiun kvaropon. Estas dirite en *Poezio*: ‘Senĝenaj estas riĉuloj, kompatindaj estas soleculoj.’²⁴

La reĝo diris: “Bone dirite!”

Mengzi diris: “Se Via Moŝto konsiderus tion bona, kial do vi ne kondukas laŭ tio?”

La reĝo diris: “Mi havas makulon, ke mi ŝatas varojn.”

Mengzi respondis: “Antaŭe estis iu ŝatanto de varoj, nomata Duko Liu, en *Poezio* estas skribite: ‘Li akumulis, staplis, enpakis sekigitajn provizojn per diversaj sakoj, kun intenco certigis la sekurecon. Li pretigis pafarkojn kaj sagojn, ŝildojn, halebarojn, hakilojn kaj toporojn por ekiro al ekspedicio.’²⁵ Tial do al postfrontuloj estis la plenakumulita tenejo, al militirantoj estis enpakitaj provizoj, kaj oni povis ekiri al ekspedicio. Via Moŝto same ŝatas varojn, sed se ili estus dividitaj kun la popolanoj, kia problemo estiĝus por vi?”

La reĝo diris: “Mi havas makulon, mi ŝatas virinojn.”

Mengzi respondis: “Antikve la Granda reĝo, avo de la reĝo Wen, estis ŝatanto de virinoj, amanta sian damon. Estas dirite en *Poezio*: ‘Gugong Tanfu iu matene, rajdante sur ĉevalo laŭ okcidenta bordo, atingis ĝis la piedo de monto Zhi. Li kunvivis kun virino de la tribo Jiang tie lokiĝinte.’²⁶ En tiu tempo interne ne troviĝis virinoj frustriĝantaj, ekstere ne troviĝis fraŭloj sen amatino. Via Moŝto estas same ŝatanto de virinoj, sed se ankaŭ popolanoj ĝuas kune kun vi, kia problemo estiĝus por vi?”

13 [1B6]

孟子謂齊宣王曰：「王之臣有託其妻子於其友，而之楚遊者。比其反也，則凍餒其妻子，則如之何？」

王曰：「棄之。」

曰：「士師不能治士，則如之何？」

王曰：「已之。」

曰：「四境之內不治，則如之何？」

王顧左右而言他。

Mengzi parolis al la reĝo Xuan de Qi-regno, dirante: “Kion vi opinias, se iu el viaj

²⁴ Citaĵo el 詩經, 小雅, 正月.

²⁵ Citaĵo el 詩經, 大雅, 公劉. La duko Liu estis unu pranepo de 后稷 fondinto de Zhou 周.

²⁶ Citaĵo el 詩經, 大雅, 縣.

subuloj, konfidinte siajn edzinon kun infanoj al sia amiko, oficvojaĝis al Chu-regno, kaj reveninte trovis siajn edzinon kaj infanojn suferantaj pro frostiĝo kaj malsato?”

La reĝo diris: “Li forlasu tian amikon.”

Mengzi diris: “Se iu revizoro ne povas kontroli oficistojn, kion fari?”

La reĝo diris: “Li estu forigita.”

Mengzi diris: “Se ene de kvar direktoj en via regno ne estus regate bonorde, kion fari?”

La reĝo murmuris ion alian al korteganoj, skuante kapon dekstren-maldekstren.

14 [1B7]

孟子見齊宣王曰：「所謂故國者，非謂有喬木之謂也，有世臣之謂也。王無親臣矣，昔者所進，今日不知其亡也。」

王曰：「吾何以識其不才而舍之？」

曰：「國君進賢，如不得已，將使卑踰尊，疏踰戚，可不慎與？左右皆曰賢，未可也；諸大夫皆曰賢，未可也；國人皆曰賢，然後察之；見賢焉，然後用之。左右皆曰不可，勿聽；諸大夫皆曰不可，勿聽；國人皆曰不可，然後察之；見不可焉，然後去之。左右皆曰可殺，勿聽；諸大夫皆曰可殺，勿聽；國人皆曰可殺，然後察之；見可殺焉，然後殺之。故曰，國人殺之也。如此，然後可以為民父母。」

Mengzi, vidante la reĝon Xuan de Qi-regno, diris: “Se temas pri la regno kun malnova tradicio, tio ne nur signifas, ke la regno havas altajn sanktarbojn, sed signifas, ke ĝi havas la omaĝulojn, heredatajn de generacioj. Ĉe la reĝo sen konfidindaj omaĝuloj, estas nesciate, ĉu iu, promociita hieraŭ, volus subite forlasi vin hodiaŭ.”

La reĝo diris: “Kiel mi povas scii sentaŭgulon, forĵetendan?”

Mengzi diris: “Kiam regnestro promocias iun saĝulon, faru tion nur kiel devigite per nepreco. Endas tre skrupule rangaltigi iun personon de malalta deveno pli alte ol personojn de respektinda deveno, aŭ rangaltigi iun malproksiman pli alte ol proksimajn je parenceco. Ankoraŭ ne devas kredi, kiam ĉiuj korteganoj deksre kaj maldekstre dirus iun saĝa, ankoraŭ ne devas kredi, kiam ĉiuj grandoficistoj dirus iun saĝa. Post kiam ĉiuj regnantoj dirus iun saĝa, vi devas ekzameni tiun, kaj nur poste se vi mem rigardas tiun saĝa, promociu lin. Ne aŭskultu, kiam ĉiuj korteganoj dekstre-maldekstre dirus iun neakceptebla, nek aŭskultu, se ĉiuj grandoficistoj dirus lin neakceptebla. Ekzameni lin post kiam ĉiuj regnantoj dirus lin saĝa, kaj nur poste se vi rigardas lin neakceptebla, tiam forlasu lin. Ne aŭskultu, kiam ĉiuj korteganoj dekstre-maldekstre dirus iun mortigenda, nek aŭskultu, kiam grandoficistoj dirus lin mortigenda. Esploru post kiam ĉiuj regnantoj dirus lin mortigenda, kaj nur poste se vi mem rigardas lin mortigenda,

tiam mortigu lin.²⁷ Se tiel, vi povus esti rigardata kiel gepatroj por la popolo.”

15 [1B8]

齊宣王問曰：「湯放桀，武王伐紂，有諸？」

孟子對曰：「於傳有之。」

曰：「臣弑其君可乎？」

曰：「賊仁者謂之賊，賊義者謂之殘，殘賊之人謂之一夫。聞誅一夫紂矣，未聞弑君也。」

La reĝo Xuan de Qi-regno demandis, dirante: “Tang ekzilis Jie, la reĝo Wu mortigis Zhou, ĉu vere tio okazis?”

Mengz respondis: “Tiel estas transdonite en analogoj.”

La reĝo diris: “Ĉu estas allaseble, ke la regato atencu la regnestron?”

Mengzi diris: “Kiu ofendas bonvoleculon, tiu nomiĝas rabisto. Kiu ofendas justulon, tiu nomiĝas kanajlo. Kiu ofendas aŭ rabas homojn, tiu nomiĝas nura unu ulo. Mi aŭdis, ke iu ulo, nomata Zhou, estis akuzita, sed ne aŭdis, ke iu regnestro estus atencita.”²⁸

16 [1B9]

孟子見齊宣王曰：「為巨室，則必使工師求大木。工師得大木。則王喜，以為能勝其任也。匠人斲而小之，則王怒，以為不勝其任矣。夫人幼而學之，壯而欲行之。王曰『姑舍女所學而從我』，則何如？今有璞玉於此，雖萬鎰，必使玉人彫琢之。至於治國家，則曰『姑舍女所學而從我』，則何以異於教玉人彫琢玉哉？」

Mengzi vidis la reĝon Xuan kaj diris: “Por konstrui grandan palacon, oni nepre igas iun mastron-metiiston serĉi grandan arbon. Kiam li trovis la grandan arbon, la reĝo ĝojegas kaj komisiis al iu taŭgulo la taskon. Se la komisiita metiisto mishakus la arbon malgranda, tiuokaze la reĝo ekkoleras, taksante lin ne taŭga al la tasko. Por ekzemplo, iu persono estis lernanta ion ekde la infaneco kaj dezirus en sia maturiĝo praktiki la lernitan – sed reĝo dirus: ‘Vi dume flanklasu la lernitan de vi kaj sekvu min!’, kio do okazus al li? Nun supozu, ke vi havas ankoraŭ ne poluratan jadon, valoran je dekmil *yí*, vi nepre igos juveliston tajli ĝin. Koncernante la regadon de la ŝtato, se la reĝo dirus: ‘Vi

²⁷ Opinio de Mencio pri avanco de personoj estis gvidoprince por feŭdalismo. Sed ĝi havis influon dumlonge sur japaneska administrado de entreprenoj, kiun forŝovis laŭmerita promocio de personoj post 90-aj jaroj de 20-a jc.. Estas notine, li opinias, ke kalumnio estas plej evitenda por stabila regado, ĉar li mem estis unu el viktimoj. Iuj tradukas la vorton 國人 kiel “popolanoj”.

²⁸ La reĝo Xuan mem estas la posteulo de Tian Chang, kiu atencis sian reĝon. En la historio de Ĉinio kaj Japanio estis kritikata tiu opinio de Mengzi kiel revoluciema. Sed ankaŭ Mozi kaj Xunzi havis la saman opinion rilate al mortigo de la tirano Zhou.

dume flanklasu la lernitan de vi kaj sekvu min' – tio estus nenio alia, ol instrui al juvelisto kiel tajli jaden, ĉu ne?"

17 [1B10]

齊人伐燕，勝之。宣王問曰：「或謂寡人勿取，或謂寡人取之。以萬乘之國伐萬乘之國，五旬而舉之，人力不至於此。不取，必有天殃。取之，何如？」

孟子對曰：「取之而燕民悅，則取之。古之人有行之者，武王是也。取之而燕民不悅，則勿取。古之人有行之者，文王是也。以萬乘之國伐萬乘之國，簞食壺漿，以迎王師。豈有他哉？避水火也。如水益深，如火益熱，亦運而已矣。」

Qi-regnanoj atakis Yan-regnon kaj venkis ĝin.²⁹ La reĝo Xuan demandis, dirante: "Tu diras, ke mi ne prenu ĝin, la alia diras, ke mi prenu ĝin. Tio, ke unu regno kun dekmil militĉaroj batis la alian regnon kun dekmil militĉaroj en kvindek tagoj, ne atingeblus nur per la homa forto. Do, se mi ne prenos ĝin, tiam nepre ricevos plagon de la Ĉielo. Se mi prenos, kio okazos sekve?"

Mengzi respondis: "Se la popolo de Yan-regno ĝojas je la okupado far vi, tiam prenu ĝin. Antikve estis ankaŭ ekzemplo, ke tion faris la reĝo Wu. Se la popolo de Yan ne ĝojas je la okupado far vi, tiam ne prenu ĝin. Antikve estis ankaŭ ekzemplo, ke tiel kondukis la reĝo Wen. Kiam unu regno kun dekmil militĉaroj batis la alian regnon kun dekmil militĉaroj, la reĝa armeo de la unua estos akceptata kun korboj da manĝaĵo kaj kruĉoj da vino, ĉu en tia konduto estus alia kialo, ol eviti akvon kaj fajron? Ju pli profunda estas la akvo kaj ju pli arda estas la fajro³⁰, des pli oni turnas sin tiel per si mem."

18 [1B11]

齊人伐燕，取之。諸侯將謀救燕。宣王曰：「諸侯多謀伐寡人者，何以待之？」

孟子對曰：「臣聞七十里為政於天下者，湯是也。未聞以千里畏人者也。《書》曰：『湯一征，自葛始。』天下信之。『東面而征，西夷怨；南面而征，北狄怨。曰，奚為後我？』民望之，若大旱之望雲霓也。歸市者不止，耕者不變。誅其君而弔其民，若時雨降，民大悅。《書》曰：『徯我后，后來其蘇。』

「今燕虐其民，王往而征之。民以為將拯己於水火之中也，簞食壺漿，以迎王師。若殺其父兄，係累其子弟，毀其宗廟，遷其重器，如之何其可也？天下固畏齊之疆也。今又倍地而不行仁政，是動天下之兵也。王速出令，反其旄倪，止其重器，謀於燕眾，置君而後去之，則猶可及止也。」

²⁹ Qi-regno venkis Yan-regnon en 314 a. K., en la sesa jaro de la reĝo Xuan.

³⁰ Akvo kaj fajro signifas la tiranecon de landestro.

Qi-regnanoj atakis Yan-regnon, kaj okupis ĝin. Aliaj landestroj ekintrigis savi la Yan-regnon. La reĝo Xuan diris: “Multaj landestroj intrigas ataki min. Kiel mi devas teni min je tio?”

Mengzi respondis: “Mi aŭdis, ke havanto de teritorion je 70 *li*oj kvadrato povis ekregi la mondon. Tiu estas Tang. Mi ankoraŭ ne aŭdis, ke havanto de teritorion je mil *li*oj kvadrato timus la aliajn. Estas dirite en *Libro*: ‘Tang ekmilitis unue kontraŭ Ge-lando. La mondo fidis al li. Kiam li ekspedicias orienten, la okcidentaj barbaroj envasias, kaj kiam li ekspedicias suden, la nordaj triboj envasias, dirante: ‘Kial do li postlasas nin?’ Popoloj esperis tion, kvazaŭ ili esperus nubojn dum granda sekeco. Eĉ dum la milito senĉese ili iradas al merkato, senŝanĝe ili terkulturadas. Akuzi ilian landestron kaj konsoli la popolojn estas same, kiel ekpluvo ĝustatempa. La popoloj ĝojegas je tio. Estas skribite en *Libro*: ‘Mi atendas la postan, venontan, kiu revivigos min.’ Nun Yan-regno turmentas sian popolon, do Via Moŝto ekiris puni ĝin. La popolo, konsiderante tion ĝuste savo el de akvo kaj fajro, akceptis Vian reĝan armeon kun korboj da mangaĵo kaj kruĉoj da vino. Malgraŭ tio, se via armeo mortigus iliajn patrojn kaj fratojn, kaptus iliajn filojn, detruus ilian prapatran maŭzoleon, forprenus de ili gravajn trezorojn, kion do ili povus fari? La mondo ja timas la fortecon de Qi-regno. Se nun Qi duobligas la teritorion kaj ne faras bonvolecan politikon, tio instigas la mondon mobilizi la armeojn kontraŭ Qi. Via Moŝto, tuj ordonu al via armeo redoni iliajn oldulojn kaj infanojn, ĉesigi la forprenon de iliaj trezoroj, lasu al la popolo de Yan memdecidi pri si je la starigo de ilia regnestro kaj poste retiriĝu. Nur per tio haltigeblus la kontratako.”³¹ ,

19 [1B12]

鄒與魯鬪。穆公問曰：「吾有司死者三十三人，而民莫之死也。誅之，則不可勝誅；不誅，則疾視其長上之死而不救，如之何則可也？」

孟子對曰：「凶年饑歲，君之民老弱轉乎溝壑，壯者散而之四方者，幾千人矣；而君之倉廩實，府庫充，有司莫以告，是上慢而殘下也。曾子曰：『戒之戒之！出乎爾者，反乎爾者也。』夫民今而後得反之也。君無尤焉。君行仁政，斯民親其上、死其長矣。」

Okazis konflikto inter Zou-lando kaj Lu-regno.³² La duko Mu de Zou demandis, dirante: “Dum miaj oficistoj mortis 33, inter popolanoj-soldatoj tamen ne estis mortintoj. Mi volus akuzi ilin, sed neakuzablas pro la multeco. Se ne akuzi, ili malatentos la morton de siaj suprujoj kaj ne savos ilin. Kion mi devas fari?”

³¹ Yoshida Shoin rimarkis al tiu teksto jene: “Nunaj regnestroj devus honti pri si, kiam ili atingis tiun ĉapitron ĉe la legado de Mencio.” [講孟餘話 63]

³² Zou-lando estas hejmloko de Mengzi. Antaŭa nomo estis Zhu 邾, poste en la epoko de Milit-landoj la nomo ŝanĝiĝis en Zou.

Mengzi respondis: “En la jaroj de sterilego kaj malsatego, olduloj kaj malfortuloj inter via popolo mortis survoje en fosaĵoj aŭ kloakoj, kelkmiloj da plenaĝuloj dispelis sin en kvar direktojn. Sed plenaj estis la grenejo kaj la tenejo de Via Moŝto, neniu el oficistoj raportis vin pri tio. Tiel do la supro estis aroganta kaj kruela al la subo. Zengzi diris: ‘Estu singarda, estu singarda! Kio eliras de vi, tio returnos al vi.’³³ La popolanoj estas nun returnantaj por repagi. Ne riproĉu, Via Lorda Moŝto! Se vi farus bonvolecan politikon, la popolo iĝus intima al la supro kaj preta je sia morto por siaj estroj.”

20 [1B13]

滕文公問曰：「滕，小國也，間於齊楚。事齊乎？事楚乎？」

孟子對曰：「是謀非吾所能及也。無已，則有一焉：鑿斯池也，築斯城也，與民守之，效死而民弗去，則是可為也。」

Duko Wen de Teng-lando demandis, dirante: “Teng estas malgranda lando, situanta inter Qi kaj Chu regnoj. Al kiu regno ĝi devas servi, Qi aŭ Chu?”³⁴

Mengzi respondis: “Tio estas ja demando, pri kiu mi ne estas kompetenta respondi. Se neeviteble, mi havus nur unu respondon – konstrui ĉirkaŭfoson, munti remparon, gardi ilin kune kun la popolo. Ke la popolo ne foriru de vi eĉ se mortus, jen tio farendas al vi.

21 [1B14]

滕文公問曰：「齊人將築薛，吾甚恐。如之何則可？」

孟子對曰：「昔者大王居邠，狄人侵之，去之岐山之下居焉。非擇而取之，不得已也。苟為善，後世子孫必有王者矣。君子創業垂統，為可繼也。若夫成功，則天也。君如彼何哉？疆為善而已矣。」

La duko Wen de Teng demandis, dirante: “Qi-regnanoj ĝuste konstruis la urbon Xue, mi ege timas. Kion mi devas fari?”³⁵

Mengzi respondis: “Antikve la Granda reĝo loĝis en Bin. Kiam la tribo Di invadis tien, la reĝo translokiĝis al la piedo de la monto Zhi neeviteble sen alia alternativo. Kiu

³³ Zengzi estas unu el disĉiploj de Konfuceo kaj ankaŭ Mencio apartenas al lia skolo.

³⁴ Teng estas nuna Tengzhou de la urbo Zaozhuang en Shangdong provinco. La unua feŭdita landestro Cuo Shuxiu 錯叔綉 estis unu el filoj de la reĝo Wen, fondinto de Zhou-dinastio. En 414 a. K. ĝi estis unufoje pereigita de Yue, kaj baldaŭ revivis, sed poste pereigita de Song-regno.

³⁵ Xue situas en nuna Zaozhuang. Fama Meng Cangjun 孟嘗君 posedis la urbon Xue, kie kolektiĝis multaj talentuloj.

faras bonon, el ties posteuloj nepre aperos imperiestro.³⁶ Noblulo komencas la aferon kaj heredigas la tradicion por daŭrigi. La sukceso dependas de la Ĉielo. Kio al vi estas farebla rilate Qi? Nur strebu forte fari la bonon.

22 [1B15]

滕文公問曰：「滕，小國也。竭力以事大國，則不得免焉。如之何則可？」

孟子對曰：「昔者大王居邠，狄人侵之。事之以皮幣，不得免焉；事之以犬馬，不得免焉；事之以珠玉，不得免焉。乃屬其耆老而告之曰：『狄人之所欲者，吾土地也。吾聞之也：君子不以其所以養人者害人。二三子何患乎無君？我將去之。』去邠，踰梁山，邑于岐山之下居焉。邠人曰：『仁人也，不可失也。』從之者如歸市。或曰：『世守也，非身之所能為也。效死勿去。』君請擇於斯二者。」

La duko Wen de Teng demandis, dirante: “Teng estas malgranda lando. Spite ke ĝi servas tutforte al grandaj regnoj, restas vane. Kion mi devas fari?”

Mengzi respondis: “Antikve la Granda reĝo logis en Bin, la tribo Di invadis tien. Li servintus al Di per donaco de peltoj kaj ŝtofoj, sed vane; provis donaci hundojn kaj ĉevalojn, sed vane; provis donaci perlojn kaj jadojn, sed vane. Li kunvokis siajn patriarkojn kaj diris: ‘Di-anoj deziras havigi al si nian landon. Mi aŭdis, ke reĝo ne devas viktimitigi siajn homojn pro sia alteniĝo al nutrilo de homoj.’³⁷ Kio do ĝenos vin eĉ se ne estus reĝo? Mi nun foriros de ĉi-tie.’ Forlasinte la urbon Bin, li transiris monton Liang, kaj translokiĝis al la piedo de la monto Zhi. Homoj de Bin diris: ‘Li estas bonvolemulo, do ni ne devas perdi lin’, kaj ili sekvis lin grandnombre kvazaŭ ili turnus sin kure al foiro. Aŭ troviĝas iu, kiu diras: ‘La landon, heredatan de generacioj, mi mem ne povas perdi, eĉ se mi mortus, mi ne devas forlasi.’ Jen la alternativo, Via Moŝto, elektu unu el tiuj du.”

23 [1B16]

魯平公將出。嬖人臧倉者請曰：「他日君出，則必命有司所之。今乘輿已駕矣，有司未知所之。敢請。」公曰：「將見孟子。」曰：「何哉？君所為輕身以先於匹夫者，以為賢乎？禮義由賢者出。而孟子之後喪踰前喪。君無見焉！」公曰：「諾。」

樂正子入見，曰：「君奚為不見孟軻也？」曰：「或告寡人曰，『孟子之後喪踰前喪』，是以不往見也。」曰：「何哉君所謂踰者？前以士，後以大夫；前以三鼎，而後以五鼎與？」曰：「否。謂棺槨衣衾之美也。」曰：「非所謂踰也，貧富不同也。」

³⁶ La historio de Zhou-dinastio estis bona modelo por malgrandaj landoj. Eĉ se ĝi perdis unufoje la teritorion pro la invado de barbaroj, ĝi kreskis poste kiel la granda imperio. Mencio montras idealan tipon de Granda reĝo kiel kondukti en malfavora kondiĉo.

³⁷ Nutrilo de homoj signifas ĉi tie la teron.

樂正子見孟子，曰：「克告於君，君為來見也。嬖人有臧倉者沮君，君是以不果來也。」曰：「行或使之，止或尼之。行止，非人所能也。吾之不遇魯侯，天也。臧氏之子焉能使予不遇哉？」

La duko Ping de Lu-regno estis eliranta.³⁸ Iu favorato, nomata Zang Cang, dece demandis, dirante: “Via Moŝto, pri via elirado en pasinteco nepre estis antaŭsciate al oficistoj, sed nun vi ekiras per kaleŝo kien ne sciate al la oficistoj. Ĉu mi rajtus demandi kien?”³⁹

La duko diris: “Mi iras nun vidi Mengzi.”

Zang diris: “Kial do? Via Moŝto degnus tiel facile turni sin al iu nura simplulo, ĉu tio estas saĝa? De saĝeco venas decreguloj kaj justo. Mengzi okazigis la lastan funebbron por sia patrino multe pli lukse ol la antaŭan por sia patro. Via Moŝto, ne vidu lin?”

La duko diris: “Konsentite.”

Yuezhengzi eniris, vidante la dukon, diris: “Via Moŝto, kial vi ne vidas Meng Ke?”⁴⁰

La duko diris: “Iu diris al mi, ke Mengzi okazigis la lastan funebbron pli lukse ol la antaŭan kontraŭ decreguloj, do mi ne iris vidi lin.”

Li diris: “Kial vi konsideris tion devojiĝa? Li funebbris la antaŭan, kiel nura oficisto, sed la lastan, kiel grandoficisto – antaŭe kun tri pladoj, poste kun kvin pladoj por oferado, ĉu ne?”⁴¹

La duko diris: “Ne. Temas pri lukseco de interna kaj ekstera ĉerkoj kaj beleco de vestaĵoj.”

Li diris: “Tio ne signifas la devojiĝon, sed signifas nur la malsamecon laŭ tempo, riĉa aŭ malriĉa.”

Yuezhengzi vidis Mengzi kaj diris: “Mi persvadis la regnestron, ke li renkontu vin. Sed la favorato, nomata Zang Cang, malhelpis, tial do li ne sukcesis veni al vi.”

Mengzi diris: “Kio iras, tion lasu iri; kio haltas, tion lasu halti. Iri aŭ halti – tio ne dependas de homa kapablo. Ke mi ne renkontis la markizon Lu, tio dependis de la Ĉielo.⁴² Kiel do iu filo de Zang-klano povus igi nin ne renkonti?”

³⁸ La duko Ping estis surtrone 316-297 a. K.

³⁹ Biren 嬖人 – favorata konkubino aŭ eŭnuko.

⁴⁰ Yuezhengzi estas unu el disĉiploj de Mengzi. Ke 克 estas lia nomo.

⁴¹ Plado estas por oferaĵoj de dombestoj, kiel porkoj kaj ŝafoj. Laŭ rangoj de funebrantoj diversas nombroj de pladoj – tri por oficisto, kvin por grandoficisto. Laŭ ĉi tiu teksto 前以士後以大夫 iuj esploristoj supozas, ke la patro mortis, kiam Mencio estis plenkreskulo, ĉar kiel oficisto 士. Mi konjektas, ke lia patro mortis kiam Mencio estis infano.

⁴² Laŭ Yoshida Shoin, tiu frazo estas ĵuro de Mencio al la Ĉielo, ke homoj devas fari tion, kio estas komisiita al ili. Homo proponas, Dio disponas. Jen en tio kuŝas la signifo de la Ĉiela ordono. Ke Shoin lekcias pri Mencio en la malliberejo, tio estas la praktiko de justo por li. [講孟餘話:70-71]

《公孫丑上》

GONGSUN CHOU (I)

1 [2A1]

公孫丑問曰：「夫子當路於齊，管仲、晏子之功，可復許乎？」

孟子曰：「子誠齊人也，知管仲、晏子而已矣。或問乎曾西曰：『吾子與子路孰賢？』曾西蹴然曰：『吾先子之所畏也。』曰：『然則吾子與管仲孰賢？』曾西艱然不悅，曰：『爾何曾比予於管仲？管仲得君，如彼其專也；行乎國政，如彼其久也；功烈，如彼其卑也。爾何曾比予於是？』曰：「管仲，曾西之所不為也，而子為我願之乎？」

曰：「管仲以其君霸，晏子以其君顯。管仲、晏子猶不足為與？」

曰：「以齊王，由反手也。」

曰：「若是，則弟子之惑滋甚。且以文王之德，百年而後崩，猶未洽於天下；武王、周公繼之，然後大行。今言王若易然，則文王不足法與？」

曰：「文王何可當也？由湯至於武丁，賢聖之君六七作。天下歸殷久矣，久則難變也。武丁朝諸侯有天下，猶運之掌也。紂之去武丁未久也，其故家遺俗，流風善政，猶有存者；又有微子、微仲、王子比干、箕子、膠鬲皆賢人也，相與輔相之，故久而後失之也。尺地莫非其有也，一民莫非其臣也，然而文王猶方百里起，是以難也。齊人有言曰：『雖有智慧，不如乘勢；雖有鎡基，不如待時。』

「今時則易然也。夏后、殷、周之盛，地未有過千里者也，而齊有其地矣；雞鳴狗吠相聞，而達乎四境，而齊有其民矣。地不改辟矣，民不改聚矣，行仁政而王，莫之能禦也。且王者之不作，未有疏於此時者也；民之憔悴於虐政，未有甚於此時者也。飢者易為食，渴者易為飲。孔子曰：『德之流行，速於置郵而傳命。』當今之時，萬乘之國行仁政，民之悅之，猶解倒懸也。故事半古之人，功必倍之，惟此時為然。」

Gongsun Chou demandis, dirante: “Majstro, se vi okupus iun altan postenon en Qi-regno, ĉu tiuokaze vi povus restaŭri la meriton fare de Guan Zhong kaj Yanzi?”

Mengzi diris: “Vi estas ja vere Qi-ano, vi scias nur Guan Zhong kaj Yanzi. Iu demandis Zeng Xi, dirante: ‘El inter vi kaj Zilu, kiu do estas pli saĝa?’ Zeng Xi konsternite diris humile: ‘Eĉ mia patro profunde respektis Zilu.’ Li demandis plu: ‘Tiel do, inter vi kaj Guang Zhong, kiu do estas pli saĝa?’ Zeng Xi kun vizaĝkoloro ŝanĝita malagrabis, dirante: ‘Kial vi komparas min kun Guan Zhong? Ricevinte reĝan konfidon, Guan Zhong okupis sin je la ŝtataferoj kiel la unuavlo, administris dumlonge la regnan politikon, hastis por merito kiel maldeca avidulo. Kial vi komparas min kun li?’ Mengzi diris plue: “Guan Zhong estas tia figuro, kiun Zeng Xi ne estimis. Ĉu vi dezirus, ke mi fariĝu tia?”⁴³

⁴³ Gongsun Chou estas unu el disĉiploj de Mengzi. Guang Zhong estas fama ĉefministro

Gongsun Chou diris: “Guan Zhong faris la reĝon hegemono, Yanzi faris la reĝon brile elstara. Ĉu al Guan Zhong kaj al Yanzi mankas io?”

Mengzi diris: “Fari Qi-regnon monda reĝo estas ja tiel facile kiel turni la manon.”

Gongsun Chou diris: “Se tiel, mi kiel via disĉiplo, sentas grandan perplekson. Ĉar eĉ kun virto de la reĝo Wen, mortinta post cent-jaraĝa, ankoraŭ ne regeblis la tuta mondo, – nur post kiam la reĝo Wu kune kun la duko Zhou heredis lin, la granda afero estis efektivigita. Vi nun diras, ke fariĝi la monda reĝo estas facile, ĉu tio signifas, ke la reĝo Wen ne estas sufiĉa kiel modelo?”⁴⁴

Mengzi diris: “Kiel estus adaptebla la kazo de la reĝo Wen? De Tang ĝis Zhou tra Wu Ding estis surtrone ses-sep reĝoj saĝaj kaj sankaj. Dum longe la mondo estis regata de Yin-dinastio, kaj estis malfacile ŝanĝiĝi dum longe. Wu Ding tributigis landestrojn kaj posedis la mondon, manipulante kvazaŭ sur sia manplato. Post Wu Ding pasis ne longe, ĝiskiam venis Zhou-tirano kaj foriris. Ankoraŭ restis malnova familio, bona moro, bona komunikado de la supro-subo, kaj kutimoj de bona administrado.⁴⁵ Aldone estis personoj, kiel Weizi, Wei Zhong, Princo Bigan, Jizi, Jiao Ge – ĉiuj estis saĝuloj, kune asistantaj longe al Zhou, kiu poste perdis ilin.⁴⁶ Estis neniu terpeco, kiu ne aparternas al tiu Zhou, estis neniu popolano, kiu ne submetiĝas al li. La reĝo Wen komencis leviĝi kun sia teritorio je cent *li*oj kvadrato, do estis malfacile rivali. Inter Qi-anoj oni parolas: ‘Eĉ se al inteligento, ne eblas oponi kontraŭ la fluo; eĉ se kun bonaj kultiviloj, ne eblas ne atendi la tempon.’

En nuna tempo estas pli facile. Ĉe dinastioj de Xia, Yin kaj Zhou, eĉ la plej granda teritorio estis nur pli ol mil *li*oj kvadrato. Nun Qi-regno jam posedas la tioman teritorion. Estas dirite, ke krioj de kortobirdoj kaj bojoj de hundoj, bredataj de popolo, atingas senĉese landlimojn de kvar direktoj. Nun unu Qi-regno jam regas la tioman popolon. Sen ekspluati nove terojn, sen kolekti nove popolojn, kiu ajn faras bonvolecan politikon, tiu fariĝos imperiestro, kaj nenio povos deteni tion. Plie, tia epoko, kiam mankas imperiestro kiel nun, troviĝas en la historio malofte, kaj tia epoko, kiam popoloj laĉiĝis

ĉe la duko Huan de Qi-regno. Yanzi estas fama ĉefministro ĉe la duko Jing de Qi-regno. Zeng Xi estas filo de Zeng Shen 曾參.

⁴⁴ La reĝo Wen estas patro de la reĝo Wu, fondinto de Zhou-dinastio. La duko Zhou 周公 estas juna frato de la reĝo Wu.

⁴⁵ 故家遺俗, 流風善政 Yoshida Shoin taksis tiujn 4 elementojn kiel plej fidindajn por konservi la stabilan regnon. [講孟餘話 76-77] Laŭ Shoin, “流風” signifas komunikadon de supro al subo.

⁴⁶ Tang estas la fondinto de Yin-dinastio, kies lasta reĝo estas tirano Zhou. Wu Ding, alinome Gaozong 高宗, estas filo de Xiao Yi 小乙, juna frato de Pan Geng 盤庚. Weizi estas pli aĝa frato de Zhou, Wei Zhong estas juna frato de Weizi. Bigan estas onklo de Zhou, ankaŭ Jizi estas onklo de Zhou. Jiao Ge estas ministro ĉe Zhou.

pro kruela politiko kiel nun, troviĝas malofte en la historio. Kiu malsatas, povas esti facile tentata per manĝaĵo; kiu soifas, povas esti facile tentata per trinkaĵo. Konfuceo diris: 'Virto propagiĝas tiel rapide, kiel poŝta kuriero.' Aparte nuntempe, se uu granda regno kun dekmil militĉaroj farus bonvolecan politikon, popoloj ekĵojegus je tio, kvazaŭ liberigite el de la pendigilo kun kapo malsupren. Eĉ se la afero estus plenumata nur duone kompare kun antikvuloj, tamen la merito nepre duobliĝus, farate en la nuna tempo."

2 [2A2]

公孫丑問曰：「夫子加齊之卿相，得行道焉，雖由此霸王不異矣。如此，則動心否乎？」

孟子曰：「否。我四十不動心。」

曰：「若是，則夫子過孟賁遠矣。」

曰：「是不難，告子先我不動心。」

曰：「不動心有道乎？」

曰：「有。北宮黝之養勇也，不膚撓，不目逃，思以一豪挫於人，若撻之於市朝。不受於褐寬博，亦不受於萬乘之君。視刺萬乘之君，若刺褐夫。無嚴諸侯。惡聲至，必反之。孟施舍之所養勇也，曰：『視不勝猶勝也。量敵而後進，慮勝而後會，是畏三軍者也。舍豈能為必勝哉？能無懼而已矣。』孟施舍似曾子，北宮黝似子夏。夫二子之勇，未知其孰賢，然而孟施舍守約也。昔者曾子謂子襄曰：『子好勇乎？吾嘗聞大勇於夫子矣：自反而不縮，雖褐寬博，吾不憚焉；自反而縮，雖千萬人，吾往矣。』孟施舍之守氣，又不如曾子之守約也。」

曰：「敢問夫子之不動心，與告子之不動心，可得聞與？」

「告子曰：『不得於言，勿求於心；不得於心，勿求於氣。』不得於心，勿求於氣，可；不得於言，勿求於心，不可。夫志，氣之帥也；氣，體之充也。夫志至焉，氣次焉。故曰：『持其志，無暴其氣。』」

「既曰『志至焉，氣次焉』，又曰『持其志無暴其氣』者，何也？」

曰：「志壹則動氣，氣壹則動志也。今夫蹶者趨者，是氣也，而反動其心。」

「敢問夫子惡乎長？」

曰：「我知言，我善養吾浩然之氣。」

「敢問何謂浩然之氣？」

曰：「難言也。其為氣也，至大至剛，以直養而無害，則塞于天地之間。其為氣也，配義與道；無是，餒也。是集義所生者，非義襲而取之也。行有不慊於心，則餒矣。我故曰，告子未嘗知義，以其外之也。必有事焉而勿正，心勿忘，勿助長也。無若宋人然：宋人有閔其苗之不長而揠之者，芒芒然歸。謂其人曰：『今日病矣，予助苗長矣。』其子趨而往視之，苗則槁矣。天下之不助苗長者寡矣。以為無益而舍之者，不耘苗者也；助之長者，揠苗者也。非徒無益，而又害之。」

「何謂知言？」

曰：「諛辭知其所蔽，淫辭知其所陷，邪辭知其所離，遁辭知其所窮。生於其心，害於其政；發於其政，害於其事。聖人復起，必從吾言矣。」

「宰我、子貢善為說辭，冉牛、閔子、顏淵善言德行。孔子兼之，曰：『我於辭命則不能也。』然則夫子既聖矣乎？」

曰：「惡！是何言也？昔者子貢、問於孔子曰：『夫子聖矣乎？』孔子曰：『聖則吾不能，我學不厭而教不倦也。』子貢曰：『學不厭，智也；教不倦，仁也。仁且智，夫子既聖矣！』夫聖，孔子不居，是何言也？」

「昔者竊聞之：子夏、子游、子張皆有聖人之一體，冉牛、閔子、顏淵則具體而微。敢問所安。」

曰：「姑舍是。」

曰：「伯夷、伊尹何如？」

曰：「不同道。非其君不事，非其民不使；治則進，亂則退，伯夷也。何事非君，何使非民；治亦進，亂亦進，伊尹也。可以仕則仕，可以止則止，可以久則久，可以速則速，孔子也。皆古聖人也，吾未能有行焉；乃所願，則學孔子也。」

「伯夷、伊尹於孔子，若是班乎？」

曰：「否。自有生民以來，未有孔子也。」

曰：「然則有同與？」

曰：「有。得百里之地而君之，皆能以朝諸侯有天下。行一不義、殺一不辜而得天下，皆不為也。是則同。」

曰：「敢問其所以異？」

曰：「宰我、子貢、有若智足以知聖人。汙，不至阿其所好。宰我曰：『以予觀於夫子，賢於堯舜遠矣。』子貢曰：『見其禮而知其政，聞其樂而知其德。由百世之後，等百世之王，莫之能違也。自生民以來，未有夫子也。』有若曰：『豈惟民哉？麒麟之於走獸，鳳凰之於飛鳥，太山之於丘垤，河海之於行潦，類也。聖人之於民，亦類也。出於其類，拔乎其萃，自生民以來，未有盛於孔子也。』」

Gongsun Chou demandis, dirante: “Se vi, Majstro, nomumite kiel ĉefministro, povus praktiki la Vojon, tiam ne strange estus, ke via reĝo povu fariĝi majesta hegemono. Se tiel, vi estus emociota je via koro aŭ ne?”

Mengzi diris: “Ne. Mi tenas mian koron senmova ekde kvardek-jaraĝa.”

Gongsun Chou diris: “Tiuokaze, vi, Majstro, multe superis herkulon Meng Ben.”

Mengzi diris: “Tio ne malfacilas. Gaozi atingis la senmovan koron pli frue ol mi.”

Gongsun Chou diris: “Ĉu estas ia rimedo por atingi la senmovan koron?”⁴⁷

Mengzi diris: “Jes, estas. Beigong You havigis al si tian sen-timan kuraĝon ne

⁴⁷ Meng Ben estis bravulo de Wei 衛. Gaozi [不害] estis lernanto de Mozi kaj samtempulo de Mengzi.

ektremitate nek palpebrumi fiksrigardate. Li prenis la tiradon de sia unu hareto fare de la alia homo kiel la punskurĝon sur merkato. Li ne ŝatis ricevi ian ajn ofendon ĉu de ĉifona vulgareco, ĉu de reĝo kun dek mil militĉaroj. Li same fiksrigardis tute egale ĉu reĝon de dek mil militĉaroj aŭ nuran ĉifonulon.⁴⁸ Li ne timis landestrojn. Al ĉiu, kiu ajn ofendis lin, li nepre kontratakis. Mengshi She havigis al si la alian kuraĝon, esprimitan en jena frazo: ‘Mi observas malvenkon samkiel venkon. T. e. nur postkiam kalkulas fortecon de malamiko, mi ekmovas min; konvinkite tamen je la certa venko, mi ekbatalas. Tio estas pro la timo alfronti rekte Tri armeojn. Kiel mi povas nepre venki? Ĉar mi nur povas nenigi la kaŭzon de timo.’

Mengshi She similas al Zengzi, Beigong You similas al Zixia.⁴⁹ Mi ne scias, kiu el tiuj du tipoj estas supera je kuraĝo. Sed firme tenebla estas tio de Mengshi She. Iam antaŭe Zengzi parolis al Zi Xiang, dirante: ‘Ĉu vi ŝatas kuraĝon? Mi aŭdis la Majstron diranta pri la granda kuraĝo, ke tio estas – <Se memobservante introspekte min malprava, mi devus time tremeti eĉ antaŭ ĉifonulo, sed memobservante intorspekte min vere prava, mi antaŭeniros eĉ kontraŭ milojn da homoj.>’ Mengshi She tenis Ĉjion [animenergion] grava, sed tio ankoraŭ ne superas pli ol Zengzi tenis la konvinkon firma.

Gongsun Chou diris: “Permesu al mi demandi vin pri ‘senmova koro’, kia diferenco estas inter via kaj de Gaozi? Ĉu mi povus aŭdi?”

(Mengzi diris): “Gaozi diris, ke ne serĉu al koro tion, kio ne akireblas per vortoj; ne serĉu al Ĉjio tion, kio ne akireblas al koro.” Laŭ mia opinio, kvankam estas bone ne serĉi al Ĉjio tion, kio ne akireblas al koro, tamen estas malbone ne serĉi al koro tion, kio ne akireblas per vortoj. La aspiro de koro estas mastro de Ĉjio, kaj la Ĉjio pleniĝas en la korpo. La kora aspiro estas la plej grava, kaj la Ĉjio estas la dua. Do estas dirite: ‘Tenu la koran aspiro, ne lasu Ĉjion arbitra.’”

Gongsun Chou diris: “Vi diras, ke la kora aspiro estas la plej grava, kaj la Ĉjio estas la dua, kaj diras, ke tenu la koran aspiro sed ne lasu Ĉjion arbitra. Kion tio signifas?”

Mengzi diris: “La kora aspiro, farate la unua, movas la Ĉjion, sed la Ĉjio, farate la unua, movas la koran aspiro. Kiu igas onin stumbli kaj hasti, tiu estas Ĉjio. Ĝi kontraŭe ja movas la koron.”

Gongsun Chou diris: “Permesu al mi demandi vin, Majstro, kion fari estas pli bone?”

⁴⁸ La vorton 視刺 multaj esploristoj prenas kiel “mortigi”, sed mi prenas tiun vorton kiel “rigardi kvazaŭ pikante”.

⁴⁹ Pri Beigong You kaj Mengshi She estis sciate malmulte. La unua estis Qi-regnanto. Zengzi kaj Zixia estis disĉiploj de Konfuceo. La unua estis supozata la verkisto de la Sutro de Fila Pietato 孝經, la dua rigardis la formon de decreguloj grava. Zi Xiang estas disĉiplo de Zengzi.

Mengzi diris: “Al mi gravas scii vortojn kaj al mi bone estas doni al ni nutri *Ĉjion*, vastaniman kaj grandampleksan.”

Gongsun Chou diris: “Bonvolu diri al mi, kio estas la vasta kaj vastanima *Ĉjio*?”

Mengzi diris: “Estas malfacile esprimi ĝin per unu vorto. Ĝi faras *Ĉjion* plej granda kaj plej firma, kaj nutras rekte sen ajna damaĝo, kaj plenigas spacon inter la Ĉielo kaj la teron. Ĝi faras la *Ĉjion* konforma kun la justo laŭ la Vojo. Sen ĉi tiu oni laciĝas vane. Ĝi estiĝas ĉe la interne akumulita justo, ne per la akirado de ekstere. Kiu sentas ion misharmonian je sia konduto en la koro, tiu laciĝas vane.⁵⁰ Do mi diras, ke Gaozi ankoraŭ ne scias juston, konsiderante ĝin io ekstera.⁵¹ Kiam ekstaras iu afero, ne atendu tujan sukceson, ne forgesu nepre en la koro, por ke ne helpu kreskigi ĝin haste. Ne estu tia, samkiel Song-landano en la jena epizodo.

Iu Song-landano sentis sin maltrankvila, ke plantido ne kreskas, kaj plistreĉis la plantidon supren. Reveninte hejmen tute laca, li diris: ‘Hodiaŭ mi ege laciĝis, ke mi helpis al la plantido kreski.’ Lia filo haste ekiris tien, kaj vidis la plantidon tute velkinta. En la mondo troviĝas ne malmulte da helpantaj al plantido kreski, aŭ tiu, kiu konsideras tion senutila kaj lasas spontane kreski, tute ne sarkante herbaĉon nek erpante. Eltiri la plantidon, dezirante helpi ties kreskigon, – estas ne nur senutile, sed malutile por ĝi.”

Gongsun Chou demandis: “Kion signifas tio, ke vi scias vortojn?”

Mengzi diris: “Tio estas scii ion kaŝitan en senekvilibras vortoj, scii faltruon en malĉastaj vortoj, scii disocion en maljustaj vortoj, scii seneliron en elturniĝemaj ĉikanaj vortoj. Naskiĝinte en la koro, tiuj vortoj malhelpas al la politiko. Aperante en la sfero de politiko, ili damaĝas la aferojn. Se sanktuloj releviĝus, ili nepre sekvos kion mi parolas.”

Gongsun Chou diris: “Zaiwo, Zigong estis lertaj je bona konduto kaj parolado, Ranniu, Minzi, Yanyuan estis lertaj je bonaj vortoj kaj je virta konduto. Al Konfuceo apartenis ambaŭ bonaĵoj, sed li diris: ‘Mi ne kapablas je la parolado de vortoj.’ Majstro, kun scio de vortoj, vi jam estas sankta, ĉu ne?”

Mengzi diris: “Tute ne! Kion vi diras? Antaŭe iam Zigong demandis Konfuceon, dirante: ‘Vi, Majstro, estas sankta, ĉu ne?’ – Konfuceo diris: ‘Mi ne kapablas fariĝi sankta, mi nur lernas sen enue kaj instruas sen lace.’ – Zigong diris: ‘Lerni sen enue estas ja intelekto, instrui sen lace estas ja bonvoleco. Kun bonvoleco kaj intelekto, vi,

⁵⁰ *Ĉjio* – laŭ ĉina-esperanto vortaro de Wang Chongfang, “abstrakta koncepto rilatanta al la homa subjektiva spirito aŭ la plej elementa substanco en la universo, (laŭ ĉina medicino) vitala energio [forto]; vitala spiro. Mengzi uzas la terminon en la senco de la unua parto “subjektiva spirito”. *Vastanima Ĉio* 浩然之氣 estas la termino speciala por esprimi la animstaton, movantan personon libere kaj aktive al alta celo.

⁵¹ Vidu la saman argumenton en la sesa ĉapitro 6A4. Gaozi rigardas juston estanta ekstere de koro.

Majstro, estas jam sankta! Koncernante nomi sin sankta, ne jesis eĉ Konfuceo, ĉu mi havas ion diri por mi mem?”

Gongsun Chou diris: “Mi aŭdis iam, ke Zixia, Ziyou, Zizhang, ĉiu el ili havis unu parton de sankteco, kaj Ranniu, Minzi, Yanyuan havigis al si tuton de sankteco po malmulte. Permesu min demandi, al kiu vi similas?”

Mengzi diris: “Lasu tiun temon flanken.”

Gongsun Chou demandis: “Pri Bo Yi kaj Yi Yin, kian opinion vi havas?”

Mengzi diris: “Ilia vojo malsamas ol mia. Kiu ne servas al la estro, ne identa kun sia idealo, ne uzas la popolon, ne identan kun sia idealo, antaŭen iras se en ordo, retiriĝas se en malordo – tiu estas Boyi. Kiu servas ajnan estron, eĉ malbonan, uzas ajnan popolon, eĉ malbonan, antaŭen iras ajnokaze, ĉu en ordo ĉu en malrodo – tiu estas Yi Yin. Kiu servas, se servenda, haltas, se haltenda, daŭrigas, se daŭrigenda, rapidas, se rapidenda je decido retiriĝi – tiu estas Konfuceo. Ĉiuj estas antikvaj sanktuloj, mi ankoraŭ ne kapablas konduti tiel, sed mi esperas lerni Konfuceon.”

Gongsun Chou diris: “Ĉu Bo Yi kaj Yi Yin egalas al Konfuceo je la klasifiko?”

Mengzi diris: “Ne. El inter naskiĝintaj ĝis nun popolanoj, neniu estas komparebla kun Konfuceo.”

Gongsun Chou demandis: “Ĉu troviĝas iu sameco inter menciitoj?”

Mengzi diris: “Jes. Ili, estante nur en la teritorio je cent *li*oj kvadrato, servis la estron, kaj ĉiuj povis venigi landestrojn tributi al sia reĝo kaj regis la mondon. Sen fari eĉ unu maljuston, sen mortigi eĉ unu nekulpan, ili ĉiuj prenis la mondon – jen tio estas la sameco.”

Gongsun Chou demandis: “Ĉu mi povus demandi pri la malsameco?”

Mengzi diris: “Zaiwo, Zigong, Youruo estis sufiĉe saĝaj por rekoni la sanktan, almenaŭ ili ne povis flati al sia ŝatato. Zaiwo diris: ‘Mi observas la Majstron kaj trovis lin multe pli saĝa ol Yao-Shun.’ Zigong diris: ‘Vidante liajn decregulojn, sciante lian politikon, aŭdante lian muzikon, sciante lian virton, mi povas diri sen erare, ke ekde naskiĝo de popolanoj ĝis cent generaciojn poste de nun, kaj post cent generacioj da reĝoj, ne aperos tia persono, egala al la Majstro.’ Youruo diris: ‘Ĉu li estus nura popolano? Al sama klasifiko apartenus unukornulo kaj kurantaj bestoj, fenikso kaj flugantaj birdoj, Taishan kaj montetoj, maro kaj riveretoj, kaj al sama klasifiko apartenus sanktuloj kaj popoloj, sed tamen je la sama klasifiko estas iu eminenta el eminentaj, elstaranta el elstaraj, kiun neniu el naskiĝintaj popoloj pli superas – tiu estas Konfuceo.’”

3 [2A3]

孟子曰：「以力假仁者霸，霸必有大國，以德行仁者王，王不待大。湯以七十里，文王以百里。」

以力服人者，非心服也，力不贍也；以德服人者，中心悅而誠服也，如七十子之服孔子也。《詩》云：『自西自東，自南自北，無思不服。』此之謂也。」

Mengzi diris: “Kiu pere de forto ŝajnis sin bonvolema – tiu estas superreganto, hegemoniulo. La hegemoniulo nepre posedas la grandan regnon. Kiu pere de virto faras bonvolecan regadon – tiu estas vera reĝo. Povas esti la vera reĝo sen granda teritorio, Tang ekregis sepdek *liojn* kvadrato, la reĝo Wen – cent *liojn* kvadrato. Kiu obeigas homojn pere de forto, ne povas igi ilin obei elkore, ĉar ne sufiĉas la forto. Kiu obeigas homojn pere de virto, al tiu oni obeas kun ĝojo elkore kaj sincere, samkiel sepdek disĉipuloj, sekvantaj al Konfuceo. En *Poezio* estas dirite: ‘El okcidento, el oriento, el sudo, el nordo, troviĝas neniuj, kiu ne volas obei.’⁵² Tio signifas la supre menciitan.”

4 [2A4]

孟子曰：「仁則榮，不仁則辱。今惡辱而居不仁，是猶惡溼而居下也。如惡之，莫如貴德而尊士，賢者在位，能者在職。國家閒暇，及是時明其政刑。雖大國，必畏之矣。《詩》云：『迨天之未陰雨，徹彼桑土，綢繆牖戶。今此下民，或敢侮予？』孔子曰：『為此詩者，其知道乎！能治其國家，誰敢侮之？』今國家閒暇，及是時般樂怠敖，是自求禍也。禍福無不自己求之者。《詩》云：『永言配命，自求多福。』《太甲》曰：『天作孽，猶可違；自作孽，不可活。』此之謂也。」

Mengzi diris: “Kun bonvoleco oni prosperas, sen bonvoleco estas hontigite. Kiu, kvankam hontigite, vivas tamen senbonvolece, similas al tiu, kiu, abomenante malsekecon, loĝas sube. Se tio ne plaĉus, estas preferinde estimi virton kaj respekti kleran personon, postenigi saĝulon kaj doni oficon al kompetentulo. Tiel do la ŝtato ĝuos la liberan tempon, dume estos bontenate klare je la politiko kaj la leĝaro. Tiun ŝtaton nepre respektite timas eĉ grandaj regnoj. Estas dirite en *Poezio*: ‘Dum ankoraŭ ne ekas pluvsezono en la Ĉielo, mi, kolektinte ŝelojn de morusarboj, plektas ilin por pretigi la neston likrezista. Kiu el suba popolo ĉi tie aŭdacus malestimi min?’⁵³ Konfuceo diris: ‘Versis la poemon ja tiu, kiu konas la Vojon! Kiu, kapabla je la ŝtatregado, aŭdacus malestimi tion?’ Se nun, dum la ŝtato havas liberan tempon, oni dronus en fia plezuro aŭ en pigreco, oni mem altiras al si la plagon. Ĉu plagon, ĉu feliĉon, senescepte oni mem altiras al si. Estas dirite en *Poezio*: ‘La eterna estas la vorto, asignita de la Ĉielo – <Kiom iu mem serĉas, tiom da feliĉo tiu ricevas.>’⁵⁴ Ankaŭ en *Tai Jia* estas dirite:

⁵² Citaĵo el 詩經, 大雅, 文王有声.

⁵³ Citaĵo el 詩經, 豳風, 鸛鳴.

⁵⁴ Citaĵo el 詩經, 大雅, 文王.

‘Malfeliĉo donita de la Ĉielo ankoraŭ estas evitebla, sed malfeliĉo memfarata ne estas travivebla.’⁵⁵ Tio signifas la supre menciitan.”

5 [2A5]

孟子曰：「尊賢使能，俊傑在位，則天下之士皆悅而願立於其朝矣。市廛而不征，法而不廛，則天下之商皆悅而願藏於其市矣。關譏而不征，則天下之旅皆悅而願出於其路矣。耕者助而不稅，則天下之農皆悅而願耕於其野矣。廛無夫里之布，則天下之民皆悅而願為之氓矣。信能行此五者，則鄰國之民仰之若父母矣。率其子弟，攻其父母，自生民以來，未有能濟者也。如此，則無敵於天下。無敵於天下者，天吏也。然而不王者，未之有也。」

Mengzi diris: “Kie oni respektas la saĝan, uzas la kapablan, enoficigas la elstaran – tien ĉiuj kleraj personoj de la mondo ĝojege dezirus direkti sin kaj turni sin. Kie sur merkato oni imputas al vendejo nur renton sed ne impostas al komercaĵoj, tie ĉiuj negocistoj de la mondo ĝojege dezirus malfermi komercejojn sur la merkato.⁵⁶ Kie ĉe la gardejo de landlimo oni inspektas sed ne impostas, tie ĉiuj turistoj de la mondo ĝojege dezirus vojaĝi la stratojn. Kie oni terkulturas helpe al la komuna terpeco por imposta devo sed ne bezonas pagi kroman imposton, tie ĉiuj kamparanoj ĝojege dezirus terkulturi sur la kampoj. Kie ne ekzistus impostoj, kiel rento, kapimposto kaj servuto, tien popoloj de la mondo ĝojege dezirus enmigri. Kiu povos efektivigi ĉi tiujn kvin politikojn, tiun la popoloj de najbaraj landoj rigardos kvazaŭ siajn gepatrojn. Post la apero de homoj neniu gvidanto ankoraŭ sukcesis igi gefilojn ataki gepatrojn. Tial do li estos senrivala en la mondo. Kiu estas senrivala en la mondo, estas la Ĉiela servanto. Li ne povas ne fariĝi la vera reĝo.”

6 [2A6]

孟子曰：「人皆有不忍人之心。先王有不忍人之心，斯有不忍人之政矣。以不忍人之心，行不忍人之政，治天下可運之掌上。所以謂人皆有不忍人之心者，今人乍見孺子將入於井，皆有怵惕惻隱之心。非所以內交於孺子之父母也，非所以要譽於鄉黨朋友也，非惡其聲而然也。由是觀之，無惻隱之心，非人也；無羞惡之心，非人也；無辭讓之心，非人也；無是非之心，非人也。惻隱之心，仁之端也；羞惡之心，義之端也；辭讓之心，禮之端也；是非之心，智之端也。人之有是四端也，猶其有四體也。有是四端而自謂不能者，自賊者也；謂其君不能者，賊其君者也。凡有四端於我者，知皆擴而充之矣，若火之始然，泉之始達。苟能充之，足以保四海；苟不充之，不足以事父母。」

⁵⁵ Tai Jia 太甲 estas titolo de unu el la ĉapitroj en Libro 尚書. Sama citaĵo en 離婁 4 上.

⁵⁶ 廛 Chan estas domgrundo difinita al nenobelo en urbo en la antikveco, aŭ domo de nenobelo. [Laŭ Wang Chongfang] Do mi prenas ĝin kiel renton al la grundo.

Mengzi diris: “Ĉiu homo havas la koron kompateman, ke al li estas neelteneble vidi la alian suferanta. Antaŭaj reĝoj, havante la koron neelteneble vidi alies suferon, okupis sin je la kompatema politiko neelteneble vidi homon suferanta. Se kun kompatema koro fari la kompateman politikon, tiam la mondo estus regata kvazaŭ ĝi glate turniĝus sur mane. Ĉar ĉiu homo havas al si la koron, ke neelteneblas vidi la alian suferanta, – vidante infaneton nun falonta en puton, ĉiu ajn ekavertas por savi ĝin kun la pura koro kompatema, ne pro tio, ke tiu havus la rilaton kun gepatroj de infaneto, nek pro tio, ke li volus esti laŭdota de samvilaĝanoj aŭ amikoj, nek pro tio, ke li timus malbonan voĉon el lia societo. Laŭ tia vidpunkto, kiu ne havus ĉe si koron de kompatemo, tiu ne estas homo. Kiu ne havas koron de honto je malbono, tiu ne estas homo. Kiu ne havas koron de humileco kaj cedemo, tiu ne estas homo. Kiu ne havas koron por distingi pravecon kaj malpravecon, tiu ne estas homo. La kompatema koro estas la komenco de bonvoleco, la koro de honto al malbono estas la komenco de justo, la humila koro de cedemo estas la komenco de dereguloj, la koro de distingo je praveco kaj malpraveco estas la komenco de intelekto. Persono havas ĉe si tiujn kvar fontojn same, kiel kvar membrojn de korpo. Se iu, havante la kvar fontojn, dirus, ke li mem ne povas kondukti laŭ ili, tiu degradas sin mem kanajlo. Kiu diras, ke sia estro ne kapablas kondukti laŭ ili, tiu damaĝas la estron. Kiu nur se rekonas, ke ĉiuj havas ĉe si la kvar fontojn, ĉiu povus vastigi kaj kreskigi ilin por igi la kvaropon plena, kvazaŭ fajro, ekbrulanta, kaj akvofonto, ekŝprucanta. Se oni povas plene etendi tiujn fontojn al la mondo, tiam teneblas la tuta mondo kun la kvar maroj en paco; se ne, ne eblas eĉ por servadi suface proprajn gepatrojn.”

7 [2A7]

孟子曰：「矢人豈不仁於函人哉？矢人唯恐不傷人，函人唯恐傷人。巫匠亦然，故術不可不慎也。孔子曰：『里仁為美。擇不處仁，焉得智？』夫仁，天之尊爵也，人之安宅也。莫之禦而不仁，是不智也。不仁、不智、無禮、無義，人役也。人役而恥為役，由弓人而恥為弓，矢人而恥為矢也。如恥之，莫如為仁。仁者如射，射者正己而後發。發而不中，不怨勝己者，反求諸己而已矣。」

Mengzi diris: “Ĉu sagofaristo estas malpli bonvoleca ol kirasofaristo? Sagofaristo timas nur, ke la fabrikaĵo ne povos vundi aliajn homojn, sed kirasofaristo timas nur, ke pro la fabrikaĵo povos vundiĝi la homoj, uzantaj ĝin. Same, kiel ili, diferencas la pensmaniero inter kuracisto kaj ĉerkofaristo. Do oni ne devas ne esti skrupula je la elektado de sia profesio. Konfuceo diris: ‘Estas bele vivi en bonvoleco. Estas saĝe elekti

loĝlokon bonvolecan.⁵⁷ Bonvoleco estas la honora posteno dotita de la Ĉielo, jen en kio estas la paca loĝejo por homoj. Nenio gardas nin bone krom bonvoleco kaj saĝo. Havante ne bonvolecon, nek saĝon, nek decregulojn, nek juston, homo restas sklavo. La sklavo hontas je sia laboro, samkiel arkofaristo hontas je sia fabriko de pafarkoj kaj sagofaristo hontas je sia fabriko de sagoj. Se iu tiel hontas, al li estas fari nenion pli bone ol fari ion bonvolecan. Bonvoleculo similas al la pafarkisto, kiu, tenante sin rekta je la pozicio, ekpafas. Eĉ se ne trafus la pafita de li, li ne malbenas la venkinton, sed nur introspekte serĉas la kaŭzon en si mem.”

8 [2A8]

孟子曰：「子路，人告之以有過則喜。禹聞善言則拜。大舜有大焉，善與人同。舍己從人，樂取於人以為善。自耕、稼、陶、漁以至為帝，無非取於人者。取諸人以為善，是與人為善者也。故君子莫大乎與人為善。」

Mengzi diris: “Zilu tre ĝojis, kiam oni avertis al li pri lia eraro. Yu respekte klinis sin, kiam li aŭdis ion bonan. Shun, la Granda, estis pli granda – li dividis bonon kune kun aliaj homoj, fordonante sin mem sekvis la aliajn, li ĝojis lernadi ĉe la aliaj kiel fari bonon, li mem terkulturis, plantis, faris argilaĵojn, fiŝkaptis, kaj finfine surtroniĝis kiel imperiestro, tiel do li lernadis ion ajn ĉe la aliaj homoj. Kiu lernas ĉe la aliaj kiel fari bonon, tiu ankaŭ lasas la aliajn fari bonon. Neniu noblulo estas pli granda, ol tiu, kiu lasas la aliajn fari bonon.”

9 [2A9]

孟子曰：「伯夷，非其君不事，非其友不友。不立於惡人之朝，不與惡人言。立於惡人之朝，與惡人言，如以朝衣朝冠坐於塗炭。推惡惡之心，思與鄉人立，其冠不正，望望然去之，若將浼焉。是故諸侯雖有善其辭命而至者，不受也。不受也者，是亦不屑就已。柳下惠，不羞汙君，不卑小官。進不隱賢，必以其道。遺佚而不怨，阨窮而不憫。故曰：『爾為爾，我為我，雖袒裼裸裎於我側，爾焉能浼我哉？』故由由然與之偕而不自失焉，援而止之而止。援而止之而止者，是亦不屑去已。」

孟子曰：「伯夷隘，柳下惠不恭。隘與不恭，君子不由也。」

Mengzi diris: “Bo Yi ne ekservis al tiu, kiun li ne estimis kiel reĝon, li nek amikiĝis kun tiu, kiun li ne estimis kiel amikon. Li ne turnis sin al kortego de malbonuloj, nek interparolis kun malbonuloj. Se servus en kortego de malbonuloj, oni devus interparoli kun malbonuloj, tio estas ja grandega ĝeno de hidaĵo, eĉ se ornamite en kortega vestaĵo

⁵⁷ Vd. Analektoj 4:1

kaj en kortega ĉapo. La koro forŝovi malbonon estas tiom granda, ke li, starante ĉe samvilaĝanoj kun ĉapo metita malĝuste, ekdezirus forlasi ĉi tiun honteme, kvazaŭ li sentus sin malpurigita. Tial do, malgraŭ ke landestroj iam proponis al li bonan kondiĉon de lia postenigo, li ne akceptis. Li ne akceptis, ĉar li ne konsideris tion pura.

Interalie, Liuxia Hui ne hontis servi al malpura estro, nek malŝatis malgrandan oficon. Promociite je rango, li ne kaŝis sian saĝon, nepre plenumis sian taskon laŭ la Vojo. Iam ajn preterlasite aŭ forlasite, li ne rankoris; eĉ malbonsorta aŭ mizera, li ne ĉagreniĝis. Li diris: ‘Vi estas vi, mi estas mi. Kia ajn, eĉ nuda estu vi, vi ne povus senhonorigi min.’ Tiel do li aplombe kunvivis kun iu ajn ĉie ajn, ne perdinte sin mem. Se oni lasas al li halti, li haltas. Lasate halti, haltas – ankaŭ tio estas unu maniero de foriro por ke li ne malpuriĝu.”

Mengzi plue diris: “Bo Yi estas tro streta, kaj Liuxia Hui – tro sendigna. Noblulo ne sekvas ambaŭ ekstrecojn.”⁵⁸

⁵⁸伯夷 Bo Yi – la unua reĝido de Guzhu-lando, kontraŭis al la mortigo de tirano Zhou far de la reĝo Wu, retiriĝis kune kun sia frato Shuqi en la monto Shouyang, mortis. 柳下惠 estis grandoficisto de Lu-regno en la epoko Chun-qiu, aperas en Zhuangzi kiel pliaĝa frato de rabisto Zhi.

《公孫丑下》

GONGSUN CHOU (II)

10 [2B1]

孟子曰：「天時不如地利，地利不如人和。三里之城，七里之郭，環而攻之而不勝。夫環而攻之，必有得天時者矣；然而不勝者，是天時不如地利也。城非不高也，池非不深也，兵革非不堅利也，米粟非不多也；委而去之，是地利不如人和也。故曰：域民不以封疆之界，固國不以山谿之險，威天下不以兵革之利。得道者多助，失道者寡助。寡助之至，親戚畔之；多助之至，天下順之。以天下之所順，攻親戚之所畔；故君子有不戰，戰必勝矣。」

Mengzi diris: “Ĉiela ŝanco estas malpli decida ol tera avantaĝo, la tera avantaĝo estas malpli decida ol homa akordo. Okazas, ke kastelo je tri *lioj* da cirkonferenco kun muro je 7 *lioj* da cirkonferenco, kvankam ĉirkaŭsieĝite, ne povas esti venkita. Por sieĝi ĉirkaŭen nepre necesas la Ĉiela ŝanco, sed eĉ ĉe tio ne eblas venki, ĉar la Ĉiela ŝanco estas malpli decida ol la tera avantaĝo. Sed ankaŭ estas okazo, kiam oni devas forlasi la teron, ne pro tio, ke la kastelo ne estas malalta, nek pro tio, ke la fosaĵo ne estas malprofunda, nek pro tio, ke armiloj kaj kiraso ne estas malfortaj aŭ malakraj, nek pro tio, ke da rizo kaj setario ne estas malmulte. Ĉar la tera avantaĝo estas malpli decida ol la homa akordo. Do estas dirite: ‘La popolanoj en la teritorio estas sekure gardataj ne nur pere de landlimoj, la lando estas gardataj ne nur pere de krutaj montoj kaj valoj, la majesteco en la mondo estas akiritaj ne nur pere de avantaĝo je armiloj, sed pere de diversaj asistoj. Al atinginto de la Vojo estas donate je plimulte da asistoj, al perdinto de la Vojo estas donate je malmulte da asistoj. Ĉe plej malmulte da asistoj, eĉ parencoj spitas. Ĉe plej multe da asistoj, la tuta mondo omaĝas. Estas evidente je la rezulto, se tiu, kiun omaĝas la mondo, atakus tiun, kiun spitas eĉ parencoj. Do noblulo okaze ne aŭdacus militadi, tamen unufoje ekmilitas, nepre venkas.’”⁵⁹

11 [2B2]

孟子將朝王，王使人來曰：「寡人如就見者也，有寒疾，不可以風。朝將視朝，不識可使寡人得見乎？」對曰：「不幸而有疾，不能造朝。」

明日，出吊於東郭氏，公孫丑曰：「昔者辭以病，今日吊，或者不可乎！」曰：「昔者疾，今

⁵⁹ Yoshida Shoin rimarkis al ‘la homa akordo’, ke “ĝi signifas, kiel nestas sentoj de fila pietato kaj lojaleco en la homa koro. Nur se havante tiujn sentojn, oni devas lerni sciencon, ekzerci batalartojn, rezervi armilojn, kaj tiel eblas ricevi kaj la ĉielan ŝancon kaj la teran avantaĝon. Sen la sentoj de fila pietato kaj lojaleco, se iu lernas sciencon, ekzercas batalartojn kaj rezervas armilojn, tiu malhelpas aferon des pli kaj ne povos bonteni plene eĉ sin mem.” [講孟餘話 97]

日愈，如之何不吊？」

王使人問疾，醫來。孟仲子對曰：「昔者有王命，有采薪之憂，不能造朝。今病小愈，趨造於朝，我不識能至否乎？」使數人要於路，曰：「請必無歸，而造於朝！」

不得已而之景丑氏宿焉。景子曰：「內則父子，外則君臣，人之大倫也。父子主恩，君臣主敬。丑見王之敬子也，未見所以敬王也。」

曰：「惡！是何言也！齊人無以仁義與王言者，豈以仁義為不美也？其心曰『是何足與言仁義也』云爾，則不敬莫大乎是。我非堯舜之道，不敢以陳於王前，故齊人莫如我敬王也。」

景子曰：「否，非此之謂也。禮曰：『父召，無諾；君命召，不俟駕。』固將朝也，聞王命而遂不果，宜與夫禮若不相似然。」

曰：「豈謂是與？曾子曰：『晉楚之富，不可及也。彼以其富，我以吾仁；彼以其爵，我以吾義，吾何慊乎哉？』夫豈不義而曾子言之？是或一道也。天下有達尊三：爵一，齒一，德一。朝廷莫如爵，鄉黨莫如齒，輔世長民莫如德。惡得有其一，以慢其二哉？故將大有為之君，必有所不召之臣。欲有謀焉，則就之。其尊德樂道，不如是不足與有為也。故湯之於伊尹，學焉而後臣之，故不勞而王；桓公之於管仲，學焉而後臣之，故不勞而霸。今天下地醜德齊，莫能相尚。無他，好臣其所教，而不好臣其所受教。湯之於伊尹，桓公之於管仲，則不敢召。管仲且猶不可召，而況不為管仲者乎？」

Mengzi ĝuste estis ekironta al reĝo en kortego, sed la reĝo alsendis homon anonci: 'Mi devintus vidi vin, sed ekmalvarmumis kaj evitas venton. Ĉu al mi eblus vidi vin morgaŭ matene en la kortego?

Mengzi respondis: "Bedaŭrinde, mi estas malsana, do mi ne povos turni min al la kortego."

En la alia tago, Mengzi eliris al s-ro Dong Guo por kondolenci lin. Gongsun Chou diris: "Hieraŭ rifuzi pro la malsano, hodiaŭ eliri kondolenci, ĉu estas allaseble?"

Mengzi diris: "Hieraŭ estis malsana, hodiaŭ resaniĝis, kial ne eblus iri kondolenci?"

La reĝo alsendis al li subulon por demandi, kaj ankaŭ kuracisto alvenis. Meng Zhongzi paliative respondis: "Hieraŭ li ricevis la reĝan ordonon, li tamen, havante la malsanon pro laciĝo, ne povis iri la kortegon. Hodiaŭ li iomete resaniĝis kaj elkuris al kortego, sed mi ne scias, ĉu li povis jam atingi tien aŭ ne", kaj sendis dume kelke da homoj al stratoj por serĉi Mengzi, dirante: "Mi petas, nepre ne revenu hejmen, tuj iru la kortegon!"⁶⁰

Mengzi ne devas ne turni sin al s-ro Jing Chou krom resti ĉe li. S-ro Jing diris: "Interne gravas la rilato de patro-filo, ekstere – la rilato de estro-subulo, tio estas la granda moralo por homoj. Por la filo ĉefe gravas ŝuldosento al la patro, por la subuloj

⁶⁰ Dong Guo estas grandoficisto de Qi-regno. Meng Zhongzi povas esti unu el disĉiploj de Mengzi kaj lia parenco.

ĉefe gravas respekto al la estro. Mi vidis la reĝon respektanta vin, sed mi ankoraŭ ne vidas vin respektanta la reĝon.”

Mengzi diris: “Ho ve! Kion vi diras? Se el inter Qi-regnanoj neniu parolus al la reĝo pri bonvoleco kaj justo, ĉu tio ne signifas, ke ili konsiderus la bonvolecon kaj la juston malpli belaj?⁶¹ En sia koro ili dirus: ‘Ne indas paroli kun li pri la bonvoleco kaj la justo.’ Nenio estas ja grandega malrespekto pli ol tio. Se ne pri la Vojo de Yao kaj Shun, mi ne aŭdacus prediki antaŭ la reĝo. Tial do Qi-regnanoj respektas la reĝon malpli ol mi.”

S-ro Jing diris: “Ne, mi diras ne tion. En la libro de Decreguloj estas skribite: ‘Kiam la patro alvokas, respondu tuj per la deca jesado sen pripensi; kiam la estro alvokas, tuj ekiru per la kaleŝo.’ Endas tuj haste ekiri la kortegon. Aŭdinte la ordonon de la reĝo, ne plenumi ĝin estas malsimile al la decreguloj.”⁶²

Mengzi diris: “Kial vi prenas tiel? Zengzi diris: ‘Riĉeco de Jin kaj Chu-regnoj estas nekontestebla, lasu ilin posedi tiom da riĉaĵon, sed mi havas la ideon pri nia bonvoleco; ili havas rangon, mi havas la ideon pri nia justo. Kial do ni devus malkontenti je la diverseco?’ Ĉu troviĝas io maljusta en la opinio de Zengzi? La Vojo estas unu. En la mondo estas tri estimindaj – unu estas rango, la alia estas pliaĝeco, la tria estas virto. En kortego plej estiminda estas la rango, en vilaĝoj kaj societoj – la pliaĝeco, en la asistado al la mondo kaj en la kreskado de la popolo – la virto. Kial do estimi nur unu el ili, ignorante la du aliajn? Do kiu bezonas esti granda por la estro, tiu ne devas esti nura subulo alvokata, sed devas esti ja kompetenta por ke la estro konsultu lin. Povante estimi la virton kaj ĝoji je la Vojo, la estro sufiĉe povas kune fari la aferojn. Tang, rilate al Yi Yin, lernis ĉe li kaj poste faris lin ministro, tiel do senpene fariĝis la reĝo. La duko Huan, rilate al Guan Zhong, lernis ĉe li kaj poste faris lin ministro, tiel do senpene fariĝis unu el superegaj hegemoniuloj. Nun teroj de la mondo estas malbelaj, ke ĉiuj estas egalaj je la sama virta nivelo unu kun la alia je senkapableco. La kaŭzo estas nenio alia ol tio, ke oni ŝatas subulon, kiu povas esti instruata, sed ne ŝatas tian subulon, de kiu eblas ricevi instruon. Rilate al Yi Yin ĉe Tang kaj al Guan Zhong ĉe la duko Huan, la reĝoj ne aŭdakis de supre alvoki ilin. Eĉ Guan Zhong-on oni ne povis alvoki, des pli min, kiu ne konsideras Guan Zhong modela, ĉu ne?”

12 [2B3]

陳臻問曰：「前日於齊，王餽兼金一百而不受；於宋，餽七十鎰而受；於薛，餽五十鎰而受。前日之不受是，則今日之受非也；今日之受是，則前日之不受非也。夫子必居一於此矣。」

⁶¹ Laŭ tia dirmaniero povas esti supozeble, ke en tiama Qi-regno, eĉ en la fama akademio Jixia 稷下, troviĝus da fortaj konfuceanoj tro malmulte krom Mengzi mem.

⁶² Jing Chou estas grandoficisto de Qi-regno.

孟子曰：「皆是也。當在宋也，予將有遠行。行者必以贖，辭曰：『餽贖。』予何為不受？當在薛也，予有戒心。辭曰：『聞戒。』故為兵餽之，予何為不受？若於齊，則未有處也。無處而餽之，是貨之也。焉有君子而可以貨取乎？」

Chen Zhen demandis, dirante: “Hieraŭ en Qi-regno la reĝo donintus al vi cent *yi* da oroj, sed vi ne akceptis. En Song-regno vi ricevis sepdek *yi* da oroj, en Xie-lando vi ricevis kvindek *yi* da oroj.⁶³ Se pravas la hieraŭa malakceptado, tiam ankaŭ la hodiaŭa akceptado ne pravas; se pravas la hodiaŭa akceptado, tiam ankaŭ la hieraŭa malakceptado ne pravas. Koncernante tion, sur kia unuopa pozicio vi staras?”

Mengzi diris: “En ĉiu kazo pravas. Kiam mi estis en la Song-regno, mi ĝuste estis irona foren. Vojaĝonto nepre bezonas adiaŭan donacon, ĉar oni diris ĉe la adiaŭo, ke tio estas ‘la donaco por la adiaŭo’. Kial do mi ne devus ricevi? Kiam mi estis en Xie, mi havis antaŭzorgon. Ĉe la adiaŭo oni diris: ‘Ni aŭdis pri via antaŭzorgo’. Do tio estas por provizi la vojaĝon. Kial do mi ne ricevu ĝin? Okaze de Qi-regno, ankoraŭ neniu kialo troviĝas por ricevi. Sen ajna kialo, tio estas nura mono. Kial do la noblulo povus preni nuran monon?”

13 [2B4]

孟子之平陸。謂其大夫曰：「子之持戟之士，一日而三失伍，則去之否乎？」

曰：「不待三。」

「然則子之失伍也亦多矣。凶年饑歲，子之民，老羸轉於溝壑，壯者散而之四方者，幾千人矣。」

曰：「此非距心之所得為也。」

曰：「今有受人之牛羊而為之牧之者，則必為之求牧與芻矣。求牧與芻而不得，則反諸其人乎？抑亦立而視其死與？」

曰：「此則距心之罪也。」

他日，見於王曰：「王之為都者，臣知五人焉。知其罪者，惟孔距心。為王誦之。」王曰：「此則寡人之罪也。」

Mengzi, irante iam en Pinglu, demandis al la ĉi tiea grandoficisto, (nomata Kong Juxin): “Ĉe vi estas soldatoj kun armiloj, okaze iu el ili faris tri erarojn de la malplenumado en unu tago, cu vi maldungos lin?”⁶⁴

Juxin respondis: “Ne atendente ĝis la tri fojoj, mi maldungos lin.”

⁶³ Chen Zhen estis unu el disĉiploj de Mengzi. *yi* estis 20 兩 *liang*. 兼金 signifas bonkvalitan oron.

⁶⁴ Pinglu, landlima urbeto de Qi-regno, situis en nuna Wenshangbei 汶上北 norde en Shangdong provinco.

Mengzi demandis: “Vi mem multfoje eraris je la administrado. En la jaro de katastrofa rikolto el viaj popolanoj estiĝis miloj da viktimoj: maljunuloj kaj malfortuloj rulfaladis en fosojn aŭ trancojn kaj plenaĝuloj forfuĝis, disirinte en kvar direktojn.”

Juxin diris: “Tiu problemo superas mian kapablon.”

Mengzi diris: “Nun, supozu, estas komisiite al iu paŝti bovojn kaj ŝafojn, tiuokaze li nepre devas rezervi paŝtejon kun furaĝo. Se li ne povus rezervadi paŝtejon kun furaĝo, ĉu li devus redoni ilin al la alia, aŭ li devas starante pretervidi ilin mortantaj?”

Juxin diris: “Je tio mi kulpas.”

En alia tago, Mengzi vidis la reĝon kaj diris: “Mi renkontiĝis kun kvin urbestroj en via regno. El ili konfesis sin kulpa nur unu – s-ro Kong Juxin. Por Via Reĝa Moŝto mi rakontas pri li.”

La reĝo diris: “Je tio kulpas mi mem.”

14 [2B5]

孟子謂蚺鼃曰：「子之辭靈丘而請士師，似也，為其可以言也。今既數月矣，未可以言與？」蚺鼃諫於王而不用，致為臣而去。齊人曰：「所以為蚺鼃，則善矣；所以自為，則吾不知也。」公都子以告。曰：「吾聞之也：有官守者，不得其職則去；有言責者，不得其言則去。我無官守，我無言責也，則吾進退，豈不綽綽然有餘裕哉？」

Mengzi parolis al Chi Wa, dirante: “Ŝajnas, ke vi retiriĝis de la okupo en Lingqiu kaj petis la oficon de tribunalestro. Vi eble havis iun opinion por paroli supren per tio. Jam pasis kelke da monatoj, ĉu ankoraŭ vi ne povas konsili al la reĝo?”⁶⁵

Chi Wa admonintus la reĝon, sed lia admono ne estas akceptita, do li devis foriri de la posteno. Iu Qi-regnano diris: “Estus bone diri tiel rilate al Chi Wa, sed koncerne de Mengzi mem al ni ne estas sciate, kiel li kondukus en tia situacio.” Gong Douzi raportis pri tio al Mengzi.⁶⁶

Mengzi diris: “Mi aŭdis, ke oficisto devas ekŝiĝi, se ne plenumblas la oficdevo, kaj konsilanto devas ekŝiĝi, se ne direblas la opinio. Mi havas nenian ofican rangon, nek respondecon por la konsilado. Do mi estas tute libera je mia konduto resti aŭ ekŝiĝi, ĉu ne?”

15 [2B6]

孟子為卿於齊，出吊於滕，王使蓋大夫王驩為輔行。王驩朝暮見，反齊滕之路，未嘗與之言行事也。

⁶⁵ Chi Wa estas grandofcisto de Qi-regno. Lingqiu estis periferia lokonomo de Qi-regno.

⁶⁶ Gong Douzi estis unu el disĉiploj de Mengzi.

公孫丑曰：「齊卿之位，不為小矣；齊滕之路，不為近矣。反之而未嘗與言行事，何也？」
曰：「夫既或治之，予何言哉？」

Mengzi fariĝis ministro de Qi-regno. Iam li estis sendita al Teng-lando por esprimi kondolencon. La reĝo igis Wang Huan, grandoficiston de Ge-provinco, akompani kiel vicsenditon por asisti Mengzi. Kvankam Wang Huan ĉiutage de matene ĝis vespere vidis lin, tamen ili nenion parolis kune pri la evento dum tuta vojo tien kaj reen inter Qi-regno kaj Teng.

Gongsun Chou diris: “La posteno de ministro de Qi-regno ne estas malgranda, la vojo inter Qi kaj Teng ne estas proksima. Malgraŭ tio, vi nenion kune parolis pri la evento. Kial?”

Mengzi diris: “Je ĉio estis jam antaŭdecidite. Kion mi povus paroli?”⁶⁷

16 [2B7]

孟子自齊葬於魯，反於齊，止於嬴。

充虞請曰：「前日不知虞之不肖，使虞敦匠事。嚴，虞不敢請。今願竊有請也，木若以美然。」

曰：「古者棺槨無度，中古棺七寸，槨稱之。自天子達於庶人。非直為觀美也，然後盡於人心。不得，不可以為悅；無財，不可以為悅。得之為有財，古之人皆用之，吾何為獨不然？且比化者，無使土親膚，於人心獨無慼乎？吾聞之君子：不以天下儉其親。」

Mengzi iris de Qi-regno al Lu-regno por funebri sian patrinon, kaj sur la revena vojo al Qi li pasloĝis en Ying.⁶⁸

Chong Yu demandis, dirante: “Antaŭe, spite mian maltaŭgecon, vi igis min observi la ĉerkofaradon, tiam en la solena tasko mi ne aŭdacis demandi, sed nun mi volus demandi vin, ĉu la lignaĵo estus tro bela?”

Mengzi diris: “En praantikvo ne estis reguloj por ĉerkoj interna kaj ekstera, poste en meza antikvo supre por la Ĉiela filo kaj sube eĉ por popolanoj iĝis normale, ke estu la interna ĉerko el ligna tabulo dika je 7 *cun*oj kun la proporcia ekstera ĉerko. Tio estas ne pro laŭaspekta beleco, sed pro pleja sincereco de la homa koro. Se ne permesate, oni ne povas tiel fari; sen riĉeco oni ne povas tiel fari. Eblas fari tiel, kun permeso kaj mono. Antikvuloj ĉiuj faris tion, kiel do mi sola ne devus? Dum la korpa transformiĝo, ne lasu teron tuŝi la haŭton de la amata. Ĉu ne estas ja kontentige al la homa koro? Mi aŭdis,

⁶⁷ Wang Huan estis favorata asiduulo de la reĝo. Sed al Mengzi ne plaĉas lia flatema personeco, do al li Mengzi tenis sin rigore. Eble, ankaŭ tio faris la medion de kortego kontraŭa al Mengzi.

⁶⁸ Ying estis lokonomo, situanta nord-okcedente de nuna Laiwu 莱芜 de Shangdong provinco. Chong Yu estas unu el disĉiploj de Mengzi.

ke noblulo, estu io ajn en la mondo, ne ŝparas, se por la gepatroj.”⁶⁹

17 [2B8]

沈同以其私問曰：「燕可伐與？」

孟子曰：「可。子噲不得與人燕，子之不得受燕於子噲。有仕於此，而子悅之，不告於王而私與之吾子之祿爵；夫士也，亦無王命而私受之於子，則可乎？何以異於是？」

齊人伐燕。或問曰：「勸齊伐燕，有諸？」

曰：「未也。沈同問『燕可伐與』？吾應之曰『可』，彼然而伐之也。彼如曰『孰可以伐之』？則將應之曰：『為天吏，則可以伐之。』今有殺人者，或問之曰『人可殺與』？則將應之曰『可』。彼如曰『孰可以殺之』？則將應之曰：『為士師，則可以殺之。』今以燕伐燕，何為勸之哉？」

Shen Tong demandis private al Mengzi, dirante: “Ĉu oni devas ataki por puni la Yan-regnon?”

Mengzi diris: “Jes. Zikuai ne devus transdoni la Yan-regnon al la alia, Zizhi ne devus ricevi de Zikuai la tronon de Yan. Supozu, ke estu iu persono, plaĉa al vi, kaj vi laŭvole transdonu vian salajron kaj rangon al tiu sen peti permeson de la reĝo, kaj supozu, ke la persono, sen ajna reĝa ordono, donus al sia filo ion ricevitan private. Ĉu tio estus allaseble? Tie okazis nenio alia ol tio.”

Qi-regnanoj atakis la Yan-regnon. Iu demandis al Mengzi: “Estas vi, kiu persvadis, ke Qi ataku Yan, ĉu ne?”

Mengzi diris: “Ne, ne eblus diri tiel. Shen Tong demandis, ĉu atakendus Yan, mi respondis, ke endas. Li per si mem atakis ĝin. Se li demandus, kiu do devas ataki ĝin, tiuokaze mi tuj respondus, ke la sendito de la Ĉielo devas ataki ĝin.” Supozu nun, ke okazis homomortigo, kaj iu demandus, ĉu iu povus mortigi la krimulon. Mi tuj respondus, ke eblas. Se tiu demandus plu, kiu do povus mortigi lin. Tiam mi ĝuste respondus: ‘Iu ekzekuciisto de la juĝisto povas mortigi lin.’ Tial nun, se lasus al Yan-anoj puni Yan-anojn, kion do devus persvadi mi?”⁷⁰

⁶⁹ Mengzi defias la ŝpareman funebro de Mozi. Eĉ lernanto kaj samtempuloj de Mengzi konsterniĝis je la lukseco de funebro por lia patrino, ke tio fariĝis ja la rekta kaŭzo de nerenkontiĝo kun la reĝo de Lu-regno.[vd.1B16] Sed la opinio de Mengzi pri la funebro havis tre fortan influon kaj estis longe reganta la societon de Ĉinio en postaj generacioj.

⁷⁰ Multaj esploristoj komprenas la frazon “以燕伐燕”, ke ‘regno sama, kiel Yan (t. e. Qi), punas la regnon Yan. El la kunteksto estas kompreneble per laŭlitera traduko, kiu donas pli ampleksan signifon – la atakanto de Yan estas ne sendito de la Ĉielo, nek de la juĝisto. Chen Tong estas ministro de Qi-regno. Zi Kuai de Yan-regno estis surtrone en 320-314 a. K. Li transdonis la tronon al Zi Zhi kaj la regno malordiĝis, kaj ekis la batalo inter Zi Zhi kaj reĝido Ping (poste reĝo Zhao 昭王) dem kelke da monatoj. Laŭ *Shiji* de Sima Qian, Mengzi persvadis la reĝon de Qi 湣王(surtrone 300-284; aŭ 323-284 a. K.)

18 [2B9]

燕人畔。王曰：「吾甚慚於孟子。」

陳賈曰：「王無患焉。王自以為與周公，孰仁且智？」

王曰：「惡！是何言也？」

曰：「周公使管叔監殷，管叔以殷畔。知而使之，是不仁也；不知而使之，是不智也。仁智，周公未之盡也，而況於王乎？賈請見而解之。」

見孟子，問曰：「周公何人也？」

曰：「古聖人也。」

曰：「使管叔監殷，管叔以殷畔也，有諸？」

曰：「然。」

曰：「周公知其將畔而使之與？」

曰：「不知也。」

「然則聖人且有過與？」

曰：「周公，弟也；管叔，兄也。周公之過，不亦宜乎？且古之君子，過則改之；今之君子，過則順之。古之君子，其過也，如日月之食，民皆見之；及其更也，民皆仰之。今之君子，豈徒順之，又從為之辭。」

Yan-anoj ekribelis. La reĝo de Qi diris: “Mi ege hontas antaŭ Mengzi.”

Chen Jia diris: “Ne ĉagreniĝu, Via Moŝto. Inter vi mem kaj la Duko Zhou, kiu estas pli bonvoleca kaj intelekta?”

La reĝo diris: “Ho! Kion signifas tiu demando?”

Chen Jia diris: “Spite ke la Duko Zhou igis al Guan Shu vokti Yin-regnon, tiu Guan Shu ekribelis poste kune kun Yin-anoj. Se li igis lin, sciante – tio ne estus bonvoleca. Se li igis lin, ne sciante – tio ne estus intelekta. Eĉ la Duko Zhou ne povis kondukti sufiĉe bonvolece kaj intelekta, ĉu Via Moŝto povus perfekte? Permesu min kompreni la problemon tiel.”

Chen Jia vidis Mengzi kaj demandis lin, dirante: “Kia estis la Duko Zhou?”

Mengzi respondis: “Li estis la antikva sanktulo.”

Chen Jia diris: “Ĉu okazis, ke li igis Guan Shu vokti Yin kaj Guan Shu ekribelis kune kun Yin-anoj?”

Mengzi diris: “Jes.”

Chen Jia diris: “Ĉu la Duko Zhou sendis lin, antaŭsciante, ke li iam ribelos?”

Mengzi diris: “Li ne sciis.”

ataki la Yan-regnon. [燕召公世家]. Zhao konfidis al sia instruisto Guo Kui 郭隗, kiu invitis Yue Yi 樂毅. Qi-regno estis venkita de Yue Yi.

Chen Jia demandis: “Se tiel, ĉu eĉ sanktulo povas iam erari?”

Mengzi diris: “La Duko Zhou estas plijuna frato, Guan Shu – pliĝa frato. Ĉu estus ne allasebla la eraro de la Duko Zhou? Antikvaj nobluloj, se ili eraris, tiam korektis la eraron. Nunaj nobluloj, se ili eraris, obstine sekvas la eraron. La eraro fare de la antikvaj nobluloj estas sama, kiel eklipso de suno kaj luno, do ĉiuj popolanoj vidas ĝin kaj poste ĉiuj popolanoj revidas supren pli. Nunaj nobluloj ne nur lasas sin persiste sekvi la eraron, sed serĉas senkulpiĝi sin.”⁷¹

19 [2B10]

孟子致為臣而歸。王就見孟子，曰：「前日願見而不可得，得侍，同朝甚喜。今又棄寡人而歸，不識可以繼此而得見乎？」對曰：「不敢請耳，固所願也。」⁷²

他日，王謂時子曰：「我欲中國而授孟子室，養弟子以萬鍾，使諸大夫國人皆有所矜式。子盍為我言之？」

時子因陳子而以告孟子，陳子以時子之言告孟子。孟子曰：「然。夫時子惡知其不可也？如使予欲富，辭十萬而受萬，是為欲富乎？季孫曰：『異哉子叔疑！使己為政，不用，則亦已矣，又使其子弟為卿。人亦孰不欲富貴？而獨於富貴之中，有私龍斷焉。』古之為市也，以其所有易其所無者，有司者治之耳。有賤丈夫焉，必求龍斷而登之，以左右望而罔市利。人皆以為賤，故從而征之。征商，自此賤丈夫始矣。」

Mengzi estis forironta hejmen, rezignante la oficon de ministro. La reĝo, apenaŭ vidante Mengzi, diris: “Mi dezirus vidi vin antaŭe, sed ne povis. Ne vane atendinte vian alvenon, mi tre ĝojas revidi vin en la kortego. Nun vi forlasas min kaj revenas hejmen, sed ĉu al mi eblus daŭre vidi vin?”

Mengzi respondis: “Mi ne aŭdacus peti vin, sed tio ja estas kion mi firme deziras.”

Alian tagon, la reĝo parolis al Shizi, dirante: “Mi volus doni al Mengzi la halon en metropolo, kie li povu instrui lernantojn per salajro je dekmil *zhong*, por ke ĉiuj el grandoficistoj kaj ŝtatoficistoj povu lerni ĉe li la respektadon de decreguloj. Ĉu vi, anstataŭ mi, povos transdoni al li mian proponon?”⁷³

Shizi transdonis tion tra Chenzi al Mengzi. Kiam Chenzi sciigis al Mengzi la vorton

⁷¹ En 312 a. K. Yan kun ĝia alianco (Zhao-regno) ribelis kontraŭ Qi-regno. La reĝo Xuan de Qi (319-301 a. K.) ne sekvis al al propono de Mengzi. Chen Jia estas grandoficisto de Qi. La Duko Zhou estas idealo por konfuceanoj. Guan Shu lasis al Wu Geng 武庚 de Yin ekribeli kontraŭ Zhou.

⁷² Mi konsentas kun multaj esploristoj, konsiderantaj, ke tiu reĝo de Qi-regno estas Xuan 宣, spite ke Sima Qian atribuis la reĝon Min 湣王. Kelkaj konsideras, ke la reĝo mem venis al la loĝejo de Mengzi por vidi, sed mi interpretas alie.

⁷³ unu *zhong* estas mezuruno de grenoj, egala al 6 *dan* 石 4 *dou* 斗 (100 litroj laŭ Wang Chongfabg). Dekmil estas 64 mil *danoj* (6.400.000 litroj). Shizi estas ministro de Qi.

de Shizi, Mengzi diris: “Nu, kial s-ro Shizi ne komprenas tion malebla? Li rigardus min deziranta je riĉaĵoj, sed vane. Kiu rezignis centmil, ĉu tiu akceptus dekmil? Ji Sun diris: ‘Kiel stranga kaj dubinda estas Zi Shu! Li ekokupis sin per la administrado, kaj kiam lia konsilo montriĝis sentaŭga, tiam restis al li nur aksiĝi. Sed li postenigis eĉ siajn filon kaj fraton ministroj. Tiele homoj ne povus ne avari monopole riĉaĵon kaj rangon nur por propriigi profiton, sole alteniĝante al la riĉaĵo kaj la rango, kvazaŭ hundo en la kripo.’ Antikve la merkato ekzistis por ke oni interŝanĝu varojn inter posedantoj kaj neposedantoj, kaj la peranto nur okupiĝis je la administrado. Iam aperis iu malnobla ulo, deziranta propriigi profiton, kaj ascendis supren sur la kripo. Li, gvatante de supre dekstren kaj maldekstren por ricevi tributon, proprigis la profiton de la merkato. Ĉiuj homoj rigardis tion malnobla, do sekve enkondukis la impostan sistemon. La komerca imposto ekis de tia malnobla fiulo.”⁷⁴

20 [2B11]

孟子去齊，宿於晝。

有欲為王留行者，坐而言。不應，隱几而臥。客不悅曰：「弟子齊宿而後敢言，夫子臥而不聽，請勿復敢見矣。」

曰：「坐！我明語子。昔者魯繆公無人乎子思之側，則不能安子思；泄柳、申詳，無人乎繆公之側，則不能安其身。子為長者慮，而不及子思，子絕長者乎？長者絕子乎？」

Mengzi forlasis Qi-regnon, kaj estis tranoktanta en Zhou.⁷⁵ Iu persono volus reteni lin komisiite je la nomo de la reĝo de Qi, kaj sidante surgenu alparolis lin. Mengzi ne respondis, apogante sin sur la brakseĝo dormetis. La gasto malkontente diris: “Mi alvenis ĉi tien sen manĝi kaj poste aŭdacas alparoli vin, sed vi, kuŝante, ne aŭskultas min. Mi ne povos vidi vin plu.”

Mengzi diris: “Sidu plu! Mi klarigas al vi. Antaŭ nelonge la duko Mu de Lu-regno zorgis, ĉu se por Zi Si estus neniuj servisto, klopodanta, ke Zi Si sentu sin trankvila. Xie Liu kaj Shen Xiang zorgis, ĉu se ĉe la duko Mu estus neniuj personoj, klopodanta, ke la duko sentu sin trankvila. Vi zorgas pri mi malpli ol la duko Mu pri Zi Si. Kiu forlasis kiun, ĉu vi min, aŭ ĉu mi vin?”⁷⁶

⁷⁴ Chenzi estas Chen Zhen 陳臻, disĉiplo de Mengzi. Laŭ la metaforo, Mengzi ne volis okupi daŭre la altan postenon, sentante ke lia konsilo estis ne akceptata. Se li restus en la posteno, li monopolus la privilegion. ŝ

⁷⁵ Zhou estas lokonomo, sude-okcidente de la ĉefurbo Lin Zi.

⁷⁶ La duko Mu estas 穆 (surtrone 407-377 a. K.) Zi Si estas nepo de Konfuceo, supozata, ke verkis la libron 中庸 *Modereco*. Xie Liu aperas en la ĉapitro Gaozi 2 告子下 kiel 子柳, kaj Shen Xiang estas filo de Zizhang 子張, bofilo de Ziyu 子游.

21 [2B12]

孟子去齊。尹士語人曰：「不識王之不可以為湯武，則是不明也；識其不可，然且至，則是干澤也。千里而見王，不遇故去。三宿而後出晝，是何濡滯也？士則茲不悅。」

高子以告。曰：「夫尹士惡知予哉？千里而見王，是予所欲也；不遇故去，豈予所欲哉？予不得已也。予三宿而出晝，於予心猶以為速。王庶幾改之。王如改諸，則必反予。夫出晝而王不予追也，予然後浩然有歸志。予雖然，豈舍王哉？王由足用為善。王如用予，則豈徒齊民安，天下之民舉安。王庶幾改之，予日望之。予豈若是小丈夫然哉？諫於其君而不受，則怒，悻悻然見於其面。去則窮日之力而後宿哉？」

尹士聞之曰：「士誠小人也。」

Mengzi forlasis Qi-regnon. Yin Shi parolis al iu, dirante: “Ne kompreni, ke la reĝo ne povus fari tian aferon, kiun faris Tang kaj Wu, estas malsaĝe. Sciante, ke la reĝo ne kapablas, tamen ekservi lin – tio estas nur kun la celo por salajro. Alveninte mil *liojn* por vidi la reĝon, li forlasis ne akceptate. Kaj post tri tagojn de loĝado en la apuda tranoktejo li eliris de Zhou, kial do li restis hezite dumlonge? Mi estas desapontita de li.”

Gaozi sciigis tion al Mengzi. Mengzi diris: “Kiel do Yin Shi povus kompreni min? Mi venis mil *liojn* por vidi la reĝon, ĉar mi havis la deziron. Forlasi ne akceptate, ĉu mi dezirus tion? Mi ne devis ne konduti tiel. Post tri noktoj de la restado mi eliris de Zhou, spite ke mi volus en mia koro foriri laŭeble plej rapide, ĉar mi dume esperis, ke la reĝo ŝanĝos sian koron, kaj se li ŝanĝos, li nepre revokos min. Sed ĝis mia eliro de Zhou la reĝo ne hastis post min, do mi poste ekiris hejmen laŭ la revena vojo kun aspiro plena de libera animo. Ĉu direblus, ke mi forlasis la reĝon? La reĝo estas ankoraŭ sufiĉe utila por fari bonon. Se la reĝo utiligus min, tiam estiĝus paco ne nur al la popolo de Qi, sed ankaŭ al la popolo de la mondo. Ke la reĝo ĝustigu sin, tion mi ĉiutage deziras. Ĉu mi ŝajnus tia malgrandulo, kiu provis admoni, sed ne akceptate de la estro, ekkoleris? kaj mienis laciĝinta kaj forirante tranoktis kun forto elĉerpita en apuda gastejo?”

Yin Shi aŭdis tion kaj diris: “Vera malgrandulo estas ja mi.”⁷⁷

22 [2B13]

孟子去齊。充虞路問曰：「夫子若有不豫色然。前日虞聞諸夫子曰：『君子不怨天，不尤人。』」曰：「彼一時，此一時也。五百年必有王者興，其間必有名世者。由周而來，七百有餘歲矣。以其數則過矣，以其時考之則可矣。夫天，未欲平治天下也；如欲平治天下，當今之世，舍

⁷⁷ Ne sciate pli detale pri figuroj, ol Yi Yin estas Qi-regnano kaj Gaozi estas unu el lernantoj de Mengzi. Laŭ tiu teksto la reĝo de Qi-regno, kiun Mengzi servis, estas unu, t. e. probable, Xuan.

我其誰也？吾何為不豫哉？」

Mengzi foriris de la Qi-regno. Chong Yu survoje demandis, dirante: “Vi mienas malĝoja. Antaŭ nelonge mi aŭdis Majstrojn dirantaj; ‘Noblulo ne rankoras la Ĉielon, nek riproĉas la homon.’”

Mengzi diris: “En unu tempo tiel, en la alia aliel. Dum 500 jaroj nepre aperas la vera reĝo kaj tiam nepre estiĝas iu renoma elstarulo en la mondo. Tamen ekde Zhou-dinastio pasis pli ol 700 jaroj, do pli multe da jaroj ol la atenditaj. Se kalkuli la tempon, jam estus efektivegeble. Ĉu la Ĉielo ankoraŭ ne dezirus, ke la mondo estu regata en paco? Se ĝi dezirus la pacan regadon al la mondo, al kiu en nuntempa mondo ĝi komisios la taskon krom al mi? Kial do mi devus malĝoji?”

23 [2B14]

孟子去齊，居休。

公孫丑問曰：「仕而不受祿，古之道乎？」

曰：「非也。於崇，吾得見王。退而有去志，不欲變，故不受也。繼而有師命，不可以請。久於齊，非我志也。」

Mengzi, foririnte de Qi-regno, ekloĝis en Xiu.

Gongsun Chou demandis, dirante: “Servante en oficejo, ne ricevi la salajron por grandoficisto, ĉu estas konforme al la antikva Vojo?”

Mengzi diris: “Ne. En la urbo Chong mi unuafoje havis aŭdiencon de la reĝo. Sed mi ne volis ŝanĝi la intencon, ke mi iam retiriĝu kaj foriru, do mi ne ricevis la salajron. Poste estis proklamita la milito, ne eblis peti la eksigon, tiel do mi restis longe en Qi-regno. Tio ne estis mia intenco.”⁷⁸

⁷⁸ Xiu estas lokonomo, proksima al la hejmo de Mengzi, norde de Tengzhou je 15 *lioj*. Chong estas lokonomo, nun ne sciate kie. 祿 Lu povas esti tradukita kiel ‘salajro’, ‘lukro’, Mengzi povus ricevi centmil *zhong* da salajro, sed rezignis [2B10].

《滕文公上》

LA DUKO WEN DE TENG-LANDO (I)

1 [3A1]

滕文公為世子，將之楚，過宋而見孟子。孟子道性善，言必稱堯舜。

世子自楚反，復見孟子。孟子曰：「世子疑吾言乎？夫道一而已矣。成覿謂齊景公曰：『彼丈夫也，我丈夫也，吾何畏彼哉？』顏淵曰：『舜何人也？予何人也？有為者亦若是。』公明儀曰：『文王我師也，周公豈欺我哉？』今滕，絕長補短，將五十里也，猶可以為善國。《書》曰：『若藥不瞑眩，厥疾不瘳。』」

Kiam la duko Wen de Teng estis ankoraŭ kronprinco, estis veturanta al Chu-regno tra Song-regno, kie li renkontiĝis kun Mengzi. Mengzi predikis al li pri boneco de la denaska homa naturo, nepre laŭdante Yao kaj Shun. La kronprinco ankaŭ sur la revena vojo de Chu denove renkontis Mengzi.

Mengzi diris: “Ĉu Via Princa Moŝto dubas mian eldiron? La Vojo estas unu, nur unu. Cheng Jian iam diris al la duko Jing de Qi-regno: ‘Ili estas homoj, kaj mi estas homo. Kial do mi devus timi ilin?’ Yan Yuan diris: ‘Kio estis Shun? Kio estas mi? Kiu havas la aferon por fari, tiuj estas samaj.’ Gongming Yi diris: ‘La reĝo Wen estas mia majstro, kaj ankaŭ la duko Zhou neniam povus trompi min.’ Kvankam nun la lando de Teng havas teritorion pli-malpli nur je 50 *lioj* kvadrato, tamen eblas fari la landon plibona. Estas skribite en *Libro*: ‘Medikamento, se ne maldolĉega, ne povas kuraci malsanon.’”⁷⁹

2 [3A2]

滕定公薨。世子謂然友曰：「昔者孟子嘗與我言於宋，於心終不忘。今也不幸至於大故，吾欲使子問於孟子，然後行事。」

然友之鄒問於孟子。孟子曰：「不亦善乎！親喪固所自盡也。曾子曰：『生事之以禮；死葬之以禮，祭之以禮，可謂孝矣。』諸侯之禮，吾未之學也；雖然，吾嘗聞之矣。三年之喪，齊疏之服，飭粥之食，自天子達於庶人，三代共之。」

然友反命，定為三年之喪。父兄百官皆不欲，曰：「吾宗國魯先君莫之行，吾先君亦莫之行也，至於子之身而反之，不可。且志曰：『喪祭從先祖。』」曰：「吾有所受之也。」謂然友曰：「吾他日未嘗學問，好馳馬試劍。今也父兄百官不我足也，恐其不能盡於大事，子為我問孟子。」然友復之鄒問孟子。孟子曰：「然。不可以他求者也。孔子曰：『君薨，聽於冢宰。歠粥，面深墨。即位而哭，百官有司，莫敢不哀，先之也。』」上有好者，下必有甚焉者矣。『君子之德，

⁷⁹ Cheng Jian estas ministro de Qi-regno, fama je la braveco. Gongming Yi estas lernanto de Zeng Cen 曾參. La lasta citaĵo estas el 尚書, 說命上. La lando de Teng situis en nuna Zaozhuang, Tengzhou.

風也；小人之德，草也。草尚之風必偃。』是在世子。」

然友反命。世子曰：「然。是誠在我。」五月居廬，未有命戒。百官族人可謂曰知。及至葬，四方來觀之，顏色之戚，哭泣之哀，弔者大悅。

La duko Ding de Teng mortis. La kronprinco parolis al sia mentoro, Ran You, dirante: “Antaŭ longe Mengzi diris al mi en la Song-regno ion neforgeseblan por ĉiam en mia koro. Nun okazis la malfeliĉo la plej granda, do mi volus sendi iun al Mengzi por demandi lin, kaj poste plenumi la funebro.”

Ran You ekiris al Zou por demandi Mengzi. Mengzi diris: “Estas tre bone, ke oni faras sian plej bonan por funebri gepatrojn. Zengzi diris: ‘Dum vivas gepatroj, oni servas ilin kun decreguloj; ĉe la morto oni funebras kun decreguloj; ĉe la festo oni festas kun decreguloj – jen kio estas nomata Fila pietato.’⁸⁰ Koncernante decregulojn de landestroj, mi ankoraŭ ne lernis, sed mi aŭdis iam pri tio – funebra servo daŭras ĝis la tria jaro post la morto, ĉeffunebranto vestas sin per kruda vestaĵo, manĝas kaĉon aŭ porigon, – jen tiel faradis en tri dinastioj kaj supre la Ĉiela Filo kaj sube simplaj popolanoj.”

Ran You revenis kaj proponis funebri por la duko Ding per la tri-jara funebrado. Sed el pliaĝaj parencoj kaj cent oficistoj, ĉiuj ne deziris, dirante: “Ne estis farataj tiel la funebroj por antaŭaj reĝoj de nia prapatra regno Lu, nek por niaj antaŭaj landestroj. Estas ne allaseble al la kronprinco mem kontraŭi, ĉar estas skribite en la dokumento ke ‘Koncerne de funebro kaj festo sekvu prapatrojn’, do jen kion ankaŭ ni devas akcepti.”⁸¹

La kronprinco diris al Ran You: “Mi antaŭe ne lernis sciencon, sed mia ŝatokupo estis rajdoĉevalo kaj skermado. Nun pliaĝaj parencoj kaj cent oficistoj malkontentas je mi. Mi timas, ke estos ne plenumbla la granda afero. Mi petas vin demandi al Mengzi por mi.”

Ran You denove iris al Zou demandi Mengzi. Mengzi diris: “Ha! Devas serĉi solvon neniu alia ol li mem. Konfuceo diris: ‘Kiam la estro mortis, lasu al intendantoj la ŝtadadministradon, la heredanto mem, prenante nur kaĉon por manĝi, kun vizaĝo nigliganta, surtroniĝu kaj plorkriadu. Cent oficistoj, okupante sin je oficoj, ne povas ne droni en malĝojo tiel same, kiel la ĉefo iniciate montras ekzemplon.’ Kion la supro ŝatas, tion la subo nepre ŝategas. La virto de noblulo estas simila al vento, kiun sekvas la virto de malgrandaj homoj, kvazaŭ herboj. Herboj nepre turnas sin al la direkto, kien blovas la vento, t. e. la heredanto-kronprinco.”

Ran You reveninte raportis. La kronprinco diris: “Jes. Vere, tio dependas de mi.” Li

⁸⁰ Pri la samo estas skribite en la Analektoj, eb la ĉap. 為政.

⁸¹ Lu-regno kaj Teng havas la saman fondinton, la dukon Zhou 周公旦. Do Teng konsideris Lu-regnon prapatra. La citaĵo montras, ke la longdaŭra funebro je tri jaroj ne estis kutimo ĝis tiam.

loĝis en ŝedo kvin monatojn, nenion ordonante nek dekretante je la ŝtatregado. Cent oficistoj kaj parencoj de la sama klano aprobis kaj komprenis. En la fino de la funebro ili alvenis observi lin el kvar direktoj, kaj vidis lin paliĝinta je mieno, plorkrianta pro malĝojo, tiel do estis ege emociitaj la vizitantoj de kondolenco.

3 [3A3]

滕文公問為國。孟子曰：「民事不可緩也。《詩》云：『晝爾于茅，宵爾索綯；亟其乘屋，其始播百穀。』民之為道也，有恆產者有恆心，無恆產者無恆心。苟無恆心，放辟邪侈，無不為已。及陷乎罪，然後從而刑之，是罔民也。焉有仁人在位，罔民而可為也？是故賢君必恭儉禮下，取於民有制。陽虎曰：『為富不仁矣，為仁不富矣。』」

「夏后氏五十而貢，殷人七十而助，周人百畝而徹，其實皆什一也。徹者，徹也；助者，藉也。龍子曰：『治地莫善於助，莫不善於貢。貢者校數歲之中以為常。樂歲，粒米狼戾，多取之而不為虐，則寡取之；凶年，糞其田而不足，則必取盈焉。為民父母，使民矜矜然，將終歲勤動，不得以養其父母，又稱貸而益之。使老稚轉乎溝壑，惡在其為民父母也？』夫世祿，滕固行之矣。《詩》云：『雨我公田，遂及我私。』惟助為有公田。由此觀之，雖周亦助也。

「設為庠序學校以教之：庠者，養也；校者，教也；序者，射也。夏曰校，殷曰序，周曰庠，學則三代共之，皆所以明人倫也。人倫明於上，小民親於下。有王者起，必來取法，是為王者師也。《詩》云『周雖舊邦，其命惟新』，文王之謂也。子力行之，亦以新子之國。」

使畢戰問井地。孟子曰：「子之君將行仁政，選擇而使子，子必勉之！夫仁政，必自經界始。經界不正，井地不鈞，穀祿不平。是故暴君汙吏必慢其經界。經界既正，分田制祿可坐而定也。夫滕壤地褊小，將為君子焉，將為野人焉。無君子莫治野人，無野人莫養君子。請野九一而助，國中什一使自賦。卿以下必有圭田，圭田五十畝。餘夫二十五畝。死徙無出鄉，鄉田同井。出入相友，守望相助，疾病相扶持，則百姓親睦。方里而井，井九百畝，其中為公田。八家皆私百畝，同養公田。公事畢，然後敢治私事，所以別野人也。此其大略也。若夫潤澤之，則在君與子矣。」

La duko Wen de Teng demandis pri la ŝtatregado kaj Mengzi respondis: “La afero por la popolo ne devas esti loza. Estas dirite en *Poezio*: “Tage vi sarkas herbojn, vespere plektas ŝnurojn, haste riparas tegmentojn de domoj, kaj komencas semi kaj planti cent grenojn.”⁸² Koncernante la popolan aferon estas la principo – kun konstanta proprietaĵo haveblas konstanta koro, sen konstanta proprietaĵo ne haveblas konstanta koro; se mankas konstanta koro, popolanoj lasas sin kondukti senbride kaj malĉaste, farante ĉion ajn sen escepte. Kaj finfine ili falas en krimon, kaj poste estos punitaj – tio estas same, kiel faligi la popolon en reton. Kial do bonvolema persono en sia ofico povus kapti tiel la popolon en tia maŝkaptilo? Saĝa estro nepre tenas sin humila kun decreguloj laŭ

⁸² Citaĵo el 詩經, 豳風, 七月.

ekonomio je la traktado de la popolo, kaj prenas de la popolo per laŭleĝa reguligo. Yang Hu diris: ‘Kiu serĉas riĉon, tiu ne estas bonvoleca; kiu serĉas bonvolecon, tiu ne estas riĉa.’⁸³

Se temas pri la imposta sistemo, en la taksa unuo de la Xia-dinastio estis asignite je 50 *mu* al ĉiu unu familio laŭ *gong* sistemo, en la Yin-dinastio – 70 *mu* laŭ *zhu* sistemo, en la Zhou-dinastio – 100 *mu* laŭ *che* sistemo.⁸⁴ Efektive, ĉiuj sistemoj baziĝis sur la imposto de unu dekonon. La sistemo *che* estis unueca imposto, tute sama je kvanto por ĉiu devanto de impostpago, *zhu* estas la impostpago per reciproka helpo de komuna terkulturado en unu naŭono de la asignita kampo.⁸⁵ Longzi diris: ‘Por la regado de la tero nenio estas pli bona ol la sistemo *zhu*, nenio estas malpli bona ol la sistemo *gong*. La konstanta impostpago laŭ la sistemo *gong* estas decidita surbaze de la meza averaĝo dum kelkaj jaroj. En la jaro de superabunda rikolto oni forĵetas grenojn kaj rizojn vane, do eĉ se estus pliigita la imposto, oni ne turmentiĝus. Malgraŭ tio, la impostpago restas same, t. e. tro malmulte. En la jaro de malabunda rikolto, kontraŭe, eĉ la sterko mankas por kampoj, tamen la imposton *gong* endas pagi plene, t. e. tro multe. Estroj, kiuj devas esti gepatroj de la popolo, lasas la popolon furioze malkontenta. La popolanoj, ĉiel ajn diligentus tutan jaron, ne povas nutri siajn gepatrojn, dum uzuristoj, pruntedonante, nutras sian monujon. Kiuj lasas maljunulojn kaj infanojn rulfali en kloakon aŭ fosaĵon, ĉu tiuj povus esti gepatroj de la popoloj?’

Rilate al imposto, en Teng-lando estas tiom sekure, ke estas tenata la sistemo de hereda salajro por oficistoj. En *Poezio* estas dirite: ‘Pluvu sur nian publikan komunan kampon, kaj ankaŭ sur nian privatan.’⁸⁶ La sistemo *zhu* estas aplikebla al la publika komuna kampo. Estas vidate, ke ankaŭ en la Zhou-dinastio estis la sistemo *zhu*.

Starigu lernejojn, nomatajn *xiang*, *xu*, *xue*, *xiao*, kaj instruu tie. *Xiang* estas kie oni vartas, *xiao* estas kie oni instruas. *Xu* estas kie oni instruas pafarkon.⁸⁷ En la epoko de Xia-dinastio oni nomis la lernejon *xiao*, en la epoko de Yin-dinastio oni nomis ĝin *xu*, en la epoko de Zhou-dinastio oni nomis ĝin *xiang*. Ĉiuj tri dinastioj havis la lernejojn, kie

⁸³ Yang Hu estas Yang Huo 陽貨, servis al Ji 季氏, la grandoficisto de Lu-regno. Pri lia rilato al Konfuceo estas skribite en Analektoj 17:2.

⁸⁴ *mu*, mezurunuo de areo; dum la tempo de Mengzi 1 *mu* egalas al ĉ. 225 kvadrataj metroj; nuntempe 625 kv. m (1 ha = 16 *mu*oj).

⁸⁵ Laŭ *gong* sistemo ĉiu familio pagas ankaŭ unu dekonon de rikoltaĵo, sed imposton, deciditan per meza averaĝo de kelkaj jaroj. Laŭ *che*, surbaze de la unu-dekona sistemo, ĉiu jara imposto ŝanĝiĝas depende de rikolto. Laŭ *zhu*, kamparanoj pagas imposton, kultivante la komunan parcelon je la unu-naŭa kampo.

⁸⁶ Citaĵo el 詩經, 小雅, 大田.

⁸⁷ La sama propono videblas en [1A3]. La konkreta enhavo de tiuj lernejoj estas nescigebla, sed la propono mem havis grandan influon al Japanio (vd. Yoshida Shoin, p. 40-41).

estis instruate pri homa moralo. Kie pri la homa moralo estas klarigite de la supro, tie en la subo etaj popolanoj kutimiĝas al tio kaj proksimiĝas unuj al la aliaj. Kiam iu reĝo estiĝos, tiam li nepre venos al vi preni vian ekzemplon de la regadmaniero, kaj faros vin instruisto de la reĝo. Estas dirite en *Poezio*: ‘Kvankam Zhou estas malnova regno, sed ĝia ordono estas nova.’⁸⁸ Tio mencias la aferon de la reĝo Wen. Vi forte praktiku tion por konstrui vian ŝtaton nova.”

La duko sendis iun Bi Zhan al Mengzi demandi pri la “naŭonaĵa sistemo”.

Mengzi diris: “Via estro ĝuste nun estas praktikonta la politikon de bonvoleco, kaj elektis vin kiel senditon al mi. Do vi nepre diligente lernu tion! La bonvoleca politiko ekas de ter-apartigo per limoj. Se la ter-apartigo estas maljusta, la naŭonaĵa sistemo ne iĝas justa je terpeco, la salajro de grenoj ne iĝas egala. Tiam tiranecaj estroj kaj koruptemaj pedeloj nepre ekspluatas la defekton de ter-apartigaj limoj. Apenaŭ kun la limoj ĝustigitaj oni povas facile establi la sistemon de kampodivido kaj de salajro. Kvankam la fekunda tero en Teng estas malgranda, tamen tie loĝas kaj nobluloj kaj kamparanoj. Sen la nobluloj ne eblas regi la kamparanojn, sen la kamparanoj ne eblas nutri la noblulojn. Donu al la periferiaj kamparanoj la naŭonaĵan sistemon por pagi la imposton *zhu*, kaj en la centro de lando lasu pagi la imposton de unu dekonono. Al ĉiu el ministroj kaj el la pli subaj altranguloj krom salajro nepre necesas la kampo por ritoj, nomata *gui*, je 50 *muoj*. Al ĉiu el la ceteraj viroj necesas kampo je 25 *muoj*. Eĉ ĉe la morto de familiestro kaj ĉe lia transloĝiĝo oni ne forlasas la vilaĝon, kie kampo estas uzata komune laŭ la naŭonaĵa sistemo. Oni amike interrilatas unu al la alia, defendas, gardas kun reciproka helpo, kaj helpas unu la alian je malsaniĝo, tiel do la popolanoj vivas intime kaj harmonie. La tuta kampo konsistas el unu *li*o kvadrato, havas naŭcent *muojn*, dividite en naŭ kvadrataj partoj, kaj la publika kampo situas en la centro. Ĉiu el ok familioj private posedas cent *muojn* kaj komune kulturas la publikan parton. Oni antaŭ ĉio terkulturas unue la publikan, poste povas mastrumadi la privatan aferon. Tiel estas distingite ĉe kamparanoj. Jen kia estas la skizo. La plenumado dependas de Lia Moŝto kaj vi.

4 [3A4]

有為神農之言者許行，自楚之滕，踵門而告文公曰：「遠方之人聞君行仁政，願受一廛而為氓。」文公與之處，其徒數十人，皆衣褐，捆屨、織席以為食。

陳良之徒陳相與其弟辛，負耒耜而自宋之滕，曰：「聞君行聖人之政，是亦聖人也，願為聖人

⁸⁸ Citaĵo el 詩經, 大雅, 文王. La frazo 為王者師 fariĝis la alta celo de malgranda lando por provi idealana regadon. Yoshida Shoin diris: “Ne por unu lando faras la noblulo sian regadon, sed por ke la regado estu la leĝo de postaj generacioj de la mondo.”[講孟 127]

氓。」陳相見許行而大悅，盡棄其學而學焉。

陳相見孟子，道許行之言曰：「滕君，則誠賢君也；雖然，未聞道也。賢者與民並耕而食，饗殮而治。今也滕有倉廩府庫，則是厲民而以自養也，惡得賢？」

孟子曰：「許子必種粟而後食乎？」曰：「然。」

「許子必織布而後衣乎？」曰：「否。許子衣褐。」

「許子冠乎？」曰：「冠。」

曰：「奚冠？」曰：「冠素。」

曰：「自織之與？」曰：「否。以粟易之。」

曰：「許子奚為不自織？」曰：「害於耕。」

曰：「許子以釜甑爨，以鐵耕乎？」曰：「然。」

「自為之與？」曰：「否。以粟易之。」

「以粟易械器者，不為厲陶冶；陶冶亦以其械器易粟者，豈為厲農夫哉？且許子何不為陶冶。舍皆取諸其宮中而用之？何為紛紛然與百工交易？何許子之不憚煩？」曰：「百工之事，固不可耕且為也。」

「然則治天下獨可耕且為與？有大人之事，有小人之事。且一人之身，而百工之所為備。如必自為而後用之，是率天下而路也。故曰：或勞心，或勞力；勞心者治人，勞力者治於人；治於人者食人，治人者食於人：天下之通義也。」

「當堯之時，天下猶未平，洪水橫流，汜濫於天下。草木暢茂，禽獸繁殖，五穀不登，禽獸逼人。獸蹄鳥跡之道，交於中國。堯獨憂之，舉舜而敷治焉。舜使益掌火，益烈山澤而焚之，禽獸逃匿。禹疏九河，濬濟漯，而注諸海；決汝漢，排淮泗，而注之江，然後中國可得而食也。當是時也，禹八年於外，三過其門而不入，雖欲耕，得乎？后稷教民稼穡，樹藝五穀，五穀熟而民人育。人之有道也，飽食、煖衣、逸居而無教，則近於禽獸。聖人有憂之，使契為司徒，教以人倫：父子有親，君臣有義，夫婦有別，長幼有序，朋友有信。放勳曰：『勞之來之，匡之直之，輔之翼之，使自得之，又從而振德之。』聖人之憂民如此，而暇耕乎？」

「堯以不得舜為己憂，舜以不得禹、皋陶為己憂。夫以百畝之不易為己憂者，農夫也。分人以財謂之惠，教人以善謂之忠，為天下得人者謂之仁。是故以天下與人易，為天下得人難。孔子曰：『大哉堯之為君！惟天為大，惟堯則之，蕩蕩乎民無能名焉！君哉舜也！巍巍乎有天下而不與焉！』堯舜之治天下，豈無所用其心哉？亦不用於耕耳。」

「吾聞用夏變夷者，未聞變於夷者也。陳良，楚產也。悅周公、仲尼之道，北學於中國。北方之學者，未能或之先也。彼所謂豪傑之士也。子之兄弟事之數十年，師死而遂倍之。昔者孔子沒，三年之外，門人治任將歸，入揖於子貢，相向而哭，皆失聲，然後歸。子貢反，築室於場，獨居三年，然後歸。他日，子夏、子張、子游以有若似聖人，欲以所事孔子事之，彊曾子。曾子曰：『不可。江漢以濯之，秋陽以暴之，皜皜乎不可尚已。』今也南蠻駘舌之人，非先王之道，子倍子之師而學之，亦異於曾子矣。吾聞出於幽谷遷于喬木者，未聞下喬木而入於幽谷者。《魯頌》曰：『戎狄是膺，荊舒是懲。』周公方且膺之，子是之學，亦為不善變矣。」

「從許子之道，則市賈不貳，國中無偽。雖使五尺之童適市，莫之或欺。布帛長短同，則賈

相若；麻縷絲絮輕重同，則賈相若；五穀多寡同，則賈相若；屨大小同，則賈相若。」曰：「夫物之不齊，物之情也；或相倍蓰，或相什伯，或相千萬。子比而同之，是亂天下也。巨屨小屨同賈，人豈為之哉？從許子之道，相率而為偽者也，惡能治國家？」

Iu Xu Xing, adepto de la vortoj de Shennong, dio de agronomo, alvenis de Chu-regno al Teng, atingis la pordon kaj anoncis al la duko Wen, dirante: “Ni venis de malproksime, aŭdinte ke vi faras bonvolecan politikon, ni petas vin doni al ni parcelon por enmigri.”

La duko Wen donis al ili parcelon, da ili estas kelkdek, ĉiuj vestis sin per kruda kanabo, vivtenas sin, fabrikante sandalojn kaj plektante pajlmatojn.

Chen Xiang kaj lia juna frato, lernantoj de konfuceano Chen Lian, venis de Song-regno al Teng, portante surdorse ŝpatojn, kaj diris: “Ni aŭdis, ke Via reĝa Moŝto faras la politikon de sanktuloj kaj mem estas sanktulo. Permesu nin enmigri por fariĝi subuloj de la sanktulo.”

Vidante Xu Xing, Chen Xiang tre ĝojas, kaj, forlasinte sian antaŭan lernitaĵon, eklernis ĉe Xu Xing. Chen Xiang renkontis Mengzi kaj sciigis al li jenan komenton de Xu Xing, dirante: “Lia Moŝto, la duko de Teng, estas vere saĝa reĝo, sed tamen li ankoraŭ ne atingis la Vojon-Taon. Saĝulo estas tiu, kiu terkulturas kaj manĝas kune kun la popolo, kaj li mem kuiras maten- kaj vesper-manĝon kaj samtempe okupiĝas pri la regado. Nun, en Teng estas grenejoj kaj trezorejoj, kiuj por la popolo estas peza ŝarĝo, kvankam jam estas sufiĉe da rezervo por nutri la regnon mem. Kial oni povus nomi lin saĝa?”

Mengzi diris: “Ĉu s-ro Xu semas mem kaj manĝas grenon?”

Respondis: “Jes.”

“Ĉu s-ro Xu teksas mem ŝtofon kaj vestiĝas?”

“Ne. S-ro Xu nur vestas sin per kruda lano.”

“Ĉu s-ro Xu metas sur sin kronon?”

“Metas.”

“Kian kronon?”

“Silkan kronon”

“Ĉu li mem teksas ĝin?”

“Ne. Li ricevis ĝin interŝanĝe por greno.”

“Kial s-ro Xu mem ne teksas ĝin?”

“Ĉar tio malhelpas al li terkulturi.”

“Ĉu s-ro Xu kuiras per argila kaldrono? plugas per fera soko?”

“Jes.”

“Ĉu li mem fabrikis ilin”

“Ne, li ricevis ilin kontraŭ greno.”

“Ĉu ricevi instrumentojn kontraŭ greno ne estas subpremi per peza ŝarĝo potistojn kaj forĝistojn? Ĉu, male, ricevi grenon kontraŭ iloj ne estas subpremi per peza ŝarĝo agrikulturistojn? Se tiel, kial s-ro Xu ne fariĝus potisto kaj forĝisto? Kial ne preni ĉion ĉi tion sur sin por uzi hejme? Kial li tiom ĝenplene interŝanĝas aĵojn kun cent metiistoj? Kial s-ro Xu ne evitas tian ĝenon?”

“Aferojn de cent metiistoj oni ne povas fari samtempe, okupante sin per la terkulturado.”

“Se tiel, ĉu oni povas regi la mondon, samtempe terkulturante? Estas ja la afero de grandulo, kaj estas la afero de malgrandulo. Unu homo estas ekipita per aĵoj faritaj de cent metiistoj. Se oni devus fari mem ĉion, kion mem poste uzos, laciĝus la mondo. Do estas dirite: iuj laboras per menso, la aliaj laboras per korpa forto; personoj de mensa laboro regas homojn, homoj de korpa laboro estas regataj; la regato provizas per manĝaĵoj, la reganto manĝas dank al homoj – tio estas la komuna justo de la mondo.”

En la tempo de la reĝo Yao, la mondo ankoraŭ ne estis paca, superakvego fluadis flanken kaj okazadis inundoj en la mondo. Herboj kaj arboj kreskadis libervole, rabobirdoj kaj bestoj pululadis, kvin cerealoj ne estis sufiĉe rikoltataj. Rabobirdoj kaj bestoj minacadis homojn. Padoj de animaloj kaj birdoj intermiksiĝis en la centra lando. Yao sola malĝojis je tio, promociis Shun por establi la regadon. Shun igis Yi porti fajran torĉon, ke Yi bruligu montojn kaj marĉojn por elpeli rabobirdojn kaj bestojn. Yu bontenadis naŭ riverojn, ĝustigis la fluon de riveroj Qi kaj Ta, por ke ili enfluu marojn; elboris riverojn Ru kaj Han, ŝovis riverojn Huai kaj Su en la riveron Changjiang. Kaj poste en la centra lando iĝis eble manĝi al homoj. En tiu tempo, Yu agadis ekstere ok jarojn, ne revenante hejmen, spite ke li preterpasadis sian domon tri fojojn. Kiel ajn li mem dezirus terkulturi, ĉu al li eblus? Hou Ji instruis la popolon kiel semadi kaj rikoltadi, plantadi kvin cerealojn, kaj, sukcesinte fari kvincerealajn maturajn, la popolo ekkreskis kiel plenaj homoj. Sed estas la Vojo-Tao por homoj. Kvankam ili satmanĝas, vestiĝas varme, loĝas pace, tamen se ili ne estus edukataj, ili restus similaj al birdoj kaj bestoj. Tio kaŭzis al sanktuloj zorgojn, do Shun asignis al Xie ministron pri edukaj aferoj, kaj igis lin instrui pri morala rilato de homoj, t. e. – intimeco inter gepatroj kaj gefiloj, justeco inter estroj kaj subuloj, distingo inter edzo kaj edzino, ordo inter pliaĝulo kaj malpliaĝulo, fido inter amikoj.

Fangxun (la reĝo Yao) diris: ‘Rilate al lernantoj, kuraĝigu, stimulu kaj konduku ilin, korektu kaj rektigu ilin, asistu kaj donu al ili flugilojn, lasu ilin mem akiri la celatan,

tiam ili sekvos, disvolvante la virton.’ Tiel do la sanktuloj prizorgadis la popolon, ĉu ili havus la tempon por terkulturadi?

Kio igis Yao maltrankvila, estas, ĉu li povus akiri Shun kiel heredanto aŭ ne. Ankaŭ Shun zorgis, ĉu eblus akiri Yu kaj Gao Yao aŭ ne. Se kamparanoj, ili nur zorgadas, ĉu eblus mastrumi la kampon je cent *muoj* aŭ ne. Disdoni al homoj riĉaĵojn estas nomata la semado de ‘favoro’, instrui al homoj bonon estas nomata la semado de ‘fideleco’, akiri personojn por la mondo estas nomata la semado de ‘bonvoleco’. Estas facile transdoni al iu ajn homo la mondon, sed estas malfacile akiri la personon taŭgan por la mondo.

Konfuceo diris: ‘Kiel granda estis Yao kiel la reĝo! Vere, li rigardis nur la Ĉielon granda, kaj nur sekvis la Ĉielon. Li estis tiel vasta kaj ampleksa, ke la popolo ne povas doni al li la nomon! Kia reĝo estis ja Shun! Li estis tiel alta kaj supera, ke li regis la mondon, kvazaŭ mem ne tuŝus ĝin!’ Dum Yao kaj Shun regis la mondon, ĉu ili ne dediĉis sin al tio elkore? Nur ili mem ne okupis sin propramane per la laboro de terkulturado.

Mi aŭdas, ke la dinastio Xia provis transformi barbarojn, sed mi ne aŭdas, ke ĝi estis transformita de la barbaroj. Chen Liang devenis de Chu-regno kaj li ĝojis je la Vojo de la Duko Zhou kaj Konfuceo. Li alvenis norden por lerni en la centra regno. Nordaj sciencistoj ne kapablis superi lin. Li estis t. n. la persono elstara. Vi kaj viaj fratoj lernis ĉe li kelkdek jarojn, kaj post lia morto vi finfine forlasis lin kaj turnis sin al Xu Xing.

Antaŭ longe, post kiam Konfuceo forpasis, liaj lernantoj revenis hejmen post la plenumado de trijara funebro. Ĉe la adiaŭo ili turnis sin al Zigong, ploris unuj kun la aliaj tiom, kiom ili perdis la voĉon, kaj poste ili foriris al sia hejmo. Zigong, male, konstruis la barakon apud la tombo kaj sola loĝis tie plie dum tri jaroj, kaj poste foriris hejmen. En la alia tago, Zixia, Zizhang, Ziyou, rigardante Youruo-n simila al sanktulo, volus servi al li kiel al Konfuceo. Ili provis persvadi ankaŭ Zengzi aliĝi, sed Zengzi diris: ‘Ne eblas. Kiom ajn lavadu lin per grandaj riveroj kiel Cangjiang kaj Han, kiom ajn turnadi lin al aŭtuna suno, neniam eblas pure plialtigi lin.’⁸⁹

Kiel vi diferencas de tiu Zengzi, perfidinte vian instruiston, kaj lernante nun ĉe iu suda barbaro, laniosimila babilemulo sen la vojo de antaŭaj reĝoj! Mi aŭdas, ke estas iu, kiu, elirinte de malhela valo, transiras al la alta arbo, sed mi ne aŭdas iun iranta de alta arbo suben al malhela valo. Estas dirite en ‘Lu Kantoj’: ‘Barbarojn en nordo kaj okcidento, Rong kaj Di, li atakis, sudajn barbarojn Jing kaj Shu li punis.’ Kion ĉiam atakadis la Duko Zhou, tion vi prenas kiel lernindan. Tio estas ja malbona ŝanĝiĝo.”

Chen Xiang diris: “Laŭ la vojo de s-ro Xu, la merkata prezo de varoj ne disdiiĝas,

⁸⁹ Multaj esploristoj prenas la objekton 之 por Konfuceo kaj interpretas: “Kio estas lavita per la granda rivero kaj elmetita al aŭtuna suno, tion neniu povas superi je pura alteco.”

kaj ne estiĝas falso en la tuta mondo. Kiam knabo malgranda je 5 *chioj* estos sendata al bazono, li ne estos trompata. Ŝtofoj de sama kvanto estos vendataj je la sama prezo, kanabo kaj silko, se kun difina kvanto, estos vendataj je fiksjaj prezoj; kvin cerealoj, se kun difina kvanto, estos vendataj je fiksjaj prezoj. Ŝuoj, se samaj je grandeco, estos vendataj je la fiksjaj prezoj.”

Mengzi diris: “La diverseco de aĵoj estas la natura karaktero de aĵoj. Iu kostas duoble-kvinoble, la alia – dekoble-centoble, la tria – miloble-dekmiloble. Se vi egaligus ilin por fari ilin samaj, tiam malordiĝus la mondo. Se ŝuoj fajnaj kaj ŝuoj malfajnaj estos vendataj kontraŭ la sama prezo, kion farus homoj? La vojo de s-ro Xu kondukas homojn al falsado. Kiel regeblus la ŝtato per tiu maniero?”

5 [3A5]

墨者夷之，因徐辟而求見孟子。孟子曰：「吾固願見，今吾尚病，病愈，我且往見，夷子不來！」他日又求見孟子。孟子曰：「吾今則可以見矣。不直，則道不見；我且直之。吾聞夷子墨者。墨之治喪也，以薄為其道也。夷子思以易天下，豈以為非是而不貴也？然而夷子葬其親厚，則是以所賤事親也。」

徐子以告夷子。夷子曰：「儒者之道，古之人『若保赤子』，此言何謂也？之則以為愛無差等，施由親始。」

徐子以告孟子。孟子曰：「夫夷子，信以為人之親其兄之子為若親其鄰之赤子乎？彼有取爾也。赤子匍匐將入井，非赤子之罪也。且天之生物也，使之一本，而夷子二本故也。蓋上世嘗有不葬其親者。其親死，則舉而委之於壑。他日過之，狐狸食之，蠅蚋姑嘍之。其頽有泚，睨而不視。夫泚也，非為人泚，中心達於面目。蓋歸反藁裡而掩之。掩之誠是也，則孝子仁人之掩其親，亦必有道矣。」

徐子以告夷子。夷子慙然為閒曰：「命之矣。」

Iu mohisto, Yi Zhi, dezirus renkontiĝi kun Mengzi pere de Xu Bi. Mengzi diris: “Mi volus certe vidi lin, sed mi estas nun malsana. Post kiam mi resaniĝos, mi iros vidi lin. Ne venu s-ro Yi al mi nun!”

En alia tago Yi Zhi denove petis de Mengzi la renkontiĝon. Mengzi diris: “Mi devus vidi lin nun. Se mi ne korektus lin, la vera Vojo ne videblus. Do mi volas fari lin rekta. Mi aŭdis, ke s-ro Yi estas mohisto. Rilate al la plenumado de funebro, mohistoj konsideras la simplan konformanta al la Vojo. S-ro Yi pensas ŝanĝi la mondon laŭ la simpligo. Ĉu li ne rigardas tion malestiminda? Sed tamen li mem funebriis siajn gepatrojn lukse – tio signifas, ke li konsideris la simpligon kiel malestimon je la servado al gepatroj.”

S-ro Xu transdonis la vortojn al s-ro Yi. S-ro Yi diris: “Konfuceanoj tenas kiel

principan vojon la frazon: ‘antikvuloj zorgadis homojn, kvazaŭ vartus bebojn’. Kion signifas tiu frazo? Tio estas, ke oni devas ami homojn sen distinge komence de siaj intimaj.”

S-ro Xu transdonis lian vortojn al Mengzi. Mengzi diris: “Ĉu s-ro Yi opinias, ke oni devas trakti bebojn de najbaro tiel intime, samkiel infanojn de sia pliĝa frato? Li prenas la frazon por tia signifo. (La frazo signifas, ke) se iu bebo rampas al la puto, apenaŭ enfalante tien, la bebo mem ne kulpas je tio. Kiu estiĝas, tiun naskas la Ĉielo. Do estigas tion la unu fonto. Sed s-ro Yi konsideras du fontojn kiel kaŭzon.⁹⁰

Pratempe eĉ okazis, ke iuj ne entombigis gepatrojn. Kiam mortis la gepatroj, oni forĵetis kadavron en valon. Tagojn poste vulpoj k. c. manĝis ĝin, muŝoj kaj kuloj alsuĉis. Ekfluis glacia ŝvito al la filo sur la frunto kaj ne eblis rigardi la aspekton. Li ŝvitis ne per timo de reputacio inter aliuloj, sed la ŝvito elfluis sur la vizaĝon el la centro de koro. Li returnis sin hejmen, kunportis korbon kaj ŝovelilon, kaj kovris la kadavron per terpeco. La kovrado estas la esprimo de sincera konscienco. La gepatrojn kovris fila pietato kaj homa bonvoleco. En tio nepre troviĝas la Vojo.”

S-ro Xu transdonis la mesaĝon al s-ro Yi. S-ro Yi spirĝeme paŭzis kaj diris: “Tio estas ja la ordono.”⁹¹

⁹⁰ La dirmaniero de Mengzi ŝajnas al mi tro lakona, do estus allaseble kompreni diverse la opinion. La citaĵo pri bebo el 尚書,康誥 estas komprenata diverse inter Mengzi kaj Yi. Mengzi diras: “bebo ne kulpas” en la signifo, ke kulpas ne popolo, sed reganto. Yi Zhi insistas, ke amo al bebo estas komuna, do kondukas al universala amo. La disputo ne estas sufiĉe disvolvita, ĉar tio ne estas farata per rekta konversacio, sed tra peranto.

⁹¹ La lasta vorto de Yi Zhi 命 estis interpretata de multaj esploristoj, kiel “instruo”, sed mi tradukis kiel ‘ordono (destino)’ pro tio, ke ne estiĝis fruktodona diskuto per la rekta interparolo kun Mengzi.

《滕文公下》

LA DUKO WEN DE TENG-LANDO (II)

6 [3B1]

陳代曰：「不見諸侯，宜若小然；今一見之，大則以王，小則以霸。且志曰：『枉尺而直尋』，宜若可為也。」

孟子曰：「昔齊景公田，招虞人以旌，不至，將殺之。志士不忘在溝壑，勇士不忘喪其元。孔子奚取焉？取非其招不往也，如不待其招而往，何哉？且夫枉尺而直尋者，以利言也。如以利，則枉尋直尺而利，亦可為與？昔者趙簡子使王良與嬖奚乘，終日而不獲一禽。嬖奚反命曰：『天下之賤工也。』或以告王良。良曰：『請復之。』彊而後可，一朝而獲十禽。嬖奚反命曰：『天下之良工也。』簡子曰：『我使掌與女乘。』謂王良。良不可，曰：『吾為之範我馳驅，終日不獲一；為之詭遇，一朝而獲十。《詩》云：「不失其馳，舍矢如破。」我不貫與小人乘，請辭。』御者且羞與射者比。比而得禽獸，雖若丘陵，弗為也。如枉道而從彼，何也？且子過矣，枉己者，未有能直人者也。」

Chen Dai diris: “Ne renkonti landstrojn ŝajnas iomete etanime; se vi unufojon renkontus ilin, iu pligranda el ili fariĝus reĝo, iu malpligranda iĝus almenaŭ hegemoniulo. Estas skribite en *Rekordo*: ‘Cedante unu *chio*-n kurban, anstataŭe rektigi ok *chiojn*’. Al vi endas provi tiel.”

Mengzi diris: “Antaŭ longe la duko Jing de Qi-regno, ĉasante, alvokis iun gardiston de ĉasejo per signalo de flago, sed li ne venis, do la duko ĵus volus mortigi lin.⁹² Estas dirite, ke la alta persono estas preta enfali fosaĵon aŭ valon, la bravulo estas preta je la morto per senkapigo. Kion ĉerpis Konfuceo el tiu epizodo? – Se la alvoko malprava, tiuokaze la persono ne iras. Se ne atendante la pravan alvokon, oni ne ekirus, kio ajn okazus. Kiu diras, ke cedu al la kurba parto unu *chion* por rektigi ok *chiojn*, tiu celas profiton. Se temas pri profito, eblus ankaŭ diri, ke restigu la kurban parton je ok *chioj* por fari unu *chio*-n rekta, ĉu ne?”

Iam Zhao Jianzi igis Wang Liang, ĉar-kondukiston, akompani lian favoraton Xi por la ĉasado. Tutan tagon ili ĉasis vane sen unu birdo. La favorato Xi diris reveninte: ‘Li estas plej mallerta je la konduka tekniko.’ Pri tio estas sciigite al Wang Liang. Li diris: ‘Mi petegas denove provi.’ Post lia persista petado estas permesite. Dum unu mateno dek birdoj estas kaptitaj. La favorato Xi raportis reveninte: ‘Li estas plej lerta je la konduka tekniko.’ Jianzi diris: ‘Mi donas lin al vi konduki vian ĉaron.’ Kaj pri tio estas sciigite al Wang Liang. Li ne povas konsenti, dirante: ‘Kiam mi lasis ĉevalĉaron kuradi

⁹² Por alvoki estas necese uzi diverse signalojn depende de klasoj, la flago estas uzata por alvoki grandoficistojn, sed por alvoki gardistojn uzata la fela ĉapo.

laŭ norme, tutan tagon li ĉasis vane sen unu rezulto. Kiam mi faris ruzon kontraŭ la normo hazarde laŭ la nivelo de ĉasisto, dum unu mateno li gajnis dek. Estas dirite en *Poezio*: <Se la ĉaro estas kondukata sen erare, la pafita sago trafas la celon.>⁹³ Mi ne alkutimiĝas kune rajdi kun malgrandulo. Permesu al mi rifuzi.' Eĉ ĉar-kondukisto hontas, komparate kun fuŝpafisto. Eĉ se gajnus da birdoj-bestoj multabunde kvazaŭ montoj, li ne konsentus. Cedante la vojaĉon kurban obei al aliuloj, kial necesus? Vi eraras. Kiu cedus sin al kurbiĝo, tiu ne povus rektigi homojn."⁹⁴

7 [3B2]

景春曰：「公孫衍、張儀豈不誠大丈夫哉？一怒而諸侯懼，安居而天下熄。」

孟子曰：「是焉得為大丈夫乎？子未學禮乎？丈夫之冠也，父命之；女子之嫁也，母命之，往送之門，戒之曰：『往之女家，必敬必戒，無違夫子！』以順為正者，妾婦之道也。居天下之廣居，立天下之正位，行天下之大道。得志與民由之，不得志獨行其道。富貴不能淫，貧賤不能移，威武不能屈。此之謂大丈夫。」

Jing Chun diris: “Gongsun Yan kaj Zhang Yi estas vere grandaj personoj, ĉu ne? Se ili unufojon ekkoleras, landestroj ektimas tremante; se ili sidas en paco, la mondo ripozas.”⁹⁵

Mengzi diris: “Kial eblus konsideri ilin grandaj personoj? Ĉu vi ankoraŭ ne lernis pri decreguloj? Kiam iu viro ekestis kronata, lia patro donas al li ordonon;⁹⁶ kiam iu virino ekiras ediniĝi, ŝia patrino donas al ŝi ordonon akompanante ĉe ŝie eliro de la pordo, kaj avertas, dirante: ‘Vi nun iros al via domo, nepre respektu kaj nepre prizorgu, ke vi ne kontraŭu vian edzon!’ Konduti konforme al ĝusteco estas la vojo de edzinoj.

Kiam iu sidas sur granda loĝejo de la mondo kaj okupas la ĝustan postenon de la mondo, tiu devas iri laŭ la granda Vojo de la mondo. Se farebla estas via intenco, faru tion kun la popolo; se ne farebla, iru sola laŭ la Vojo. Kiun ne povas devojigi la riĉo kaj la alta rango, nek povas ŝanĝi la malriĉo kaj la mizero, nek povas submeti la potenco kaj la

⁹³ Citaĵo el 詩經, 小雅, 車攻.

⁹⁴ Chen Dai estas nomo de unu el disĉiploj de Mengzi. La duko Jing de Qi-regno estis surtrone 547-490 a. K. Zhao Jianzi estas ministro de Jin-regno. Wang Liang estas fama je bona kondukisto. Pri Xi, iu konjektas tiun kiel vir-favoraton, la alia – kiel virinon, amonistinon.

⁹⁵ Zhang Yi kaj Gongsun Yan estas tre famaj politikistoj-diplomatoj. Gongsun Yan fariĝis cefministro de Qin-regno en 333 kaj 317 a. K. Pri Zhang Yi estas skribite en *Shiji* detale. Ankaŭ Jing Chun estis tia publicisto laŭ komentistoj. Laŭ la teksto Mengzi rigardis Zhang Yi k. a. kiel irantaj la vojon de virinoj. Estas notinde, ke Mengzi havas multe pli grandan influon al posteuloj ol tiuj famaj politikistoj, kiel Zhang Yi k. a.

⁹⁶ Antikve en Ĉinio por la 20-jara viro estis farata la ceremonio de la portado de krono, kiel maturiĝo.

forto, tiu estas nomata la granda persono.

8 [3B3]

周霄問曰：「古之君子仕乎？」

孟子曰：「仕。傳曰：『孔子三月無君，則皇皇如也，出疆必載質。』公明儀曰：『古之人三月無君則弔。』」

「三月無君則弔，不以急乎？」

曰：「士之失位也，猶諸侯之失國家也。禮曰：『諸侯耕助，以供粢盛；夫人蠶繅，以為衣服。犧牲不成，粢盛不潔，衣服不備，不敢以祭。惟士無田，則亦不祭。』牲殺器皿衣服不備，不敢以祭，則不敢以宴，亦不足弔乎？」

「出疆必載質，何也？」

曰：「士之仕也，猶農夫之耕也，農夫豈為出疆舍其耒耜哉？」

曰：「晉國亦仕國也，未嘗聞仕如此其急。仕如此其急也，君子之難仕，何也？」

曰：「丈夫生而願為之有室，女子生而願為之有家。父母之心，人皆有之。不待父母之命、媒妁之言，鑽穴隙相窺，踰牆相從，則父母國人皆賤之。古之人未嘗不欲仕也，又惡不由其道。不由其道而往者，與鑽穴隙之類也。」

Zhou Xiao demandis, dirante: “Ĉu ankaŭ antikvaj nobluloj servis al iu estro?”

Mengzi diris: “Servis. Estas dirite: ‘Kiam Konfuceo havis dum tri monatoj neniun estron por servi, ne sentis sin trankvila. Elirante landlimon, li nepre portis ĉe si la memordonacon por sia estonta estro.’ Gong Mingyi diris: ‘Antikvuloj, kiam ili ne havis estron por servi dum tri monatoj, kondolencis.’”

Zhou Xiao demandis: “Kondolenci se ne troviĝus estro dum tri monatoj, ĉu tio estas tro ekstreme?”

Mengzi diris: “Ke iu persono perdas la postenon, tio estas same, kiel por landestroj estas perdita la ŝtato. Estas dirite en ‘Libro de Decreguloj: ‘Landestro asistas la terkulturadon, oferante pleton plenan de milio, kaj lia edzino kulturas silkraŭpon, kokonon kaj teksas vestaĵon. Se la oferaĵo ne estus plena, la milio ne estus pura, la vestaĵo ne estus kompleta, tiam oni ne aŭdacas okazigi la feston. Ankaŭ iu ofic-persono sen kampo de oferaĵo ne povas okazigi la feston.’ Se ne estas preta la ceremonia ujo de buĉoferaĵo nek la ceremonia vestaĵo, ne okazigeblas la festo, ĉu tio ne indas je kondolenco?”

Zhou Xiao demandis: “Ĉe eliro de landlimo nepre necesis la memordonaco, kial?”

Mengzi diris: “Por esti enoficigita. Samkiel kamparanoj terkulturas, ĉu ili ne portas kun si la hojon ĉe la elirado el de landlimo?”

Zhou Xiao diris: “En Jin-regno, kie mi iam servis, mi ne aŭdis, ke la enoficiĝo estas

tiel grava, strikte solena. Se tiel estas grava la enoficiĝo, kial vi, noblulo, ne servas?”

Mengzi diris: “Ke la viro, naskiĝinta, havigu al si edzinon, kaj la virino, naskiĝinta, havigu al si domon, – tion kore deziras gepatroj, kaj ĉiuj havas tian deziron. Sed gepatroj kaj ĉiuj landanoj malestimas, ke sia filo aŭ filino, ne atendante la ordonon de gepatroj, sen vortoj de perantoj, ŝtelrigardante tra truoj unu la alian, kuniĝus memvole trans muron. Antikvuloj neniam ne deziris enoficiĝi, sed malamis ne laŭ la ĝusta vojo. Kiu iras ne laŭ la ĝusta vojo, tiu estas sama, kiel ŝtelrigardanto tra truoj.”⁹⁷

9 [3B4]

彭更問曰：「後車數十乘，從者數百人，以傳食於諸侯，不以泰乎？」

孟子曰：「非其道，則一簞食不可受於人；如其道，則舜受堯之天下，不以為泰，子以為泰乎？」

曰：「否。士無事而食，不可也。」

曰：「子不通功易事，以羨補不足，則農有餘粟，女有餘布；子如通之，則梓匠輪輿皆得食於子。於此有人焉，入則孝，出則悌，守先王之道，以待後之學者，而不得食於子。子何尊梓匠輪輿而輕為仁義者哉？」

曰：「梓匠輪輿，其志將以求食也；君子之為道也，其志亦將以求食與？」

曰：「子何以其志為哉？其有功於子，可食而食之矣。且子食志乎？食功乎？」

曰：「食志。」

曰：「有人於此，毀瓦畫墁，其志將以求食也，則子食之乎？」

曰：「否。」

曰：「然則子非食志也，食功也。」

Peng Geng demandis, dirante: “Kun kelkdek da ĉaroj sekvataj, kun sekvantaro el kelkcento, nutrate de landestroj unu post la alia, ĉu vi ne konsideras tion ekstravaganca?”

Mengzi diris: “Se ne laŭ la Vojo, oni ne devas ricevi de homoj eĉ unu porcion de manĝaĵo, se laŭ la Vojo, Shun akceptis de Yao la mondon – ĉu tio ne estas ekstravaganca? aŭ vi konsideras tion ekstravaganca?”

Peng Geng diris: “Ne. Sed ne allaseblas, ke nobla persono sen laboro manĝas.”

Mengzi diris: “Vi ne komprenas meriton de reciproka interŝanĝo laŭ cirkulado, kompletigo de manko per superfluo, ekzemple, iam ĉe kamparanoj superfluas grenoj, ĉe vi superfluas toloj. Se vi povus cirkuladi varojn, tiam lignometiistoj kaj ĉarmetiistoj, ĉiuj akiras de vi manĝaĵojn. Supozu, estas ĉi tie iu persono, kiu, estante kun fila pietato interne de familio, kun fideleco al pliaĝuloj ekstere de domo, sekvas la Vojon de antaŭaj reĝoj kaj poste fariĝis scienculo, sed ne povas akiri manĝaĵon ĉe si. Vi respektas

⁹⁷ Jin-regno estas Wei-regno 魏 tiutempe.

lignometiiston kaj ĉarmetiiston, sed preterrigardas personon de bonvoleco kaj justo, kial?”

Peng Geng diris: “Lignometiisto kaj ĉarmetiisto strebas de komence al la gajno de manĝaĵoj, noblulo – al la Vojo. Ĉu ankaŭ li strebas al la gajno de manĝaĵoj?”

Mengzi diris: “Kial vi rigardas la strebon grava? Kiam iu donas al vi meriton, se indas al tiu doni manĝi, donu manĝaĵon. Ĉu vi donas al li manĝi pro la strebo? aŭ pro la merito?”

Peng Geng diris: “Pro la strebo.”

Mengzi diris: “Por ekzemplo, troviĝas iu, kiu rompis tegolojn kaj petolskribis muron. Li strebis al la gajno de manĝaĵoj. Ĉu vi donas al li manĝi?”

Peng Geng diris: “Ne.”

Mengzi diris: “Tiuokaze vi donas al iu manĝi ne pro la strebo, sed pro la merito.”⁹⁸

10 [3B5]

萬章問曰：「宋，小國也。今將行王政，齊楚惡而伐之，則如之何？」

孟子曰：「湯居亳，與葛為鄰，葛伯放而不祀。湯使人問之曰：『何為不祀？』曰：『無以供犧牲也。』湯使遺之牛羊。葛伯食之，又不以祀。湯又使人問之曰：『何為不祀？』曰：『無以供粢盛也。』湯使亳眾往為之耕，老弱饋食。葛伯率其民，要其有酒食黍稻者奪之，不授者殺之。有童子以黍肉餉，殺而奪之。《書》曰：『葛伯仇餉。』此之謂也。為其殺是童子而征之，四海之內皆曰：『非富天下也，為匹夫匹婦復讎也。』『湯始征，自葛載』，十一征而無敵於天下。東面而征，西夷怨；南面而征，北狄怨，曰：『奚為後我？』民之望之，若大旱之望雨也。歸市者弗止，芸者不變，誅其君，弔其民，如時雨降。民大悅。《書》曰：『徯我后，后來其無罰。』『有攸不惟臣，東征，綏厥士女，匪厥玄黃，紹我周王見休，惟臣附于大邑周。』其君子實玄黃于匪以迎其君子，其小人簞食壺漿以迎其小人，救民於水火之中，取其殘而已矣。《太誓》曰：『我武惟揚，侵于之疆，則取于殘，殺伐用張，于湯有光。』不行王政云爾，苟行王政，四海之內皆舉首而望之，欲以為君。齊楚雖大，何畏焉？」

Wang Zhang demandis, dirante: “Song estas malgranda regno, kie nun estas praktikota ia reĝa regado. Sed Qi-regno kaj Chu-regno estas atakontaj ĝin. Kiel iros tio?”

Mengz diris: “Kiam Tang la sankta reĝo loĝis en Bo⁹⁹, najbare estis la lando Ge. Landestro de Ge estis diboĉema kaj ne faris la riton de oferaĵo. Tang sendis sian

⁹⁸ Rilate al la vorto 画 estas diversaj opinioj, iuj konsideras ĝin “pentri”, aliaj – “difekti”. En tiu teksto videblas ŝajna kontraŭdiro je la taksado far Mengzi pri merito 功. En la komenco de la 1-a ĉap. Mengzi malestimas la serĉadon de profito 利. Sed li estimas la ekonomian meriton de interŝanĝo. Li taksas diference la meriton kaj la profiton.

⁹⁹ Situis norde de nuna Shangqiu 商丘, Henan 河南省.

personon por demandi lin: ‘Kial vi ne faras oferaĵon?’

Respondis: ‘Ni havas nenion oferi.’

Tang sendis al li bovojn kaj ŝafojn. La estro de Ge formangis ilin, kaj ne oferis. Tang sendis sian personon demani: ‘Kial vi ne faras oferaĵon?’

Respondis: ‘Ni ne havas grenon por oferi.’

Tang sendis siajn popolanojn de Bo por helpi terkulturadon, doni al maljunuloj kaj malfortuloj manĝi. La estro de Ge, kondukante sian popolon, forrabis vinon, manĝaĵon, milion kaj rizon, kaj mortigis tiujn, kiuj ne cedis. Oni mortigis eĉ knabon, alportantan por lunĉo milion kaj viandon, kaj forrabis lin. Estas skribite en *Libroj*: ‘La estro de Ge forrabis eĉ lunĉon.’¹⁰⁰ Tio signifas la supre menciitan. Kiam la knabo estis mortigita, Tang komencis ekspedicii por puni Ge. Ĉiuj en la tuta mondo ene de kvar maroj diradis: ‘Ne por akiri la riĉaĵon de la mondo, sed por venĝi siajn simplajn virojn kaj virinojn’, kaj ‘Tang komencis kampanjon ekde la Ge.’ En dek unu militiroj li estis senrivala sub la ĉielo. Kiam li estis deplojanta oriente, la okcidentaj barbaroj plendis; kiam li estis deplojanta sude, la nordaj triboj plendis, dirante: ‘Kial li flankklasis nin?’ Tiuj popoloj esperis lin, samkiel oni deziris pluvon dum granda sekeco. La popolanoj laŭkutime ne ĉesis iradi al merkatoj, kamparanoj senŝanĝe sarkadis herbojn, dum li estis punanta ilian estron, liberigante tamen la popolon. La popolanoj ĝojegis je tio, kvazaŭ je oportuna pluvo.

Estas dirite [ankaŭ pri la reĝo Wu de Zhou] en *Libro*: ‘Ni atendas nian regonton, se vi venos, jam ne estos la punado al ni.’ kaj skribite, ‘Sed estis ankoraŭ tiuj, kiuj ne submetiĝas tuj, do Wu militiris orienten kaj donis pacon al la soldatoj kaj virinoj. La popolanoj alportis keston de silko kolorigita per nigro kaj flavo, petis ricevi aŭdiencon de nia reĝo de Zhou, kaj vidante ripozon ĉe li, fariĝis subuloj-civitanoj en granda urbo de Zhou.’¹⁰¹ La nobluloj de Yin bonvenigis la noblulojn de Zhou per kesto plena de silko kun koloroj nigra kaj flava, la simpluloj bonvenigis la soldatojn per taso de manĝaĵo kaj botelo de trinkaĵo. Estas savita la popolo el de akvo kaj fajro, kaj estas eliminitaj nur krueluloj. Estas skribite en *Taishi*: ‘Mia gloro je la batalo iĝas alta, militiras profunden trans la limon, kaptas la restantojn el despotoj, mortigas kaj punas plenstreĉe – tiel mi lumas pli brile ol Tang.’¹⁰²

Ĉu la landestro de Song ne praktikas vere la reĝan politikon? Se li vere praktikas la reĝan politikon, ĉiuj ene de la kvar maroj atendus lin kun kolo streĉita, dezirante akcepti lin sia reĝo. Spite ke grandaj estas la regnoj de Qi kaj Chu, kion li devus timi?”

¹⁰⁰ Citaĵo el 尚書, 仲虺之誥.

¹⁰¹ Fragmentoj de citaĵo el 尚書, 武成.

¹⁰² Taishi estas la nomo de unu ĉapitro en 尚書, 周書.

11 [3B6]

孟子謂戴不勝曰：「子欲子之王之善與？我明告子。有楚大夫於此，欲其子之齊語也，則使齊人傳諸？使楚人傳諸？」

曰：「使齊人傳之。」

曰：「一齊人傳之，眾楚人咻之，雖日撻而求其齊也，不可得矣；引而置之莊嶽之間數年，雖日撻而求其楚，亦不可得矣。子謂薛居州，善士也。使之居於王所。在於王所者，長幼卑尊，皆薛居州也，王誰與為不善？在王所者，長幼卑尊，皆非薛居州也，王誰與為善？一薛居州，獨如宋王何？」

Mengzi parolis al Dai Busheng, dirante: “Ĉu vi deziras, ke via reĝo estu bona? Mi diras klare pri sekreto. Supozu, iu grandoficisto de Chu-regno dezirus, ke lia filo parolu lingvon de Qi. Kiun li donos al sia filo kiel instruiston, Qi-anon aŭ Chu-anon?”

Respondis: “Li donos Qi-anon kiel instruiston.”

Mengzi diris: “Kiam unu Qi-ano instruus vian filon, se li estus ĉirkaŭata de Chu-anoj, disbabilantaj dialekton de Chu, kvankam trejnate ĉiutage per la Qi-lingvo, li ne povus ellerni ĝin. Se lasus lin vivi inter Zhuang kaj Yue de Qi-regno kelkajn jarojn, eĉ se trejnate ĉiutage paroli Chu-dialekton, li ne povus paroli ĝin. Vi diras, ke s-ro Xue Juzhou estas bona persono. Lasu lin loĝi ĉe la reĝo. Se homoj, ĉirkaŭantaj la reĝon, maljunaj kaj junaj, malnobelaj kaj nobelaj, ĉiuj estus samaj, kiel Xue Juzhou, tiam kun kiu la reĝo farus malbonon? Se homoj, ĉirkaŭantaj la reĝon, maljunaj kaj junaj, malnobelaj kaj nobelaj, ĉiuj estus malbonaj, diference de Xue Juzhou, tiam kun kiu la reĝo farus bonon? Havante nur unu Xue Juzhou, kion la reĝo de Song sola povus fari?”¹⁰³

12 [3B7]

公孫丑問曰：「不見諸侯何義？」

孟子曰：「古者不為臣不見。段干木踰垣而辟之，泄柳閉門而不內，是皆已甚。迫，斯可以見矣。陽貨欲見孔子而惡無禮，大夫有賜於士，不得受於其家，則往拜其門。陽貨矚孔子之亡也，而饋孔子蒸豚；孔子亦矚其亡也，而往拜之。當是時，陽貨先，豈得不見？曾子曰：『脅肩諂笑，病于夏畦。』子路曰：『未同而言，觀其色赧赧然，非由之所知也。』由是觀之，則君子之所養可知已矣。」

¹⁰³ Dai Busheng estas ministro de Song-regno. Estas supozate, ke Zhuang kaj Yue estas en la ĉefurbo Linzi de Qi-regno. Ne estas bone sciate pri Xue Juzhou, ankaŭ li estis unu el ministroj en Song-regno, posteulo de landestro de Xue-lando 薛.

Gongsun Chou demandis, dirante: “Vi memvole ne eliras renkontiĝi kun landestroj, kial?”

Mengzi diris: “Antikve, se ne ministro, oni ne renkontiĝis kun ili. Duan Ganmu kaŝis sin trans heĝo por eviti intervidiĝon kun landestro, Xie Liu fermis la pordon por ne lasi eniri internen. Sed ambaŭ ili sintenis tro skrupule. Laŭ mi, se necesigite per nepreco, oni devas renkontiĝi kun landestroj.

Iam Yang Huo volis vidi Konfuceon, sed timis je maldeco kontraŭ decreguloj. Al li venis en la kapon la ideo, ke kiam grandoficisto donacis ion al iu oficisto, se tiu, kiu hazarde ne povis akcepti vid-al-vide en sia domo, devis viziti lian pordon por dankesprimi. Yang Huo, trovante Konfuceon ne estanta hejme, donacis al li vaporkuiritan porkon. Ankaŭ Konfuceo, trovante okazon dum la malesto de Yang Huo hejme, vizitis lin por dankesprimi. Tiukaze, Yang Huo unue esprimis respekton, do kial Konfuceo ne devus viziti lin?

Zengzi diris: ‘Flate rideti ŝultrolevante estas multe pli lacige ol labori somere sur kampo.’ Zi Lu diris: ‘Troviĝas tiuj, kiuj kapjesas kun kontraŭaj al si opinioj, gvatante alies mienon. Ilia vizaĝo ruĝiĝas. Al mi, You, ne eblas flati tiel.’ El tia vidpunkto, oni povas scii kiel kultivi la kondutmanieron de nobluloj.”¹⁰⁴

13 [3B8]

戴盈之曰：「什一，去關市之征，今茲未能。請輕之，以待來年，然後已，何如？」
孟子曰：「今有人日攘其鄰之雞者，或告之曰：『是非君子之道。』曰：『請損之，月攘一雞，以待來年，然後已。』如知其非義，斯速已矣，何待來年。」

Dai Yizhi diris: “Mi volus efektiviĝi la dekonaĵon je imposto, abolinte impostojn de dogano kaj merkato, sed nun ankoraŭ ne eblas. Dume mi malpezigos iomete tiujn impostojn kaj poste en la venonta jaro ĉesos plene. Kion vi opinias?”

Mengzi diris: “Supozu, nun estas iu homo, kiu ŝteladas ĉiutage kokojn de najbaroj, la alia diris al li: “Tio ne estas la vojo de nobluloj.” Tiam li diris – lasu min redukti tion, ke dume ĉiumonate mi ŝtelos po unu, kaj poste en venonta jaro mi ĉesos plene la ŝteladon.’ Kion vi konsideras maljusta, tion vi devas ĉesigi plej rapide. Kial vi atendas la venontan jaron?”

14 [3B9]

¹⁰⁴ Duan Ganmu estas disĉiplo de Zixia 子夏. Xie Liu estis ministro ĉe la duklando de Lu-regno. Yang Huo servis al Ji-familio, potenca grandoficisto de Lu-regno. Zi Lu estas disĉiplo de Konfuceo, alinome, You.

公都子曰：「外人皆稱夫子好辯，敢問何也？」

孟子曰：「予豈好辯哉？予不得已也。天下之生久矣，一治一亂。當堯之時，水逆行，汎濫於中國。蛇龍居之，民無所定。下者為巢，上者為營窟。《書》曰：『洚水警余。』洚水者，洪水也。使禹治之，禹掘地而注之海，驅蛇龍而放之菹。水由地中行，江、淮、河、漢是也。險阻既遠，鳥獸之害人者消，然後人得平土而居之。

「堯、舜既沒，聖人之道衰。暴君代作，壞宮室以為汙池，民無所安息；棄田以為園囿，使民不得衣食。邪說暴行又作，園囿、汙池、沛澤多而禽獸至。及紂之身，天下又大亂。周公相武王，誅紂伐奄，三年討其君，驅飛廉於海隅而戮之。滅國者五十，驅虎、豹、犀、象而遠之。天下大悅。《書》曰：『丕顯哉，文王謨！丕承哉，武王烈！佑啟我後人，咸以正無缺。』

「世衰道微，邪說暴行有作，臣弑其君者有之，子弑其父者有之。孔子懼，作《春秋》。《春秋》，天子之事也。是故孔子曰：『知我者其惟春秋乎！罪我者其惟春秋乎！』

「聖王不作，諸侯放恣，處士橫議，楊朱、墨翟之言盈天下。天下之言，不歸楊，則歸墨。楊氏為我，是無君也；墨氏兼愛，是無父也。無父無君，是禽獸也。公明儀曰：『庖有肥肉，廄有肥馬，民有飢色，野有餓莩，此率獸而食人也。』楊墨之道不息，孔子之道不著，是邪說誣民，充塞仁義也。仁義充塞，則率獸食人，人將相食。吾為此懼，閑先聖之道，距楊墨，放淫辭，邪說者不得作。作於其心，害於其事；作於其事，害於其政。聖人復起，不易吾言矣。

「昔者禹抑洪水而天下平，周公兼夷狄驅猛獸而百姓寧，孔子成《春秋》而亂臣賊子懼。《詩》云：『戎狄是膺，荊舒是懲，則莫我敢承。』無父無君，是周公所膺也。我亦欲正人心，息邪說，距詖行，放淫辭，以承三聖者；豈好辯哉？予不得已也。能言距楊墨者，聖人之徒也。」

Gong Duzi diris: “Eksteruloj ĉiuj diras, ke vi, Majstro, estas disputema. Mi aŭdacas demandi, kial?”

Mengzi diris: “Kial mi ŝatas disputi? Pro neeviteblaj cirkonstancoj. Pasis multe da tempoj post kiam la mondo estiĝis. Iam estadis en ordo, iam – en malordo. Kiam Yao estis surtrone, la akvo refluis kontraŭen, inundis en la centra lando, serpentoj kaj drakoj disrampadis kie ajn, la popolo ne havis loĝejojn konstantajn, tiel do sube iuj loĝis en nestoj sur arboj, aliaj supre loĝis en kavernoj. Estas skribite en *Libro*: ‘Diluvo atentigas min.’ Diluvo estas superakvego. La reĝo igis Yu preventi ĝin. Yu fosadis terojn kaj lasis akvon eniri en maron, forpelis serpentojn kaj drakojn en marĉojn. Akvo ekiris tra tero laŭ kanaloj en riverojn Changjiang, Huai, Huanghe, Han. Danĝeraj krutaĵoj estis jam forigitaj, malaperis damaĝo fare de rabobirdoj-bestoj al homoj, kaj poste al homoj iĝis loĝebla sur la ebena tero.

Yao kaj Shun jam forpasis, la Vojo de sanktuloj ŝrumpis. Anstataŭe tiranoj aperadis, detruis palacojn kaj ĉambrojn, konstruis marĉetojn kaj lagojn. Al la popolo eblis ripozoni. Kampoj forlasitaj fariĝis ĉasejoj aŭ ĝardenoj, al la popolo ne haveblis vestaĵoj nek

manĝaĵoj. Aperadis unu post la alia falsaj teorioj kaj perfortoj, ĉasejoj kaj ĝardenoj, marĉetoj kaj lagoj, ege pululadis rabobirdoj kaj bestoj. Kiam alvenis Zhou sur trono, la mondo ege malordiĝis. La Duko Zhou asistis al la reĝo Wu akuzi la tiranon Zhou kaj ataki landon Yan, tri jarojn poste venkobatis la landestron, forpelis subulon Feilian al rando de maro kaj mortigis lin. Nombro de landoj, kiujn li disbatis, estis kvindek. Forŝovitaj estis tigroj, leopardoj, rinoceroj, elefantoj. Do la tuta mondo ĝojegis. Estas skribite en *Libro*: ‘Kiel granda estas la efektivigo de la intenco de la reĝo Wen! Kiel granda estas la fervora daŭrigo de la aferoj far la reĝo Wu! Ili nin helpas kaj gvidas posteulojn ĝuste kaj sendifekte.’¹⁰⁵

Poste degeneris la generacioj kaj obskuriĝis la Vojo, Aperadis falsaj ideoj, perfortoj kaj okazadis, ke subuloj atencis siajn reĝojn kaj filoj mortigis siajn patrojn. Konfuceo ektimis je tio, kaj kompilis la historian libron ‘*Chun-Qiu* (Analoj de Printempoj-Aŭtunoj)’. ‘*Chun-Qiu*’ traktas la aferojn de la Ĉielaj Filoj. Konfuceo diris: ‘Pri mi estos sciate nur per la libro *Chun-Qiu*! Pri mi estos kritikate nur pro *Chun-Qiu*!’¹⁰⁶

Jam ne aperis sanktaj reĝoj, diboĉadis landestroj, disputaĉadis pedantoj. En la mondo iĝis plenigite per vortoj de Yang Zhu kaj Mo Di. Amasopinioj de la mondo apartenas se ne al Yang, tiam al Mo. Yang pledas por egoismo, tio implicas neniigon de suvereno. Mo pledas por universala amo, tio implicas neniigon de patroj. Neniigi la patrojn kaj suverenenon estas egale al rabobirdoj kaj bestoj. Gongming Yi diris: ‘Malgraŭ ke en ies kuirejo estas grasiĝintaj viandoj kaj en alies stalo estas grasiĝintaj ĉevaloj, la popolo tamen havas mienon malsata, en kampoj troviĝas mortintoj pro malsato, t. e., montriĝas, ke tiel oni lasas bestojn manĝi homojn.’ Se ne ĉesas la Vojoj de Yang kaj Mo, ne elmontriĝas la Vojo de Konfuceo. Dum falsaj ideoj trompas la popolon, estas ŝtopitaj la bonvoleco kaj la justo. Se ŝtopitaj la bonvoleco kaj la justo, tiam oni lasus la bestojn formanĝi homojn kaj homoj manĝus homojn unui la aliajn reciproke.¹⁰⁷ Mi timas tion kaj gardas la Vojon de antaŭaj sanktuloj, kontraŭante al Yang kaj Mo t. e., al arbitraj

¹⁰⁵ Citaĵo el 尚書, 周書, 君牙.

¹⁰⁶ Konfuceo kompilis *Chun Qiu*, historion de Lu-regno (722 – 481 a. K.). En la reĝim-ŝanĝoj okazadis multaj maljustoj, ke legantoj povas teruriĝi. Do la historio similas ekspozicion, plenan de modeloj, bonaj kaj malbonaj. En la konfeso de Konfuceo videblas la simileco al Shakespeare kaj Puŝkin.

¹⁰⁷ Tio, ke bestoj manĝas homojn, estas manko de bonvoleco kaj justo ĉe la supra kaj samtempe rezulto de homa fremdigo. Tio, ke homoj manĝas homojn, estas la rezulto de malhumaniĝo. Mengzi rigardas en universala makro-amo de Mozi la ignoradon de mikro-amo en la familio kaj detruon de rilato inter supra kaj subo. La kritiko far Mengzi estis tiel impona, ke la ideoj de Yang kaj Mo malaperis en Ĉinio ĝis 20-a j. c. Sed iliaj ideoj, similaj al nuntempaj novliberalismo kaj socialismo, devas esti studataj pli profunde. Tiel la kritiko far Mengzi iĝos pli signifoplena. Estas notinde, ke la ideoj de Yan kaj Mo estas komparataj de Mengzi kun inundo kaj rabobestoj.

diboĉaj vortoj, por ke ne povu disvastiĝi falsaj ideoj. [Se fi-ideoj penetras la koron, tio malhelpas la aferojn. Se fi-ideoj penetras la aferojn, tio malhelpas la politikon. Eĉ sanktuloj, se releviĝus, ne ŝanĝos miajn vortojn.]

Antikve Yu reguligis superakvegona, do la mondo paciĝis, la Duko Zhou bridis barbarojn kaj forpelis rabobestojn, do al popolanoj ekeblis vivi kviete. Konfuceo kompilis *Chun Qiu*, do ektimis ribelemaj subuloj kaj perversaj fiuloj. En *Poezio* estas dirite: ‘Estas batitaj la nord-okcidentaj triboj Rong kaj Di, estas punitaj la sudaj landoj Jing kaj Shu, do al ni aŭdacas kontraŭstari nun neniu.’¹⁰⁸ Neglektantojn de gepatroj kaj neglektantojn de reĝo disbatis la Duko Zhou. Ankaŭ mi volas ĝustigi al homoj la koron, haltigi falsajn fi-ideojn, obĵeti ekstremajn kondutojn, forpeli malĉastajn vortojn, kaj heredi la tri sanktulojn. Ĉu mi estas disputema? Al mi estas devigate tiel per nepreco. Kiu povas kontraŭargumenti al Yang kaj Mo, tiu estas ja disĉiplo de la sanktuloj.”

15 [3B10]

匡章曰：「陳仲子豈不誠廉士哉？居於陵，三日不食，耳無聞，目無見也。井上有李，蝻食實者過半矣，匍匐往將食之，三咽，然後耳有聞，目有見。」

孟子曰：「於齊國之士，吾必以仲子為巨擘焉。雖然，仲子惡能廉？充仲子之操，則蚓而後可者也。夫蚓，上食槁壤，下飲黃泉。仲子所居之室，伯夷之所築與？抑亦盜跖之所築與？所食之粟，伯夷之所樹與？抑亦盜跖之所樹與？是未可知也。」

曰：「是何傷哉？彼身織屨，妻辟纊，以易之也。」

曰：「仲子，齊之世家也。兄戴，蓋祿萬鍾。以兄之祿為不義之祿而不食也，以兄之室為不義之室而不居也，辟兄離母，處於於陵。他日歸，則有饋其兄生鵝者，己頻顛曰：『惡用是醜醜者為哉？』他日，其母殺是鵝也，與之食之。其兄自外至，曰：『是醜醜之肉也。』出而哇之。以母則不食，以妻則食之；以兄之室則弗居，以於陵則居之。是尚為能充其類也乎？若仲子者，蚓而後充其操者也。」

Kuang Zhang diris: “S-ro Chen Zhongzi estas vere honesta kaj pura persono, ĉu ne? Kiam li loĝis en Wu Ling, li ne manĝis tri tagojn, kaj liaj oreloj ne aŭdis, okuloj ne vidis. Supre puto estis prunarbo, da kies fruktoj pli ol duonon formanĝis vermoj. Li alrampis tien kaj manĝis, kaj, glutinte ilin tri fojojn, poste li kapablis denove aŭdi per oreloj kaj vidi per okuloj.”¹⁰⁹

Mengzi diris: “El inter kleraj personoj de Qi-regno, mi rigardas s-ron Zhongzi grandega, kiel polekso inter fingroj. Sed kiel li povus esti konsiderata pura? La ĉasteco

¹⁰⁸ Citaĵo el 詩經, 魯頌, 閟宮.

¹⁰⁹ Kuang Zhang estis generalo de Qi-regno ĉe la reĝoj Wei kaj Xuan. Chen Zhongzi estas Qi-regnana, fama je alta moraleco, aperas ankaŭ en Han Feizi, Xunzi.

de s-ro Zhongzi estus atingebla nur al tiu, kiu fariĝus tervermo. La tervermo manĝas supre sekan grundaĵon, trinkas sube flavan fonton de subtera mondo. Estas ne sciate, ĉu la ĉambro loĝata de s-ro Zhongzi estis konstruita de justulo, kiel Bo Yi? Aŭ konstruita de ŝtelisto kiel Zhi? Ne sciate, ĉu la grenoj manĝataj de li estis plantitaj de Bo Yi, aŭ plantitaj de ŝtelisto Zhi?”

Kuang Zhang diris: “Kio difektas lin? Li mem teksas kaj plektas sandalojn, kaj lia edzino faras kanaban tolon kaj interŝanĝas.”

Mengzi diris: “S-ro Zhongzi devenis de prestiĝa familio de Qi-regno. Pliiĝa frato, s-ro Dai, ricevas salajron je dekmil *zhong*, sed s-ro Zhongzi, konsiderante la salajron maljusta, ne manĝas per la salajro de la frato. Konsiderante la ĉambron de la frato maljusta, li ne loĝas en la ĉambro de la domo. Kaj, evitante la fraton, disiĝinte de la patrino, li sola ekloĝis en Wu Ling. Iun tagon li revenis hejmen. Tiam iu donacis al la frato vivantan anseron, s-ro Zhongzi, kuntirinte brovojn, diris: ‘Por kio necesus tiu gakanto?’ En la alia tago la patrino mortigis la anseron kaj donis al li manĝi ĝin. Lia frato de ekstere revenis hejmen, kaj diris: ‘Tio estas ja viando de la gakinto.’ S-ro Zhongzi eliris eksteren kaj vomis ĝin. Li ne manĝas kion la patrino donas, sed manĝas kion la edzino donas. Li ne povas loĝi en la domo de la frato, kaj transloĝiĝis en Wu Ling. Ĉu tio povus esti laŭdata kiel la plenumado de la konduto sur la principo kohera? Tia persono kiel s-ro Zhongzi povus plenumi la ĉastecon, nur fariĝinte tervermo.”¹¹⁰

¹¹⁰ Mengzi ankaŭ tenas sin purama, sed konsideras la sian sintenon tute diferenca de tiu de Chen Zhongzi. La kritiko memorigas al ni la vorton de Aristotelo (384-322 a. K.): “Se troviĝus iu vivestaĵo, ne povanta vivi en la societo, aŭ ne bezonanta vivi en la societo pro sia mempleneco, tiam tiu fariĝus aŭ animalo aŭ dio. Li ne povus esti reala parto de la ŝtato.”

《離婁上》

LI LOU (I)

1 [4A1]

孟子曰：「離婁之明，公輸子之巧，不以規矩，不能成方員；師曠之聰，不以六律，不能正五音；堯舜之道，不以仁政，不能平治天下。今有仁心仁聞而民不被其澤，不可法於後世者，不行先王之道也。

「故曰，徒善不足以為政，徒法不能以自行。《詩》云：『不愆不忘，率由舊章。』遵先王之法而過者，未之有也。聖人既竭目力焉，繼之以規矩準繩，以為方員平直，不可勝用也；既竭耳力焉，繼之以六律，正五音，不可勝用也；既竭心思焉，繼之以不忍人之政，而仁覆天下矣。

「故曰，為高必因丘陵，為下必因川澤。為政不因先王之道，可謂智乎？是以惟仁者宜在高位。不仁而在高位，是播其惡於眾也。上無道揆也。下無法守也，朝不信道，工不信度，君子犯義，小人犯刑，國之所存者幸也。

「故曰，城郭不完，兵甲不多，非國之災也；田野不辟，貨財不聚，非國之害也。上無禮，下無學，賊民興，喪無日矣。《詩》曰：『天之方蹙，無然泄泄。』泄泄，猶沓沓也。事君無義，進退無禮，言則非先王之道者，猶沓沓也。故曰：責難於君謂之恭，陳善閉邪謂之敬，吾君不能謂之賊。」

Mengzi diris: “Se iu ajn havus la vidkapablon de Li Lou aŭ la lertecon de Gong Shuzi, tiu sen cirkelo kaj ortilo ne povus fari kvadraton nek cirklon.¹¹¹ Se iu ajn havus la aŭdkapablon de la muzikisto Majstro Kuang, tiu sen fluto-agordilo de ses tonoj ne povus fari gamon de kvin notoj ĝusta. Se iu ajn atingus la Vojon de Yao-Shun, tiu sen bonvoleca registaro ne povus regi la mondon en paco. Nun, eĉ se li, bonvolema je koro kaj fama je la bonvolemo, ne povus reale feliĉigi la popolon, ne povus fariĝi modelo por la postaj generacioj, sen praktiki la Vojon de la antaŭaj reĝoj. Do estas dirite: ‘Nur la boneco ne sufiĉas por fari la politikon, nur per leĝaro ne efektiveblas la memstareco.’ Kaj estas dirite en *Poezio*: ‘Ne eraras nek forgesas, kondukate laŭ malnova regularo.’¹¹² Ankoraŭ ne estas tiu, kiu eraris, fidele sekvante la leĝaron de antaŭaj reĝoj. Sanktuloj, plejeble uzante la vidkapablon, daŭre utiligas plie la cirkelon, ortilon, nivelilon kaj

¹¹¹ Zhuang traktas la mezurilojn tute alie ol Mengzi, dirante: “Ĝustigi per kurbilo, rektilo, cirkelo kaj ortilo estas forskrapi la denaskecon. Ŝnuri kaj solidigi per gluaĵoj estas perforti la virton.”[ĉap. 駢拇]

¹¹² Citaĵo el 詩經, 大雅, 假樂. Li Lou, alinome Li Zhu 離朱, havis akran vidkapablon, ke Huang Di 黃帝 igis lin serĉi perditan perlon, aperas ankaŭ en Zhuangzi, la ĉap. Tian Di. Gong Shuzi estas alinome Gong Shupan 公輸般 aŭ Lu Pan 魯般, fama metiisto-technikisto, aperas ankaŭ en Mozi. Kuang estas muzikisto, servanta al la duko Ping de Jin-regno.

tuĉsnuron, por fari kvadraton, cirklon, horizontalon kaj vertikalon, ke ili estas nevenkeble utilaj. Mizikisto, plejeble uzante orelojn, agordas plie ses tonojn laŭ agordilo kaj faras gamon de kvin notoj ĝusta, do la muziko estas bonega. Regantoj, plejeble uzante koron kaj penson, plie faras politikon laŭ kompatplena koro, do la mondo estas kovrita plene de bonvoleco. Do estas dirite, ke por fari la plialtan konstruon oni baziĝas sur montaro, por fari la malplialtan oni baziĝas sur rivero kaj marĉo. Se por fari la politikon iu ne baziĝas sur la Vojo de antaŭaj reĝoj, ĉu eblus nomi lin saĝa? Do, estas bone, ke nur bonvolemuloj okupas la altan postenon. Ke ne bonvolemuloj okupas la altan postenon, tio signifas semi la malbonon sur popolamaso. Se supre estas ignorata la Vojo, sube ne estas observata la leĝaro. En kortego ne estas fidate je la Vojo, al metiistoj ne estas fidate je mezuriloj, kaj nobluloj rompas juston, malgranduloj faras krimon, – en tiu okazo estus bonsorte, se povus ekzistadi iu regno en tia stato.

Ke kasteloj kaj muroj ne estas kompletaj aŭ armiloj ne estas multaj, tio ankoraŭ ne estas plago de la regno. Ke kampoj ne estas kultivataj aŭ da varoj kaj monoj ne estas amase, tio ankoraŭ ne estas damaĝo de la regno. Se supre mankas decreguloj kaj sube oni ne lernas ilin, tiam ekleviĝas la ribelema popolo kaj subite pereas la regno. Estas skribite en *Poezio*: ‘Kiam per la Ĉielo via regno ekfaliĝas impete, ne dronu, subuloj, en vegeto.’¹¹³ ‘Droni en vegeto’ signifas agi hezite kaj lante. Tia ago signifas maljustan servadon al sia reĝo, konduton sen decreguloj kaj ignoradon pri la Vojo de antaŭaj reĝoj. Do estas dirite: ‘Humileco estas sincere kritiki la reĝon, kaj, respekto al reĝo estas eksplicite paroli la bonon por ŝtopi malbonon. Estas ja ribelo, se nur rigardi sian reĝon malkompetenta.’”

2 [4A2]

孟子曰：「規矩，方員之至也；聖人，人倫之至也。欲為君盡君道，欲為臣盡臣道，二者皆法堯舜而已矣。不以舜之所以事堯事君，不敬其君者也；不以堯之所以治民治民，賊其民者也。孔子曰：『道二：仁與不仁而已矣。』暴其民甚，則身弑國亡；不甚，則身危國削。名之曰『幽厲』，雖孝子慈孫，百世不能改也。《詩》云『殷鑒不遠，在夏后之世』，此之謂也。」

Mengzi diris: “Cirkelo kaj ortilo faras la plej akuratan kvadraton kaj cirklon. Sanktuloj faris la plej altan je morala rilato de homoj. Se reĝo volus sekvi la reĝan vojon kaj la subulo volus sekvi la vojon de subuloj, tiam ambaŭ du devas ĉiuj preni la reĝojn Yao kaj Shun kiel la modelon. Ne servi al sia reĝo samkiel Shun servis al Yao estas ne respekti la reĝon. Ne regi sian popolon samkiel Yao regis la popolon estas turmenti la popolon.

¹¹³ Citaĵo el 詩經, 大雅, 板.

Konfuceo diris: ‘Estas nur du Vojoj – bonvoleca kaj malbonvoleca.’ Kiu ekstreme subpremas la popolon, tiu estos atencita kaj ties regno pereos; kiu ne tiel ekstreme sed subpremas la popolon, tiu mem estos endanĝerigita kaj ties regno estos reduktita. Kaj post lia morto estos nomate kiel You(Nebululo) aŭ Li(Rigorulo). Eĉ se li havus obeeman filon kaj ĝentilan nepon, lia nomo ne povas esti ŝanĝita dum cent generacioj. Estas dirite en *Poezio*: ‘Spegulo de Yin-dianstio troviĝas ne malproksime, sed en la lasta epoko de Xia-dinastio.’¹¹⁴ Tio signifas la supre menciitan.”

3 [4A3]

孟子曰：「三代之得天下也以仁，其失天下也以不仁。國之所以廢興存亡者亦然。天子不仁，不保四海；諸侯不仁，不保社稷；卿大夫不仁，不保宗廟；士庶人不仁，不保四體。今惡死亡而樂不仁，是猶惡醉而強酒。」

Mengzi diris: “Tio, ke tri dinastioj povis konkeri la mondon, estas dank’ al bonvoleco. Ke ili perdis la mondon, tio estas pro malbonvoleco. Prospero-malprospero kaj ekzistopereo de regnoj dependas de la samo. Se la Ĉiela Filo estas malbonvoleca, la mondo ene de kvar maroj ne povas esti konservata. Se la landestro ne estas malbonvoleca, ne povas esti konservata la lando kun la altaro de tero kaj grenoj. Se la grandoficistoj estas malbonvolecaj, ne povas esti konservataj la maŭzoleoj de prapatroj. Se oficistoj kaj simplaj popolanoj ne estas malbonvolecaj, ne povas esti bontenataj la kvar membroj de la korpoj. Kiu, malamante morton, ĝuas malbonvolecon, tiu egalas al tiu, kiu, malamante postebrion, ŝatas drinkegi fortan vinon.”

4 [4A4]

孟子曰：「愛人不親反其仁，治人不治反其智，禮人不答反其敬。行有不得者，皆反求諸己，其身正而天下歸之。《詩》云：『永言配命，自求多福。』」

Mengzi diris: “Se vi amas la aliajn, sed tamen la aliaj ne intimas kun vi, tiam reflektu vian bonvolecon. Se vi regas homojn, sed tamen ili ne estas bone regataj, tiam reflektu vian saĝon. Se vi traktas la aliajn respektplene kun decreguloj, sed tamen ili ne respondas al vi reciproke, tiam reflektu la vian manieron de respekto. Se via konduto ne sukcesas gajni la atenditan rezulton, ĉiam turnu vin internen al vi mem por reflekti kaj serĉi la kialon. Se vi mem estas ĝusta, tiam la mondo submetiĝos al vi. Estas dirite en

¹¹⁴ Citaĵo el 詩經, 大雅, 蕩. Spegulo=ekzemplo de la tirano Zhou de Yin estas la tirano Jie de Xia. La dinastio Xia[1907?-1555? a. K.] estis venkita de la reĝo Tang, fondinto de Yin-dinastio.

Poezio: ‘Por ĉiam sekvu la vortojn de la Ĉiela ordono, kaj trovu por vi mem multe da feliĉo.’¹¹⁵”

5 [4A5]

孟子曰：「人有恆言，皆曰『天下國家』。天下之本在國，國之本在家，家之本在身。」

Mengzi diris: “Ĉiuj diradas ĉiam: ‘La subĉielo konsistas el Mondo, Regno, Familio’. La mondo estas bazita sur la regnoj, la regno estas bazita sur la familioj, la familio estas bazita sur ĉiu individuo mem.”¹¹⁶

6 [4A6]

孟子曰：「為政不難，不得罪於巨室。巨室之所慕，一國慕之；一國之所慕，天下慕之；故沛然德教溢乎四海。」

Mengzi diris: “La regado ne estas malfacila. Ne ofendi komunumon de granduloj.¹¹⁷ Kion la komunumo de granduloj admiras, tion ankaŭ unu regno admiras. Kion unu regno admiras, tion la mondo admiras. Tiel do la virta instruo spontanee kovras la tutan mondon ene de kvar marojn.”

7 [4A7]

孟子曰：「天下有道，小德役大德，小賢役大賢；天下無道，小役大，弱役強。斯二者天也。順天者存，逆天者亡。齊景公曰：『既不能令，又不受命，是絕物也。』涕出而女於吳。今也小國師大國而恥受命焉，是猶弟子而恥受命於先師也。如恥之，莫若師文王。師文王，大國五年，小國七年，必為政於天下矣。《詩》云：『商之孫子，其麗不億。上帝既命，侯于周服。侯服于周，天命靡常。殷士膚敏，裸將于京。』孔子曰：『仁不可為眾也。夫國君好仁，天下無敵。』今也欲無敵於天下而不以仁，是猶執熱而不以濯也。《詩》云：『誰能執熱，逝不以濯？』」

Mengzi diris: “Kiam estas la Vojo-Tao en la mondo, la virteto servas al la virtego, la

¹¹⁵ Citaĵo el 詩經, 大雅, 文王.

¹¹⁶ Fama devizo de konfuceanismo – Memkulturado, Ordigo de familio, Regado de la regno, Pacigo de la mondo. 修身、齊家、治國、平天下

¹¹⁷ Ne estas klare, kiu estas la subjekto en ĉi tiu frazo, reĝo aŭ saĝa persono kiel Mengzi mem. Multaj esploristoj prenas la vorton 巨室 kiel heredajn nobelojn, grandoficistojn. Yoshida Shoin, legante ripete la tekston, ploradas kun larmoj, ĉar estas ege malfacile al alte aspiranta persono aŭ reĝo ne ofendi komunumon de granduloj. Tial do li konsideras la tekston fanfarone skribita de Mengzi. [講孟 173-174] Mi supozas, ke la kaŝita signifo devas esti – “la regado estas ege malfacila”.

saĝeto servas al la saĝego. Kiam ne estas la Vojo-Tao en la mondo, la malgranda servas al la granda, la malforta servas al la forta. Tiuj duopoj dependas de la Ĉielo. Kiu sekvas la Ĉielon, tiu ekzistas; kiu kontraŭas al la Ĉielo, tiu pereas.

La duko Jing de Qi-regno diris: 'Se, ne povante jam komandi, ne akcepti la destinon – tio estas ja senelira situacio.' Kaj li kun larmoj sendis sian filinon al Wu-regno¹¹⁸. Nun malgrandaj landoj hontas akcepti la ordonon de la grandaj regnoj, kvankam prenante la lastajn por sia modelo. Tio estas same, kiel iu disĉiplo hontus akcepti ordonon de sia instruisto. Se iu konsideras tion hontinda, al tiu estas pli bone preni la reĝon Wen kiel la modelon. Sekvante la modelon de la reĝo Wen, postaj reĝoj nepre povos ekregi la mondon, se la granda regno en kvin jaroj, se la malgranda en sep jaroj. Estas dirite en *Poezio*: 'Popolnombro de idoj ĉe Shang-dinastio ne malpli ol centmiloj. La supra Dio jam ordonis, ke la estroj submetu sin al Zhou-regno. Tiel do ili submetiĝis al Zhou, ĉar la Ĉiela ordono ne ĉiam favoras al ili. Oficiroj de Yin-anoj, komprenante tion sagace per haŭto, oferverŝis ĉe reĝimŝanĝo por la ĉefurbo.'¹¹⁹

Konfuceo diris: 'Al la bonvoleco ne povas montri sian superecon eĉ la majoritato. Kun regnestro, ŝatanta bonvolecon, povas rivali neniu sub la Ĉielo.' Nun, troviĝas tiu, kiu, dezirante fariĝi senrivala en la mondo, restas sen bonvoleco. Li similas al tiu, kiu prenas ion varmegan sen malvarmigi manojn per akvo anticipe. Estas dirite en *Poezio*: 'Kiu povus preni ion varmegan sen malvarmigi per akvo anticipe?'¹²⁰

8 [4A8]

孟子曰：「不仁者可與言哉？安其危而利其菑，樂其所以亡者。不仁而可與言，則何亡國敗家之有？有孺子歌曰：『滄浪之水清兮，可以濯我纓；滄浪之水濁兮，可以濯我足。』孔子曰：『小子聽之！清斯濯纓，濁斯濯足矣，自取之也。』夫人必自侮，然後人侮之；家必自毀，而後人毀之；國必自伐，而後人伐之。《太甲》曰：『天作孽，猶可違；自作孽，不可活。』此之謂也。」

Mengzi diris: "Ĉu eblus interparoli kun malbonvoleculo? Li misprenas danĝeron sendanĝera, plagon profitdona, ĝojas je tio, kio pereigas lin. Se, malgraŭ la malbonvoleco, li estus konsilebla per interparolo, ĉu ni lasus la ŝtaton pereji kaj la familion detruigi? Iu knabo kantis, dirante: 'Se la akvo de la rivero Canglang estas pura, mi povas lavi ornamŝnureton de ĉapo, se la akvo de la rivero Canglang estas malpura,

¹¹⁸ Estas skribite en 說苑權謀篇: "La duko Jing de Qi edzinigis sian filinon al Helü." La frazo 恥受命 estas grava por reĝoj. La tasko estas kiel ŝanĝi neeviteblan honton en la plibonigon de la regno per bonvoleca regado konforme al la Ĉiela ordono. Modelo estas la reĝo Wen de Zhou.

¹¹⁹ Citaĵo el 詩經, 大雅, 文王. Por detronigi sian dion oni oferverŝis vinon el nigra paniko kun tulipo 鬱鬯 al la maŭzoleo.

¹²⁰ Citaĵo el 詩經, 大雅, 桑柔.

mi povas lavi piedojn.’

Konfuceo diris: ‘Aŭskultu, miaj disĉiploj! Se pura, lavi ornamŝnureton, se malpura, lavi piedojn – estas elektate per si mem.’ Nepre okazas jen tiel, ke iu homo unue ekmalestimas sin mem, poste la aliuloj malestimos lin. Iu familio unue ekdetruas la sian familion, poste la aliuloj detruos ĝin. Iu ŝtato unue ekbatas sin mem, poste la aliaj batos ĝin. Estas dirite en Tai Jia: ‘Malfeliĉo, sendita de la Ĉielo, ankoraŭ estus evitebla, sed malfeliĉo memfarata ne estas travivebla.’¹²¹ Tio signifas la supre menciitan.”

9 [4A9]

孟子曰：「桀紂之失天下也，失其民也；失其民者，失其心也。得天下有道：得其民，斯得天下矣；得其民有道：得其心，斯得民矣；得其心有道：所欲與之聚之，所惡勿施爾也。民之歸仁也，猶水之就下、獸之走壙也。故為淵馭魚者，獺也；為叢馭爵者，鸛也；為湯武馭民者，桀與紂也。今天下之君有好仁者，則諸侯皆為之馭矣。雖欲無王，不可得已。今之欲王者，猶七年之病求三年之艾也。苟為不畜，終身不得。苟不志於仁，終身憂辱，以陷於死亡。《詩》云『其何能淑，載胥及溺』，此之謂也。」

Mengzi diris: “Tiranoj Jie kaj Zhou perdis la mondon, ĉar ili perdis la popolon. Perdinto de la popolo perdas ankaŭ la koron. Estas la Vojo por akiri la mondon – tio estas gajni la popolon, t. e., akiri la mondon. Estas la Vojo por gajni la popolon – se gajni la koron, tiam akireblas la popolo. Estas la Vojo por gajni ilian koron – oni povas kolekti ĝin, se faras kion ili deziras, kaj ne faras kion ili malamas. La popolo altiriĝas per bonvoleco kvazaŭ akvo fluas suben kaj bestoj kuras kampon. Forpelas fiŝojn en abismon – lutroj, forpelas paserojn en vepraron – falkoj. Forpelis la popolon al la reĝoj Tang kaj Wu – tiranoj Jie kaj Zhou. En nuntempa mondo, se troviĝus iu reĝo, ŝatanto de bonvoleco, tiam la ĉiuj aliaj landestroj ludus rolon forpeli la popolojn al li. Do eĉ se li ne dezirus reĝan postenon, li ne devus ne fariĝi la reĝo de reĝoj. Sed nunaj dezirantoj fariĝi reĝo similas al tiu, kiu serĉas al si artemizian medikamenton nur por 3 jaroj, kvankam ties malsano daŭros dum 7 jaroj. Se ne estu akumulite je kuracilo, ne eblas pluvivi. Kiu ne strebas al bonvoleco, tiu finos en spleno la tutan vivon hontigite kaj mortos kaptite en enfalujo. Estas dirite en *Poezio*: ‘Kiel ili povus pliboniĝi, kune dronante unu kun la alia?’¹²² Tio signifas la supre menciitan.”

10 [4A10]

¹²¹ 太甲 estas titolo de unu ĉapitro en 尚書. Kiel pledanto por la homa denaska boneco, Mengz ne povas permesi al homaĉo, malestimanta sin mem.

¹²² Citaĵo el 詩經, 大雅, 桑柔.

孟子曰：「自暴者，不可與有言也；自棄者，不可與有為也。言非禮義，謂之自暴也；吾身不能居仁由義，謂之自棄也。仁，人之安宅也；義，人之正路也。曠安宅而弗居，舍正路而不由，哀哉！」

Mengzi diris: “Kun tiu, kiu violentas al si mem, ne eblas interparoli; kun tiu, kiu sinforĵetas en malespero, ne eblas kune labori. Kiu paroladas sen dece sen justo, tiu estas nomata la violenta al si mem. Kiu ne povas vivi kviete en bonvoleco laŭ justo, tiu estas nomata la sinforĵetinto. La bonvoleco estas paca domo por homo. La justo estas ĝusta strato por homo. Kiel damaĝe estas dezertigi la pacan domon kaj neniigi la loĝejon, forlasi la ĝustan straton kaj resti sen apogo!”¹²³

11 [4A11]

孟子曰：「道在爾而求諸遠，事在易而求之難。人人親其親、長其長而天下平。」

Mengzi diris: “La Vojo-Tao estas proksima, sed oni serĉas ĝin ie malproksime. La afero estas facila, sed oni serĉas ĝin en io malfacila. Ke homoj proksimiĝu unu kun la alia, kiel kun siaj gepatroj, homoj respektu la pliaĝulojn, kiel la siajn – jen de tio estiĝas la monda paco.”

12 [4A12]

孟子曰：「居下位而不獲於上，民不可得而治也。獲於上有道：不信於友，弗獲於上矣；信於友有道：事親弗悅，弗信於友矣；悅親有道：反身不誠，不悅於親矣；誠身有道：不明乎善，不誠其身矣。是故誠者，天之道也；思誠者，人之道也。至誠而不動者，未之有也；不誠，未有能動者也。」

Mengzi diris: “Kiu, okupante suban rangon en oficejo, ne povas gajni konfidon de la supro, tiu ne povas administri la popolon. Por gajni konfidon de la supro estas la vojo. Kiu ne estas fidata de amikoj, tiu ne povas gajni fidon de la supro. Por esti fidata de amikoj estas la vojo. Kiu, servante al gepatroj, ne povas doni al ili ĝojon, tiu ne povas gajni fidon de amikoj. Por ĝojigi gepatrojn estas la vojo. Kiu, turnante sin internen al si mem, ne trovas sin honesta, tiu ne povas doni al gepatroj ĝojon. Por teni sin honesta estas la vojo. Kiu ne klaras je sia boneco, tiu ne povas teni sin honesta. Do honesteco estas la Ĉiela Vojo. Strebo al honesteco estas la Homa Vojo. Ankoraŭ neniam troviĝas iu ajn, kiu, estante honesta, ne povis movi homojn, aŭ, estante ne honesta, povis movi la

¹²³ Mengzi, kredanto je la boneco de denaska naturo, malamas tiun, kiu, facile perdante esperon, damaĝas sin mem – 自暴自棄.

homojn.”

13 [4A13]

孟子曰：「伯夷辟紂，居北海之濱，聞文王作，興曰：『盍歸乎來！吾聞西伯善養老者。』太公辟紂，居東海之濱，聞文王作，興曰：『盍歸乎來！吾聞西伯善養老者。』二老者，天下之大老也，而歸之，是天下之父歸之也。天下之父歸之，其子焉往？諸侯有行文王之政者，七年之內，必為政於天下矣。」

Mengzi diris: “Boyi rifuĝis de tirano Zhou kaj loĝis ĉe la norda maro, aŭdinte, ke la reĝo Wen eklevis sin, ankaŭ li ekmoviĝis, dirante: ‘Mi revenos nun por sekvi lin! Mi aŭdis, ke Xibo, la reĝo Wen, bone nutras maljunulojn.’ Ankaŭ Tai Gong rifuĝis de tirano Zhou kaj loĝis ĉe la orienta maro, aŭdinte la reĝon Wen leviĝinta, ekmoviĝis, dirante: ‘Nun mi revenos por sekvi lin! Mi aŭdis, ke Xibo bone nutras maljunulojn.’¹²⁴

Ambaŭ ili, du maljunaj, estis grandaj maljunuloj en la mondo. Ke ili sekvis lin, tio signifas, ke patroj de tuta mondo sekvas lin. Se la patroj de la mondo estas sekvantaj lin, kial ne iliaj filoj ankaŭ kune iros? Se nun estus iu el landestroj, kiu praktikus la regadon laŭ la reĝo Wen, li nepre ekregus la mondon en sep jaroj.

14 [4A14]

孟子曰：「求也為季氏宰，無能改於其德，而賦粟倍他日。孔子曰：『求非我徒也，小子鳴鼓而攻之可也。』由此觀之，君不行仁政而富之，皆棄於孔子者也。況於為之強戰？爭地以戰，殺人盈野；爭城以戰，殺人盈城。此所謂率土地而食人肉，罪不容於死。故善戰者服上刑，連諸侯者次之，辟草萊、任土地者次之。」

Mengzi diris: “Ran Qiu fariĝis intendanto ĉe la klano Ji, sed ne povas korekti la virton de Ji, kaj faris la imposton de grenoj duobla antaŭ kelkaj tagoj. Konfuceo diris: ‘Qiu jam ne estas mia lernanto, karaj miaj etuloj, vi devas kritiki lin kun tondrado de tamburo.’ Se observi el tia vidpunkto, kiu riĉigas la estron, ne farantan politikon de bonvoleco, ĉiu estas forĵetita de Konfuceo. Des pli instiganto de militoj. Se batali por la teritorio per milito, kampo iĝas plen-plena de mortintoj. Se batali por la urbo per milito, en la urbo estas plenigite per mortintoj. Tio estas nomata. verdire, ke la tero formanĝas la homan viandon. La krimo estas multe pli granda ol ajna mortpuno. Do inter subuloj de malbonaj estroj, tiu, kiu lertas je milito, indas je la plej alta punado. Kiu manovras aliancojn de regnestroj, tiu devas esti punata pro krimo de sekva grado. Malpli peze

¹²⁴ Boyi kun lia juna frato Shuqi 伯夷·叔齊. Taigon estas Taigong Wang 太公望呂尚. Wen estis feŭdita en okcidento, do nomata 西伯 Xibo.

devas esti punata sekve tiu, kiu malfermas virgan terenon kaj disdonas ĝin.¹²⁵”

15 [4A15]

孟子曰：「存乎人者，莫良於眸子。眸子不能掩其惡。胸中正，則眸子瞭焉；胸中不正，則眸子眊焉。聽其言也，觀其眸子，人焉廋哉？」

Mengzi diris: “Se temas pri la observado de homo, neniu parto estas pli bona ol pupiloj. La pupiloj ne povas kaŝi ion malbonan. Kiu estas ĝusta je sia interno, ties pupiloj estas klaraj. Kiu estas malĝusta je sia interno, ties pupiloj estas malhelaj. Se aŭskulti la vortojn kaj observi la pupilojn, nenio en la homo estas kaŝebla.”

16 [4A16]

孟子曰：「恭者不侮人，儉者不奪人。侮奪人之君，惟恐不順焉，惡得為恭儉？恭儉豈可以聲音笑貌為哉？」

Mengzi diris: “Kiu estas humila, tiu ne malestimas la aliajn; kiu estas ekonomie modesta, tiu ne rabas violence de la aliaj. Se troviĝas iu estro, malestimanta kaj prirabanta la aliajn, li nur timas, ke la aliaj ne estu obeemaj al li. Kiel do li povus fariĝi humila kaj modesta? Ĉu estus esprimebla la humileco kaj modesteco per mielaj voĉoj kaj ridetoj je mieno?”

17 [4A17]

淳于髡曰：「男女授受不親，禮與？」

孟子曰：「禮也。」

曰：「嫂溺則援之以手乎？」

曰：「嫂溺不援，是豺狼也。男女授受不親，禮也；嫂溺援之以手者，權也。」

曰：「今天下溺矣，夫子之不援，何也？」

曰：「天下溺，援之以道；嫂溺，援之以手。子欲手援天下乎？」

Chunyu Kun diris: “Ĉu koncernas decregulojn tio, ke viro kaj virino ne tuŝas unu la alian ĉe la donado kaj ricevado?”¹²⁶

¹²⁵ Estas malfacile kompreni la frazon 辟草萊任土地者. La ideogramo 辟 havas diversajn signifojn: forigi, eviti, malfermi. Estas notinde, ke Mengzi kritikis severe eĉ subulojn, helpantajn al malbonaj estroj. Vorto de Konfuceo estas en Analektoj, ĉap. Xianjin. Konfuceismo subtenas apartan amon al patrolando 別愛, sed deadmonas servi al nebonvolecaj estroj.

¹²⁶ Chunyu Kun estas fama diplomato, menciita en *Shiji*. Li servis al la reĝoj Wei kaj

Mengxi respondis: “Jes, la decregulojn.”

Demandis: “Ĉu iu viro ne helpas per siaj manoj sian bopatrinon dronantan?”

Respondis: “Kiu ne helpas dronantan bofratinon, tiu estas ŝakalo aŭ lupo. Ke geviroj ne tuŝas unu la alian, tio koncernas la decregulojn. Helpi la dronantan bofratinon per manoj estas ja oportuna ago laŭcele.”

Demandis: “Nun la mondo estas dronanta. Vi, Majstro, ne etendas manon por savi ĝin, kial?”

Respondis: “Helpi la dronantan mondon estas farate per la Vojo. Helpi la dronantan bofratinon estas farate per manoj. Ĉu vi dezirus helpi la mondon per manoj?”

18 [4A18]

公孫丑曰：「君子之不教子，何也？」

孟子曰：「勢不行也。教者必以正；以正不行，繼之以怒；繼之以怒，則反夷矣。『夫子教我以正，夫子未出於正也。』則是父子相夷也。父子相夷，則惡矣。古者易子而教之。父子之間不責善。責善則離，離則不祥莫大焉。」

Gongsun Chou demandis: “Noblulo mem ne instruas sian propran filon, kial?”

Mengzi respondis: “Pro natura cirkonstanco ne iras bone la instruado. Instruanto penas nepre korekti instruaton. Se la korektado ne iras bone, tiuokaze sekvas kolero. Se instrui kun kolero, tiam estiĝas malbona retroefiko. La instruato vidas: ‘Mastro instruas min ke mi estu ĝusta, sed tamen la mastro mem ankoraŭ ne montriĝas ĝusta.’ Rezulte, patro kaj filo ofendas unu la alian reciproke. Estas malbone, ke patro kaj filo ofendas sin reciproke. Antikvuloj interŝanĝis filojn por instrui. Ne devas okazi ia ĉikanado pri la bono inter patro kaj filo. La ĉikanado pri la bono disigas ilin, Nenio estas pli malfeliĉa ol la disiĝo.”

19 [4A19]

孟子曰：「事孰為大？事親為大；守孰為大？守身為大。不失其身而能事其親者，吾聞之矣；失其身而能事其親者，吾未之聞也。孰不為事？事親，事之本也；孰不為守？守身，守之本也。曾子養曾皙，必有酒肉。將徹，必請所與。問有餘，必曰『有』。曾皙死，曾元養曾子，必有酒肉。將徹，不請所與。問有餘，曰『亡矣』。將以復進也。此所謂養口體者也。若曾子，則可謂養志也。事親若曾子者，可也。」

Mengzi diris: “Kio el la servado estas granda? La servado al gepatroj estas granda.

Xuan de Qi-regno kaj al la reĝo Hui de Liang. Li estis malaltastatura, sed drola kaj sprita. La respondo de Mengzi konformas al la argumento en [4A14].

Kion gardi estas grande? Gardi sin mem estas grande. Mi aŭdas, ke ne perdinto de sia korpo povas servi al la gepatroj, sed mi ankoraŭ ne aŭdas, ke la perdinto de sia korpo povus servi al la gepatroj. La servado al siaj gepatroj estas la bazo. Kial ne gardi sin? Gardi sin mem estas ja la bazo.

Kiam Majstro Zengzi zorgadis pri sia patro Zeng Xi, nepre liveradis lin per vino kaj viando. Ĉe la fino de la manĝado la filo demandis, al kiu la patro volus doni la restaĵon. Patro demandis, ĉu restas iom, Zengzi nepre diradis: ‘Restas.’ Zeng Xi mortis, Zeng Yuan zorgadis pri Zengzi, nepre liveradis lin per vino kaj viando. Ĉe la fino de la manĝado Zeng Yuan ne demandis, al kiu la patro volus doni la restaĵon. Kiam la patro demandis, ĉu restas iom, la filo respondis: ‘Jam ne estas’, kvankam li intencis liveri denove se necesus. Zeng Yuan celas nur al la nutrado de buŝo kaj korpo. Eblas diri, ke Zengzi – al la nutrado de koro. Zengzi servas al gepatroj pli bone.”¹²⁷

20 [4A20]

孟子曰：「人不足與適也，政不足聞也。惟大人為能格君心之非。君仁莫不仁，君義莫不義，君正莫不正。一正君而國定矣。」

Mengzi diris: “Ne sufiĉas akuzi kompetentecon de homoj, nek sufiĉas kritiki la politikon. Nur granda persono scipovas korekti la eraron de reĝa koro. Se la reĝo estas bonvoleca, neniu iĝas malbonvoleca, se la reĝo estas justa, neniu iĝas maljusta, se la reĝo estas rekta, neniu iĝas malrekta. Se la reĝo estos ĝustigita, la ŝtato iĝos stabila.”¹²⁸

21 [4A21]

孟子曰：「有不虞之譽，有求全之毀。」

Mengzi diris: “Estas ne atendita laŭdo kaj estas ĉion postulanta kritiko.”¹²⁹

22 [4A22]

孟子曰：「人之易其言也，無責耳矣。」

¹²⁷ Zeng Xi estas patro de Zengzi (曾參 Zeng Shen), kaj Zeng Yuan estas filo de Zengzi. Estas konsiderate, ke Zeng Shen kompilis la sutron de Fila Pietato 孝經.

¹²⁸ Mi prenas ideogramon 適 por ordinara signifo. Estas dirite: “Konvena persono al konvena posteno”, sed ne okazas ĉiam, ke iu persono taŭgus sufiĉe por la posteno. Mengzi, samkiel Mozi, konsideras la akordiĝon al supro 尚同 decida, do la plej grava tasko de konsilanto estas stimuli reĝon je bonvolema koro.

¹²⁹ La frazon 有求全之毀 komprenas Zhuxi alie: “Kvankam strebante al perfekteco, tamen iu faras fuŝon.”[四書集注第八卷 252]

Mengzi diris: “Kiu facile ŝanĝas la vorton, estas nura senrespondeculo.”¹³⁰

23 [4A23]

孟子曰：「人之患在好為人師。」

Mengzi diris: “Homo havas malsanon, ke li ŝatas fariĝi alies instruisto.”¹³¹

24 [4A24]

樂正子從於子敖之齊。樂正子見孟子。孟子曰：「子亦來見我乎？」曰：「先生何為出此言也？」曰：「子來幾日矣？」曰：「昔昔。」曰：「昔昔，則我出此言也，不亦宜乎？」曰：「舍館未定。」曰：「子聞之也，舍館定，然後求見長者乎？」曰：「克有罪。」

Yuezheng-zi venis al Qi-regno en la sekvantaro de Zi Ao.¹³² Yuezheng-zi vizitis Mengzi. Mengzi diris: “Vi alvenis vidi ankaŭ min?”

Respondis: “Majstro, por kio vi eldiris tiel?”

Demandis: “Kiam vi alvenis ĉi tiun urbon?”

Respondis: “Antaŭ tagoj.”

Demandis: “Antaŭ tagoj! Estas nature, ke mi dirus tiumaniere.”

Respondis: “Ankoraŭ ne akomodigis je la gastejo.”

Demandis: “Ĉu vi lernis tiel, ke povas viziti la pliaĝulon post la akomodigo?”

Respondis: “Mi kulpas.”

25 [4A25]

孟子謂樂正子曰：「子之從於子敖來，徒餽啜也。我不意子學古之道，而以餽啜也。」

Mengzi parolis al Yuezheng-zi, dirante: “Vi, sekvante s-ron Zi Ao, venis ĉi tien kaj nur manĝadas kaj trinkadas. Estas por mi ne atendite, ke vi lernis la Vojoj-Taon de antikvuloj nur por manĝadi kaj trinkadi.”

26 [4A26]

孟子曰：「不孝有三，無後為大。舜不告而娶，為無後也，君子以為猶告也。」

¹³⁰ Iuj prenas la frazon alie: “Oni facile eldiradas vortojn, se ne riproĉite.”

¹³¹ La frazo estas mallonga, sed signifoplena. Mengzi ne ŝatas instrui de supre al lernantoj, sed nur instigi ilin al memlernado. En tio kuŝas diferenco inter li kaj Xunzi.

¹³² Yuezheng-zi estas unu el disĉiploj de Mengzi. Zi Ao, Wang Huan 王驩 estas favorato de la reĝo de Qi. Mengzi ne ŝatis Zi Ao[2B6, 4B27]. El tiu teksto videblas, kiel profunde amas Mengzi sian disciplon, Yuezheng-zi, do li ne devas ne riproĉi lin pro misago.

Mengzi diris: “Estas tri agoj kontraŭ fila pietato. La plej granda el ili estas ne havi posteularon. Shun edziĝis sen informigi al gepatroj, ĉar li tiam ne havis posteulojn. Nobluloj konsideras tion sama, ke li informigis laŭfakte.”¹³³

27 [4A27]

孟子曰：「仁之實，事親是也；義之實，從兄是也。智之實，知斯二者弗去是也；禮之實，節文斯二者是也；樂之實，樂斯二者，樂則生矣；生則惡可已也，惡可已，則不知足之蹈之、手之舞之。」

Mengzi diris: “Bonvoleco fruktas en la servado al gepatroj; justo fruktas en la sekvado al pliaĝaj fratoj; intelekto fruktas en la kompreno ne forlasi la supre menciitan duopon; dereguloj fruktas en fajna reguligado kaj ornamado de la duopo; muziko fruktas en la ĝojo de la duopo. Kion oni ĝojas, tio kreskas vive. Kio kreskas vive, tio ne haltigeblas. Se ne haltigeblas, tiam senscie ekpaŝas en ritmo piedoj kaj ekdancas manoj.”¹³⁴

28 [4A28]

孟子曰：「天下大悅而將歸己。視天下悅而歸己，猶草芥也。惟舜為然。不得乎親，不可以為人；不順乎親，不可以為子。舜盡事親之道而瞽瞍底豫，瞽瞍底豫而天下化，瞽瞍底豫而天下之為父子者定，此之謂大孝。」

Mengzi diris: “La mondo ĝojege submetis sin al li mem. Li vidis la tutan mondon submetiĝinta ĝojplene al si kvazaŭ senutilan herbon. Shun estis ĝuste tia. Dum ne akceptate de gepatroj, li sentis, ke li ne povis fariĝi persono; dum ne akordante kun gepatroj, li supozis, ke li ne povis fariĝi filo. Do Shun pleje servadis al gepatroj laŭ la Vojo-Tao, kaj lia patro, Gusou, finfine ekĝojis. Kiam Gusou ekĝojis finfine, la tuta mondo transformiĝis. Per tio, ke Gusou ekĝojis, la tuta mondo iĝis stabila surbaze de la ĝusta rilato inter patro kaj filo, t. n. la granda fila pietato.”¹³⁵

¹³³ Estas konsiderate kiel tri malbonoj de filo: 1) flatado al gepatroj, 2) sen laboro dum la gepatroj maljuniĝis, 3) sen posteularo. Edziĝo sen informigi gepatrojn estas ne pli malbona ol manko de posteuloj.

¹³⁴ Ĉi tie estas formulete koncize pri la principo de konfuceismo laŭ Mengzi.

¹³⁵ Tre fama estas malbona rilato inter la reĝo Shun kaj liaj gepatroj, do tiu problemo estas tikla por konfuceanoj. Mengzi elcerbumis ĉi tie sian solvon el la vidpunkto de Fila pietato, dirante, ke se oni sukcesos ŝanĝi la plej obstinan obstaklon en ion favoran, tiam la mondo transformiĝos.

《離婁下》

LI LOU (II)

29 [4B1]

孟子曰：「舜生於諸馮，遷於負夏，卒於鳴條，東夷之人也。文王生於岐周，卒於畢郢，西夷之人也。地之相去也，千有餘里；世之相後也，千有餘歲。得志行乎中國，若合符節。先聖後聖，其揆一也。」

Mengzi diris: “Shun nasikiĝis en Zhufeng, translokiĝis en Fuxia, mortis en Mingtiao, li estis orienta provincano. La reĝo Wen naskiĝis en Qizhou kaj mortis en Biying, li estis okcidenta provincano. Je lokoj ili disas unu de la alia je distanco de milioj. Je la tempo ili disas unu post la alia pli ol mil jarojn. Sed je la strebo kaj konduto en la Meza Lando ambaŭ ili ĝuste konformis unu al la alia kvazaŭ du duonj de dividita sigelo. Antaŭa sanktulo kaj posta sanktulo estis unusamaj.”

30 [4B2]

子產聽鄭國之政，以其乘輿濟人於溱洧。孟子曰：「惠而不知為政。歲十一月徒杠成，十二月輿梁成，民未病涉也。君子平其政，行辟人可也。焉得人人而濟之？故為政者，每人而悅之，日亦不足矣。」

Zichan, kiam li estis administranta la regionon Zheng, lasis siajn regnantojn transiri la riverojn Zhen kaj Wei per sia portseĝo.

Mengzi diris: “Li, kvankam bonfarema, tamen ne scias la regadon. En la dek-unua monato estos starigita iu ŝtipa ponteto por transiri piede, en la dek-dua monato estos starigita la ponto transirebla per ĉaro, do popolanoj povas iradi transe sen problemo. Se la estro faras la politikon ordinara, eĉ eblas dume ĉesigi homojn transiradi. Kial oni devus transporti ĉiun homon per portseĝo? Al politikisto mankas tempo por plezurigi ĉiun homon.”¹³⁶

31 [4B3]

孟子告齊宣王曰：「君之視臣如手足，則臣視君如腹心；君之視臣如犬馬，則臣視君如國人；君之視臣如土芥，則臣視君如寇讎。」

王曰：「禮，為舊君有服，何如斯可為服矣？」

¹³⁶ Zichan – fama ĉefministro de Zheng-regno. Kiam li mortis en 496 a. K., Konfuceo tre bedaŭris, dirante ke perdiĝis bonvoleculo. 11-a kaj 12-a monato estas septembro kaj oktobro laŭ nuna kalendaro.

曰：「諫行言聽，膏澤下於民；有故而去，則君使人導之出疆，又先於其所往；去三年不反，然後收其田里。此之謂三有禮焉。如此，則為之服矣。今也為臣。諫則不行，言則不聽；膏澤不下於民；有故而去，則君搏執之，又極之於其所往；去之日，遂收其田里。此之謂寇讎。寇讎何服之有？」

Mengzi diris al la reĝo Xuan de Qi-regno: “Se la reĝo rigardas siajn subulojn aŭ omaĝulojn kiel siajn manojn kaj piedojn, ankaŭ la subuloj rigardas sian reĝon kiel sian ventron kaj koron; se la reĝo rigardas siajn subulojn kiel hundojn kaj ĉevalojn, ankaŭ la subuloj rigardas la reĝon kiel fremdulon; se la reĝo rigardas siajn subulojn kiel terbulon kaj rubaĵon, ankaŭ la subuloj rigardas la reĝon kiel malamikon.”

La reĝo diris: “Precipe, laŭ decreguloj devintus, ke oni restu obeema al la antaŭa reĝo. Kiel do oni povas resti tiom obeema?”

Respondis: “Se estas tia subulo, kies admono estis praktikata kaj konsilo estis aŭdata, kaj sube la popolanoj ricevis favoron. Kiam tiu subulo devas forlasi la regnon pro ia nepra kialo, tiuokaze la reĝo sendas al li homon por akomani lin ĝis la eliro trans landlimon kaj lasas lin loĝi stabile en alia lando, kaj post tri jaroj de lia alilanda loĝado, se li ne revenos plu, la reĝo finfine reprenos la konceditan al li kampon kaj vilaĝon. Tio estas nomata Triopo da decreguloj. Se tiel, povas esti subulo, restanta obeema. Sed nun, se temas pri subuloj, kies admono ne estas praktikata, kies konsilo ne estas aŭdata, sube la popolo ne ricevas favoron. Kiam iu subulo devas forlasi la landon pro ia nepra kialo, la reĝo provas aresti lin kaj postkuras persekuti lin, loĝantan alilande. Tuj en tiu tago, kiam li foriris, la reĝo konfiskas la konceditan al li kampon kaj vilaĝon. Tio estas nomata ‘venĝo’ al malamiko. Kial la malamiko, merita je venĝo, povus resti obeema al la antaŭa reĝo?”

32 [4B4]

孟子曰：「無罪而殺士，則大夫可以去；無罪而戮民，則士可以徙。」

Mengzi diris: “Kiam ie oficisto estas punmortigita spite neniun kulpon, tiam gandoficisto povas foriri de tiu lando; kiam ie senkulpaj popolanoj estas murditaj, tiam oficisto povas forlasi tiun landon.”

33 [4B5]

孟子曰：「君仁莫不仁，君義莫不義。」

Mengzi diris: “Kie la reĝo estas bonvoleca, tie ne estas malbonvoleco; kie la reĝo

estas justa, tie ne estas maljusto.”

34 [4B6]

孟子曰：「非禮之禮，非義之義，大人弗為。」

Mengzi diris: “Grandulo ne praktikas falsajn decregulojn, nek falsan juston .”

35 [4B7]

孟子曰：「中也養不中，才也養不才，故人樂有賢父兄也。如中也棄不中，才也棄不才，則賢不肖之相去，其閒不能以寸。」

Mengzi diris: “Kiu estas meza, tiu devas varti la malpli altan ol la mezan; kiu estas kapabla, tiu devas varti malpli kapablan. Do oni ĝojas, havante saĝajn gepatrojn kaj pliaĝajn fratojn. Okazas, ke la meza forlasas la suban kaj la kapabla forlĵetas la malpli kapablan. Tiam la saĝa kaj la malsaĝa disas unu de la alia tiom, kiom la distanco ne mezureblus per *cuno*.”¹³⁷

36 [4B8]

孟子曰：「人有不為也，而後可以有為。」

Mengzi diris: “Por homo estas sfero de senago, kaj poste povas esti ago.”¹³⁸

37 [4B9]

孟子曰：「言人之不善，當如後患何？」

Mengzi diris: “Tiu, kiu mencias alies malbonon, kian suferon devos elteni poste?”

38 [4B10]

孟子曰：「仲尼不為已甚者。」

¹³⁷ Ĉirkaŭ la frazo 不能以寸 (ne mezurebla per *cuno*-colo) diversas opinioj inter esploristoj. Iu konsideras la distancon malgranda, la alia – granda. Mi konsentas kun la lasta, ĉar la zorgado de la malpli kapabla far la pli kapabla altigas la personecon.

¹³⁸ Kontraŭargumento far Mengzi al Lao-Zhuang, kiel sintezo de senago kaj ago. Estas multaj diversaj opinioj ĉirkaŭ la vortoj 不為·有為. Yoshida Shoin komparas tiun kun la frazo en la ĉap. Jinxin2(37)狂獯(frenezulo kaj ermito)、狂者進取、獯者有所不為.Shoin preferas frenezulon al ermito.

Mengzi diris: “Zhong Ni(Konfuceo) ne faris ion ekscesan.”¹³⁹

39 [4B11]

孟子曰：「大人者，言不必信，行不必果，惟義所在。」

Mengzi diris: “Se temas pri grandulo, ne ĉiam estas fidinda lia eldiro, ne ĉiam bone rezultas lia ago, sed li tenas sin nur en justo.”

40 [4B12]

孟子曰：「大人者，不失其赤子之心者也。」

Mengzi diris: “Grandulo estas tiu, kiu ne perdas koron de bebo.”¹⁴⁰

41 [4B13]

孟子曰：「養生者不足以當大事，惟送死可以當大事。」

Mengzi diris: “La nutrado de longviveco ne estas sufiĉe granda afero. Kiel morti devas esti ja la granda afero.”¹⁴¹

42 [4B14]

孟子曰：「君子深造之以道，欲其自得之也。自得之，則居之安；居之安，則資之深；資之深，則取之左右逢其原，故君子欲其自得之也。」

Mengzi diris: “Noblulo profunde prifosante kreas ion per la Vojo-Tao, ĉar deziras memakiri solide tion per sia forto. Memakirinte tion per si mem, li kviete loĝas kun tio. Kviete loĝante kun tio, li utiligas tion profunde kiel la fondon. Profunde utiligante la fondon, li pristudas tion multflanke, dekstre-maldekstre, kaj renkontas la fonton. Tiel do noblulo deziras posedi solide tion per si mem.”¹⁴²

¹³⁹ Konfuceo faris tion, kion li mem konsideris justa. Li iris laŭ la Vojo, kiun li kredis vera. En tiu senco Mengzi diras, ke estas nenio ekstraordinara. Sed tiel vivi estas malfacile. Liaj vortoj kaj agoj ne mortas, sed eterne vivas kaj naskas heredantojn.

¹⁴⁰ Ĉi tie manifestiĝas la denaska boneco de homa naturo.

¹⁴¹ La frazo 養生 nutrado de longviveco estas ŝlosila por Zhuangzi. Multaj esploristoj prenas la frazon 養生 por la servado al gepatroj, kaj la frazon 送死 por funebri la gepatrojn.

¹⁴² La frazon 自得之 Zhuxi komprenas kiel atingi la rezonon, aŭ la fundamentan leĝon 理.[朱熹、四書集注 264-265]

43 [4B15]

孟子曰：「博學而詳說之，將以反說約也。」

Mengzi diris: “Lernadi ion vaste kaj pristudi tion detale – estas ja por resumi koncize tion.”

44 [4B16]

孟子曰：「以善服人者，未有能服人者也；以善養人，然後能服天下。天下不心服而王者，未之有也。」

Mengzi diris: “Kiu provas bonfareme submetigi homojn, tiu ne povas submeti ilin. Kiu mem bonfarante nutras homojn, tiu finfine povas submeti la mondon. Tiu, al kiu ne submetiĝis elkore la mondo, estis neniam reĝo.”

45 [4B17]

孟子曰：「言無實不祥。不祥之實，蔽賢者當之。」

Mengzi diris: “Vorto sen vereco estas malbonaŭgura. Malbonaŭgura vere estas ja tio, kio kalumnias saĝulojn.

46 [4B18]

徐子曰：「仲尼亟稱於水，曰：『水哉，水哉！』何取於水也？」

孟子曰：「原泉混混，不舍晝夜。盈科而後進，放乎四海，有本者如是，是之取爾。苟為無本，七八月之間雨集，溝澮皆盈；其潤也，可立而待也。故聲聞過情，君子恥之。」

Xuzi diris: “Zhong Ni ofte laŭdadis akvon, dirante: ‘Ho akvo, ho akvo!’ Kion bonan li vidis en akvo?”¹⁴³

Mengzi diris: “La fonto ŝprucas plen-plene, la akvo fluas senĉese tagnokte, plenigante kavojn torentas antaŭen, enfluas kvar marojn. Kiu havas la fonton, tiu estas tia. Tion ja admiris Konfuceo. Sen la fonto, eĉ se multe pluvus dum la sepa kaj la oka monatoj, akvumante plene ĉiujn kanalojn, grandajn kaj malgrandajn, fine oni devas nur vidi la elĉerpiĝon. Nobluloj hontas je tio, ke troa reputacio superfluas la realan povon.”

¹⁴³ Xuzi, 徐辟, estas unu el disĉiploj de Mengzi, aperas en la ĉapitro La duko Wen de Teng.

47 [4B19]

孟子曰：「人之所以異於禽於獸者幾希，庶民去之，君子存之。舜明於庶物，察於人倫，由仁義行，非行仁義也。」

Mengzi diris: “La diferenco inter homoj kaj birdoj-bestoj estas tre malgranda. Popolanoj ignoras tiun diferencon, sed noblulo bontenas tion. Shun klare vidis multe da estaĵoj, observis homan rilaton kaj kondukis laŭ dereguloj kaj justo. Tio estis ne afekta farado de bonvoleco kaj justo.”

48 [4B20]

孟子曰：「禹惡旨酒而好善言。湯執中，立賢無方。文王視民如傷，望道而未之見。武王不泄邇，不忘遠。周公思兼三王，以施四事；其有不合者，仰而思之，夜以繼日；幸而得之，坐以待旦。」

Mengzi diris: “Yu ne amis dolĉan vinon sed ŝatis la bonan vorton. Tang alteniĝis je la Mezeco kaj promociis saĝulojn sendiskriminacie. La reĝo Wen prizorgadis la popolon kiel vundiĝeman, esperis la Vojon-Taon, kvazaŭ sopirus je io ankoraŭ ne plenumata. La reĝo Wu ne preterrigardis proksimulojn, nek forgesis malproksimulojn. La duko Zhou intencis kunigi la manierojn far antaŭaj reĝoj de tri dinastioj kaj efektiviĝi aferojn de kvar reĝoj, se trovis ion ne taŭga, observante, elpensadis ĉiam pri tio tage kaj nokte. Kiam li feliĉe eltrovis ion, sidante atendis la tagiĝon.”¹⁴⁴

49 [4B21]

孟子曰：「王者之迹熄而詩亡，詩亡然後春秋作。晉之乘，楚之檮杌，魯之春秋，一也。其事則齊桓、晉文，其文則史。孔子曰：『其義則丘竊取之矣。』」

Mengzi diris: “Reĝaj spuroj jam ne restis kaj *Poezio* pereis, post la pereco de *Poezio* estis kreita la analoj de historio *Chun-qiu* (*Printempo-Aŭtuno*)– *Sheng kroniko* de Jin-regno, *Taowu kroniko* de Chu-regno, *Printempo-Aŭtuno* de Lu-regno estas samaj laŭ kategorio. Pri la aferoj far Huan de Qi-regno kaj Wen de Jin-regno estas enskribite en la historio. Konfuceo diris: ‘Selekti faktojn el historio aŭdacis mi mem.’¹⁴⁵”

¹⁴⁴ Yu diris, ke dolĉa vino pereigas regnon(戰国策卷 7 魏策惠王). Tang promociis kuiriston Yi Yin al ministro. La reĝo Wen mem ne povis faligi la dinastion Yin. Mengzi, kiel konfuceano, alte estimas la aferon de La duko Zhou 周公旦.

¹⁴⁵ Sheng, Taowu estas titoloj de historio en Jin kaj Chu regnoj. Konfuceo redaktis la analojn de Lu-regno, do li elektis manifestojn de justo (aŭ maljusto) el sia vidpunkto.

50 [4B22]

孟子曰：「君子之澤五世而斬，小人之澤五世而斬。予未得為孔子徒也，予私淑諸人也。」

Mengzi diris: “Influo de noblulo al posteuloj daŭras dum kvin generacioj, ankaŭ influo de malgrandulo povas daŭri dum kvin generacioj. Mi ne povis esti rekta lernanto de Konfuceo, sed mi admiras lin kiel mian Majstron tra aliaj personoj, ĉe kiuj mi lernis private.”

51 [4B23]

孟子曰：「可以取，可以無取，取傷廉；可以與，可以無與，與傷惠；可以死，可以無死，死傷勇。」

Mengzi diris: Kiam estas alternativo: allaseblas kaj preni kaj ne preni, – se prenos, tio povos vundi vian honestecon. Se allaseblas kaj doni kaj ne doni, – se donos, tio povos vundi vian favordonemon. Se allaseblas kaj morti kaj ne morti, – se elektos morton, tio povos vundi vian bravecon.”¹⁴⁶

52 [4B24]

逢蒙學射於羿，盡羿之道，思天下惟羿為愈己，於是殺羿。孟子曰：「是亦羿有罪焉。」公明儀曰：「宜若無罪焉。」曰：「薄乎云爾，惡得無罪？鄭人使子濯孺子侵衛，衛使庾公之斯追之。子濯孺子曰：『今日我疾作，不可以執弓，吾死矣夫！』問其僕曰：『追我者誰也？』其僕曰：『庾公之斯也。』曰：『吾生矣。』其僕曰：『庾公之斯，衛之善射者也，夫子曰「吾生」，何謂也？』曰：『庾公之斯學射於尹公之他，尹公之他學射於我。夫尹公之他，端人也，其取友必端矣。』庾公之斯至，曰：『夫子何為不執弓？』曰：『今日我疾作，不可以執弓。』曰：『小人學射於尹公之他，尹公之他學射於夫子。我不忍以夫子之道反害夫子。雖然，今日之事，君事也，我不敢廢。』抽矢扣輪，去其金，發乘矢而後反。」

Peng Meng lernis pafarkarton ĉe Yi kaj atingis la Vojon de mastro Yi. Pensante, ke en la mondo nur Yi superas lin mem, li mortigis sian mastron Yi.

Mengzi diris: “Je tio ankaŭ Yi estis kulpa.”

Malgraŭ ke Gongming Yi estis dirinta: “Ŝajnas, ke ne kulpas Yi.”, Mengzi diris: “Kvankam malgranda estas lia kulpo, tamen kial oni povus konsideri lin ‘senkulpa’? Kiam Zheng-regnanoj sendis Zizhuo Ruzi por invadi la regnon Wei, Wei igis Yugong Si kontraŭataki lin.

¹⁴⁶ La frazo kun bela ĉinlingva eŭfonio donas signifoplenan admonon al la persono, kiu volas teni sin alta je sia personeco. Aparte gravas la lasta admono pri la braveco.

Zizhuo Ruzi diris: ‘Hodiaŭ mi malsaniĝis, ke mi ne povas arkpafi. Ni mortos certe!’
 Li demandis sian servanton, dirante: ‘Kiu do estas atakanta min?’
 La servanto respondis: ‘Yugong Si’.
 Li diris: ‘Ni restos vivaj.’
 La servanto diris: ‘Yugong Si estas bona pafarkisto de Wei-regno, sed vi diras, ke ni restos vivaj. Kial?’
 Li diris: ‘Yugong Si lernis la pafarkarton ĉe Yingong Ta, kaj Yingong Ta lernis la pafarkarton ĉe mi. Tiu Yingong Ta estas persono fidela al principo. Ankaŭ Yugong Si prenis de mia amiko nepre la fidelecon al principo.’
 Atinginte la fronton, Yugong Si demandis: ‘Kial vi ne prenas la pafarkon, Sinjoro?’
 Zizhuo Ruzi respondis: ‘Hodiaŭ mi malsaniĝis, do ne povas arkpafi.’
 Yugong Si diris: ‘Mi lernis pafarkarton ĉe Yingong Ta kaj Yingong Ta lernis la pafarkarton ĉe vi, Sinjoro. Mi ne eltenos damaĝi Sinjoron kontraŭ la Vojo de Sinjoro. Sed tamen hodiaŭa afero estas por mia reĝo. Mi ne aŭdacas neglekti la aferon.’
 Li eltiris sagojn, sed, foriginte metalan sagpinton pere de ĉarrado, pafis kvar sagojn kaj retroiris.”¹⁴⁷

53 [4B25]

孟子曰：「西子蒙不潔，則人皆掩鼻而過之。雖有惡人，齊戒沐浴，則可以祀上帝。」

Mengzi diris: “Se Xishi, belulino, estus malpurigita, tiam ĉiuj homoj kun nazo premita preterpasus, evitante ŝin. Kontraŭe, ĉiu ajn, spite trajtojn malbelajn, se purigas sin, lavas sin kaj banis sin, tiam povus eĉ fari ceremonion por adorkulti la Supran Dion.”

54 [4B26]

孟子曰：「天下之言性也，則故而已矣。故者以利為本。所惡於智者，為其鑿也。如智者若禹之行水也，則無惡於智矣。禹之行水也，行其所無事也。如智者亦行其所無事，則智亦大矣。天之高也，星辰之遠也，苟求其故，千歲之日至，可坐而致也。」

Mengzi diris: “La subĉiela lingvo estas laŭnatura, do gravas ja la kaŭzeco. La kaŭzeco faras utilecon baza. La malbono de intelektulo kuŝas en la harfenda borado.

¹⁴⁷ Gongming Yi, disĉiplo de Zeng Shen 曾參, aperadas en aliaj lokoj de Mengzi, vd. 3A1, 3B3, 3B9. El la pensmaniero de 4B23, Yi kulpas je tio, ke li donis favore al Peng Meng pafarkarton sen doni la Vojon de lernanto. Yi estis vundita finfine pro sia senprudenta favordonemo.

Sed la intelektulo, kiel Yu, lasis akvon iri glate. De en tio estas nenia malbono de intelekto. Yu faris la akvon iri glate, kaj en la irado estis nenia problemo, Ke intelektulo lasas iun iri sen problemo, tio estas ja grandega intelekto.

La Ĉielo estas alta, la steloj estas foraj. Sed se serĉi la kaŭzecon, oni sidante scipovas la solisticon trans mil jaroj.”¹⁴⁸

55 [4B27]

公行子有子之喪，右師往弔，入門，有進而與右師言者，有就右師之位而與右師言者。孟子不與右師言，右師不悅曰：「諸君子皆與驩言，孟子獨不與驩言，是簡驩也。」

孟子聞之，曰：「禮，朝廷不歷位而相與言，不踰階而相揖也。我欲行禮，子敖以我為簡，不亦異乎？」

Gonghangzi estis funebranta je la filo. Wang Huan Ziao, la dekstra ministro iris por ĉeesti la funebran ceremonion. Kiam li estis eniranta, iuj aliradis kaj ekparoladis al li, kaj kiam li estis sidanta sur la seĝo de la dekstra ministro, la aliaj ekparoladis al li. Mengzi ne parolis al li kaj al la dekstra ministro tio ne plaĉis, do tiu ĉi sentis malagrable, dirante; “Ĉiuj nobluloj alparolis min, Huan, sed Mengzi sola ne parolis. Tio signifas, ke Mengzi preteratentis min.”

Mengzi poste aŭdis tion kaj diris: “Laŭ decreguloj en la kortego, oni ne parolas unu kun al alia nek reciprokas saluton trans sidejojn. Mi deziris konduki laŭ la decreguloj. Sed s-ro Ziao prenis min, ke mi malrespektus lin. Kiel stranga, ĉu ne?”¹⁴⁹

56 [4B28]

孟子曰：「君子所以異於人者，以其存心也。君子以仁存心，以禮存心。仁者愛人，有禮者敬人。愛人者人恆愛之，敬人者人恆敬之。有人於此，其待我以橫逆，則君子必自反也：我必不仁也，必無禮也，此物奚宜至哉？其自反而仁矣，自反而有禮矣，其橫逆由是也，君子必自反也：我必不忠。自反而忠矣，其橫逆由是也，君子曰：『此亦妄人也已矣。如此則與禽獸奚擇哉？於禽獸又何難焉？』是故君子有終身之憂，無一朝之患也。乃若所憂則有之：舜人也，我亦人也。舜為法於天下，可傳於後世，我由未免為鄉人也，是則可憂也。憂之如何？如舜而已矣。若夫君子所患則亡矣。非仁無為也，非禮無行也。如有一朝之患，則君子不患

¹⁴⁸ En la agado de la reĝo Yu videblas la ideala homa ago laŭ la natura leĝo. Akvo iras, Yu lasas la akvon iri reguligate. Tio estas la utiligo de kaŭzeco. Kelkaj esploristoj prenas la ideogramon 利 por eraro. Sed en ĉi tiu kunteksto ĝi estas uzata ne por la esprimo de homa avareco, sed por la klarigo de natura leĝo. Zhuxi komprenas ĝin kiel la signifon 順 konformiĝo. Tio similas al Darwin je la kompreno pri ‘adaptebleco’.

¹⁴⁹ Zi Ao, alinome Wang Huan, aperas en aliaj lokoj.[4A24, 4A25] Malintima estas la interrilato de Mengzi kaj Zi Ao.

矣。」

Mengzi diris: “La noblulo diferencas de ordinarulo je tio, ke la unua bontenas la koron. La noblulo apogas sin sur la koro en bontenado de bonvoleco, sur la koro en bontenado de decreguloj. Persono de bonvoleco amas homojn, persono kun decreguloj respektas homojn. Amanton de homoj la homoj ĉiam amas, respektanton de homoj la homoj ĉiam respektas. Okazus eĉ al tia persono la situacio, ke li estu akceptata malice kun malracia traktado. Tiam la noblulo nepre reflektas sin, turnante sin internen al si mem: ‘Ŝajnas, ke mi mem nepre estas malbonvoleca, al mi nepre mankas decreguloj. Alie, kial okazus al mi tia situacio?’ Reflektante, li trovis sin mem bonvoleca; reflektante, li trovis sin mem havanta decregulojn, malgraŭ tio la malracia malico ankoraŭ daŭras. Tiukaze la noblulo nepre turnas sin internen al si mem, reflektante: ‘Mi mem nepre ne estas fidela’. Reflektante, li trovis sin mem fidela, sed tamen la malracia malico ankoraŭ daŭras.

Tiam la noblulo diras: ‘Tiu homo estas nura kanajlo. Tial do li ne estas alia ol rabobirdoj-bestoj. Kial mi devus lukti kontraŭ rabobirdoj kaj bestoj?’ Tiel do la noblulo, havante ĉe si la zorgon dumvivan, ne havigas al si la momentan ĉagrenon dum unu mateno. La zorgo, kiun li havas, estas tia: ‘Shun estas homo, ankaŭ mi estas homo. Shun prezentis al la mondo la transdoneblan modelon, heredatan de postaj generacioj. Mi devas, tamen, resti kiel ununura vilaĝano. Tio al mi estas zorgenda.’ Jen kia estas lia zorgo. Li nur volus fariĝi tia, kia estis Shun. Tia noblulo havigas al si nenian ĉagrenon. Se ne bonvolecon, li ne faras. Se kontraŭ decreguloj, li ne kondukas. Je tia nura dummatena ĉagreno la noblulo tute ne ĉagreniĝas.”

57 [4B29]

禹、稷當平世，三過其門而不入，孔子賢之。顏子當亂世，居於陋巷。一簞食，一瓢飲。人不堪其憂，顏子不改其樂，孔子賢之。孟子曰：「禹、稷、顏回同道。禹思天下有溺者，由己溺之也；稷思天下有飢者，由己飢之也，是以如是其急也。禹、稷、顏子易地則皆然。今有同室之人鬪者，救之，雖被髮纓冠而救之，可也。鄉鄰有鬪者，被髮纓冠而往救之，則惑也，雖閉戶可也。」

Yu kaj Ji, okupante sin fervore per aferoj en la paca mondo, preteriris la sian domon kaj ne eniris la pordon trifoje. Konfuceo laŭdis ilin saĝaj. Yanhui, vivante en la tumulta mondo, loĝis en povra kvartalo, prenante ĉe si nur unu kesteton da manĝaĵo, unu kukurbon da trinkaĵo. Aliaj homoj ne povus elteni tian aflikton, sed Yanhui ne ŝanĝis ĝojigan al si vivmanieron. Konfuceo laŭdis lin saĝa.

Mengzi diris: “Yu, Ji, kaj Yanhui, ĉiuj iris laŭ la sama Vojo. Vidante en la mondo homojn dronantajn, Yu pensis, kvazaŭ dronigus ilin Yu mem. Vidante en la mondo homojn malsatajn, Ji pensis, kvazaŭ malsatigus ilin Ji mem. Tial do ili haste traktis la urĝan aferon. Yu, Ji, kaj Yanzi, kvankam diversas je situacio, tamen ĉiuj estis samaj.

Nun supozu, viaj samĉambranoj konfliktus unu kun la alia, vi volus savi ilin kaj vi pacigus ilin kiel arbitraciato kun via ĉapo kovrinta harojn, tio estas allasebla. Sed, kiam samvilaĝanoj konfliktus, estas freneze, se vi provus solvi tion kun ĉapo metita sur haroj. Tiuokaze al vi estus preferinde nur fermi vian pordon.”¹⁵⁰

58 [4B30]

公都子曰：「匡章，通國皆稱不孝焉。夫子與之遊，又從而禮貌之，敢問何也？」
孟子曰：「世俗所謂不孝者五：惰其四支，不顧父母之養，一不孝也；博奕好飲酒，不顧父母之養，二不孝也；好貨財，私妻子，不顧父母之養，三不孝也；從耳目之欲，以為父母戮，四不孝也；好勇鬥很，以危父母，五不孝也。章子有一於是乎？夫章子，子父責善而不相遇也。責善，朋友之道也；父子責善，賊恩之大者。夫章子，豈不欲有夫妻子母之屬哉？為得罪於父，不得近。出妻屏子，終身不養焉。其設心以為不若是，是則罪之大者，是則章子已矣。」

Gongduzi diris: “Pri s-ro Kuang Zhang ĉiuj tra la lando nomas lin persono sen fila pietato. Vi, Majstro, ludvagadas kun li, kaj sekvas lin, dece traktante lin. Mi aŭdacas demandi vin, kial?”

Mengzi diris: “En la ordinara mondo oni nomas ulo sen fila pietato havanton de kvin aĉaj inklinoj. La unua sen fila pietato estas tiu, kiu, estante pigra je la uzado de korpmembroj, ne zorgas pri la nutrado de gepatroj. La dua estas tiu, kiu, ŝatante vetludi kaj drinkadi vinon, ne zorgas pri la nutrado de gepatroj. La tria estas tiu, kiu, avidante monon-valoraĵon kaj amante nur siajn edzinon-gefilojn, ne zorgas pri la nutrado de gepatroj. La kvara estas tiu, kiu, indulgante al si deziron de oreloj kaj okuloj, kruele traktas gepatrojn. La kvina estas tiu, kiu, estante temerara, endanĝerigas gepatrojn.

Se temas pri s-ro Kuang Zhang, ĉu li havus eĉ unu el tiuj menciitaj? La rilato inter s-ro Zhang kaj lia patro rompiĝis pro tio, ke la filo admonis la patron al io pli bona. La admono je io pli bona laŭ la Vojo-Tao devus esti farata inter amikoj. Se farate inter patro kaj filo, tia admono okazas ege vundi la favoreman rilaton. Ĉu s-ro Zhang ne dezirus

¹⁵⁰ Ji, servante al Yao-Shun, donis al la popolo instruon pri agrokulturo. Rilate al la ĉapo, mi supozas, ke ĝi povus esti simbolo de mediaciato aŭ juĝisto. Zhuxi komprenas la frazon 被髮纓冠 kiel idiomecan adverbbon ‘urĝe’.

teni la intimecon kun sia edzino, gefiloj, kaj patrino? Ĉar li rigardis sin kulpa kontraŭ sia patro kaj ne povis resti proksima al li, do li forlasis ankaŭ la edzinon kaj fordonis gefilojn, kaj ne havas poste dumvive la familion por nutri. Li decidis en koro fari tion, ĉar, se ne farus tiel, li sentus sian pekon pli granda. Jen kia estas la personeco de s-ro Zhang.”¹⁵¹

59 [4B31]

曾子居武城，有越寇。或曰：「寇至，盍去諸？」曰：「無寓人於我室，毀傷其薪木。」寇退，則曰：「修我牆屋，我將反。」寇退，曾子反。左右曰：「待先生，如此其忠且敬也。寇至則先去以為民望，寇退則反，殆於不可。」沈猶行曰：「是非汝所知也。昔沈猶有負芻之禍，從先生者七十人，未有與焉。」

子思居於衛，有齊寇。或曰：「寇至，盍去諸？」子思曰：「如伋去，君誰與守？」

孟子曰：「曾子、子思同道。曾子，師也，父兄也；子思，臣也，微也。曾子、子思易地則皆然。」

Kiam Zengzi loĝis en Wucheng, tien invadis malamikoj el Yue-regno.

Oni demandis lin: “Ĉu vi ne devas forfuĝi de la invado?”

Respondis: “Lasu neniun loĝi en mia ĉambro, ili rompos ĝin kaj faros brullignojn. Post kiam malamikoj foriros, riparu por mi la murojn kaj ĉambron, mi revenos baldaŭ.” Malamikoj retiris kaj Zengzi revenis. Oni dekstre-maldekstre diris: “Ni esperis, ke la mastro elmontros la lojalecon kaj ion respektindan. Sed apenaŭ malamikoj alvenis, li unua fuĝis, vetante postan esperon je la popolanoj. Post kiam la malamikoj retiriĝis, li revenis. Tio estas preskaŭ ne allasebla.”

Shenyu Xing diris: “Tion vi ne povas kompreni. Antaŭe en mia vilaĝo Shenyu okazis tumulto far Fuchu, tiam sekvis la mastron sepdek homoj, kaj neniuj estis damaĝita.”

Kiam Zi Si loĝis en Wei-regno, ĝin atakis Qi-regno. Oni diris: “Venis la malamikoj, ĉu vi ne devas fuĝi?”

Zi Si diris: “Se mi forirus, kiu do gardos la reĝon?”

Mengzi diris: “Zengzi kaj Zi Si iras laŭ la sama Vojo. Zengzi ludas la rolon de instruisto, patro kaj pliaĝa frato. Zi Si ludas la rolon de regato kaj subuleto. Se Zengzi kaj Zi Si ŝanĝus inter si la rolon, ili kondukus same tiel, kiel postulas la rolo.”¹⁵²

¹⁵¹ Kuang Zhang estis generalo de Qi-regno, aperas ankaŭ en la lasta ĉap. “La duko Wen de Teng”, kiel adoranto de ekstrema puranimeco. La kaŭzo de la disputo kuŝis en tio, ke la patro mortigis la patrinon de Kuang Zhang kaj forĵetis ŝin en stalon. Do la filo akuzis sian patron pro tio. [陈才俊编孟子全集, 2008, 235-236] Gongduzi estis unu el disĉiploj de Mengzi.

¹⁵² Zengzi estas Zeng Shen 曾参. Wucheng estis en Lu-regno, en sud-okcidente de la

60 [4B32]

儲子曰：「王使人問夫子，果有以異於人乎？」

孟子曰：「何以異於人哉？堯舜與人同耳。」

Chuzi diris: “La reĝo sendis iun por spioni vin, Majstron, ĉu vi estas io malsama ol la aliuloj.”

Mengzi diris: “Kio alia estas mi ol la aliuloj? Eĉ Yao kaj Shun estis tute samaj kiel la aliaj homoj.”

61 [4B33]

齊人有一妻一妾而處室者，其良人出，則必饜酒肉而後反。其妻問所與飲食者，則盡富貴也。其妻告其妾曰：「良人出，則必饜酒肉而後反；問其與飲食者，盡富貴也，而未嘗有顯者來，吾將問良人之所之也。」

蚤起，施從良人之所之，遍國中無與立談者。卒之東郭墦間，之祭者，乞其餘；不足，又顧而之他，此其為饜足之道也。其妻歸，告其妾曰：「良人者，所仰望而終身也。今若此。」與其妾訕其良人，而相泣於中庭。而良人未之知也，施施從外來，驕其妻妾。由君子觀之，則人之所以求富貴利達者，其妻妾不羞也，而不相泣者，幾希矣。

Iu Qi-regnana havas unu edzinon kaj unu konkubinon, kaj ili kune loĝas en la sama domo. Tiu bonulo eliras kaj revenas hejmen nepre satmanĝinte vinon kaj viandon. Lia edzino demandas, kun kiu li drinkas kaj manĝas. Laŭ lia respondo, ĉiuj estas riĉuloj kaj altranguloj. La edzino parolis al la konkubino, dirante: “Nia bonulo ekstere nepre satdrinkas kaj satmanĝas, kaj poste revenas hejmen. Mi demandis lin, kun kiu li drinkis kaj manĝis. Ĉiuj estis riĉuloj kaj altranguloj. Spite tion, ankoraŭ neniam alvenis ĉi tien iu ajn gasto el eminentuloj. Mi nun spionos nian bonulon, kien li iros.”

Ŝi, ellitiĝinte frumatene, postsekvis la bonulon, kien ajn li iras. Dum li ĉirkaŭvagadis en la urbo, li interparolis kun neniuj. Finfine li atingis la tombejon en la orienta angulo, tie li trovis iun ajn oferanta sur altaron kaj almozpetis iom da restaĵo el festoferiĵoj. Se ne sufiĉas, li petas de aliaj. Jen kio estas lia vojo por satmanĝi.

Reveninte hejmen, la edzino diris al la konkubino: “Nia bonulo, kiun ni dumvive rigardadis respektinda, estas nun tia.”

Ŝi kun la konkubino, ne havante vorton eldiri pri la bonulo, kune ploris en la korto.

nuna gubernio Fei 費. Shenyu Xing estis unu el disĉiploj de Zeng Shen. Zi Si estas nepo de Konfuceo. Estas diversaj opinioj pri Fuchu, iu konsideras ĝin persona nomo, la alia – kamparano kun herboj surdorse.

La bonulo revenas hejmen gajplene kaj bombastas antaŭ siaj edzo kaj konkubino. El la vidpunkto de noblulo, apenaŭ troviĝas iu el inter avidantoj al riĉo, altrango, profito aŭ sukceso, pri kiu ne hontus nek plorus edzino kaj konkubino.¹⁵³

¹⁵³ La ĉapitron konkludas tiu teksto, temanta pri la homa degenero. Supozate, ke tiu bonulo antaŭe servis en iu oficejo kaj estis maldungita. En malfavora cirkonstanco videblas la persona kvalito. Sen alta celo ne eviteblas tia sorto, kia de la bonulo en tiu epizodo. Notinde, ke li estas nomata 'bonulo 良人', ĉar li estas pli bona ol malvirtulo, pekulo aŭ krimulo.

《萬章上》

WAN ZHANG (I)

1 [5A1]

萬章問曰：「舜往于田，號泣于旻天，何為其號泣也？」

孟子曰：「怨慕也。」

萬章曰：「父母愛之，喜而不忘；父母惡之，勞而不怨。然則舜怨乎？」

曰：「長息問於公明高曰：『舜往于田，則吾既得聞命矣；號泣于旻天，于父母，則吾不知也。』公明高曰：『是非爾所知也。』夫公明高以孝子之心，為不若是忍，我竭力耕田，共為子職而已矣，父母之不我愛，於我何哉？帝使其子九男二女，百官牛羊倉廩備，以事舜於畎畝之中。天下之士多就之者，帝將胥天下而遷之焉。為不順於父母，如窮人無所歸。天下之士悅之，人之所欲也，而不足以解憂；好色，人之所欲，妻帝之二女，而不足以解憂；富，人之所欲，富有天下，而不足以解憂；貴，人之所欲，貴為天子，而不足以解憂。人悅之、好色、富貴，無足以解憂者，惟順於父母，可以解憂。人少，則慕父母；知好色，則慕少艾；有妻子，則慕妻子；仕則慕君，不得於君則熱中。大孝終身慕父母。五十而慕者，予於大舜見之矣。」

Wan Zhang demandis, dirante: “Kiam Shun estis iranta kampon, li plorkriis al la kompatema Ĉielo, kial?”

Mengz diris: “Li havis rankoron kaj sopiris.”

Wan Zhang diris: “Se amate de gepatroj, tiu homo ĝojas kaj ne forgesas tion; se ne amate de gepatroj, tiu homo devas nur labori kaj ne rankori. Do kial Shun havis rankoron?”

Mengzi diris: “Tam Chang Xi demandis Gongming Gao, ‘Ni jam aŭdis de vi la instruon, ke, irante kampon, Shun plorkriis al la kompatema Ĉielo pro siaj gepatroj, sed ni ne scias, kial?’ Gongming Gao respondis: ‘Tion vi ne povas kompreni.’ Gongming Gao konsideris la koron de fila pietato netraktebla tiel apatie, kiel <mi kultivas la kampon tutforte, kaj samtempe nur faras mian profesion kaj la taskon de fila devo, do min tuŝas neniom tio, ke gepatroj ne amas min>.”

La imperiestro Yao igis siajn gefilojn – naŭ virojn kaj du virinojn –, kaj cent oficistojn, bovojn, ŝafojn kaj grenejojn servi al Shun en kultivita kaj kanalizita kampo. Multe da kleruloj kolektiĝis, kaj la imperiestro Yao tiel observadis Shun por transdoni la mondon. Sed tamen pro malakordo kun gepatroj Shun ŝajnis soleca, ne havanta hejmon por reveni.

Potenco, kion personoj de la mondo konsideras ĝojiga kaj dezirus akiri, ne povas solvi la malĝojon de Shun. Povis solvi al li la malĝojon nek belulinoj kiel du filinoj de la imperiestro, nek la riĉaĵo el riĉaĵoj de la mondo dezirataj de homoj, nek alta rango kiel la

Ĉiela Filo, dezirata de homoj. La homa plezuro, kiel belulinoj, riĉaĵoj, rangoj, ne sufiĉas por la solvado de lia malĝojo. Sed nur la akordiĝo kun gepatroj povas solvi al li la malĝojon. Infaneto adoras gepatrojn, adoleskanto adoras junan belulinon, edzo adoras edzinon, oficisto adoras la estron kaj fervoras por gajni la favoron de la estro. Persono kun granda fila pietato dumvive adoras gepatrojn. La kvindek-jaraĝan personon, sopirantan al gepatroj, mi vidas en la Granda reĝo Shun.”

2 [5A2]

萬章問曰：「《詩》云：『娶妻如之何？必告父母。』信斯言也，宜莫如舜。舜之不告而娶，何也？」

孟子曰：「告則不得娶。男女居室，人之大倫也。如告，則廢人之大倫，以對父母，是以不告也。」

萬章曰：「舜之不告而娶，則吾既得聞命矣；帝之妻舜而不告，何也？」

曰：「帝亦知告焉則不得妻也。」

萬章曰：「父母使舜完廩，捐階，瞽瞍焚廩。使浚井，出，從而揜之。象曰：『謨蓋都君咸我績。牛羊父母，倉廩父母，干戈朕，琴朕，張朕，二嫂使治朕棲。』象往入舜宮，舜在床琴。」

象曰：『鬱陶思君爾。』忸怩。舜曰：『惟茲臣庶，汝其于予治。』不識舜不知象之將殺己與？」

曰：「奚而不知也？象憂亦憂，象喜亦喜。」

曰：「然則舜偽喜者與？」

曰：「否。昔者有饋生魚於鄭子產，子產使校人畜之池。校人烹之，反命曰：『始舍之圍圉焉，少則洋洋焉，攸然而逝。』子產曰『得其所哉！得其所哉！』校人出，曰：『孰謂子產智？予既烹而食之，曰：得其所哉？得其所哉。』故君子可欺以其方，難罔以非其道。彼以愛兄之道來，故誠信而喜之，奚偽焉？」

Wan Zhang demandis, dirante: “En *Poezio* estas dirite: ‘Kion fari ĉe edziĝo? Nepre sciiĝi gepatrojn pri tio.’ Se fidinda estas tiu vorto, nenio estas malpli bona ol la konduto de Shun. Shun, ne sciigante gepatrojn, edziĝis. Kial?”

Mengzi diris: “Se li sciigus anticipe, li ni povus edziĝi. Grandega bazo je rilato de homoj kuŝas en la kunloĝado de viro kaj virino. Se sciigus, la granda bazo de homarilato detruigis. Tial do li ne sciigis siajn gepatrojn.”

Wan Zhang diris: “Pri tio, ke Shun edziĝis sen sciigo al gepatroj, mi jam aŭdis vian opinion. Sed la imperiestro Yao edzinigis siajn filinojn al Shun sen sciigi liajn gepatrojn, kial?”

Respondis: “La imperiestro sciis, ke se antaŭsciigi liajn gepatrojn, ne eblus edzinigi.”

Wan Zhang diris: “La gepatroj igis Shun ripari grenejon, kaj poste foriginte

ŝtupetaron, la patro Gusou ekbruligis la grenejon. Kiam ili igis Shun dragi puton, Gusou poste kovris la elirejon de la puto.

Bofrato Xiang diris: 'Estos mia merito je la komploto por forigo de Shun - la urbofondinto. Bovoĵoj kaj ŝafoĵoj apartenu al gepatroj, grenejo apartenu al gepatroj, sed armiloj al mi, liuto al mi, pafarko al mi, liaj du edzinoj kunloĝadu ĉe mi.'

Poste, kiam Xiang eniris en la palacon de Shun, li trovis Shun ludanta liuton, sidante sur la kuŝejo.

Xiang diris: 'Mi estis ege maltrankvila pri vi, mia reĝo.' Kaj li aspektis embarasita kun hontemo en koro.

Shun diris: 'Ĉe mi estas subuloj kaj popolanoj, vi administru ilin por mi.'

Mi, Wang Zhang, ne komprenas, ĉu Shun ne povus scii Xiang mortiganta lin mem."

Mengzi diris: "Kial ne sciis Shun pri tio? Sed tamen, kiam Xiang malĝojas, ankaŭ Shun malĝojas. Kiam Xiang ĝojas, ankaŭ Shun ĝojas."

Wang Zhang demandis: "Se tiel, ĉu Shun ĝojus hipokrite je la trompanto?"

Mengzi diris: "Ne. Antaŭe iu donacis vivantan fiŝon al Zichan, ĉefministro de Zheng-regno, Zichan donis ĝin al iu pedelo de lago-gardejo, ordonante forlasi ĝin en la lageton. La pedelo kuiris ĝin kontraŭ la ordono kaj diris al Zichan: 'Kiam mi forlasis la fiŝon, ĝi dume ankoraŭ ŝajnus embarasita, sed iom poste ĝi sentis sin libera, kaj fornaĝis aplombe.'

Zichan diris: 'Ho ĝi reakiris la sian antaŭstaton! Ĝi reakiris la sian antaŭstaton!'

La pedelo eliris kaj diris: 'Kial oni nomas Zichan intelektulo? Mi jam kuiris kaj formanĝis la fiŝon, sed li diras, ke ĝi reakiris la sian antaŭstaton, ĝi reakiris la sian antaŭstaton.'

Tiel do malgraŭ ke noblulo povas esti kvankam trompita, tamen trompita per ĝusta rezono, sed estas malfacile trompi la noblulon per malhumana vojo. Xiang prenis manieron, ke li alvenis, amante la pliaĝan fraton, do Shun honeste kredis lin kaj ekĝojis je tio. Kia falso estas en la konduto de Shun?"¹⁵⁴

3 [5A3]

萬章問曰：「象日以殺舜為事，立為天子，則放之，何也？」

¹⁵⁴ Laŭ Mengzi la koncepto de 'Fila Pietato 孝' estas la plej granda en la homa virto. Ekzemplo de Gusou, malbona patro, kaj la sinteno de Shun estas la modelo de Fila Pietato laŭ konfuceismo. Kiel ajn malbona estu la patro, la filo nepre devas servi al la patro. Kaj kiel ajn malbona estu la frato, oni devas trakti lin kun favoro. Tiel povas esti firme tenata la familio, la bazo de bazoj por bonorda ŝtato. Sed Mengzi ne postulas absolutan obeon de filo al la patro. Li ne perdis respekton al Kuang Zhang, malobeanta al la patro.

孟子曰：「封之也，或曰放焉。」

萬章曰：「舜流共工于幽州，放驩兜于崇山，殺三苗于三危，殛鯀于羽山，四罪而天下咸服，誅不仁也。象至不仁，封之有庠。有庠之人奚罪焉？仁人固如是乎？在他人則誅之，在弟則封之。」

曰：「仁人之於弟也，不藏怒焉，不宿怨焉，親愛之而已矣。親之欲其貴也，愛之欲其富也。封之有庠，富貴之也。身為天子，弟為匹夫，可謂親愛之乎？」

「敢問或曰放者，何謂也？」

曰：「象不得有為於其國，天子使吏治其國，而納其貢稅焉，故謂之放，豈得暴彼民哉？雖然，欲常常而見之，故源源而來。『不及貢，以政接于有庠』，此之謂也。」

Wan Zhang demandis, dirante: “Xiang ĉiutage intencis mortigi Shun, sed kiam Shun surtroniĝis kiel la Ĉiela Filo, Shun nur forpelis Xiang foren. Kial?”

Mengzi siris: “Li estis feŭdita, sed iuj diras, ke li estis forpelita.”

Wan Zhang diris: “Shun ekzilis Gonggong al Youzhou, forpelis Huan Dou al la monto Chong, mortigis tribanojn de San Miao en San Wei, ekzekutis Kun en la monto Yu. Tiuj kvar persekutoj imponis la mondon, kiel la akuzo de malbonvoleco. Xiang, malgraŭ la ekstrema malbonvoleco, estis feŭdita en provinco Youbi. En kio kulpas la popolo de Youbi? Ĉu povus konduki la bonvoleca persono tiel – akuzi la aliajn, feŭdi la plijunan fraton?”

Mengzi diris: “La sinteno de bonvoleculo al la juna frato estas ne akumuladi la koleron, nek tenadi la venĝemon, sed nur intime ami lin kiel la proksiman. Oni dezirus, ke estu altranga tiu, kiu estas intima. Oni dezirus, ke estu riĉa tiu, kiun oni amas. Feŭdi en Youbi estas por riĉigi kaj altigi. Kiam li mem fariĝis la Ĉiela Filo, se lia plijuna frato restus ordinarulo, kiel eblus nomi tion intima amo?”

Demandis: “Permesu al mi demandi vin. Oni diras, ke li estis forpelita. Kial?”

Mengzi diris: “Xiang ne povis fari ion utilan en la lando. La Ĉiela Filo igis oficistojn administri la landon, kolekti tributojn kaj impostojn, do direblas, ke Xiang estis forpelita. Kiel do li povus tirani la popolon? Sed, dezirante ofte vidi lin, Shun venigis lin al si, kiel al fonto de fontoj, ‘akceptante lin el Youbi ĉiam ajn krom por la devo de tributo aŭ politika raporto.’ Tio signifas la supre menciitan.”¹⁵⁵

4 [5A4]

咸丘蒙問曰：「語云：『盛德之士，君不得而臣，父不得而子。』舜南面而立，堯帥諸侯北面而

¹⁵⁵ La patrino de Shun mortis frue, do plijuna frato Xiang estis naskita de la vicpatrino kaj Gusou. Mengzi substrekis la amon de Shun al frato, sed ankaŭ nepotismo povas esti pravigita per tia logiko.

朝之，瞽瞍亦北面而朝之。舜見瞽瞍，其容有蹙。孔子曰：『於斯時也，天下殆哉，岌岌乎！』不識此語誠然乎哉？」

孟子曰：「否。此非君子之言，齊東野人之語也。堯老而舜攝也。《堯典》曰：『二十有八載，放勳乃徂落，百姓如喪考妣，三年，四海遏密八音。』孔子曰：『天無二日，民無二王。』舜既為天子矣，又帥天下諸侯以為堯三年喪，是二天子矣。」

咸丘蒙曰：「舜之不臣堯，則吾既得聞命矣。《詩》云：『普天之下，莫非王土；率土之濱，莫非王臣。』而舜既為天子矣，敢問瞽瞍之非臣，如何？」

曰：「是詩也，非是之謂也；勞於王事，而不得養父母也。曰：『此莫非王事，我獨賢勞也。』故說《詩》者，不以文害辭，不以辭害志。以意逆志，是為得之。如以辭而已矣，《雲漢》之詩曰：『周餘黎民，靡有子遺。』信斯言也，是周無遺民也。孝子之至，莫大乎尊親；尊親之至，莫大乎以天下養。為天子父，尊之至也；以天下養，養之至也。《詩》曰：『永言孝思，孝思維則。』此之謂也。《書》曰：『祇載見瞽瞍，夔夔齊栗，瞽瞍亦允若。』是為父不得而子也。」

Xianqiu Meng demandis, dirante: “Estas dirite de antikve: ‘Altvirtan personon eĉ la reĝo ne povas trakti kiel subulon, eĉ la patro ne povas trakti kiel filon.’ Post kiam Shun surtroniĝis kaj sidas kun vizaĝo al sudo, Yao kaj landestroj, sidante kun vizaĝo al nordo, submetiĝis, kaj ankaŭ Gusou, kun vizaĝo al nordo, submetiĝis. Shun, vidante Gusou, sulkigis sian vizaĝon. Konfuceo diris: ‘En tiu momento la mondo estus apenaŭ endanĝerigita sur kurtegaĵo!’ Mi ne scias, ĉu vere tia estis la eldiro?”

Mengzi diris: “Ne. Tiu vorto ne estas de la noblulo, sed de iu orienta provincano de Qi. Yao maljuniĝis kaj Shun fariĝis regento. Estas dirite en Yao-Canonoj: ‘28 jarojn poste Fang Xun (Yao) forpasis, popolanoj similas perdintojn de oldaj gepatroj. Dum tri jaroj malaperis ok sonoj de muziko en la mondo ene de kvar maroj.’¹⁵⁶ Konfuceo diris: ‘La Ĉielo ne havas du sunojn, la popolo ne havas du reĝojn.’ Nur post kiam Shun jam fariĝis la Ĉiela Filo, la gvidanto kaj landestroj de la mondo okupiĝis pri la funebrado de Yao dum tri jaroj, por eviti samtempan ekziston de du filoj de la Ĉielo.”

Xianqiu Meng diris: “Ke Yao ne estis subulo de Shun, pri tio ni jam audis vian opinion. Sed estas dirite en *Poezio*: ‘Ĉie ajn sub la Ĉielo nenio estas ne la reĝa tero, ĉie ajn sur la tero kaj la plaĝo neniu estas ne la reĝa subulo.’¹⁵⁷ Permesu al mi demandi vin, ĉu, eĉ post kiam Shun fariĝis la Ĉiela filo, Gusou ne estus la subulo? Kio estas li?”

Mengzi diris: “La *Poezio* ne signifas tion. Tio diras pri la laboro de la reĝa afero, sed ne pri la nutrado de gepatroj. Estas dirite: ‘Tio estas ne alia ol la reĝa afero, mi sola saĝe

¹⁵⁶ La citaĵo troviĝas en la nuna 尚書, 舜典.

¹⁵⁷ Citaĵo el 詩經, 小雅, 北山. Problemo kuŝas en la timo, ke se la patro fariĝus subulo de la filo, la fundamento de fila pietato difektiĝus.

zorgas pri tio.' Do, kiu predikas la *Poezion*, tiu devas ne difekti vorton per frazo, nek difekti aspiron per vorto, nek kontraŭi al aspiro per volo. Tiel kompreneblas la signifo. Se nur per vorto oni provus legi la tekston, kiel kompreni la jenon, diritan en la poezio de Yunhan, kie estas skribite: 'El la popolo de Zhou neniu estis postvivanta.'¹⁵⁸ Se kredi la vorton laulitere, ne restus la postvivantoj el la popolo de Zhou. La apogeo de fila pietato estas ne alia ol respekto de gepatroj. En la pleja respektado de gepatroj estas nenio estas pli granda ol la nutrado de la mondo. Fariĝi la patro de la Ĉiela Filo estas plej respektinde. Nutri la mondon estas plej alte je la nutrado. Estas dirite en *Poezio*: 'Eterne parolu la ideon de fila pietato, ĉar la ideo de fila pietato estas la principa normo.'¹⁵⁹ Tio signifas la supre menciitan. Estas dirite en *Libro*: 'Li respektplene vidas Gusou timeme kaj humile, ankaŭ Gusou ŝanĝiĝis konforme al virto.'¹⁶⁰ Tia estis ja la realo de la frazo: 'La patro ne povas trakti la personon kiel la filon.'

5 [5A5]

萬章曰：「堯以天下與舜，有諸？」

孟子曰：「否。天子不能以天下與人。」

「然則舜有天下也，孰與之？」

曰：「天與之。」

「天與之者，諄諄然命之乎？」

曰：「否。天不言，以行與事示之而已矣。」

曰：「以行與事示之者如之何？」

曰：「天子能薦人於天，不能使天與之天下；諸侯能薦人於天子，不能使天子與之諸侯；大夫能薦人於諸侯，不能使諸侯與之大夫。昔者堯薦舜於天而天受之，暴之於民而民受之，故曰：天不言，以行與事示之而已矣。」

曰：「敢問薦之於天而天受之，暴之於民而民受之，如何？」

曰：「使之主祭而百神享之，是天受之；使之主事而事治，百姓安之，是民受之也。天與之，人與之，故曰：天子不能以天下與人。舜相堯二十有八載，非人之所能為也，天也。堯崩，三年之喪畢，舜避堯之子於南河之南。天下諸侯朝覲者，不之堯之子而之舜；訟獄者，不之堯之子而之舜；謳歌者，不謳歌堯之子而謳歌舜，故曰天也。夫然後之中國，踐天子位焉。而居堯之宮，逼堯之子，是篡也，非天與也。《太誓》曰：『天視自我民視，天聽自我民聽』，此之謂也。」

Wan Zhang demandis: "Yao donis al Shun la mondon, ĉu okazis tio?"

¹⁵⁸ Citaĵo el 詩經, 大雅, 雲漢.

¹⁵⁹ Citaĵo el 詩經, 大雅, 下武.

¹⁶⁰ Citaĵo el 書經, 大禹謨篇 Iu esploristo konsideras la tiun ĉapitron falsa.

Mengzi diris: “Ne. La Ciela Filo ne povas doni al la alia la mondon.”

Demandis: “Sed Shun posedis la mondon, kiel ĝi estas donita?”

Mengzi diris: “La Ĉielo donis.”

Demandis: “Kiel la Ĉielo donis, ordonante per persvadaj vortoj?”

Respondis: “Ne. La Ĉielo ne parolas per vortoj, sed montras nur per agoj kaj aferoj.”

Demandis: “Kiel estas montrite per agoj kaj aferoj?”

Respondis: “La Ĉiela Filo povas rekomendi iun personon al la Ĉielo, sed ne povas igi al la Ĉielo doni la mondon. Landestroj povas rekomendi iun al la Ĉiela Filo, sed ne povas igi al la Ĉiela Filo fari iun landestro. Grandoficistoj povas iun rekomendi al la landestro, sed ne povas igi al landestro fari iun grandoficisto. Antikve Yao rekomendis Shun al la Ĉielo, kaj la Ĉielo akceptis lin, elmontris lin al la popolo, kaj la popolo akceptis lin. Tial do estas dirite: ‘La Ĉielo ne parolas per vortoj, prezentas nur per agoj kaj aferoj.’”

Demandis: “Bonvolu diri al mi, kion signifas la frazo: ‘Rekomendis lin al la Ĉielo kaj la Ĉielo akceptis; elmontris lin al la popolo kaj la popolo akceptis lin?’”

Respondis: “La oferfesto estas farita de li kiel ĉefpastro, kaj cent dioj akceptis tion kun plezuro – tio signifas, ke La Ĉielo akceptis lin. La servado estas farita de li kiel ĉefpastro kaj la servado iris en ordo, do la popolanoj estas pacaj, tio signifas, ke la popolo akceptis lin. La Ĉielo donis lin, kaj homoj donis lin. Do estas dirite, ke la Ĉiela Filo ne povas doni al iu persono la mondon. Shun estis regento ĉe Yao dum 28 jaroj, tio estus farebla al neniu krom al la Ĉielo. Yao forpasis, kaj post tri-jara funebro Shun foriris suden trans la Flava rivero por humile cedi al la filo de Yao.¹⁶¹ Sed por partopreni en la regado landestroj de la mondo turnis sin ne al la filo de Yao sed al Shun. Por arbitracio de juĝa proceso oni turnis sin ne al la filo de Yao, sed al Shun. Por laŭdkanti oni turnis sin kun himno ne al la filo de Yao, sed al Shun. Do, oni diras ke tio estas la Ĉielo. Poste Shun situis en la Meza regno kaj surtroniĝis kiel la Ĉiela Filo. Se loĝi en la palaco de Yao kaj forpeli la filon de Yao – tio estus ja uzurpo, t. e. ne Ĉiela donaco. Estas skribite en *Tai Shi (Granda Ĵuro)*: ‘La Ĉielo rigardas, samkiel mia popolo rigardas, la Ĉielo aŭdas, samkiel mia popolo aŭdas’ Tio signifas la supre menciitan.”¹⁶²

6 [5A6]

萬章問曰：「人有言：『至於禹而德衰，不傳於賢而傳於子。』有諸？」

孟子曰：「否，不然也。天與賢，則與賢；天與子，則與子。昔者舜薦禹於天，十有七年，舜崩。三年之喪畢，禹避舜之子於陽城。天下之民從之，若堯崩之後，不從堯之子而從舜也。」

¹⁶¹ Nomo de la filo de Yao estas 丹朱 Danzhu.

¹⁶² 尚書, 太誓

禹薦益於天，七年，禹崩。三年之喪畢，益避禹之子於箕山之陰。朝覲訟獄者不之益而之啟，曰：『吾君之子也。』謳歌者不謳歌益而謳歌啟，曰：『吾君之子也。』丹朱之不肖，舜之子亦不肖。舜之相堯，禹之相舜也，歷年多，施澤於民久。啟賢，能敬承繼禹之道。益之相禹也，歷年少，施澤於民未久。舜、禹、益相去久遠，其子之賢不肖，皆天也，非人之所能為也。莫之為而為者，天也；莫之致而至者，命也。匹夫而有天下者，德必若舜禹，而又有天子薦之者，故仲尼不有天下。繼世以有天下，天之所廢，必若桀紂者也，故益、伊尹、周公不有天下。伊尹相湯以王於天下。湯崩，太丁未立，外丙二年，仲壬四年。太甲顛覆湯之典刑，伊尹放之於桐。三年，太甲悔過，自怨自艾，於桐處仁遷義；三年，以聽伊尹之訓己也，復歸于亳。周公之不有天下，猶益之於夏，伊尹之於殷也。孔子曰：『唐虞禪，夏后、殷、周繼，其義一也。』」

Wan Zhang demandis, dirante: “Iu diras: ‘Ĉe Yu ŝrumpis la virto, ĉar li transdonis la tronon ne al saĝulo, sed al sia filo. Ĉu vere?’”

Mengzi diris: “Ne. Ne estas vere. Se la Ĉielo donus al saĝulo, estus donite al saĝulo. Se la Ĉielo donas al filo, estas donite al filo. Antikve Shun rekomendis Yu al la Ĉielo. 17 jarojn poste Shun forpasis. Post tri-jara funebro, Yu retiris sin al Yangcheng, sinĝenante pro la filo de Shun. Sed la popolo de la mondo sekvis Yu, samkiel post la morto de Yao ili ne sekvis lian filon, sed sekvis Shun. Yu rekomendis Yi al la Ĉielo. 7 jarojn poste Yu mortis. Post tri-jara funebro Yi retiris sin norden trans la monto Qi, sinĝenante pro la filo de Yu. Tiuj, kiuj okupiĝas je ŝtataferoj kaj je arbitracio de juĝa proceso, turnis sin ne al Yi, sed al Qi, la filo de Yu. Ili diris: ‘Ĉi tiu estas la filo de nia reĝo.’ Kantistoj de himno ne kantis por Yi, sed kantis por Qi, dirante: ‘Ĉi tiu estas la filo de nia reĝo.’”

Danzhu, la filo de Yao, estis filaĉo. La filo de Shun estis ankaŭ filaĉo.¹⁶³ Do Shun fariĝis regento por Yao, kaj Yu asistis Shun. Ili kun riĉa sperto bone regis la popolon dumlonge. Qi estas saĝa kaj povis respektplene heredi la Vojon de Yu. Yi asistis Yu, sed kun malmulta sperto, li ne povis doni favoron al la popolo dumlonge. Tio, ke Yi ne egalas al Shun kaj Yu, kaj tio, ke filo estas saĝa aŭ ne, tute dependas de la Ĉielo. Koncerne de tio homoj povas fari nenion. Kion homoj ne povas fari, tion faras la Ĉielo. Kio al homoj estas ne atingebla, tion plenumas la Ĉiela ordono. Se iu ordinarulo povas posedi la mondon, tiu nepre estas havanta la virton, samkiel Shun kaj Yu, aŭ rekomendita de la Ĉiela Filo. Tial do Konfuceo ne posedis la mondon. Eĉ tiu, kiu heredis la tronon kaj posedis la mondon, tiu estis neniigita de la Ĉielo, kiel la tiranoj Jie kaj Zhou. Do, Yi, Yi Yin, kaj la Duko Zhou ne posedis la mondon. Yi Yin asistis al Tang fariĝi la reĝo de la mondo. Tang forpasis, sed Tai Ding, kronprinco, ne surtroniĝis, do Wai Bing estis sur

¹⁶³ Filo de Shun nomiĝis Shang Jun 商均. Yi estas alinome Bo Yi 伯益. Qi estas la filo de Yu.

trone dum du jaroj, Zhong Ren – dum kvar jaroj. Tai Jia renversis la regulojn kaj la punjuron de Tang, do Yi Yin forpelis lin al Tong. Tri jarojn poste Tai Jia pentis sian eraron, sinkritikis kaj korektis sin, en Tong li konvertiĝis al bonvoleco kaj justo, post tri jaroj, aŭskultante la instruon de Yi Yin, revenis al Bo.¹⁶⁴ La Duko Zhou ne posedis la mondon, samkiel Yi de Xia-dinastio kaj Yi Yin de Yin-dinastio. Konfuceo diris: “Trono estas transdonita jene: Yao-Shun per abdikto kaj cedo de trono, sed en dinastioj de Xia, Yin kaj Zhou per heredo al filoj. Sed en ĉio estas penetrite per unu justo.”¹⁶⁵

7 [5A7]

萬章問曰：「人有言『伊尹以割烹要湯』有諸？」

孟子曰：「否，不然。伊尹耕於有莘之野，而樂堯舜之道焉。非其義也，非其道也，祿之以天下，弗顧也；繫馬千駟，弗視也。非其義也，非其道也，一介不以與人，一介不以取諸人，湯使人以幣聘之，囁囁然曰：『我何以湯之聘幣為哉？我豈若處畎畝之中，由是以樂堯舜之道哉？』湯三使往聘之，既而幡然改曰：『與我處畎畝之中，由是以樂堯舜之道，吾豈若使是君為堯舜之君哉？吾豈若使是民為堯舜之民哉？吾豈若於吾身親見之哉？天之生此民也，使先知覺後知，使先覺覺後覺也。予，天民之先覺者也；予將以斯道覺斯民也。非予覺之，而誰也？』思天下之民匹夫匹婦有不被堯舜之澤者，若已推而內之溝中。其自任以天下之重如此，故就湯而說之以伐夏救民。吾未聞枉己而正人者也，況辱己以正天下者乎？聖人之行不同也，或遠或近，或去或不去，歸潔其身而已矣。吾聞其以堯舜之道要湯，未聞以割烹也。伊訓曰：『天誅造攻自牧宮，朕載自亳。』」

Wan Zhang demandis, dirante: “Ĉu diras, ke Yi Yin pere de kuirado flatakiris la favoron de Tang, ĉu vere?”

Mengzi diris: “Ne. Ne vere. Yi Yin terkulturadis en la kampo de klano You Xin, kie li ĝuis la Vojon de Yao-Shun. Vivante ne kontraŭ al la justo, nek kontraŭ al la Vojo, li ne zorgadis pri la salajro en la mondo, nek pri mil ĉevalkoleŝoj. Kio kontraŭas al justo kaj kontraŭas al la Vojo, tion li neniam donis al la alia, nek prenis de la aliaj. Tang sendis sian homon kun donaco al li por inviti lin, li indiferece diris: ‘Pro kio mi devus ricevi la donacon de Tang? Preferinde, mi estu en la kampo terkulturadi inter digoj kaj sulkoj, per tio ĝuji la Vojon de Yao-Shun.’ Tang sendadis al li tri fojojn por inviti lin, kaj fine li ŝanĝis la sintenon, dirante alie: ‘Por mi estos pli bone fari tiun reĝon la imperiestro kiel Yao-Shun, ol terkulturadi en la kampo inter digoj kaj sulkoj, ĝuante la Vojon de Yao-Shun. Estos pli bone fari nian popolon sama kiel la popolo de Yao-Shun. Estos pli

¹⁶⁴ Tai Ding mortis antaŭ la surtroniĝo. Wai Bing kaj Zhong Ren estas plijunaj fratoj de Tai Ding. Tai Jia estas filo de Tai Ding. Iu opinias, ke Tong estas la loko, kie estis la tombo de Tang, la alia – kie estis la aparta palaco. Bo estis la ĉefurbo ĉe la reĝo Tang.

¹⁶⁵ Tang-Yu 唐虞 estas alinomo de Yao-Shun 堯舜.

bone vidi tion per miaj okuloj. La Ĉielo naskis la popolon, por ke antaŭsciiginto veku la postan kaj antaŭvekiĝinto veku la postan. Mi estas antaŭsciiginto el inter la Ĉiela popolo. Mi ĝuste vekos la popolon per la Vojo. Se vekos ilin ne mi, kiu do? Li pensis, ke se troviĝus iu ordinara viro aŭ virino el la popolo de la mondo, ne ricevanta la benon de Yao-Shun, li estus mem kulpa je tio, ke ili estas enfaligitaj en la digon. Tiel do li mem decidis akcepti sur sin la pezan sargon de la mondo. Tial li persvadis Tang bati la Xia-dinastion por savi la popolon. Estas neniam aŭdate de ni, ke iu kurba rektigus la alian. Neniam okazas, iu hontinda ĝustigus la mondon. Saĝuloj diferencas unu de la alia je sia konduto. Iu agas fore, la alia proksime. Iu foriras, la alia ne foriras. Sed sume, ili mem tenas sin puraj. Ni aŭdas, ke li akiris favoron de Tang per la Vojo de Yao-Shun, sed neniam aŭdis, ke per kuirado. En la ĉapitro Yi Xun estas skribite: ‘Akuzo far la Ĉielo ekis el la atako al la palaco Mu de tirano Jie, mi kun Yi Yin komencis la akuzon al tirano Zhou de la ĉefurbo Bo.’¹⁶⁶”

8

萬章問曰：「或謂孔子於衛主癡疽，於齊主侍人瘠環，有諸乎？」

孟子曰：「否，不然也。好事者為之也。於衛主顏讎由。彌子之妻與子路之妻，兄弟也。彌子謂子路曰：『孔子主我，衛卿可得也。』子路以告。孔子曰：『有命。』孔子進以禮，退以義，得之不得曰『有命』。而主癡疽與侍人瘠環，是無義無命也。孔子不悅於魯衛，遭宋桓司馬將要而殺之，微服而過宋。是時孔子當阨，主司城貞子，為陳侯周臣。吾聞觀近臣，以其所為主；觀遠臣，以其所主。若孔子主癡疽與侍人瘠環，何以為孔子？」

Wan Zhang demandis, dirante: “Iu diras, ke Konfuceo en Wei-regno estis gastigita de Yong Ju, en Qi-regno estis gastigita de eunuko Ji Huan, ĉu vere?”

Mengzi diris: “Ne. Ne estis vere. Tion fabrikis klaĉuloj. En Wei lin gastigis Yan Chouyou. Edzino de Mizi estis fratino de la edzino de Zilu. Mizi diris al Zilu: ‘Se Konfuceo estos mia gasto, li povos fariĝi ministro de Wei-regno.’ Zilu transdonis tiun vorton, Konfuceo diris: ‘Estas la Ĉiela ordono.’ Konfuceo iris antaŭen laŭ decreguloj, iris malantaŭen laŭ justo. Koncerne de sukceso aŭ malsukceso je posteno li diris: ‘Estas la Ĉiela ordono.’

Se li estus gastigita de Yong Ju kaj de asiduantoj Ji Huan, tio ne estas justo, nek la Ĉiela ordono. Konfuceo estis akceptata malbone en Lu kaj Wei, renkontis akcidenton en Song-regno, ke Huan la militoficisto intencis mortigi lin. Li trapasis la Song-regnon, kamuflinte sin en simpla vestaĵo. En tiu momento Konfuceon trafis malfacilego, kaj lin

¹⁶⁶ 尚書(書經), 伊訓. Ĉapitro nun perdita. Yi Xun estas instruo de Yi Yin al Tai Jia. La vorto ‘Akuzo far la Ĉielo 天誅’ estas uzata ĝis nun kiel pravigo de terorismo kaj renverso.

gastigis s-ro Zhen la urbestro, estanta subulo de Zhou, la markizo Chen.

Ni aŭdis, ke por taksi la proksiman vasalon oni vidas kiun li gastigas kaj por taksi la malproksiman vasalon oni vidas de kiu li estas gastigita. Se Konfuceo estus gastigita de Yong Ju kaj eŭnuko Ji Huan, kia oni konsiderus Konfuceon?"¹⁶⁷

9

萬章問曰：「或曰：『百里奚自鬻於秦養牲者，五羊之皮，食牛，以要秦穆公。』信乎？」

孟子曰：「否，不然。好事者為之也。百里奚，虞人也。晉人以垂棘之璧與屈產之乘，假道於虞以伐虢。宮之奇諫，百里奚不諫。知虞公之不可諫而去，之秦，年已七十矣，曾不知以食牛干秦穆公之為汙也，可謂智乎？不可諫而不諫，可謂不智乎？知虞公之將亡而先去之，不可謂不智也。時舉於秦，知穆公之可與有行也而相之，可謂不智乎？相秦而顯其君於天下，可傳於後世，不賢而能之乎？自鬻以成其君，鄉黨自好者不為，而謂賢者為之乎？」

Wan Zhang demandis, dirante: “Tu diras, ke Baili Xi vendis sin al bredisto de bestoj en Qin-regno, kaj li, estante bovobredisto, estis aĉetita de la duko Mu de Qin kontraŭ feloj de kvin ŝafoj. Ĉu estas kredinde?”

Mengzi diris: “Ne. Ne kredinde. Tion fabrikis klaĉuloj. Baili Xi estis Yu-landano. Jin-regnanoj, donacante jardon de Chuiji-minejo kaj ĉevalojn de Qu-manego, prunteprenis la straton de Yu-lando por ataki la landon Guo. Gong Zhiqi, saĝa oficisto de Yu, deadmonintus tion, sed Baili Xi tute ne admonis, sciante ke la dukon de Yu-lando oni ne povas admoni, kaj foriris al Qin-regno. Tiam li jam havis sepdek jarojn. Ne estas sciate, ĉu estus saĝe ricevi honton antaŭ la duko Mu pro la bredado de bovoj? Ĉu ne estus saĝe ne admoni tiun, kiun oni ne povas admoni? Ke, antaŭsciiĝinte la estontan pereon de la duko de Yu li forlasis lin, tio ne nomeblas malsaĝa. Ĉu estus ne saĝe, ke li iris ĝustatempe al Qin-regno, sciante la dukon Mu inda por kunlabori kaj asisti. Ĉu ne estus saĝa kaj kapabla tiu, kiu assistis Qin-regnon por fari la reĝon elstara en la mondo tiom brile ke estis transdonate al la postaj generecoj? Vendi sin por sukcesigi la reĝon – ne povas eĉ sinamemaj kamparuloj. Ĉu tion povas fari tiel nomata la saĝulo?”

¹⁶⁷ Yong Ju estas konsiderata kiel favorato-eŭnuko de la duko Ling de Wei, Ji Huan – eŭnuko-servanto en Qi-regno. Signifo de la nomo Yong Ju estas ulcero. Yan Chouyou estas saĝa grandoficisto de Wei. Mizi estas Mizi Jia 瑕, subulo de la duko Lin de Wei. Militoficisto Huan estas 司馬桓魋, kiu aperas en Analektoj 述而. Zhen 司城貞子 estas Chen-regnano. Markizo Chen estas la filo de la duko Huai de Chen.

《萬章下》

WAN ZHANG (II)

10 [5B1]

孟子曰：「伯夷，目不視惡色，耳不聽惡聲。非其君不事，非其民不使。治則進，亂則退。橫政之所出，橫民之所止，不忍居也。思與鄉人處，如以朝衣朝冠坐於塗炭也。當紂之時，居北海之濱，以待天下之清也。故聞伯夷之風者，頑夫廉，懦夫有立志。」

「伊尹曰：『何事非君？何使非民？』治亦進，亂亦進。曰：『天之生斯民也，使先知覺後知，使先覺覺後覺。予，天民之先覺者也；予將以此道覺此民也。』思天下之民匹夫匹婦有不與被堯舜之澤者，若己推而內之溝中，其自任以天下之重也。」

「柳下惠，不羞汙君，不辭小官。進不隱賢，必以其道。遺佚而不怨，阨窮而不憫。與鄉人處，由由然不忍去也。『爾為爾，我為我，雖袒裼裸裎於我側，爾焉能浼我哉？』故聞柳下惠之風者，鄙夫寬，薄夫敦。」

「孔子之去齊，接淅而行；去魯，曰：『遲遲吾行也。』去父母國之道也。可以速而速，可以久而久，可以處而處，可以仕而仕，孔子也。」

孟子曰：「伯夷，聖之清者也；伊尹，聖之任者也；柳下惠，聖之和者也；孔子，聖之時者也。孔子之謂集大成。集大成也者，金聲而玉振之也。金聲也者，始條理也；玉振之也者，終條理也。始條理者，智之事也；終條理者，聖之事也。智，譬則巧也；聖，譬則力也。由射於百步之外也，其至，爾力也；其中，非爾力也。」

Mengzi diris: “Bo Yi estis tiu, kies okuloj ne vidas malbonan belulinon, oreloj ne aŭdas malbonan voĉon. Li ne servas al netaŭga estro, nek uzas netaŭgan popolon. Se en ordo, li iras antaŭen, se en malordo, li retiras sin. Al li estas neelteneble situi sin tie, kie la politiko estas korupta, tie, kie la popolo estas perversa. Li kosideris, ke situi sin kune kun vulgaraj provincaĵoj estas same, kiel sidi en la koto vestiĝinte je kortega vesto kun kortega ĉapo. En la epoko de la tirano Zhou, li loĝis sur la bordo de Norda maro, atendante la mondon puran. Do, aŭdante la moralecon de Boyi, obstinuloj iĝas nekoruptebla, timemuloj ekaspiras.

Yi Yin diris: ‘Al kiu reĝo mi ne servus? Kiun popolon mi ne uzus?’ En ordo, li iris antaŭen, ankaŭ en malordo, iris antaŭen, dirante: ‘La Ĉielo naskis la popolon, por ke la antaŭiranto je scio veku la postiranton je la scio, la antaŭvekiĝinto veku postvekiĝonton. Mi estas antaŭvekiĝinto inter el la Ĉiela popolo, do mi vekos la popolon laŭ la Vojo.’ Se inter la Ĉiela popolo estus ordinaraj geviroj ne ricevitaj gracon de Yao-Shun, li imagis, kvazaŭ ilin forpuŝis en tiun digon li mem per sia mano, do li prenis sur sin la Ĉielan ŝarĝon kiel la sian respondecon.

Liuxia Hui ne hontis servi al malpura estro, nek rifuzis malgrandan oficon. Irante

antaŭen sen kaŝi sian saĝecon, li nepre iris la Vojon. Ne havante rankoron okaze de ajna perdiĝo, li ne sentis sin mizera okaze de ajna suferiĝo. Eĉ inter provincanoj li tenis sin libera kaj natura, ne forlasis ilin. ‘Vi estu vi, mi estu mi. Kiel ajn konduitu la aliaj apud mi, ĉu tutnude aŭ ne, ili neniam povas makuli min.’ Aŭdante moralecon de Liuxia Hui, etanimulo iĝas grandanima, facilanimulo iĝas sincera.

Forlasante Qi-regnon, Konfuceo, sen perdi tempon por finkuiri rizon, haste foriris; sed, forlasante Lu-regnon, li diris: ‘Lante, lante, mi estis foriranta.’¹⁶⁸ Tio estas la maniero por forlasi la landon de gepatroj. Kiam endas rapidi, rapidas; kiam endas malrapidi, malrapidas; kiam endas resti hejme, restas; kiam endas servi, servas – jen kia estis Konfuceo.”

Mengzi diris: “Bo Yi estas la sanktulo pura, Yi Yin estas la sanktulo plena je devsentio, Liuxia Hui estas la sanktulo de akordiĝo, Konfuceo estas la sanktulo konforma al tempo. Eblas nomi Konfuceon grandskala kunmetinto. Li amplekse kompletigis la kolektitajn, kvazaŭ sonojn de bronzosonoriloj kaj de ŝtonaj marimboj¹⁶⁹. Per la sonoj de bronzosonoriloj oni komencas racie la koncerton, per la marimboj finas racie la koncerton. Komenci racie la koncerton estas la afero de intelekto. Fini racie la koncerton estas la afero de sankteco. Intelekto estas ja la metaforo de lerteco. Sankteco estas ja la metaforo de forto. Se diri per ekzemplo de pafarko kun la distanco je pli ol cent paŝoj, ĝis la loko de celo estas atingeble per via forto, sed celtrafi estas jam ne per via forto.”

11

北宮錡問曰：「周室班爵祿也，如之何？」

孟子曰：「其詳不可得聞也。諸侯惡其害己也，而皆去其籍。然而軻也，嘗聞其略也。天子一位，公一位，侯一位，伯一位，子、男同一位，凡五等也。君一位，卿一位，大夫一位，上士一位，中士一位，下士一位，凡六等。

「天子之制，地方千里，公侯皆方百里，伯七十里，子、男五十里，凡四等。不能五十里，不達於天子，附於諸侯，曰附庸。天子之卿受地視侯，大夫受地視伯，元士受地視子、男。

「大國地方百里，君十卿祿，卿祿四大夫，大夫倍上士，上士倍中士，中士倍下士，下士與庶人在官者同祿，祿足以代其耕也。次國地方七十里，君十卿祿，卿祿三大夫，大夫倍上士，上士倍中士，中士倍下士，下士與庶人在官者同祿，祿足以代其耕也。小國地方五十里，君十卿祿，卿祿二大夫，大夫倍上士，上士倍中士，中士倍下士，下士與庶人在官者同祿，祿

¹⁶⁸ ‘Lavinte rizon’接淅 signifas, ke li ne finkuiris rizon, t. e. tiomgrade li hastis. Lu estas lia hejmloko.

¹⁶⁹ 金聲而玉振 Mi oportune tradukis nomojn de instrumentoj per bronza sonorilo kaj ŝtona marimbo. Laŭ Zhuxi tiama muziko havis 8 instrumentojn – bronzo, ŝtono, tendeno, bambuo, kalabaso, shi(?), led, ligno. 金石絲竹匏土草木.

足以代其耕也。耕者之所獲，一夫百畝。百畝之糞，上農夫食九人，上次食八人，中食七人，中次食六人，下食五人。庶人在官者，其祿以是為差。」

Beigong Yi demandis, dirante: “Kia estis la sistemo de titolo-rango kaj salajro en la Zhou-dinastio?”

Mengzi diris: “Mi ne povis aŭdi detale. Landestroj, ne ŝatante ion malkonvenan al si, ĉiuj forĵetis la rekordon. Sed mi, Ke, rakontos skize pri tio, kion mi aŭdis.

La Ĉiela Filo prezentas unu titolon, la duko – unu titolon, la markizo – unu titolon, la grafo – unu titolon, la vicgrafo kaj la barono kundividas ĉiu po unu titolo. Totale titoloj konsistas el kvin klasoj. En feŭdo, la reĝo prezentas unu rangon, ministro – unu rangon, grandoficisto – unu rangon, el oficialuloj la supra persono – unu rangon, la meza persono – unu rangon, la suba persono – unu rangon, totale konsistas el ses klasoj.

Rilate al la teritorio, la Ĉiela Filo posedas teritorion mil *li*ojn kvadrato, la duko kaj la markizo ĉiuj – cent *li*ojn kvadrato, la grafo – 70 *li*ojn kvadrato, la vicgrafo kaj la barono – 50 *li*ojn kvadrato, ĝenerale konsistas el kvar klasoj. Kiu posedas malpli ol 50 *li*ojn kvadrato, ne povas aliri al la Ĉiela Filo. Inter ili, tiu, kiu apartenas al landestro, estas nomata ‘dependanto (fuyou)’.

Ministro ĉe la Ĉiela Filo ricevis tiom da tero, kiom la markizo; grandoficisto ricevis teron – samkiel la grafo, supra persono ricevis teron – samkiel la vicgrafo kaj la barono.

Rilate al salajrosistemo, la regnestro de granda regno kun cent *li*oj kvadrato ricevis dekoble pli ol ministro, la ministro – kvaroble pli ol grandoficisto, la grandoficisto – duoble pli ol supra persono, la supra persono – duoble pli ol meza persono, la meza persono – duoble pli ol suba persono, la suba persono ricevis salajron same, kiel oficisto el ordinaruloj. Salajro povas esti anstataŭigita per samvalora agro. Landestro de la sekva grado kun 70 *li*oj kvadrato ricevis dekoble pli ol ministro, la ministro – trioble pli ol grandoficisto, la grandoficisto – duoble pli ol supra persono, la supra persono – duoble pli ol meza persono, la meza persono – duoble pli ol suba persono, la suba persono ricevis tiom da salajro, kiom oficisto el ordinaruloj. La salajro povas esti anstataŭigita per la samvalora agro. La landestro de malgranda lando kun 50 *li*oj kvadrato ricevis salajron dekoble pli ol ministro, la ministro – duoble pli ol grandoficisto, la grandoficisto – duoble pli ol supra persono, la supra persono – duoble pli ol meza persono, la meza persono – duoble pli ol suba persono, la suba persono ricevas tiom da salajro, kiom oficisto el ordinaruloj. La salajro povas esti anstataŭigita per la samvalora agro.

Kncernante enspezon de terkulturistoj, unu kamparano ricevis cent *mu*ojn, t. e. cent *mu*ojn da sterkita tero. Supra kamparano manĝigas naŭ familianojn, la sekva post

la supra – ok, la meza – sep, la sekva de la meza – ses, la suba – kvin familianojn. Ĉiu oficisto el popolanoj ricevis la salajron depende de la deveno je supre menciita diferenco.”

12 [5B3]

萬章問曰：「敢問友。」

孟子曰：「不挾長，不挾貴，不挾兄弟而友。友也者，友其德也，不可以有挾也。孟獻子，百乘之家也，有友五人焉：樂正裘、牧仲，其三人，則予忘之矣。獻子之與此五人者友也，無獻子之家者也。此五人者，亦有獻子之家，則不與之友矣。非惟百乘之家為然也。雖小國之君亦有之。費惠公曰：『吾於子思，則師之矣；吾於顏般，則友之矣；王順、長息則事我者也。』非惟小國之君為然也，雖大國之君亦有之。晉平公之於亥唐也，入云則入，坐云則坐，食云則食。雖疏食菜羹，未嘗不飽，蓋不敢不飽也。然終於此而已矣。弗與共天位也，弗與治天職也，弗與食天祿也，士之尊賢者也，非王公之尊賢也。舜尚見帝，帝館甥于貳室，亦饗舜，迭為賓主，是天子而友匹夫也。用下敬上，謂之貴貴；用上敬下，謂之尊賢。貴貴、尊賢，其義一也。」

Wan Zhang demandis, dirante: “Permesu al mi demandi vin pri amikeco.”

Mengzi diris: “Ne fieri pri sia pliaĝuleco, nek fieri pri sia altrango, nek fieri pri siaj fratoj kaj amikoj. Havi amikon estas amikiĝi kun la virto. Oni ne devas fieri. Ĉe Meng Xianzi de la familio kun cent militĉaroj estis kvin amikoj – Yuezheng Qiu, Mu Zhong kaj tri aliaj, kies nomojn mi ne momoras.¹⁷⁰ Xianzi amikiĝis kun tiuj kvin amikoj sen konscii ke la familio de Xianzi estus granda. Se tiuj kvin homoj kalkulus grandecon de la familon de Xianzi, ili ne amikiĝis unuj kun la aliaj. Senkondiĉe de la familio kun cent militĉaroj ili fariĝis amikoj.

Okazis same kun reĝo de malgranda lando. La duko Hui de Bi-lando diris: ‘Mi faris Zi Si mia mastro, faris Yan Ban mia amiko. Sed Wan Shun kaj Chang Xi estas nur miaj servantoj.’¹⁷¹ Ne nur kun la reĝo de landeto, sed ankaŭ kun reĝo de granda regno okazis same. La duko Ping de Jin-regno rilatis kun ermito Hai Tang jen tiel: se la lasta permesis al la unua eniri, eniris, se permesis sidiĝi, sidiĝis, se permesis manĝi, manĝis. Manĝante eĉ krudajn manĝaĵojn, legomojn kaj supon, li eĉ ne satmanĝis. Ĉar li ne aŭdacis diri ke li satmanĝis. Sed la interrilato estis nur tia. La duko Ping ne dividis kun Hai Tang la Ĉielan postenon, nek kune administris la Ĉielan oficon, nek kune ricevis la Ĉielan enspezon. Li respektis la saĝulon kiel persono, sed respektis la saĝulon ne kiel

¹⁷⁰ Meng Xianzi estis alinome Zhongsun Mie 仲孫蔑, la grandoficisto de Lu-regno, en la epoko de Chun-qiu.

¹⁷¹ La duko Hui de Bi estis landestro de Bi-lando 費 en la epoko de Chun-qiu. Zi Si 子思 estas nepo de Konfuceo.

reĝo-duko.¹⁷²

Kiam Shun ricevis aŭdiencon de imperiestro Yao, la imperiestro loĝigis la bofilon en la dua ĉambro, aranĝis bankedon por Shun, kaj ili reciproke alternis je la rolo de gasto kaj gastiganto. Jen kia estas la rilato inter la Ĉiela Filo kaj simpla amiko. Ke la subo respektas la supron, tio estas nomata estimi la noblecon; ke la supro respektas la subon, tio estas nomata respekti la saĝon. Estimo de nobleco kaj respekto de saĝo estas unu tuto je la justeco.”¹⁷³

13 [5B4]

萬章問曰：「敢問交際何心也？」

孟子曰：「恭也。」

曰：「卻之卻之為不恭。何哉。」

曰：「尊者賜之，曰『其所取之者，義乎，不義乎』，而後受之，以是為不恭，故弗卻也。」

曰：「請無以辭卻之，以心卻之，曰『其取諸民之不義也』，而以他辭無受，不可乎？」

曰：「其交也以道，其接也以禮，斯孔子受之矣。」

萬章曰：「今有禦人於國門之外者，其交也以道，其餽也以禮，斯可受禦與？」

曰：「不可。《康誥》曰：『殺越人于貨，閔不畏死，凡民罔不讞。』是不待教而誅者也。殷受夏，周受殷，所不辭也。於今為烈，如之何其受之？」

曰：「今之諸侯取之於民也，猶禦也。苟善其禮際矣，斯君子受之，敢問何說也？」

曰：「子以為有王者作，將比今之諸侯而誅之乎？其教之不改而後誅之乎？夫謂非其有而取之者盜也，充類至義之盡也。孔子之仕於魯也，魯人獵較，孔子亦獵較。獵較猶可，而況受其賜乎？」

曰：「然則孔子之仕也，非事道與？」

曰：「事道也。」

「事道奚獵較也？」

曰：「孔子先簿正祭器，不以四方之食供簿正。」

曰：「奚不去也？」

曰：「為之兆也。兆足以行矣，而不行，而後去，是以未嘗有所終三年淹也。孔子有見行可之仕，有際可之仕，有公養之仕也。於季桓子，見行可之仕也；於衛靈公，際可之仕也；於衛孝公，公養之仕也。」

¹⁷² La duko Ping de Jin-regno (surtrone 557-532 a. K.). Hai Tang estis ermito.

¹⁷³ Estas ege malfacile por altrangulo havigi al si verajn amikojn. Eĉ se troviĝus ‘amikoj’, okazas, ke al ili mankas virto aŭ saĝo. Amikiĝas homoj, nur egalaj laŭ kvalito, do kiam unu estas malalta je la virto aŭ la saĝo, la alia ankaŭ malalta. Nur persono kun alta kvalito povas havigi al si la altkvalitan amikon. Rango kaj riĉo povas biasi al homoj trovi veran amikecon. Yoshida Shoin skribis: “Mi trifoje ploris kun larmoj, lekciante ĉi tiun tekston.”[講孟余話 264]

Wan Zhang demandis, dirante: “Bonvolu diri al mi, kion oni devas teni en la koro por la interrilato?”

Mengzi respondis: “Respektemon.”

Demandis: “Malakcepti donacon estas konsiderate kiel malrespekto, ĉu ne?”

Respondis: “Kiam iu respektinda estas donanta ion, se demandi: ‘Kiumaniere vi prenis tion, ĉu juste aŭ maljuste?’, kaj poste akcepti – estas malrespekto. Do oni ne malakceptas.”

Demandis: “Se oni en sia koro dezirus malakcepti la donacon, pensante ke ĝi estas prenita maljuste el popolanoj, oni, ne trovante la vorton por rifuzi, eldiras alian vorton por malakcepti. Ĉu tio estus allasebla?”

Respondis: “Se interrilatas unu kun la alia laŭ la Vojo, oni devas akcepti unu de la alia laŭ decreguloj. Konfuceo mem ricevis tian donacon.”

Wan Zhang demandis: “Kiam iu vojrabisto ekstere de la urba pordo volus donaci al vi ion, se estus la interrilato laŭ la Vojo kaj la donaco laŭ la decreguloj, ĉu vi povas akcepti la donacon?”

Mengzi respondis: “Ne. En ‘*Kang Gao*’ estas dirite: ‘Kiu mortigas homojn por rabi varojn, neniom timante morton, tiu estas malamata de la tuta popolo.’¹⁷⁴ Tiun oni devas puni, ne atendante reedukon. Ke la punjuron Yin-dinastio ricevis de Xia, Zhou-dinastio ricevis de Yin, tion diri ne necesas. Sed ĝis nun furiozas rabistoj. Kial oni akceptus tian donacon?”

Demandis: “Ke nunaj landestroj ekspluatas la popolojn, tio estas la rabado. Sed nobluloj akceptas ilian donacon okaze, se tio bone konformas al decreguloj. Mi aŭdacas demandi vin, kion vi diras pri tio?”

Respondis: “Ĉu vi supozas, ke se aperus la vera reĝo, tiam li akuzus ĉiujn nunajn landestrojn? Aŭ li provus reeduki ilin kaj poste akuzus ne reedukeblajn? Se nomi rabisto tiun, kiu prenis ne sian, tio estas ja konsekvenca postulo por plenumi je la kategorio de la pleja justo. Kiam Konfuceo servis en Lu-regno, Lu-anoj oferadis al altaro la bestojn, konkurence vet-ĉasitajn. Do ankaŭ Konfuceo implikiĝis en la vet-ĉasadon. Se tia vet-ĉasado estis allasebla, kia estus la akceptado de la donaco?”

Demandis: “Se tiel, ĉu la afero, ke Konfuceo servis, ne konformis al la Vojo?”

Respondis: “La afero konformis al la Vojo.”

Demandis: “Por la afero de la Vojo, kial li traktis la vet-ĉasadon?”

Respondis: “Antaŭ ĉio Konfuceo korektis ceremoniajn ilojn laŭ rekordo, kaj korektis laŭ rekordo manĝaĵojn kolektiajn de kvar direktoj, ke ne superfluu la oferaĵo.”

Demandis: “Kial Konfuceo ne foriris?”

¹⁷⁴ 康誥 estas unu ĉapitro de 尚書.

Respondis: “Li faris provon por ĝustigo. Estus bone, se la provo estus sukcesa. Se estas ne bone, poste nur foriri. Do al li neniam eblis restadi en unu loko pli ol tri jarojn. Konfuceo servadis, okaze, se li trovis la aferon praktikebla, okaze, se li povas esti traktata laŭ decreguloj, okaze, se li povas esti nutrata oficiale. Al Ji Huanzi li servis okaze de la unua, al la duko Lin de Wei – okaze de la dua, al la duko Xiao de Wei okaze de la tria.”¹⁷⁵

14 [5B5]

孟子曰：「仕非為貧也，而有時乎為貧；娶妻非為養也，而有時乎為養。為貧者，辭尊居卑，辭富居貧。辭尊居卑，辭富居貧，惡乎宜乎？抱關擊柝。孔子嘗為委吏矣，曰『會計當而已矣』。嘗為乘田矣，曰『牛羊茁壯，長而已矣』。位卑而言高，罪也；立乎人之本朝，而道不行，恥也」

Trovi oficon ne estas pro la malriĉeco, sed tamen estas la tempo fari tion pro malriĉeco. Edziĝi ne estas pro la nutrado de gepatroj, sed tamen estas la tempo fari tion pro la nutrado de gepatroj. Kiu faras ion pro malriĉeco, tiu, rifuzinte noblecon, loĝas en malnobleco, aŭ, rifuzinte riĉon, loĝas en malriĉeco. Rifuzinte noblecon, loĝi en malnobleco, kaj, rifuzinte riĉon, loĝi en malriĉeco – kiu laboro estas pli taŭga? Vivteni kiel pordisto aŭ gardisto. Konfuceo fariĝis iam magazinisto, ĉar dirite: ‘Estas bone, nur se povas kalkuli.’ Iam li fariĝis paŝtisto, ĉar dirite: ‘Estas bone, nur se bovoj kaj ŝafoj povas kreski fortaj kaj grandaj.’ Kulpas tiu, kiu, estante malalta je rango, fanfaronas. Hontinda estas tiu, kiu, starante alta je rango en kortego, ne kondukas laŭ la Vojo.”

15 [5B6]

萬章曰：「士之不託諸侯，何也？」

孟子曰：「不敢也。諸侯失國，而後託於諸侯，禮也；士之託於諸侯，非禮也。」

萬章曰：「君餽之粟，則受之乎？」

曰：「受之。」

「受之何義也？」

曰：「君之於氓也，固周之。」

曰：「周之則受，賜之則不受，何也？」

¹⁷⁵ Ji Huangzi estas 季孫斯. La duko Lin de Wei (surtrone 534-493 a. K.). Pri la duko Xiao ne estas skribite en libroj. Iu sugestas, ke li estus 出公輒, nepo de la duko Lin. La teksto enhavas la problemon ĉirkaŭ la proverbo: “Kiel ajn oni soifas, oni devas ne trinki el fonto de ŝtelisto.” Amaso da masakro okazas ofte sub la preteksto de purigo de tiuj, kiuj trinkis el fonto de malamiko. Respondo de Mengzi 其教之不改而後誅之 estas unu el modeloj por eviti la tragedion.

曰：「不敢也。」

曰：「敢問其不敢何也？」

曰：「抱關擊柝者，皆有常職以食於上。無常職而賜於上者，以為不恭也。」

曰：「君餽之，則受之，不識可常繼乎？」

曰：「繆公之於子思也，亟問，亟餽鼎肉。子思不悅。於卒也，標使者出諸大門之外，北面稽首再拜而不受。曰：『今而後知君之犬馬畜伋。』蓋自是臺無餽也。悅賢不能舉，又不能養也，可謂悅賢乎？」

曰：「敢問國君欲養君子，如何斯可謂養矣？」

曰：「以君命將之，再拜稽首而受。其後廩人繼粟，庖人繼肉，不以君命將之。子思以為鼎肉，使己僕僕爾亟拜也，非養君子之道也。堯之於舜也，使其子九男事之，二女女焉，百官牛羊倉廩備，以養舜於畎畝之中，後舉而加諸上位。故曰：王公之尊賢者也。」

Wan Zhang diris: “Vaganta saĝulo ne dependas de landestro, kial?”

Mengzi diris: “Li ne aŭdacas dependi. Estas laŭ decreguloj, ke la landestro, perdinta la landon, turnas sin al la alia landestro kun peto de protekto. Sed estas ne laŭ decreguloj, se vaganta saĝulo turnas sin al landestro kun peto de protekto.”

Wan Zhang diris: “Se estro donas al li grenojn, ĉu li ricevas?”

Respondis: “Li ricevas.”

Demandis: “Surbaze de kiu justeco li ricevas?”

Respondis: “Estro principe devas savi enmigrinton.”

Demandis: “Se por savi, li ricevas, se por donaci, li ne ricevas. Kial?”

Respondis: “Li ne aŭdacas ricevi la lastan.”

Demandis: “Bonvolu diri al mi, kial li ne aŭdacas?”

Respondis: “Se pordisto kaj gardisto, ĉiuj havas la profesion kaj per tio al ili estas donata la manĝaĵo de la supro. Se al nehavanto de la konstanta profesio estus liverata donaco de la supro, tion oni konsideras ne respektenda.”

Demandis: “Se estro donas la manĝaĵon, li ricevas ĝin. Mi ne scias, ĉu tio estus por ĉiam daŭrigebla?”

Respondis: “Rilate de la duko Mu kaj konfuceano Zi Si, la duko ofte demandadis lin, kaj ofte donis al li kuiritan viandon en kuirpoto nome de la duko. Zi Si ne ĝojis je tio. Finfine, li indikis al sendito meti ĝin ekstere de la granda pordo, kaj riverencadis turnante sin norden, ne akceptis la donacon. Zi Si diris: ‘Nun mi scias, ke la estro traktas min same, kiel hundon kaj ĉevalon.’ Poste la duko ne sendis tra pedelo manĝaĵon plu. Li, kvankam ĝojante je la saĝulo, tamen ne povis promocii lin, nek povas nutri lin. Ĉu direblus, ke li ĝojas je la saĝulo?”

Demandis: “Bonvolu diri al mi, se iu landestro volus nutri noblulon, kiel li devas

teni sin por la nutrado?”

Respondis: “Se farate laŭ la estra ordono, la ricevanto riverencadas kun kapo kliniĝanta. Do poste, ne nome de la estra ordono, sed daŭre grentenejisto mem devas alportadi grenojn kaj kuiristo – viandon. Zi Si konsideris la kuiritan viandon en kuirpoto kiel trudiĝeman al si riverencadi la estron multfoje, ke tio ne estas la Vojo por nutri la noblulon. Rilate al Yao kaj Shun, Yao donis siajn naŭ filojn al Shun servi lin, kaj edzinigis du filinojn kun li, kaj aldone donis cent oficistojn, bovojn-ŝafojn kaj grenejon, por nutri Shun, laborantan en la kampo inter kanaletoj kaj sulkoj. Poste Yao promociis lin al la plej alta rango. Do estas dirite: ‘Tio estas ja la maniero de reĝo kaj duko por respekti saĝulon.’”¹⁷⁶

16 [5B7]

萬章曰：「敢問不見諸侯，何義也？」

孟子曰：「在國曰市井之臣，在野曰草莽之臣，皆謂庶人。庶人不傳質為臣，不敢見於諸侯，禮也。」

萬章曰：「庶人，召之役，則往役；君欲見之，召之，則不往見之，何也？」

曰：「往役，義也；往見，不義也。且君之欲見之也，何為也哉？」

曰：「為其多聞也，為其賢也。」

曰：「為其多聞也，則天子不召師，而況諸侯乎？為其賢也，則吾未聞欲見賢而召之也。繆公亟見於子思，曰：『古千乘之國以友士，何如？』子思不悅，曰：『古之人有言：曰事之云乎，豈曰友之云乎？』子思之不悅也，豈不曰：『以位，則子，君也；我，臣也。何敢與君友也？以德，則子事我者也。奚可以與我友？』千乘之君求與之友，而不可得也，而況可召與？齊景公田，招虞人以旌，不至，將殺之。志士不忘在溝壑，勇士不忘喪其元。孔子奚取焉？取非其招不往也。」

曰：「敢問招虞人何以？」

曰：「以皮冠。庶人以旃，士以旂，大夫以旌。以大夫之招招虞人，虞人死不敢往。以士之招招庶人，庶人豈敢往哉。況乎以不賢人之招招賢人乎？欲見賢人而不以其道，猶欲其入而閉之門也。夫義，路也；禮，門也。惟君子能由是路，出入是門也。《詩》云：『周道如砥，其直如矢；君子所履，小人所視。』」

萬章曰：「孔子，君命召，不俟駕而行。然則孔子非與？」

曰：「孔子當仕有官職，而以其官召之也。」

Wan Zhang diris: “Bonvolu diri al mi, laŭ kia justo vi ne iras renkonti landestrojn?”

¹⁷⁶ La duko Mu de Lu (surtrone 407-377 a. K.) kaj Zi Si aperas ankaŭ en la ĉapitro Gongsun Chou [2B11]. La vorto 士 havas multajn signifojn, ĉi tie mi tradukis ĝin per ‘vaganta saĝulo’, ĉar en la kunteksto ĝi ne estas ordinara klerulo, sed specialisto de reĝa konsilianto, kiel Zi Si kaj Mengzi mem.

Mengzi diris: “Subulo, kiu loĝas en la urbo, estas nomata ‘subulo de merkato kaj puto’. Subulo, kiu loĝas sur la kampo, estas nomata ‘subulo de herboj’. Ambaŭ estas plebanoj. Sen prezenti omaĝaĵon tra peranto, plebanoj ne aŭdacas ricevi aŭdiencon ĉe landestroj, tio estas laŭ decreguloj.”

Wan Zhang diris: “Plebano iras labori, se alvokite. Sed, kiun la estro alvokus, dezirante vidi, ne iras renkonti la estron. Kial?”

Mengzi diris: “Iri labori – tio estas ja laŭ justo. Tiuokaze ne iri renkonti estas maljuste. Kial la estro dezirus vidi lin?”

Wan Zhang diris: “Ĉar tiu persono scias multe da informoj kaj estas saĝa.”

Mengzi diris: “La personon kun multe da informoj eĉ la Ĉiela Filo ne povus alvoki kiel mastron, des pli landestroj. Se temas pri la saĝulo, mi ankoraŭ ne aŭdis, ke iu, dezirante vidi saĝulon, alvokus lin.

La duko Mu ofte vidis Zi Si. Iam la duko diris: ‘Kiel vi opinias pri tio, ke antikve la reĝo de la regno je mil militĉaroj amikiĝis kun klerulo?’

Zi Si ne ĝojis je tio, dirante: “Antikvuloj parolis: ‘Eblas diri, ‘servi’, sed ĉu eblus diri, ‘amikiĝi’? Zi Si, ne ĝojante je tio, volus diri: ‘Laŭ rango vi estas reĝo, mi estas subulo. Kiel do mi povus fari la reĝon amiko? Laŭ virto vi sekvas min. Kiel do eblus fari min amiko?’ Eĉ la reĝo de mil militĉaroj ne povus fari mastron amiko, ĉu eblus alvoki lin?”

Kiam la duko Jing de Qi-regno ĝuis ĉasadon, li volus alvoki iun gardiston de ĉasejo per signalo de la flago. Sed la gardisto ne alvenis, do la duko volus mortigi lin. Aspirplena persono ne forgesas, ke li ekzistas sur danĝera krutaĵo; bravulo ne forgesas, ke li okaze perdis la kapon. Kiel Konfuceo komprenis la situacion? – La gardisto prenis la alvokon kiel ne signon al si, do ne iris al la duko.”

Demandis: “Bonvolu diri al mi, per kiu signo oni devas alvoki gardiston?”

Respondis: “Per ĉapo el pelto. Plebanon per flago, oficiston per standardo, grandoficiston per flago kun belaj plumoj. Se per flago por grandoficisto oni alvokus gardiston, la gardisto ne aŭdacas iri, eĉ li mortus. Se per standardo por oficisto oni provus alvoki plebanon, la plemano ne aŭdacas iri. Des pli ĉe la alvoko de saĝulo, ĉu la saĝulo povas esti alvokita ne per la signo por saĝulo? Se iu dezirus vidi saĝulon, prenante nekonvenan vojon, tio signifas, ke tiu, dezirante enirigi iun, fermas al li la pordon. La justo estas strato; la decreguloj estas pordo. Nur noblulo povas iradi laŭ la strato, en- kaj eliradi la pordon. Estas dirite en *Poezio*: ‘La Vojo de reĝoj en Zhou-dinastio estas simila al akriĝostono, kaj estas rekta kiel sago; nobluloj povas mem paŝi ĝin, malgranduloj nur preterrigardi ĝin.’¹⁷⁷”

Wan Zhang diris: “Konfuceo, kiam la reĝo alvokis lin, ekiris, ne atendente pretigon

¹⁷⁷ Citaĵo el 詩經, 小雅, 大東.

de la kaleŝo. Ĉu Konfuceo eraris?”

Mengzi diris: “Konfuceo tiam, enoficigite, havis la postenon en ofico, do li kondukis laŭ la oficiala alvoko.”

17 [5B8]

孟子謂萬章曰：「一鄉之善士，斯友一鄉之善士；一國之善士，斯友一國之善士；天下之善士，斯友天下之善士。以友天下之善士為未足，又尚論古之人。頌其詩，讀其書，不知其人，可乎？是以論其世也。是尚友也。」

Mengzi diris al Wan Zhang: “Unu bona persono de vilaĝo¹⁷⁸ amikiĝas kun alia bona persono de la vilaĝo, unu bona persono de ŝtato amikiĝas kun alia bona persono de la ŝtato; unu bona persono de la mondo amikiĝas kun alia bona persono de la mondo. Se al li ne sufiĉas per la bona amiko de la nuna mondo, li retrospektive estimas la opiniojn de antikvuloj. Li povas recitadi la poemojn, legadi la librojn, ne sciante persone la antikvulojn, ĉu ne? Kiu povas argumenti tiel pri la mondo kaj generacioj, tiuj estas ja estimindaj amikoj trans la tempo.”¹⁷⁹

18 [5B9]

齊宣王問卿。孟子曰：「王何卿之間也？」

王曰：「卿不同乎？」

曰：「不同。有貴戚之卿，有異姓之卿。」

王曰：「請問貴戚之卿。」

曰：「君有大過則諫，反覆之而不聽，則易位。」

王勃然變乎色。曰：「王勿異也。王問臣，臣不敢不以正對。」

王色定，然後請問異姓之卿。曰：「君有過則諫，反覆之而不聽，則去。」

La reĝo Xuan de Qi-regno demandis Mengzi pri la traktado de ministroj.

Mengzi diris: “Pri kiaj ministroj Via Moŝto demandas?”

La reĝo diris: “Cu ministroj malsamas unu de la alia?”

Mengzi diris: “Malsamas. Estas ministro laŭ deveno de la reĝa linio, kaj estas ministro laŭ la alia deveno.”

La reĝo diris: “Diru al mi, mi petas, pri la ministro laŭ la deveno de la reĝa linio.”

Mengzi diris: “Se li trovas sian reĝon farinta grandan eraron, admonas lin, sed se la

¹⁷⁸ La vilaĝo 鄉 xiang konsistis el 12500 familioj laŭ la rimarko de Zhou Li 周礼.

¹⁷⁹ En tiu senco Esperantistoj havas avantaĝon, ke ili povas amikiĝi kun ĉiuj de la mondo kaj retrospektive en la historio pere de la komuna lingvo.

reĝo ne aŭskultus spite la ripetatan admonon, tiam tiu ministro detronigus lin.”

La reĝo subite ŝanĝis la vizaĝkoloron.

Mengzi diris: “Ne miskomprenu, Via Moŝto. Vi, kiel reĝo, demandis min, do mi, kiel via subulo, ne povas ne respondi rekte.”

La reĝo kvietiĝis je la mieno, poste demandis pri la ministroj de la alia deveno.

Mengzi diris: “Se li trovas la reĝon erarinta, li admonas lin, kaj se la reĝo ne aŭskultus malgraŭ la ripetata admono, tiu ministro devus forlasi la landon.”

《告子上》

GAO ZI (I)

1 [6A1]

告子曰：「性，猶杞柳也；義，猶柎棬也。以人性為仁義，猶以杞柳為柎棬。」

孟子曰：「子能順杞柳之性而以為柎棬乎？將戕賊杞柳而後以為柎棬也？如將戕賊杞柳而以為柎棬，則亦將戕賊人以為仁義與？率天下之人而禍仁義者，必子之言夫！」

Gaozi diris: “Denaska naturo estas sama, kiel saliko; justo estas sama, kiel taso kaj bovlo. Fari bonvolecon kaj juston el la homa denaska naturo estas same, kiel fari tason kaj bovlon el saliko.”

Mengzi diris: “Ĉu vi povas fari tason kaj bovlon laŭ la denaska naturo de saliko? Aŭ perforte detruinte la salikon vi faras tason kaj bovlon? Se perforte detruinte salikon faras tason kaj bovlon, ankaŭ perforte detruinte homojn vi faras bonvolecon kaj juston, ĉu ne? Kio, gvidante homojn de la mondo, damaĝas la bonvolecon kaj juston, tio estas nepre via opinio!”¹⁸⁰

2 [6A2]

告子曰：「性猶湍水也，決諸東方則東流，決諸西方則西流。人性之無分於善不善也，猶水之無分於東西也。」

孟子曰：「水信無分於東西。無分於上下乎？人性之善也，猶水之就下也。人無有不善，水無有不下。今夫水，搏而躍之，可使過顙；激而行之，可使在山。是豈水之性哉？其勢則然也。人之可使為不善，其性亦猶是也。」

Gaozi diris: “La denaska naturo estas sama, kiel kirliĝanta akvo. Se malfermi la elirejon al oriento, ĝi fluas orienten; se malfermi la elirejon al okcidento, ĝi fluas okcidenten. Laŭ denaska naturo homoj ne distingas la bonon kaj la malbonon, samkiel akvo ne distingas orienton kaj okcidenton.”

Mengzi diris: “Kvankam akvo certe ne distingas orienton kaj okcidenton, tamen ĉu ĝi ne distingas la supron kaj la subon? La homa denaska naturo estas bona same, kiel akvo fluas suben. Homo ne havas malbonecon, kiel akvo ne fluas ne suben. Se nun batite, la akvo eksaltas supren ol kapo, se barite je la irado, la akvo estas rezervita en la monto. Sed ĉu tio estas la denaska naturo de akvo? Akvo estiĝas tia per ekstera forto. Okazas, ke ankaŭ al homo estas devigate fari malbonon. Sed ĉu tio estas laŭ la homa

¹⁸⁰ Gaozi – iuj konsideras lin mohisto, sed aliaj dubas. La sama nomo Gaozi aperas en la libro Mozi, en la ĉapitro 孔孟篇, sed apartenas al la alia epoko.

denaska naturo?”

3 [6A3]

告子曰：「生之謂性。」

孟子曰：「生之謂性也，猶白之謂白與？」曰：「然。」

「白羽之白也，猶白雪之白；白雪之白，猶白玉之白與？」曰：「然。」

「然則犬之性，猶牛之性；牛之性，猶人之性與？」

Gaozi diris: “Fenomeno de vivo estas de t. n. denaska naturo.”

Mengzi diris: “Se vivo estas de la t. n. denaska naturo, ĉu io blanka havas t. n. blankecon laŭ denaska naturo?”

Gaozi diris: “Jes.”

Mengzi diris: “Se la blankeco de plumo estas identa al la blankeco de neĝo, ĉu la blankeco de neĝo estas identa al la blankeco de jado?”

Gaozi diris: “Jes.”

Mengzi diris: “Tiuokaze la naturo de hundo devus esti sama, kiel la naturo de bovo. Ĉu la naturo de bovo estas sama, kiel la homa naturo?”¹⁸¹

4 [6A4]

告子曰：「食色，性也。仁，內也，非外也；義，外也，非內也。」

孟子曰：「何以謂仁內義外也？」

曰：「彼長而我長之，非有長於我也；猶彼白而我白之，從其白於外也，故謂之外也。」

曰：「異於白馬之白也，無以異於白人之白也；不識長馬之長也，無以異於長人之長與？且謂長者義乎？長之者義乎？」

曰：「吾弟則愛之，秦人之弟則不愛也，是以我為悅者也，故謂之內。長楚人之長，亦長吾之長，是以長為悅者也，故謂之外也。」

曰：「耆秦人之炙，無以異於耆吾炙。夫物則亦有然者也，然則耆炙亦有外與？」

Gaozi diris: “Deziro je manĝado kaj je seksumado estas la denaska naturo. Bonvoleco estas io interna pli ol ekstera, justo estas io ekstera pli ol interna.”

Mengzi diris: “Kial vi opinias, ke la bonvoleco estas interna kaj la justo estas

¹⁸¹ La teksto enhavas tre gravan temon en la Ĉina filozofio, do Zhuxi komentas surbaze sia pensmaniero 氣 *Qi* kaj 理 *Li*: “Mi opinias, ke la denaska naturo 性 estas *Li*, kiun la homo ricevis de la Ĉielo; la vivo 生 estas *Qi*, kiun la homo ricevis de la Ĉielo. 性 estas metafizika, 氣 estas fizika. [...] El la vidpunkto 氣 ne diferencas inter homo kaj nehomo. El la vidpunkto 理, homo ricevis rezonon de bonvoleco, justo, decreguloj, saĝeco, sed tamen nehomo ne ricevas ion kompletan. [朱熹四書集注 332-333]

ekstera?”

Gaozi diris: “Kiu estas pliĝa ol mi, tiun mi respektas kiel pli alta je jaraĝo. La pliĝeco apartenas ne al mi. Kiu estas blanka, tiun mi rigardas blanka. La blankeco ne apartenas al mi, sed ekstere. Do mi nomas tiun ekstera.”

Mengzi diris: “Se temas pri la diferenco, ne estas diferenco inter tio, ke blanka ĉevalo estas blanka, kaj tio, ke blanka homo estas blanka. Sed mi ne scias, ĉu ne estas diferenco en la traktado inter la pliĝeco de pliĝa ĉevalo kaj la pliĝeco de pliĝa homo? Koncerne la juston, ĉu justa estas t. n. pliĝulo? aŭ ĉu justa estas tiu, kiu rigardas iun pliĝa?”

Gaozi diris: “Ni amas plijunan fraton, ĉar li estas nia frato, tamen ni ne amas alies plijunan fraton de Qin-regno. Pro tio, ke mi sentas min ĝoja je mia frato. Do tio estas nomata ‘io interna’. Ni rigardas pliĝulon de Chu-regno pliĝa, ankaŭ rigardas nian pliĝulon pliĝa. La pliĝeco kaŭzas ĝojon. Do tio estas nomata ‘io ekstera’.”

Mengzi diris: “Tio, ke Qin-anoj gustumas rostitan viandon, ne malsamas al nia gustumado de rostita viando. La aĵo donas al ni frandi ĝin same. Ĉu tial do frandi la rostitan viandon estas ankaŭ io ekstera?”¹⁸²

5 [6A5]

孟季子問公都子曰：「何以謂義內也？」曰：「行吾敬，故謂之內也。」

「鄉人長於伯兄一歲，則誰敬？」曰：「敬兄。」

「酌則誰先？」曰：「先酌鄉人。」

「所敬在此，所長在彼，果在外，非由內也。」

公都子不能答，以告孟子。孟子曰：「敬叔父乎？敬弟乎？彼將曰『敬叔父』。曰：『弟為尸，則誰敬？』彼將曰『敬弟』。子曰：『惡在其敬叔父也？』彼將曰『在位故也。』子亦曰：『在位故也。庸敬在兄，斯須之敬在鄉人。』」

季子聞之曰：「敬叔父則敬，敬弟則敬，果在外，非由內也。」

公都子曰：「冬日則飲湯，夏日則飲水，然則飲食亦在外也？」

Meng Jizi demandis Gongduzi, dirante: “Kial vi konsideras juston io interna?”

Gongduzi respondis: “Ni kondutas laŭ respekto, do la justo estas io interna.”

¹⁸² Mengzi konsideras bonvolecon kaj juston io interna. vd. [6A6] 仁義禮智，非由外鑠我也，我固有之也 Bonvoleco, justo, decreguloj kaj intelekto ne estas io ekstera plakaĵo de mia memo, sed apartenas propre al mi memo. Gaozi vidas en la homa menso ion internan kaj ion eksteran laŭ sentivo. Apetito, seksdeziro, bonvolemo apartenas al interno. Justo, respekto al pliĝuloj, apartenas al ekstero. En Japanio, Yoshida Shoin rigardas la bonvolecon kaj la juston internaj, kaj predikas, ke persono devas servi tutanime al gepatroj kun bonvoleco kaj al estroj kun sia ‘interna’ justo.[講孟 288-289].

Demandis: “Tu vilaĝano estas pliĝa ol via pliĝa frato je unu jaro, kiun el du vi esprimas respekton pli?”

Respondis: “Mi esprimas pli da respekto al mia pliĝa frato.”

Demandis: “Ĉe la vilaĝa festo, al kiu el du vi unue priverŝas vinon?”

Respondis: “Unue mi priverŝas al la vilaĝano.”

Meng Jizi diris: “Vi respektas unu, sed je pliĝeco vi esprimas pli da respekto al la alia. Rezultas, ke tio estas ekstera, sed ne interna.”

Gongduzi ne povis respondi, turnis sin al Mengzi.

Mengzi diris: “Kiun respekti pli, onklon aŭ plijunan fraton? Oni certe respondas: ‘Respekti onklon.’ Se oni faras la junan fraton mediuno de enpersonigita mortinto, tiuokaze kiun respekti pli? Oni certe respondas: ‘Respekti la plijunan fraton.’ Vi demandas: ‘Je la unua kazo, kial oni devas respekti onklon?’ Oni certe respondas: ‘Pro la pozicio.’ Ankaŭ vi diru: ‘Pro la pozicio. Ordinare oni devas respekti pliĝan fraton, sed depende de situacio oni devas esprimi pli da respekto al vilaĝano.’”

Jizi aŭdis tion kaj diris: “Kiam endas respekti onklon, vi respektas la onklon; kiam endas respekti plijunan fraton, vi respektas la fraton. Rezulte, la respektado dependas de io ekstera, sed ne de io interna.”

Gongduzi diris: “En vintra tago oni trinkas varman akvon, en somera tago – malvarman akvon. Se tiel, laŭ vi, ankaŭ la trinkado dependas de io ekstera?”¹⁸³

6 [6A6]

公都子曰：「告子曰：『性無善無不善也。』或曰：『性可以為善，可以為不善；是故文武興，則民好善；幽厲興，則民好暴。』或曰：『有性善，有性不善；是故以堯為君而有象，以瞽瞍為父而有舜；以紂為兄之子且以為君，而有微子啟、王子比干。』今日『性善』，然則彼皆非與？」

孟子曰：「乃若其情，則可以為善矣，乃所謂善也。若夫為不善，非才之罪也。惻隱之心，人皆有之；羞惡之心，人皆有之；恭敬之心，人皆有之；是非之心，人皆有之。惻隱之心，仁也；羞惡之心，義也；恭敬之心，禮也；是非之心，智也。仁義禮智，非由外鑠我也，我固有之也，弗思耳矣。故曰：『求則得之，舍則失之。』或相倍蓰而無算者，不能盡其才者也。《詩》曰：『天生蒸民，有物有則。民之秉夷，好是懿德。』孔子曰：『為此詩者，其知道乎！故有物必有則，民之秉夷也，故好是懿德。』」

Gongduzi diris: “Gaozi diris: ‘En la denaska naturo ne estas bono, nek malbono’. Iu

¹⁸³ Sento de respekto estas interna aŭ ekstera, en kio kuŝas la disputo. Mengzi, kun la boneco de denaska naturo, konsideras ĝin devenanta de interno. Oponanto konsideras ĝin devenigita de ekstero.

diras: 'La denaska naturo povas esti bono, povas esti malbono. Ĉe la reĝoj Wen kaj Wu la popolo estis bona; ĉe la reĝoj You kaj Li la popolo estis violentema.' La alia diras: 'Estas bona naturo kaj estas malbona naturo. Do ĉe la estro Yao estiĝis Xiang; ĉe Gusou, la patro, estiĝis Shun; ĉe la tirano Zhou, kiel la frata filo kaj la reĝo, estiĝis Weizi Qi kaj princo Bi Gan.' Nun vi diras, ke la denaska naturo estas bona, ĉu ĉiuj opinioj supre menciitaj ne pravas?"

Mengzi diris: "Sed laŭ la dispozicio estas farebla la bono, tial do eblas diri, ke 'la naturo estas bona'. Se iu homo faras malbonon, en tio kulpas ne lia denaska kapablo. La koro de kompatato kaj mizerikordo apartenas al ĉiu homo; la hontemo al malbono apartenas al ĉiu homo; la koro de ĝentileco kaj respektemo apartenas al ĉiu homo; la koro de juĝado je praveco kaj malpraveco apartenas al ĉiu homo. En la koro de kompatato kaj mizerikordo estas bonvoleco. En la koro de honto je malbono estas justo; en la koro de ĝentileco kaj respekto estas decreguloj. En la koro de juĝado je praveco kaj malpraveco estas intelekto. Bonvoleco, justo, decreguloj kaj intelekto ne estas io ekstera plakaĵo de mia memo, sed ekzistas propre en mi memo. Nur mi mem ne atentis konscie al tio.

Do estas dirite: 'Serĉu, vi akiros tion; forlasu, vi perdos tion.' La rezulto diferencas unu de la alia duoble, kvinoble, nekalkuleble, pro tio, ke iuj ne povas disvolvi sian denaskan kapablon. En *Poezio* estas dirite: 'La Ĉielo naskas la popolamason laŭ la leĝo de estaĵoj tiel, ke la popola dispozicio ŝatas la belan virton.'¹⁸⁴

Konfuceo diris: 'Verkinto de tiu poemo scias la Vojon-Taon! Do nepre estas leĝo de estaĵoj, laŭ kiu la dispozicio de popolo ŝatas la belan virton'."

7 [6A7]

孟子曰：「富歲，子弟多賴；凶歲，子弟多暴，非天之降才爾殊也，其所以陷溺其心者然也。今夫麴麥，播種而耰之，其地同，樹之時又同，淳然而生，至於日至之時，皆熟矣。雖有不同，則地有肥磽，雨露之養，人事之不齊也。故凡同類者，舉相似也，何獨至於人而疑之？聖人與我同類者。故龍子曰：『不知足而為屨，我知其不為蕘也。』屨之相似，天下之足同也。口之於味，有同耆也。易牙先得我口之所耆者也。如使口之於味也，其性與人殊，若犬馬之與我不同類也，則天下何耆皆從易牙之於味也？至於味，天下期於易牙，是天下之口相似也，惟耳亦然。至於聲，天下期於師曠，是天下之耳相似也。惟目亦然。至於子都，天下莫不知其姣也。不知子都之姣者，無目者也。故曰：口之於味也，有同耆焉；耳之於聲也，有同聽焉；目之於色也，有同美焉。至於心，獨無所同然乎？心之所同然者何也？謂理也，義也。聖人先得我心之所同然耳。故理義之悅我心，猶芻豢之悅我口。」

¹⁸⁴ Citaĵo el 詩經, 大雅, 烝民. Sed estas skribite 秉彝 (posedi ĉiaman inklinton.)

Mengzi diris: “En la jaroj de abundeco multiĝas fidindaj bonaj junuloj. En la jaroj de sterilego multiĝas brutalaj junuloj, ne ĉar la Ĉielo donas al ili suben la apartan kapablon, sed ĉar estiĝas la koro pereiga kaj inercia. Se nun iu semas hordeon kaj kovras ĝin per grundo, kondiĉe de sama tero kaj de sama tempo je la semado, estos vigle ĝermanta, kaj kiam venos la tempo, en ĝusta momento tute maturiĝos, malgraŭ ke estiĝus iom da malsameco depende de grunda fekundeco, de kvanto je pluvo aŭ roso, kaj de malsama diligenteco de homoj. Kiuj apartenas al la sama speco, tiuj ĝenerale similas unu al la alia. Se temas nur pri homoj, ĉu iuj dubas je tiu sameco, ke eĉ sanktulo kaj mi havas ion saman?”

Longzi diris: ‘Mi ne scias kiu fabrikas ŝuojn, sed scias, ke tiu nepre fabrikas ne korbojn.’ Ŝuoj similas unuj al la aliaj, ĉar piedoj en la mondo estas samaj. Rilate al gustoj, frandaĵoj estas samaj, ke kuiristo Yi Ya unue komprenis, kio estas bongusta por nia buŝo. Se gustoj por buŝoj diferencus laŭ nature inter ni tiom, kiom inter mi kaj hundoj-ĉevaloj, kial do ĉiuj en la mondo sekvas la bonguston, kuiritan de Yi Ya? Ke laŭ la gusto Yi Ya estas konsiderata kiel kuiristo de bongustaĵo, tio signifas, ke buŝoj en la mondo similas unu al la alia inter si. Estas same por oreloj. Koncerne de sonoj, muzikisto Kuang estas konsiderata de la mondo kiel majstro, ĉar oreloj en la mondo similas unu al la alia inter si. Estas same por okuloj. Ĉiuj en la mondo scias la ĉarmon de Zidu. Ne scias la ĉarmon de Zidu nur nehavanto de okuloj. Do estas dirite: Buŝoj gustumas la saman frandaĵon, oreloj aŭdas la saman belsonon, okuloj vidas la saman belecon je koloroj. Kial nur al koroj mankus la sameco? En kio kuŝas la sameco de koro? En t. n. rezono, justo. Sanktuloj unue komprenis ja la samecon je nia koro. La rezono kaj la justo donas ĝojon al nia koro, samkiel viandoj donas ĝojon al nia buŝo.”¹⁸⁵

8 [6A8]

孟子曰：「牛山之木嘗美矣，以其郊於大國也，斧斤伐之，可以為美乎？是其日夜之所息，雨露之所潤，非無萌蘖之生焉，牛羊又從而牧之，是以若彼濯濯也。人見其濯濯也，以為未嘗有材焉，此豈山之性也哉？雖存乎人者，豈無仁義之心哉？其所以放其良心者，亦猶斧斤之於木也，且且而伐之，可以為美乎？其日夜之所息，平旦之氣，其好惡與人相近也者幾希，則其旦晝之所為，有梏亡之矣。梏之反覆，則其夜氣不足以存；夜氣不足以存，則其違禽獸

¹⁸⁵ Longzi estas antikva saĝulo, aperas ankaŭ en la 3-a ĉap. La duko de Wen en Teng. Yi Ya estis kuiristo ĉe la duko Huan de Qi-regno. Kuang estis blinda muzikisto ĉe la duko Ping de Jin-regno. Koncerne de Zidu, iu konjektas tiun bela viro, la alia – belulino. 芻 *chu* estas la viando de herbomanĝanta animalo, kiel ŝafo kaj bovo, 豢 *huan* estas la viando de cereal-manĝanta, kiel hundo kaj porko. Mi tradukis la vorton 理 *li* kiel rezonon, sed iu interpretas ĝin kiel principon, la alia – kiel ordon. Mi konjektas, ke 理 rilatas al la homa fizika flanko kaj 義 *yi* – la metafizika. Chengzi 程子 diris: “Kio estas ene de aĵoj estas *Li* 理, kio regas aĵojn estas *Yi* 義.” [朱熹『四書集注』 342]

不遠矣。人見其禽獸也，而以為未嘗有才焉者，是豈人之情也哉？故苟得其養，無物不長；苟失其養，無物不消。孔子曰：『操則存，舍則亡；出入無時，莫知其鄉。』惟心之謂與？」

Mengzi diris: “Arboj en la monto Bovo Njushan estis iam belaj. Sed la monto situas apud la granda urbo, do oni hakadis per toporoj la arbojn. Ĉu eblus resti belaj? Favorate kun la aero tagnokte, kun la pluvo kaj roso, nepre naskiĝas burĝonoj kaj ŝosoj, sed tamen oni paŝtas ĉi tie bovojn kaj ŝafojn, do la monto tute kalviĝis. Vidante ĝin kalva, oni pensus, ke neniam ĉi tie eskzistis arboj. Sed ĉu tia estas la denaska naturo de la monto? Se temas pri homoj, ĉu ili neniam havis la koron de bonvoleco kaj justo? Ke ili forlasis sian konsciencon aŭ bonan koron, tio similas la senĉesan hakadon de arboj per toporoj. Ĉu eblus konsideri tion bela? Spite ke estis antaŭe la tagnokta spirado kaj matena kvietaj aero (*Ĉjio*), nun estas rare ke homoj estu proksimaj je la ŝato kaj malŝato unu al la alia. Tio estas ja la rezulto de ĉiama ago en matene kaj tage, tiel do homoj iĝas katenite pereantaj. Ili, kvankam katenite, tamen ripetadas, kaj vivas en manko de nokta *Ĉjio*. Vivante en la manko de nokta *Ĉjio*, ili fariĝas ne malproksimaj al birdoj kaj bestoj. Vidante homon birdo-bestiĝanta, oni konsiderus, ke li neniam posedis la bonan kvaliton, sed ĉu tia estus la denaska homa sento? Kiun ajn oni povus nutradi sukcese, ĉiu ne povus ne kreski; kiun ajn oni ne sukcesus nutradi, ĉiu ne povas ne perdiĝi.

Konfuceo diris: ‘Bontenate, ĉiu ajn povas ekzisti, forlasite perdiĝas. Ne estas certe, kiam tio el- kaj en-iradas. Estas ne sciate, kie estas la hejmo.’ Tiu eldiro koncernas la koron, ĉu ne?’¹⁸⁶

9

孟子曰：「無或乎王之不智也，雖有天下易生之物也，一日暴之、十日寒之，未有能生者也。吾見亦罕矣，吾退而寒之者至矣，吾如有萌焉何哉？今夫弈之為數，小數也；不專心致志，則不得也。弈秋，通國之善弈者也。使弈秋誨二人弈，其一人專心致志，惟弈秋之為聽。一人雖聽之，一心以為有鴻鵠將至，思援弓繳而射之，雖與之俱學，弗若之矣。為是其智弗若與？曰非然也。」

Mengzi diris: “Oni ne devas suspekti, ke al reĝo mankus intelekta aspiro. Rilate planton, kiu facile povas kreski, se oni elmetas ĝin al suno nur unu tagon sed kaŝas en malvarmo dek tagojn, la plantita ne povus kreski. Mi vidas la reĝon malofte, kaj post kiam mi retiriĝas, li restas en malvarmo. Kion mi povus fari, eĉ se io burĝonus en li?

Nun supozu goo-ludon, kiu estas ludo de ŝtonokalkulo. Kvankam nura ludeto,

¹⁸⁶ 牛山 situis sude de la urbo Linzi 臨淄. Multe da nunaj montoj en Shangdong provinco estas kalvaj ne nur pro la hakado de arboj, sed ankaŭ pro la ekspluatado de cemento.

tamen ne akireblas sen koro koncentrita por atingi. Gooisto Qiu estas bonega ludanto tra la lando. Nun ĉe gooisto Qiu estu du lernantoj de goo-ludo, unu kun koro koncentrita aŭskultas atenteme la instruon de Qiu, sed la alia, aŭdante la instruon, en sia koro dezirus arkpafi, vidante cignon alfluganta. Kvankam ambaŭ lernas kune la samon, tamen estas ne kompareble je la rezulto. Ĉu estas ne same, kiel je la intelekto supre menciita? Mi dirus, ke tio ne estas laŭ nepreco.”¹⁸⁷

10 [6A10]

孟子曰：「魚，我所欲也；熊掌，亦我所欲也，二者不可得兼，舍魚而取熊掌者也。生，亦我所欲也；義，亦我所欲也，二者不可得兼，舍生而取義者也。生亦我所欲，所欲有甚於生者，故不為苟得也；死亦我所惡，所惡有甚於死者，故患有所不辟也。如使人之所欲莫甚於生，則凡可以得生者，何不用也？使人之所惡莫甚於死者，則凡可以辟患者，何不為也？由是則生而有不用也，由是則可以辟患而有不為也。是故所欲有甚於生者，所惡有甚於死者，非獨賢者有是心也，人皆有之，賢者能勿喪耳。一簞食，一豆羹，得之則生，弗得則死。噉爾而與之，行道之人弗受；蹴爾而與之，乞人不屑也。萬鍾則不辨禮義而受之。萬鍾於我何加焉？為宮室之美、妻妾之奉、所識窮乏者得我與？鄉為身死而不受，今為宮室之美為之；鄉為身死而不受，今為妻妾之奉為之；鄉為身死而不受，今為所識窮乏者得我而為之，是亦不可以已乎？此之謂失其本心。」

Mengzi diris: “Mi deziras manĝi fiŝon, ankaŭ manĝi ursan polmon mi deziras. Se mi ne povas akiri ambaŭ du kune, mi forlasas fiŝon kaj prenas la ursan polmon. Mi deziras vivon, mi deziras ankaŭ juston. Se mi ne povas akiri ambaŭ du kune, mi forlasas la vivon kaj prenas la juston. Spite ke mi deziras la vivon, mi deziras ion pli altan ol la vivon, do mi ne aŭdacas alteniĝi al la vivo. Mi ne ŝatas morti, sed estas io, kion mi pli malŝatas. Do mi ne evitas danĝeron. Se al homoj estus nenio pli grava ol vivo, tiuokaze por konservi la vivon oni uzus kion ajn? Se al homoj estus nenio pli malbona ol morto, tiam por eviti la morton oni farus kion ajn? Estas io, kion oni ne uzas, ĉe se per tio eblus konservi la vivon. Estas io, kion oni ne faras, ĉe se per tio eviteblus la danĝero. Tial do estas io dzirata pli ol la vivo kaj estas io malŝatata pli ol la morto. Tion posedas en koro ne nur saĝuloj, sed ĉiuj posedas tion. Sed saĝuloj nur povas ne perdi tion.

Supozu, unu bovlon da manĝaĵo, unu tason da kaĉo el legumeno, – kiu ricevis, tiu travivos, kiu ne ricevas, tiu mortos. Se donate kun maldeca vekrio, ajna vojiranto ne akceptas. Se donate per piedo, ajna almozulo malagrablas.

¹⁸⁷ En la libro de Zhuxi estas citate: “Estas tendenco, ke saĝulo estas forigita kaj malgrandulo estas proksimigita. Tiel do malplimulto ne povas venki plimulton, justo ne povas venki maljuston.”[四書集注 346]

Sed donate salajron je dekmil *zhong*, oni akceptas la postenon, ne zorgante kiel tio konformus aŭ kontraŭus al decreguloj. Kio estos aldonata al mia vivo per tiu salajro je dekmil *zhong*? Beleco de ĉambroj kiel palaco, servo de edzino kaj konkubino, ebleco de helpo al miaj povraj konatoj? Kion antaŭe ne akceptis, eĉ mortus, sed nun faras tion por la beleco de palaca ĉambro; kion antaŭe ne akceptis, eĉ mortus, sed nun faras tion por la servo de edzino kaj konkubino; kion antaŭe ne akceptis, eĉ mortus, sed tion nun faras por la helpo al la povraj konatoj. Ĉu pro neeviteblaj ĉirkonstancoj? Tio estas nomata la perdo de la baza radiko en koro.”¹⁸⁸

11 [6A11]

孟子曰：「仁，人心也；義，人路也。舍其路而弗由，放其心而不知求，哀哉！人有雞犬放，則知求之；有放心，而不知求。學問之道無他，求其放心而已矣。」

Mengz diris: “Bonvoleco estas homa koro; justo estas homa pado. Forlasinte la padon, oni neniigas la sekvotan, forlasinte la koron, oni ne scias kiel serĉi ĝin – kia domaĝo tio estas! Kiam perdiĝas koko aŭ hundo, oni povoscias serĉi ilin. Kiam perdiĝas la koro, oni ne scias serĉi ĝin. La Vojo de la lernado estas nenio alia ol serĉi la perditan koron.”¹⁸⁹

12 [6A12]

孟子曰：「今有無名之指，屈而不信，非疾痛害事也，如有能信之者，則不遠秦楚之路，為指之不若人也。指不若人，則知惡之；心不若人，則不知惡，此之謂不知類也。」

Mengzi diris: “Nun supozu, ĉe iu homo unu sennoma fingro iĝis kurba, ne rekta, sed ne tiom doloras, kiom ne eblas labori. Se troviĝas bona kuracisto, spite ajna distanco, li iros malproksimen eĉ al regno Qi aŭ Chu, ĉar lia fingro ne estas tia, kia de normala homo. Li malŝatas tion, ke li havas fingron ne saman, kiel la aliaj homoj. Sed li ne malŝatas tion, ke li havas koron ne homan. Tio estas nomata la nekompreneo pri klasifiko de graveco.”¹⁹⁰

13 [6A13]

孟子曰：「拱把之桐梓，人苟欲生之，皆知所以養之者。至於身，而不知所以養之者，豈愛身

¹⁸⁸ *zhong*: mezurunuo de kvanto. Unu *zhong* egalas al 6 斛 *hu* 4 斗 *dou*. En la epoko de Zhou-dinastio 1 *hu* egalas al 19.4 L., do 64000 斛 estis 1241.6 kl da grenoj.

¹⁸⁹ Yoshida Shoin komentas: “Okazas, ke homoj mortigas la aliajn nome de bonvoleco kaj justo.” Do gravas la lernado, ĉu tio estas laŭ la Vojo aŭ ne. [講孟 309-310]

¹⁹⁰ Sennoma fingro signifas ringofingron.

不若桐梓哉？弗思甚也。」

Mengzi diris: “Ĉiu ajn scias kiel nutri apudajn arbojn, kiel plantidojn de paŭlovnio aŭ katalpo, teneblajn per unu aŭ du manoj, se nur volus kreskigi ilin. Tamen rilate al si mem, iuj homoj ne scias kiel nutri sian personecon. Ĉu al ili ami sin mem estas malpli grande ol ami paŭlovnion kaj katalpon? Ili ege preteratentas tion.”

14 [6A14]

孟子曰：「人之於身也，兼所愛。兼所愛，則兼所養也。無尺寸之膚不愛焉，則無尺寸之膚不養也。所以考其善不善者，豈有他哉？於己取之而已矣。體有貴賤，有小大。無以小害大，無以賤害貴。養其小者為小人，養其大者為大人。今有場師，舍其梧櫟，養其槲棘，則為賤場師焉。養其一指而失其肩背，而不知也，則為狼疾人也。飲食之人，則人賤之矣，為其養小以失大也。飲食之人無有失也，則口腹豈適為尺寸之膚哉？」

Mengzi diris: “Koncernante sian korpon, homo amas ĝin totale. Ami totale estas nutri totale. Li amas en si eĉ malgrandan parton de haŭto, do li nutras sin eĉ ĝis malgrandan parton de haŭto. Tial do por konsideri pri bono aŭ malbono al la korpo ne estas alia rimedo ol mem elekti.

La korpo havas partojn altajn kaj malaltajn je rango, havas partojn grandajn kaj malgrandajn. Oni ne devas damaĝi la grandan por la bono de io malgranda, nek devas damaĝi la altan por la bono de io malalta. Kiu nutras la malgrandan, iĝas malgrandulo; kiu nutras la grandan, iĝas grandulo. Se iu ĝardenisto, forlasinte paŭlovnion kaj katalpon, nutras zizifarbon kaj dornon, li estas fi-ĝardenisto. Se iu kuracisto, ne sciante, perdigas al paciento ŝultron por nutri ties unu fingron, li estas aĉa kuracisto.¹⁹¹ Voremulo kaj drinkemulo estas homoj aĉaj, perdinte la grandan por nutri la malgrandan. Kiu drinkas kaj manĝas, perdus nenion, donante al sia buŝo kaj ventro ion konforman al sia malgranda haŭto, ĉu ne?”

15 [6A15]

公都子問曰：「鈞是人也，或為大人，或為小人，何也？」

孟子曰：「從其大體為大人，從其小體為小人。」

曰：「鈞是人也，或從其大體，或從其小體，何也？」

曰：「耳目之官不思，而蔽於物，物交物，則引之而已矣。心之官則思，思則得之，不思則不得也。此天之所與我者，先立乎其大者，則其小者弗能奪也。此為大人而已矣。」

¹⁹¹ Pri la frazo 狼疾人 estas diversaj opinioj. Iu tradukas ĝin en ‘homo lupa’, alia, prenante 疾人 por kuracisto kaj 狼 por adjektivo ‘kruela’, tradukas same, kiel mi.

Gongduzi demadis, dirante: “Homoj estas egalaj, sed estas grandulo kaj estas malgrandulo, kial?”

Mengzi diris: “Kiu sekvas ion grandan, iĝas grandulo; kiu sekvas ion malgrandan, iĝas malgrandulo.”

Demandis: “Homoj estas egalaj, sed iuj sekvas ion grandan, kaj la aliaj sekvas ion malgrandan, kial?”

Respondis: “Membroj kiel oreloj kaj okuloj ne havas kapablon pensi, do ili, iam kovrite per aĵoj, iam intermiksita kun aĵoj, estas nur altirataj al aĵoj. Membroj de koro kapablas pensi, perceptas pensante, aŭ, ne perceptas, ne pensante. Tiu kapablo, donite de la Ĉielo al mi, staras supera je la grandeco, do io malgranda ne povas forrabi tiun kapablon. Jen kio faras la personon granda.”¹⁹²

16 [6A16]

孟子曰：「有天爵者，有人爵者。仁義忠信，樂善不倦，此天爵也；公卿大夫，此人爵也。古之人修其天爵，而人爵從之。今之人修其天爵，以要人爵；既得人爵，而棄其天爵，則惑之甚者也，終亦必亡而已矣。」

Mengzi diris: “Estas la nobleco de la Ĉielo, estas la nobleco de homoj. Bonvoleco, justo, lojaleco, fideleco, ĝui bonon senlace, tio estas la Ĉiela nobleco. Dukoj, ministroj, grandoficistoj, tiuj titoloj estas la homa nobleco. Antikvuloj unue kulturis la Ĉielan noblecon, poste sekvis ilin la homa nobleco. Nuntempuloj lernas la Ĉielan noblecon unue por gajni la homan noblecon, do ricevinte la homan noblecon, ili poste forĵetas la Ĉielan noblecon. Kia perturbo estas tio. Finfine ili nepre nur pereos.”

17 [6A17]

孟子曰：「欲貴者，人之同心也。人人有貴於己者，弗思耳。人之所貴者，非良貴也。趙孟之所貴，趙孟能賤之。《詩》云：『既醉以酒，既飽以德。』言飽乎仁義也，所以不願人之膏粱之味也；令聞廣譽施於身，所以不願人之文繡也。」

Mengzi diris: “Deziri noblecon estas same al homoj en la koro. Ĉiu homo posedas en si mem noblecon, sed nur ne pripensas tion. La nobleco, rigardata de homoj kiel nobla, ne estas bona nobleco. La nobleco donita al Zhao Meng povas esti malnoblighita de Zhao

¹⁹² Laŭ ĉi tiu logiko, ne ĉio el denaska naturo estas bona, sed koro estas bona. La koro povas fariĝi malbona depende de sentumo. En tiu pensmaniero pri sento la diferenco inter Xunzi kaj Mengzi ŝajnas malgranda.

Meng mem.¹⁹³ Estas dirite en *Poezio*: ‘Regalinte nin per vino ĝis ebrie, li plenigis nin per virto ĝissate.’¹⁹⁴ La eldiro ‘ĝissate’ estas ĝoji je la bonvoleco kaj justo, do ne signifas avidi frandaĵon de grasiĝinta viando kaj grenoj. Se al kiu apartenas la bona famo kaj vasta honoro, tiu ne deziras vestojn, pompe broditajn.

18 [6A18]

孟子曰：「仁之勝不仁也，猶水勝火。今之為仁者，猶以一杯水，救一車薪之火也；不熄，則謂之水不勝火，此又與於不仁之甚者也。亦終必亡而已矣。」

Mengzi diris: “Ke bonvoleco venkas malbonvolecon, similas al tio, ke akvo venkas fajron. Sed nuna bonvolemulo similas al tiu, kiu provus per unu taso da akvo savi la lignojn, brulantajn sur unu ĉaro. Ne sukcesinte estingi, li diras, ke la akvo ne venkas la fajron. Tiel do li cedas al malbonvoleco. Kaj li finfine nepre nur pereas.”

19 [6A19]

孟子曰：「五穀者，種之美者也；苟為不熟，不如蕘稗。夫仁亦在乎熟之而已矣。」

Mengzi diris: “Kvin grenoj estas plej belaj el semoj. Se ili ne plenkreskas maturaj, ili restas malpli bonaj ol lolo kaj ekinoklo. Ankaŭ la bonvoleco vere valoras nur en la maturiĝo.”

20 [6A20]

孟子曰：「羿之教人射，必志於彀；學者亦必志於彀。大匠誨人，必以規矩；學者亦必以規矩。」

Mengzi diris: “Kiam Yi instruis al homoj la arkarton, li nepre instruis la gravecon de aspiro ĉe streĉita arko. Ankaŭ al studentoj gravas nepre la aspiro ĉe streĉita arko. Granda metiisto edukas lernantojn nepre al la uzado de cirkelo kaj ortilo. Ankaŭ al studentoj gravas nepre cirkelo kaj ortilo.”

¹⁹³ Zhao Meng estas titolo de grandoficisto en Jin-regno en la epoko de Chun-Qiu. Ĉi tie signifas potenculon.

¹⁹⁴ Citaĵo el 詩經, 大雅, 既醉. Originala signifo de frazoj: Subuloj ebriiĝis je la vino donita de reĝo, kaj ĝuas ĝissate la favoron de la reĝo.

《告子下》

GAO ZI (II)

21 [6B1]

任人有問屋廬子曰：「禮與食孰重？」曰：「禮重。」

「色與禮孰重？」曰：「禮重。」

曰：「以禮食，則飢而死；不以禮食，則得食，必以禮乎？親迎，則不得妻；不親迎，則得妻，必親迎乎！」

屋廬子不能對，明日之鄒以告孟子。孟子曰：「於答是也何有？不揣其本而齊其末，方寸之木可使高於岑樓。金重於羽者，豈謂一鈞金與一輿羽之謂哉？取食之重者，與禮之輕者而比之，奚翅食重？取色之重者，與禮之輕者而比之，奚翅色重？往應之曰：『紵兄之臂而奪之食，則得食；不紵，則不得食，則將紵之乎？踰東家牆而摟其處子，則得妻；不摟，則不得妻，則將摟之乎？』」

Iu homo el Ren-lando demandis iam Wuluzi, dirante: “Kiu estas pli grava, decreguloj aŭ manĝaĵo?”

Respondis: “Pli gravas decreguloj.”

Demandis: “Kio estas pli grava, seksumado aŭ decreguloj?”

Respondis: “Decreguloj pli gravas.”

Ren-ano diris: “Se iu observus la decregulojn pli ol la manĝado, mortus pro malsato, sed se ne observus la decregulojn pli ol la manĝado, akirus ion manĝi, – ĉu li devas nepre observi la decregulojn? Se la alia observus la decregulojn por akcepti novedzinon, ne povus akiri edzinon, sed ne observante, havus ŝancon havigi al si edzinon, – ĉu li nepre devus sekvi la decregulojn de la akceptado?”

Wuluzi ne povis respondi, do en la alia tago li turnis sin al Mengzi en Zou.

Mengzi diris: “Kio malfacila estas por respondi? Se ne rigardi la subon, ligno longa je unu cun povus esti pli alta ol ĉielskrapanto. Oro estas pli peza ol plumo, sed ĉu eblus diri, ke unu peco da oro estas pli peza ol unu ĉaro da plumoj? Tia estas ja lia komparo inter decreguloj kaj manĝado, sed kian manĝadon estas komparate kun kia regulo? Ankaŭ tia estas ja lia komparo inter decreguloj kaj seksumado, kiun seksumadon estas komparate kun kia regulo? Iru kaj respondu al li: ‘Supozu, iu povus akiri ion manĝi, se li rabus perforte de sia pliaĝa frato manĝaĵon, tordante al la frato manon, sed tamen ne estus havigebla al si manĝojo, krom se ne tordi la manon de frato, – ĉu li tordas? Supozu, la alia povus akiri edzinon, nur se li transirus la muron de najbara domo fortiri la knabinon, sed krom se ne fortiri ŝin, ne havigeblus al si edzino, – ĉu li fortiras ŝin?’”¹⁹⁵

¹⁹⁵ Wuluzi estas nomo de unu el disĉiploj de Mengzi. Demando de Ren-landano ne estas

22 [6B2]

曹交問曰：「人皆可以為堯舜，有諸？」

孟子曰：「然。」

「交聞文王十尺，湯九尺，今交九尺四寸以長，食粟而已，如何則可？」

曰：「奚有於是？亦為之而已矣。有人於此，力不能勝一匹雛，則為無力人矣；今日舉百鈞，則為有力人矣。然則舉烏獲之任，是亦為烏獲而已矣。夫人豈以不勝為患哉？弗為耳。徐行後長者謂之弟，疾行先長者謂之不弟。夫徐行者，豈人所不能哉？所不為也。堯舜之道，孝弟而已矣。子服堯之服，誦堯之言，行堯之行，是堯而已矣；子服桀之服，誦桀之言，行桀之行，是桀而已矣。」

曰：「交得見於鄒君，可以假館，願留而受業於門。」

曰：「夫道，若大路然，豈難知哉？人病不求耳。子歸而求之，有餘師。」

Cao Jiao demandis, dirante: “Ĉiu homo povas fariĝi kiel Yao kaj Shun, ĉu vere?”

Mengzi diris: “Jes.”

Demandis: “Mi aŭdis, ke la reĝo Wen estis alta je 10 *chj*oj, Tang – je 9 *chj*oj. Mi nun, alta je 9 *chj*oj 4 *cun*oj, sentaŭgulo vane manĝanta milion. Kion mi devas fari por fariĝi tiaj sanktuloj?”

Mengzi diris: “Kio estas je tio? Nur faru kion vi povas. Jen estas iu homo. Li estas tiel malforta, ke ne kapablas levi eĉ unu kokidon. Se nun li levas 100 *jun*ojn, li estas rigardata kiel fortulo. Kiu povas levi ion tiom pezan, kiom Wuhuo povis, tiu fariĝas granda fortulo, kiel Wuhuo. Ĉu al homo ne eblus venki ian malfortaĵon? Nur ne faras la fareblan. Devo de plijuna frato estas iri post la pliaĝan fraton. Mankas la frateco, se rapide iri antaŭ la pliaĝa. Ĉu ne fareblus tia atentema konduto? Se ne, ĉar nur ne faras. La Vojo-Tao de Yao-Shun kuŝas nur en la Fila Pietato kaj Frateca Devo. Se vi vestiĝas en vesto de Yao, paroladas vortojn de Yao, kondutas laŭ la konduto de Yao, tiam vi fariĝos Yao. Se vi vestiĝas en vesto de Jie [tirano], paroladas vortojn de Jie, kondutas laŭ konduto de Jie, tiam vi fariĝos Jie.”

Cao Jiao diris: “Mi, turnante min al landestro Zou, devas pruntepreni domon, por ke mi petu mian restadon ĉi tie kaj ricevu vian lecion.”

Mengzi diris: “La Vojo estas sama, kiel la granda strato. Kial estus malfacile sciiĝi? La malsano de homoj kuŝas nur en tio, ke ili ne serĉas ĝin. Vi revenu hejmen kaj serĉu

facila por respondi. Kelkaj mortas pro manko de manĝaĵo kaj pro tio, ke ili ne povas peti alies helpon, ĉar tio estas hontinda kontraŭ decreguloj. Gravas la respondo de Mengzi “Komparu inter la pezan kaj la malpezan 輕重比之”.

ĝin, troviĝos da instruistoj multege.”¹⁹⁶

23 [6B3]

公孫丑問曰：「高子曰：『《小弁》，小人之詩也。』」

孟子曰：「何以言之？」

曰：「怨。」

曰：「固哉，高叟之為《詩》也！有人於此，越人關弓而射之，則已談笑而道之；無他，疏之也。其兄關弓而射之，則已垂涕泣而道之；無他，戚之也。小弁之怨，親親也。親親，仁也。固矣夫，高叟之為《詩》也！」

曰：「《凱風》何以不怨？」

曰：「《凱風》，親之過小者也；《小弁》，親之過大者也。親之過大而不怨，是愈疏也；親之過小而怨，是不可磯也。愈疏，不孝也；不可磯，亦不孝也。孔子曰：『舜其至孝矣，五十而慕。』」

Gongsu Chou demandis, dirante: “S-ro Gao diris, ke la Xiaopan en *Poezio* estas poemo de malgrandulo.”¹⁹⁷

Mengzi diris: “Sur kio baziĝas la eldiro?”

Gongsun Chou diris: “Li diras, ke sentebblas venĝemo en la poemo.”

Mengzi diris: “Tro rigidanima estas la oldulo Gao pri la poemo. Se ĉi tie estus unu homo, kiun Yue-ano povintus arkpafi lin, li povus paroli poste pri tiu epizodo ridante, laŭ la kialo ne alia ol fremdeco je rilato. Se la pliaĝa frato povintus arkpafi lin, la juna frato devus paroli poste pri tiu epizodo plorkriante, laŭ kialo ne alia ol intimeco je rilato. La venĝemo en la Xiaopan devenas de intimeco. La intimeco je rilato estas bonvoleco. Do tro rigidanima estas la opinio de s-ro olda Gao pri la poemo.”

Gongsun Chou diris: “Kial ne sentebblas venĝemo en la poemo Gaifeng?”¹⁹⁸

Mengzi diris: “En Gaifeng la kulpo de patrino estas malgranda, sed en Xiaopan la kulpo de patro estas granda. Oni sentas sin ne venĝema, kiam la kulpo de patro estas granda kaj sia rilato al la patro estas tro fremda. Oni iĝas venĝema, kiam la kulpo de patro estas malgranda sed oni ne povas konsilĝi. Troa fremdeco estas kontraŭ fila pietato. Malebleco de konsiliĝo estas ankaŭ kontraŭ fila pietato.

Konfuceo diris: ‘Shun estis ja kulmino de fidela fileco, ĉar estante kvindek-jara, li

¹⁹⁶ Cao Jiao estis juna frato de landestro de Cao-lando. Wuhuo estis unu el fortuloj ĉe la reĝo Wu (310-307 a. K.) en Qin-regno. *jun* estis mezurunuo de pezo, unu *jun* estis 7.68 kg en la epoko de Zhou-dinastio. Ne estas sciata, kiom pezis en la epoko de Mengzi.

¹⁹⁷ Xiaopan estas unu poemo en 詩經, 小雅. Kiam la reĝo You de Zhou-dinastio provus senheredigiti la unuan filon Yi Ju, la instruisto de Yi Ju plendis kaj verkis la poemon.

¹⁹⁸ Gaifeng estas unu peco de poemo en 詩經, 邶風. Al reedziniĝo de la patrino filoj akuzas sin mem kaj konsolas ŝin.

sopiris al patro.¹⁹⁹

24 [6B4]

宋輕將之楚，孟子遇於石丘。曰：「先生將何之？」

曰：「吾聞秦楚構兵，我將見楚王說而罷之。楚王不悅，我將見秦王說而罷之，二王我將有所遇焉。」

曰：「軻也請無問其詳，願聞其指。說之將何如？」

曰：「我將言其不利也。」

曰：「先生之志則大矣，先生之號則不可。先生以利說秦楚之王，秦楚之王悅於利，以罷三軍之師，是三軍之士樂罷而悅於利也。為人臣者懷利以事其君，為人子者懷利以事其父，為人弟者懷利以事其兄。是君臣、父子、兄弟終去仁義，懷利以相接，然而不亡者，未之有也。先生以仁義說秦楚之王，秦楚之王悅於仁義，而罷三軍之師，是三軍之士樂罷而悅於仁義也。為人臣者懷仁義以事其君，為人子者懷仁義以事其父，為人弟者懷仁義以事其兄，是君臣、父子、兄弟去利，懷仁義以相接也。然而不王者，未之有也。何必曰利？」

Kiam Song Keng estis ĝuste iranta al Chu-regno, Mengzi renkontis lin en Shiqiu.

Mengzi demandis lin: “Sinjoro, kien vi iras nun?”

Song Keng respondis: “Mi aŭdis, ke regnoj Qin kaj Chu estas pretaj je intermilito. Mi nun vizitos la reĝon de Chu-regno por persvadi lin eviti la militon. Se la reĝo de Chu ne ĝojus je mia propono, mi iros al la reĝo de Qin por persvadi lin eviti la militon. Du reĝoj certe povos konsenti kun mi.”

Mengzi diris: “Mi, Ke, ne aŭdacas demandi vin skrupule pri detaloj, tamen dezirus aŭdi eĉ la epitomon. Kiel vi intencas persvadi ilin?”

Song Keng diris: “Mi intencas prediki pri la malprofito de milito.”

Mengzi diris: “Via intenco, sinjoro, estas granda, sed via argumento estas ne bona. Sinjoro, vi predikos al reĝoj de Qin kaj Chu pri la malprofito, kaj se la reĝoj de Qin kaj Chu ekĝojus je la profito kaj ĉesigus sian triopan armeon ekmiliti, tiuokaze soldatoj de la triopa armeo plezuriĝus pri la evito de milito kaj ĝojus je la profito. Tiam kiel subuloj oni servos al sia estro celante la profiton, kiel filoj oni servos al sia patro celante la profiton, kiel junaj fratoj oni servos al pliaĝaj fratoj celante la profiton. Rezultos, ke estro kaj subuloj, patro kaj filo, fratoj pliaĝaj kaj junaj, finfine forlasos bonvolecon kaj juston, celante la profiton en la reciproka interrilato. Tiuokaze estos neniu, kiu ne pereos.

Se, sinjoro, vi predikos al la reĝoj de Qin kaj Chu pri bonvoleco kaj justo, kaj la reĝoj de Qin kaj Chu, ekĝojinte je la bonvoleco kaj la justo, evitos la militon inter la triopaj

¹⁹⁹ Vd. la ĉapitron Wan Zhang.

armeoj, kaj soldatoj de la triopa armeo plezuriĝos pri la evito de milito kaj ekĝojos je la bonvoleco kaj la justo, tiam, kiel subuloj oni servos al la estro celante al la bonvoleco kaj la justo, kiel filoj oni servas al sia patro celante al la bonvoleco kaj la justo, kiel plijunaj fratoj oni servas al la siaj pliaĝaj fratoj celante al la bonvoleco kaj la justo. Rezultos, ke la estro kaj la subuloj, la patro kaj la filo, fratoj forlasos la profitamon, celante al la bonvoleco kaj la justo en la reciproka interrilato. Tiele neniu ankoraŭ ne povis fariĝi vera reĝo. Kial vi nepre devus paroli pri la profito?”²⁰⁰

25 [6B5]

孟子居鄒，季任為任處守，以幣交，受之而不報。處於平陸，儲子為相，以幣交，受之而不報。他日由鄒之任，見季子；由平陸之齊，不見儲子。屋廬子喜曰：「連得聞矣。」問曰：「夫子之任見季子，之齊不見儲子，為其為相與？」

曰：「非也。《書》曰：『享多儀，儀不及物曰不享，惟不役志于享。』為其不成享也。」

屋廬子悅。或問之。屋廬子曰：「季子不得之鄒，儲子得之平陸。」

Kiam Mengzi loĝis en Zou, princo Ji de Ren-lando, estante la substituito de landestro, alsendis al Mengzi donacon, kaj Mengzi akceptis ĝin, sed ne reciprokis tuj. Kiam Mengzi estis en Pinglu, s-ro Chu, ministro, alsendis al li donacon, kaj li akceptis ĝin sen reciproki. En la alia tago Mengzi iris de Zou al Ren kaj vizitis s-ron Ji, sed kiam Mengzi iris de Pinglu al Qi, li ne vizitis s-ron Chu.

Wuluzi amuziĝinte diris: “Mi, Lian, vidas malakordon en la konduto de Majstro. – kaj demandis, – En Ren vi, Majstro, vizitis s-ron Ji, sed en Qi vi ne vizitis s-ron Chu, kial? Ĉar li estas nur ministro?”

Mengzi diris: “Ne pro tio. En *Libro* estas skribite: ‘Je la donaco bezonatas multe da deco. Se ne sufiĉus la deco, perdiĝas la signifo de la donaco. Ĉar la donaco ne ludas rolon por esprimi sincerecon.’ La donaco de s-ro Chu ne konstitutis sufiĉe la decon.”

Wuluzi estas kontenta je la respondo. Kiam iu demandis pri tio, Wuluzi diris: “Al s-ro Ji mem ne eblas veni al Zou, sed al s-ro Chu mem eblas veni al Pinglu.”²⁰¹

26 [6B6]

淳于髡曰：「先名實者，為人也；後名實者，自為也。夫子在三卿之中，名實未加於上下而去

²⁰⁰ Song Keng estis unika pensulo en la epoko de Milit-regnoj. Li, kiel L. Tolstoj, predikis senperfortismon. Zhuangzi kaj aliaj pensuloj respektplene skribadis pri li. La argumento de Mengzi estas sama, kiel en la komenco de la unua ĉap. Liang Hui en ĉi tiu libro.

²⁰¹ S-ro Ji estis plijuna frato de landestro en Ren. Ren-lando situis okcidente de Zou je dek 10j. Pinglu estas lokonomo en Qi-regno. Citaĵo el 尚書, 周書, 洛誥.

之，仁者固如此乎？」

孟子曰：「居下位，不以賢事不肖者，伯夷也；五就湯，五就桀者，伊尹也；不惡汙君，不辭小官者，柳下惠也。三子者不同道，其趨一也。一者何也？曰：仁也。君子亦仁而已矣，何必同？」

曰：「魯繆公之時，公儀子為政，子柳、子思為臣，魯之削也滋甚。若是乎賢者之無益於國也！」

曰：「虞不用百里奚而亡，秦穆公用之而霸。不用賢則亡，削何可得與？」

曰：「昔者王豹處於淇，而河西善謳；緜駒處於高唐，而齊右善歌；華周、杞梁之妻善哭其夫，而變國俗。有諸內必形諸外。為其事而無其功者，髡未嘗觀之也。是故無賢者也，有則髡必識之。」

曰：「孔子為魯司寇，不用，從而祭，燔肉不至，不稅冕而行。不知者以為為肉也。其知者以為為無禮也。乃孔子則欲以微罪行，不欲為苟去。君子之所為，眾人固不識也。」

Chunyu Kun diris: “Kiu konsideras la honoran nomon kaj meritan realon la unua, tiu estas altruisto, faranta por la aliaj. Kiu konsideras la nomon-realon la posta, tiu estas egoisto, faranta por si mem. Vi, Majstro, estante unu el la Tri ministroj, spite ke ankoraŭ ne plenumis la nomon-realon al supro aŭ al subo, foriras nun. Ĉu tia estus la persono de bonvoleco?”²⁰²

Mengzi diris: “Kiu, estante sube, ne servis per sia saĝo al netaŭgulo, tiu estis Boyi, kiu submetiĝis kvin fojojn al Tang kaj kvin fojojn al tirano Jie, tiu estis Yi Yin.²⁰³ Kiu, ne malŝatante malpuran landestron, ne rezignis eĉ malgrandan oficon, tiu estis Lixia Hui. La vojo de tri personoj estis malsama, sed estas unu sama je la celo. En kio estas la unueco? Mi diras: ‘En la bonvoleco.’ Kio estas atendita de noblulo, tio estas nur la bonvoleco. Kial bezonatas nepre la sameco?”

Chunyu Kun diris: “En la epoko de la duko Mu en Lu-regno, Gongyizi administris la registaron kaj Ziliu kaj Zi Si estis ministroj, sed la teritorio de Lu reduktiĝis pli kaj pli. Montriĝas, ke t. n. saĝuloj estas senutilaj por la lando!”²⁰⁴

Mengzi diris: “La lando Yu ne povis uzi Baili Xi kaj pereis, sed la duko Mu de Qin-regno uzis lin kaj fariĝis supera reĝo. Kiu ne uzas saĝulon, tiu pereas. La reduktiĝo

²⁰² Chnyu Kun estis persono humura. Vd. [4A17]. Pri la vorto 名実, multaj esploristoj interpretas ĝin kiel reputacion kaj meriton. Rekta traduko estas nomo-realo, t. e., formo kaj enhavo. Koncerne de Tri ministroj 三卿 estas du diferencaj opinioj. Iu komprenas tion ministro supra, meza kaj suba 上卿, 中卿, 下卿. La alia – ministroj 相, generaloj 将, gasto-ministroj 客卿.

²⁰³ Laŭ komentariisto Zhao Qi 趙岐, Tang sendadis Yi Yin al Jie kiel tributon, sed Jie ne utiligis lin.

²⁰⁴ La duko Mu (407-377; 425-383 a. K.). Gongyi Xiu estis la ĉefministro de Lu-regno. Ziliu estas Xieliu (vd. [2B11]), kaj Zi Si estas nepo de Konfuceo.

estas ne pli serioza ol la perejo, ĉu ne.”²⁰⁵

Chunyu Kun diris: “Antaŭe iu ĉantisto Wang Bao loĝis apud la rivero Qi, tiam loĝantoj okcidente de la Flava rivero ekĉantis bone. Kiam kantisto Mien Ju loĝis en Gao Tang, Qi-anoj de dekstra parto ekkantis bone. Edzinoj de Huazhou kaj Qiliang plorkriis bone, sopirante mortintajn edzojn, do la moro de la regno ŝanĝiĝis.²⁰⁶ Se ene estas io reala, tiam nepre ĝi manifestiĝas, prenante la eksteran formon. Ke iu, farante la realan aferon, restas senmeritulo, tion mi, Kun, ankoraŭ neniam observis. Mi, Kun, konas nepre tion, ke iu, estante sensaĝa, ne povas fari ion realan.”²⁰⁷

Mengzi diris: “Konfuceo fariĝis ministro de justico en Lu-regno, sed ne uzate ĝuste, li, apenaŭ demetinte la porfestan ĉapon, foriris, kiam ĉe la festo oni ne disdonis al li pecon de oferita viando. Kiu ne sciis la situacion, tiu vidis la kaŭzon en la viando ne donita al li. Kiu sciis, tiu rigardis la kaŭzon en la manko de decreguloj. Fakte, Konfuceo deziris trovi malgrandan pretekston por foriri, li ne dzirus foriri sen ajna kaŭzo. La konduton de la noblulo la popolamaso neniel povas kompreni.”

27 [6B7]

孟子曰：「五霸者，三王之罪人也；今之諸侯，五霸之罪人也；今之大夫，今之諸侯之罪人也。天子適諸侯曰巡狩，諸侯朝於天子曰述職。春省耕而補不足，秋省斂而助不給。入其疆，土地辟，田野治，養老尊賢，俊傑在位，則有慶，慶以地。入其疆，土地荒蕪，遺老失賢，培克在位，則有讓。一不朝，則貶其爵；再不朝，則削其地；三不朝，則六師移之。是故天子討而不伐，諸侯伐而不討。五霸者，摟諸侯以伐諸侯者也，故曰：五霸者，三王之罪人也。

「五霸，桓公為盛。葵丘之會諸侯，束牲、載書而不敵血。初命曰：『誅不孝，無易樹子，無以妾為妻。』再命曰：『尊賢育才，以彰有德。』三命曰：『敬老慈幼，無忘賓旅。』四命曰：『士無世官，官事無攝，取士必得，無專殺大夫。』五命曰：『無曲防，無遏籜，無有封而不告。』曰：『凡我同盟之人，既盟之後，言歸于好。』今之諸侯，皆犯此五禁，故曰：今之諸侯，五霸之罪人也。

「長君之惡其罪小，逢君之惡其罪大。今之大夫，皆逢君之惡，故曰：今之大夫，今之諸侯之罪人也。」

Mengzi diris: “Kvinopo de hegemoniuloj estis kulpaj antaŭ la reĝoj de tri dinastioj. Nunaj landestroj estas kulpaj antaŭ la kvinopo de hegemoniuloj. Nunaj grandoficistoj estas kulpaj antaŭ la nunaj landestroj. Ke la Ĉiela Filo vizitadis landestrojn, tio estis

²⁰⁵ Yu estis malgranda lando, pereigita de Jin-regno. Baili Xi aperas en la ĉap. Wan Zhang [5A9].

²⁰⁶ Huazhou alinome Hua Xuan 華旋, Qiliang estis grandoficisto de Qi-regno.

²⁰⁷ Chunyu Kun tiel kritikis Mengzi pro tio, ke la lasta foriras sen ajna reala rezulto. Sed la libro “*Mengzi*” estas la rezulto.

nomata la rondira ĉasado. Ke landestroj vizitadis la Ĉielan Filon, tio estis nomata la raporto de devoj. En printempo, se reduktiĝas la terkulturado, oni kompletas la malsufiĉon; en aŭtuno, se reduktiĝas la rikolto, oni helpas liveradon de io mankanta. Se la Ĉiela Filo, enirante iun landon, trovas la terenon plugebligita, la kampon kaj la herbejon bone mastrumata, trovas maljunulojn nutrataj, saĝulojn respektataj, elstaruloj postenigitaj, tiuokaze li favoras la landestron kaj rekompencas lin per multigo de tero. Se li, enirante iun landon, trovas la teron dezertita, maljunulojn forlasitaj, saĝulojn perditaj, sentaŭgulojn postenigitaj, tiuokaze li igas la landeston cedi la tronon. Se iu landestro ne venis al la kortego por viziti lin unu fojon, li malpromocias la rangon; se ne venis du fojojn, li reduktas la teritorion de la lando; se ne venis tri fojojn, li sendas ses diviziojn por abdiki la landestron. Tiel do la Ĉiela Filo punas oponentojn, mem ne ekspedicias, sed aliaj landestroj nur ekspedicias, tamen ne ili estas tiu, kiu punas.

Kvinopo de hegemoniuloj implikis iujn landestrojn por bati aliajn landestrojn, do estas dirite: ‘Kvinopo de hegemoniuloj estis kulpaj antaŭ la reĝoj de tri dinastioj.’ Inter kvin hegemoniuloj plej forta estis la duko Huan. Dum la kunveno en Kuiqiu landestroj oferis bestojn kunligitaj, surmetis la dokumenton de ĵurpromeso sen ŝmiri buŝojn per sango. En la unua ĵuro estis skribite: ‘Akuzi malfidelajn filojn, ne ŝanĝi la starigitan heredonton, ne fari konkubinon edzino.’ En la dua – ‘Estimi la saĝan kaj kreskigi la kapablan, honori la virtulon.’ En la tria – ‘Respekti maljunulojn kaj kompati infanojn, ne forgesi zorgon pri gastoj-vojaĝantoj.’ En la kvara – ‘Ne fari ofican postenon hereda, ne fari ofican funkcion kumula, elekti nepre la taŭgan personaron, ne mortigi arbitre grandoficiston.’ En la kvina – ‘Ne kurbigi la digojn, ne bari transliman komercon de grenoj, ne feŭdi landon sen raporti.’ Kaj dirite – ‘La membranoj de nia ligo, post la kunligiĝo, ĉiuj tenos la bonan interrilaton.’ Nuntempaj landestroj ĉiuj transpaŝas la kvin malpromesojn. Do mi diras: ‘Nunaj landestroj estas kulpaj antaŭ la kvinopo de hegemoniuloj.

‘Lasi la reĝon fari malbonon estas kulpo malgranda, sed inciti la reĝon fari malbonon estas kulpo granda. Nunaj grandoficistoj, ĉiuj incitas la reĝon al malbono. Do mi diras: ‘Nunaj grandoficistoj estas kulpuloj.’²⁰⁸’

28 [6B8]

魯欲使慎子為將軍。孟子曰：「不教民而用之，謂之殃民。殃民者，不容於堯舜之世。一戰勝齊，遂有南陽，然且不可。」

²⁰⁸ Kvin hegemoniuloj estas la duko Huan de Qi-regno, la duko Wen de Jin-regno, la duko Mu de Qin-regno, la duko Xiang de Song-regno kaj la reĝo Zhuang de Chu-regno. Tri reĝoj 三王 estas la reĝo Yu de Xia dinastio, la reĝo Tang de Shang-dinastio, kaj la reĝoj Wen kaj Wu de Zhou-dinastio. La kunveno en Kuiqiu estis okazigita en 651 a. K.

慎子勃然不悅曰：「此則滑釐所不識也。」

曰：「吾明告子。天子之地方千里；不千里，不足以待諸侯。諸侯之地方百里；不百里，不足以守宗廟之典籍。周公之封於魯，為方百里也；地非不足，而儉於百里。太公之封於齊也，亦為方百里也；地非不足也，而儉於百里。今魯方百里者五，子以為有王者作，則魯在所損乎？在所益乎？徒取諸彼以與此，然且仁者不為，況於殺人以求之乎？君子之事君也，務引其君以當道，志於仁而已。」

Lu-regno deziris fari Shenzi la komandanto de la armeo.

Mengzi diris: “Se anticipu ne instruante la popolon, mobilizi, estas pereigi la popolon. Kiu pereigas la popolon, tiu ne estis tolerata en la epoko de Yao-Shun. Eble, unu fojon vi venkus Qi-regnon kaj okupus Nanyang, sed tio ne estas farenda.”

Shenzi kun vizaĝkoloro ŝanĝita diris malkontente: “Tio estas ja la afero ne koncernanta min mem, Huali”

Mengzi diris: “Mi klarigos tion al vi. La Ĉiela Filo posedas teritorion je mil *li*oj kvadrato. Per teritorio malpli ol mil *li*oj kvadrato, ne sufiĉas al li akceptadi landestrojn. La landestro posedas la landon je cent *li*oj kvadrato. Se malpli ol cent *li*oj kvadrato, ne sufiĉas al li protekti maŭzoleon kaj librojn-dokumentojn. La duko Zhou estis feŭdita en Lu kun teritorio je cent *li*oj kvadrato. Ne pro tio, ke mankis la tero, sed por modesteco estis limigite regi ĝis cent *li*oj kvadrato. Taigong Wang estis feŭdita en Qi kun teritorio je cent *li*oj kvadrato. Ne pro manko de la tero, sed por modesteco estis limigite je cent *li*oj kvadrato. Nun Lu-regno posedas kvin teritoriojn po cent *li*oj kvadrato. Laŭ vi, se la vera reĝo ekaperos, ĉu Lu-regno reduktiĝos, aŭ profitos? Se nur forpreni de iuj kaj doni al la aliaj, tion ne faros bonvolemluloj. Despli ili ne serĉas tion pere de la mortigo de homoj. Nobluloj devas servi al sia reĝo por lasi la reĝon iri laŭ la ĝusta Vojo kaj strebi nur al la bonvoleco.”²⁰⁹

29 [6B9]

孟子曰：「今之事君者曰：『我能為君辟土地，充府庫。』今之所謂良臣，古之所謂民賊也。君不鄉道，不志於仁，而求富之，是富桀也。『我能為君約與國，戰必克。』今之所謂良臣，古之所謂民賊也。君不鄉道，不志於仁，而求為之強戰，是輔桀也。由今之道，無變今之俗，雖與之天下，不能一朝居也。」

²⁰⁹ La duko Zhou 周公旦 la juna frato de la reĝo Wu. Taigon estas 太公望. Rilate al Shenzi, estas diversaj opinioj. Iu konsideras lin Qin Huali 禽滑釐, la unua disĉiplo de Mozi 墨子. La alia konjektas, ke Shenzi estis unu el lernantoj de 禽滑釐. La tria konsideras lin Shen Dao 慎到.

Mengzi diris: “Nunaj servantoj de estro diras: ‘Mi povas por la estro kultivebligi la teron kaj plenigi la trezorejon.’ Nunaj t. n. bonaj subuloj devus esti en antikve rabistoj de la popolo. Kiam la estro ne iras laŭ la Vojo nek strebas al bonvoleco, riĉigi la estron estas same kiel riĉigi la tiranon Jie.

‘Mi povas promesi al la estro prosperigi la landon kaj nepre venki militojn pere de la alianciĝo.’ – diras nunaj t. n. bonaj subuloj, sed ili devus esti en antikve rabistoj de la popolano. Kiam la estro ne iras laŭ la Vojo nek strebas al bonvoleco, deziri forte militi por tia estro estas same, kiel asisti la tiranon Jie. Kvankam laŭ la nuna vojo, ne ŝanĝante la nunan moron, farus la mondon prospera, tamen oni ne povus loĝi en tiu mondo eĉ unu matenon.”²¹⁰

30 [6B10]

白圭曰：「吾欲二十而取一，何如？」

孟子曰：「子之道，貉道也。萬室之國，一人陶，則可乎？」

曰：「不可，器不足用也。」

曰：「夫貉，五穀不生，惟黍生之。無城郭、宮室、宗廟、祭祀之禮，無諸侯幣帛饗飧，無百官有司，故二十取一而足也。今居中國，去人倫，無君子，如之何其可也？陶以寡，且不可以為國，況無君子乎？欲輕之於堯舜之道者，大貉小貉也；欲重之於堯舜之道者，大桀小桀也。」

Bai Kui diris: “Mi volas establi la imposton je unu dudekono, kion vi opinias?”

Mengzi diris: “Via vojo estas la vojo de barbaro Mo. Se en la lando el dek mil familioj, ĉu povus sufiĉi nur per unu potisto?”

Bai Kui diris: “Ne eblus. Mankus argilaĵoj.”

Mengzi diris: “La barbaro Mo ne produktas kvin cerealojn, sed nur milion. Ili ne havas urbon kun muroj, nek palacon, nek maŭzoleon, nek ritojn de festoj. Ĉe ili ne estas ceremonio de donacoj nek bankedo por akcepti landestrojn, nek cent oficistoj-funkciuloj, tial do al ili sufiĉas imposto je unu dudekono. Nun loĝante en la Meza Lando, kiel oni povus administri, seniginte la homan rilaton kaj noblulojn? Pro malmulte da potistoj ne eblus subteni la landon, ĉu eblus sen nobluloj? Kiu volas malpliigi imposton ol ĉe la Vojo de Yao-Shun, tiu egalas al barbaro Mo aŭ barbareto pli-malpli. Kiu volas tro pliigi imposton ol ĉe la Vojo de Yao-Shun, tiu egalas al tirano Jie aŭ tiraneto pli-malpli.”²¹¹

²¹⁰ La teksto ŝajne estas direktita al la kritiko de Qin Huali, mohisto 墨者, kiu deziris defendi malgrandajn landojn per sia lerteco je milita taktiko.

²¹¹ Bai Kui estis ministro ĉe la reĝo Hui de Wei, li estis fama je la konstruo de digoj. Mo estis la nomo de norda tribo. La Vojo de Yao-Shun signifas la imposton de ‘unu dekonon’.

31 [6B11]

白圭曰：「丹之治水也愈於禹。」

孟子曰：「子過矣。禹之治水，水之道也。是故禹以四海為壑，今吾子以鄰國為壑。水逆行，謂之洚水。洚水者，洪水也，仁人之所惡也。吾子過矣。」

Bai Kui diris: “Mi, Dan, regas akvon pli bone ol Yu.”

Mengzi diris: “Vi ne pravas. Yu reguligis akvon laŭ la vojo de la akvo, do Yu kanalizis la riverojn al kvar maroj. Sed vi kanalizis kaj fluigis akvon nur en najbarajn landojn. Kiam la akvo retrofluos, okazos t. n. diluvo, la diluvo estas inundo, kiun bonvolemuloj malamas. Vi eraras.”

32 [6B12]

孟子曰：「君子不亮，惡乎執？」

Mengzi diris: “Se noblulo ne tenas sin rezoluta, kiel li povus plenumi la taskon?”²¹²

33 [6B13]

魯欲使樂正子為政。

孟子曰：「吾聞之，喜而不寐。」

公孫丑曰：「樂正子強乎？」曰：「否。」

「有知慮乎？」曰：「否。」

「多聞識乎？」曰：「否。」

「然則奚為喜而不寐？」曰：「其為人也好善。」

「好善足乎？」曰：「好善優於天下，而況魯國乎？夫苟好善，則四海之內，皆將輕千里而來告之以善。夫苟不好善，則人將曰：『訑訑，予既已知之矣。』訑訑之聲音顏色，距人於千里之外。士止於千里之外，則讒諂面諛之人至矣。與讒諂面諛之人居，國欲治，可得乎？」

Lu-regno deziris igi Yuezhengzi administri la registaron.

Mengzi diris: “Aŭdinte tion, mi tiom ekĝojis, ke ne povis enlitiĝi.”

Gongsun Chou demandis: “Ĉu Yuezhengzi estas forta persono?”

Mengzi respondis: “Ne.”

Demandis: “Ĉu li estas prudenta?”

Respondis: “Ne.”

²¹² La teksto estas tre lakona, ke allasas diverse kompreni signifon. Iu interpretas: “Noblulo ne estas tro naiva, ĉar li malŝatas alteniĝi.” La alia tradukas: “Se noblulo ne estas honesta, kiel li regus sin?”

Demandis: “Ĉu li multe aŭdis kaj scias?”

Respondis: “Ne.”

Demandis: “Se tiel, kial vi ĝojegis tiom, ke ne povis enlitiĝi?”

Respondis: “Ĉar li estas persono, amanta la bonon.”

Demandis: “Ĉu ami la bonon sufiĉas por la posteno?”

Respondis: “Ami la bonon estas tre grava en la mondo, des pli en la Lu-regno. Al tiu, kiu amas la bonon, alvenas spite mil *liojn* ĉiuj el la mondo ene de kvar maroj por anonci la bonon. Kiu ne ŝatas la bonon, tiu certe diras: ‘Pri tio estas bone konate, mi jam scias tion.’ La saĝsajniga voĉo kaj mieno forigas homojn ekster mil *liojn*. Se kleruloj restas ekster mil *lioj*, tiam alproksimiĝas kalumniuloj, flatemuloj kaj jesuloj. Estante kune kun kalumniuloj, flatemuloj kaj jesuloj, ĉu iu povus regi la landon?”²¹³

34 [6B14]

陳子曰：「古之君子何如則仕？」

孟子曰：「所就三，所去三。迎之致敬以有禮，言將行其言也，則就之；禮貌未衰，言弗行也，則去之。其次，雖未行其言也，迎之致敬以有禮，則就之；禮貌衰，則去之。其下，朝不食，夕不食，飢餓不能出門戶。君聞之曰：『吾大者不能行其道，又不能從其言也，使飢餓於我土地，吾恥之。』周之，亦可受也，免死而已矣。」

Chengzi diris: “Kiel antikva noblulo tenis sin je la servado aŭ la neservado?”

Mengzi diris: “Estis tri kondiĉoj je la servado kaj tri kondiĉoj je la ekŝigo. Unue, akceptate respektplene kaj dece, se liaj vortoj estos ĝuste praktikataj laŭ vorte, li enoficiĝis. Eĉ akceptate ankoraŭ ne maldece, se liaj vortoj ne estas praktikataj, li foriris. Due, kvankam ne estas praktikataj liaj vortoj, akceptate respektplene kaj dece, li enoficiĝis, sed ne akceptate jam dece, li foriris. Trie, kiam li, ne havante ion manĝi matene kaj vespere, ne povas pro malsato eliradi el de la pordo, la landestro, aŭdinte tion, diras: ‘Mi ne povas praktiki lian vojon nek sekvi lian vorton, sed estas por mi hontende, se en nia lando mi lasus lin malsata.’ Se tiel, li povis akcepti la oficon. Sed nur por eviti la morton.”

35 [6B15]

孟子曰：「舜發於畎畝之中，傅說舉於版築之間，膠鬲舉於魚鹽之中，管夷吾舉於士，孫叔敖舉於海，百里奚舉於市。故天將降大任於是人也，必先苦其心志，勞其筋骨，餓其體膚，空乏其身，行拂亂其所為，所以動心忍性，曾益其所不能。人恒過，然後能改；困於心，衡於慮，而後作；徵於色，發於聲，而後喻。入則無法家拂士，出則無敵國外患者，國恒亡。然

²¹³ Yuezhengzi, Lu-regnano, estas unu el disĉiploj de Mengzi. Vd. [1B16]

後知生於憂患而死於安樂也。」

Mengzi diris: “Shun startis en la kampo inter sulkoj kaj irigacioj; Fu Yue leviĝis el inter terkonstruado; Jiao Ge leviĝis el inter fiŝado kaj salfarado; Guan Yiwu leviĝis el inter karceroj; Sunshu Ao leviĝis el inter maro, Baili Xi leviĝis el inter merkato. Al kiu la Ĉielo konfidis la grandan taskon, al tiu ĝi unue donas suferi je la koro kaj la strebo, labori kun muskolo kaj ostoj, donas malsaton en la korpo kaj haŭto, donas malplenon kaj mizeron en la vivo, obstaklon kaj perturbon en la praktiko de la agado. Tiel do kreskas la personeco, havanta aktivan koron kaj paciencon kaj disvolvanta la avantaĝon konkeri ion ajn nefareblan.

Homoj ĉiam misas kaj eraras, kaj poste kapablas pliboniĝi. Suferante en la koro, barite en la zorgado, kaj poste oni kreas ion. La personeco, apenaŭ rimarkebla en la vizaĝkoloro, aŭdebla en la voĉo, poste finfine estos konebla al la alia.

Tiel do ofte pereis la landoj, kie ene mankas juro kaj malaperas fortaj personoj kaj ekstere mankas malamikoj kaj minacoj. Rezulte, estas sciate, ke io naskiĝas en la zorgoplena suferado kaj mortas en la paca plezuro.”

36 [6B16]

孟子曰：「教亦多術矣，予不屑之教誨也者，是亦教誨之而已矣。」

Mengzi diris: “Je la instruado estas multe da rimedoj. Iam mi eĉ ne volus instrui iun, ankaŭ tio estas por tiu la instruado.”

《盡心上》

EL TUTA KORO (I)

1 [7A1]

孟子曰：「盡其心者，知其性也。知其性，則知天矣。存其心，養其性，所以事天也。殀壽不貳，修身以俟之，所以立命也。」

Mengzi diris: “Kiu ĝisfunde ekzamenas sian koron, tiu scias sian naturon. Kiu scias la naturon, tiu scias la Ĉielon. Ekzisti laŭ la koro kaj nutri la naturon estas ja la servado al la Ĉielo. Kiom ajn mallonga aŭ longa estu la vivdaŭro, kulturadi dumvive sin mem je personeco estas ja vivi firme laŭ la Ĉiela ordono.”

2 [7A2]

孟子曰：「莫非命也，順受其正。是故知命者，不立乎巖牆之下。盡其道而死者，正命也。桎梏死者，非正命也。」

Mengzi diris: “Ekzistas nenio sen la Ĉiela ordono, do oni devas humile akcepti ĝin ĝusta. Do, kiu scias la Ĉielan ordonon, tiu ne staras sub rompiĝema muro. Morti, ĝisfunde serĉante la Vojon, estas laŭ la ĝusta Ĉiela ordono. Morti katenite ne estas laŭ la ĝusta Ĉiela ordono.”

3 [7A3]

孟子曰：「求則得之，舍則失之，是求有益於得也，求在我者也。求之有道，得之有命，是求無益於得也，求在外者也。」

Mengzi diris: “Kion oni serĉas, tion oni akiras; kion oni forĵetas, tion oni perdas, ĉar serĉi ion utilan estas por akiri ĝin kaj io serĉata troviĝas en mi mem. Sed, kvankam troviĝus la vojo por serĉi tamen estas la Ĉiela ordono por la akirado, tiuokaze oni povas akiri, serĉante nenian utilecon, ĉar io serĉata ekzistas ekstere.”²¹⁴

4 [7A4]

孟子曰：「萬物皆備於我矣。反身而誠，樂莫大焉。強恕而行，求仁莫近焉。」

²¹⁴ Multaj esploristoj konsideras, ke ‘en mi mem’ estas virto, bonvoleco, justo, kaj ‘ekstere’ ekzistas riĉo, rango, honoro. Sed la teksto ne estas klara je la signifo, ĉar laŭ Mengzi la vorto ‘utileco 益’, samkiel profito 利, ne havas ĉiam pozitivan signifon.

Mengzi diris: “Ĉio estas en mi mem. Se mi ekzamenas min, reflektante min mem, kaj iĝas honesta, tiam nenia plezuro estas pli granda ol tio. Se mi per ĉiuj fortoj kondukas kun toleremo, tiam serĉi bonvolecon iĝas tre proksime.”

5 [7A5]

孟子曰：「行之而不著焉，習矣而不察焉，終身由之而不知其道者，眾也。」

Mengzi diris: “Estas iu, kiu faras ne sciante kion, lernas ne komprenante kion, ĝis fine vivas tiel ne sciante la Vojon. Tiu estas homgrego.”

6 [7A6]

孟子曰：「人不可以無恥。無恥之恥，無恥矣。」

Mengzi diris: “Homo ne devas esti senhontema. Kiu hontas je sia senhonteco, tiu ne estas hontigita.”

7 [7A7]

孟子曰：「恥之於人大矣。為機變之巧者，無所用恥焉。不恥不若人，何若人有？」

Mengzi diris: “Honto-sento estas granda parto por la persono. Kiu lertas ŝanĝiĝi por kamufligi sin laŭ okaze, tiu elturniĝas senti honton. Se iu ne sentus honton pri sia eco malpli alta ol la alies, kial tiu povus fariĝi tiel alta kiel la alia homo?”

8 [7A8]

孟子曰：「古之賢王好善而忘勢，古之賢士何獨不然？樂其道而忘人之勢。故王公不致敬盡禮，則不得亟見之。見且猶⁽¹⁾不得亟，而況得而臣之乎？」

(1). 猶：或作「由」。《孟子正義》作「由」。

Mengzi diris: “Antikve saĝaj reĝoj ŝatis la bonon kaj forgesis la potencavidon. Kial ne saĝaj personoj estis ankaŭ tiaj? Ili ĝojis je la Vojo-Tao kaj forgesis homan potencon. Do eĉ reĝoj-duktoj ne povis vidi ilin ofte sen montri respekton kaj kompletajn decregulojn. Estis ne facile eĉ vidi ilin ofte, do des pli retenis ilin kiel subulojn.”

9 [7A9]

孟子謂宋句踐曰：「子好遊乎？吾語子遊。人知之，亦囁囁；人不知，亦囁囁。」
曰：「何如斯可以囁囁矣？」

曰：「尊德樂義，則可以囂囂矣。故士窮不失義，達不離道。窮不失義，故士得己焉；達不離道，故民不失望焉。古之人，得志，澤加於民；不得志，脩身見於世。窮則獨善其身，達則兼善天下。」

Mengzi parolis al Song Goujian, dirante: “Ĉu vi ŝatas esti vaganta prelegisto? Mi priparolu al vi, kia devas esti la vaganto. Estu aplomba, kiam oni konas vin, kaj estu aplomba ankaŭ tiam, kiam oni ne konas vin.”

Song Goujian demandis: “Kion fari por ke mi povu esti aplomba?”

Mengzi diris: “Respektu virton kaj ĝoju pri justo, tiam eblas esti aplomba. Forta persono, eĉ se estante povra, ne perdas juston, se sukcesinte, ne forlasas la Vojon. En la povreco ne perdinte juston, li kulturas sin mem je la personeco. Ĉar en la sukceso li ne forlasas la Vojon, la popolo ne perdas esperon al li. Antikvaj personoj, sukcesinte en kariero, aldonis beneficon vaste al la popolo; ne sukcesinte en kariero, kulturis sin mem je la personeco kaj manifestiĝis al la mondo. En la povreco ili sole faras sin mem bona, en la sukceso ili faras bonon universale al la mondo.”²¹⁵

10 [7A10]

孟子曰：「待文王而後興者，凡民也。若夫豪傑之士，雖無文王猶興。」

Mengzi diris: “Kiu ekstaras, atendante la aperon de la reĝo Wen, tiu estas ordinara popolano. Se elstara persono, li stariĝas eĉ sen la reĝo de Wen.”²¹⁶

11 [7A11]

孟子曰：「附之以韓魏之家，如其自視欲然，則過人遠矣。」

Mengzi diris: “Se, apartenante al la riĉegaj familioj, kiel Han kaj Wei, iu rigardas sin malkontenta, tiu superas multe pli ol ordinaruloj.”²¹⁷

12 [7A12]

孟子曰：「以佚道使民，雖勞不怨；以生道殺民，雖死不怨殺者。」

²¹⁵ 遊 you, estas vaganta konsilisto, kiu prelegas al landestroj kaj reĝoj pri la politiko. Tia estas ankaŭ Mengzi. Estas ne sciate, kiu estas Song Goujian,

²¹⁶ La reĝo Wen estas la patro de la reĝo Wu, kiu fondis la Zhou-dinastion, disbatinte la Yin-dinastion. Sed tradicie oni rigardas ambaŭ reĝojn la fondintoj de Zhou-dinastio.

²¹⁷ Han kaj Wei estis potencaj en Jin-regno en la period Printempo-aŭtuno. El tia vidpunkto de Mengzi, superflua personoj de rusa nobelaro en XIX-a jc. povas esti alte taksataj.

Mengzi diris: “Se uzate laŭ la Vojo por plibonigi la popolan vivon, la popolo ne rankoras eĉ al peniga laboro; se mortigite por la Vojo konservi la popolan vivon, la popolo ne rankoras eĉ mortiginton.”²¹⁸

13 [7A13]

孟子曰：「霸者之民，驩虞如也；王者之民，皞皞如也。殺之而不怨，利之而不庸，民日遷善而不知為之者。夫君子所過者化，所存者神，上下與天地同流，豈曰小補之哉？」

Mengzi diris: “La popolo sub hegemoniulo ŝajnas foje fi-ĝojeganta. Sed la popolo sub la vera reĝo de la reĝoj ŝajnas pure kontenta. Estante ne vengema eĉ mortigite, estante indiferenta eĉ profitigite, la popolo pliboniĝas ĉiutage, ne sciante kiu faras ĝin tia. Por la nobluloj la estinto transformiĝas kaj la estanto iĝas dieca. La supro kaj la subo kunfluas kune kun la Ĉielo kaj la Tero. Ĉu eblus diri, ke la reciproka kompletigo estas malgranda?”²¹⁹

14 [7A14]

孟子曰：「仁言，不如仁聲之入人深也。善政，不如善教之得民也。善政民畏之，善教民愛之；善政得民財，善教得民心。」

Mengzi diris: “Bonvoleca vorto skribita penetras en homojn malpli profunde ol bonvoleca voĉo aŭdata. Bona politiko gajnas la popolon malpli ol bona instruado. La bonan politikon la popolo time respektas sed la bonan instruon la popolo amas. La bona politiko donas al la popolo monon sed la bona instruo donas al la popolo koron.”

15 [7A15]

孟子曰：「人之所不學而能者，其良能也；所不慮而知者，其良知也。孩提之童，無不知愛其親者；及其長也，無不知敬其兄也。親親，仁也；敬長，義也。無他，達之天下也。」

Mengzi diris: “Ke homoj povas fari ion sen lerni, tio estas pro la denaske bona kapablo. Ke homoj scias ion sen pripensi, tio estas pro la denaske bona scio. Infano naive ridanta, portate en manoj, amas sen ajna scio siajn gepatrojn. Kiu sufiĉe kreskis, tiu respektas, nenion sciante, siajn pliaĝajn fratojn. Intimi al gepatroj estas ja bonvoleco,

²¹⁸ La demando kuŝas en tio, ke la konformeco al la Vojo malkaŝiĝos nur poste.

²¹⁹ Multaj esploristoj prenas la ideogramon 過 por pasado, 存 por ekzistado, kaj prenas la frazon 小補 kiel komparon inter hegemoniulo kaj vera reĝo. Mi prenis la frazon 所過者化、所存者神 kiel “historio estas senĉesa transformiĝo, kaj kio ekzistas nun, estas racia-dieca.”

respekti pliaĝulojn estas ja justo. Necesas nenio alia ol etendi tion al la mondo.”

16 [7A16]

孟子曰：「舜之居深山之中，與木石居，與鹿豕遊，其所以異於深山之野人者幾希。及其聞一善言，見一善行，若決江河，沛然莫之能禦也。」

Mengzi diris: “Kiam Shun, loĝante en profunda monto, vivis kun arboj kaj ŝtonoj, ludadis kun cervoj kaj aproj, tiam li apenaŭ diferencis de sovaĝuloj en la profunda monto. Sed unu fojon aŭdante bonan vorton, unu fojon vidante bonan agon, li fariĝis tia persono rezoluta, kiel Changjiang kaj Flava rivero, ke nenio povas deteni la torenton kaskadegan.”²²⁰

17 [7A17]

孟子曰：「無為其所不為，無欲其所不欲，如此而已矣。」

Mengzi diris: “Ne faru kion oni ne devas fari; ne deziru kion oni ne devas deziri. Jen estu tia.”²²¹

18 [7A18]

孟子曰：「人之有德慧術知者，恒存乎疢疾。獨孤臣孽子，其操心也危，其慮患也深，故達。」

Mengzi diris: “Posedanto de virto, saĝo, arto kaj scio estas tiu, kiu ĉiam havis malsanon kaj suferon. Soleca subulo kaj bastardo, zorgantaj elkore pri danĝero kaj timantaj profunde pri malfeliĉo, penetras kaj atingas.”

19

孟子曰：「有事君人者，事是君則為容悅者也。有安社稷臣者，以安社稷為悅者也。有天民者，達可行於天下而後行之者也。有大人者，正己而物正者也。」

Mengzi diris: “Estas tiu, kiu, servante al la estro, servas por ke la estro ĝoju kun la ĝojplena mieno. Estas tiu, kiu, gardante en paco la altaron al la dio de tero kaj greno, gardas ĝin por ke la ŝtato ĝoju. Estas La Ĉiela popolo, kiu, komprenante ion fareblan por la mondo, poste praktikas ĝin. Estas la granda persono, kiu ĝustigas sin mem, kaj la

²²⁰ La monto, kie loĝis Shun, estis Li 歷山. Shun estas ideala modelo de vekiĝinta persono.

²²¹ Pri tiu teksto argumentas la artikolo de David S. Nivison, “Problems in the Mengzi:7A17” in *The Ways of Confucianism*, ed. Bryan W. Van Norden, 167-73, 1996.

estaĵoj ĉirkaŭ li iĝas ĝustaj.”

20 [7A20]

孟子曰：「君子有三樂，而王天下不與存焉。父母俱存，兄弟無故，一樂也。仰不愧於天，俯不作於人，二樂也。得天下英才而教育之，三樂也。君子有三樂，而王天下不與存焉。」

Mengzi diris: “Noblulo havas tri ĝojojn, kun kiuj ne rivalas eĉ la reĝa trono sur la mondo. Ke patro kaj patrino ambaŭ estas vivaj kaj fratoj vivas sen problemo, tio estas la unua ĝojo. Ke li mem havas nenian konscienciproĉon antaŭ la Ĉielo kaj nenion hontindan antaŭ la aliaj homoj, tio estas la dua ĝojo. Ke li povas instrui talentulojn, alvenantajn de la mondo, tio estas la tria ĝojo. La noblulo havas tri ĝojojn, kun kiuj ne rivalas eĉ la reĝa trono sur la mondo.”

21 [7A21]

孟子曰：「廣土眾民，君子欲之，所樂不存焉。中天下而立，定四海之民，君子樂之，所性不存焉。君子所性，雖大行不加焉，雖窮居不損焉，分定故也。君子所性，仁義禮智根於心。其生色也，晬然見於面，盎於背，施於四體，四體不言而喻。」

Mengzi diris: “Ke estu vasta la teritorio kaj estu multe da popolo, tion deziras landestro, sed ne en tio kuŝas lia ĝojo. Starante en centro de la mondo, stabiligi la popolojn ene de kvar maroj – pri tio ĝojas la landestro, sed la kvintesenco de lia naturo ne ekzistas en tio. La kvintesenco de la landestro ne pliiĝas per granda ago, nek malpliiĝas per mizera vivo, sed fiksita estas asignata. La kvintesenco de la landestro konsistas el bonvoleco, justo, decreguloj, saĝeco, radikigintaj en la koro. Koloro de lia viveco estas videbla klare en la vizaĝo, vigle surdorse, ĉie en la kvar membroj de la korpo, kiuj ne parolas, sed implicas.”

22 [7A22]

孟子曰：「伯夷辟紂，居北海之濱，聞文王作興，曰：『盍歸乎來！吾聞西伯善養老者。』太公辟紂，居東海之濱，聞文王作興，曰：『盍歸乎來！吾聞西伯善養老者。』天下有善養老，則仁人以為己歸矣。五畝之宅，樹牆下以桑，匹婦蠶之，則老者足以衣帛矣。五母雞，二母彘，無失其時，老者足以無失肉矣。百畝之田，匹夫耕之，八口之家足以無飢矣。所謂西伯善養老者，制其田里，教之樹畜，導其妻子，使養其老。五十非帛不煖，七十非肉不飽。不煖不飽，謂之凍餒。文王之民，無凍餒之老者，此之謂也。」

Mengzi diris: “Boyi forfuĝis de la tirano Zhou, kaj loĝis ĉe la bordo de Norda maro.

Aŭdinte, ke la reĝo Wen ekleviĝis, li diris: ‘Estas tempo reveni tien! Mi aŭdis, ke la okcidenta grafo, Wen, bone nutras maljunulojn.’ Taigong forfuĝis de la tirano Zhou, kaj loĝis ĉe la bordo de Orienta maro. Aŭdinte, ke la reĝo Wen ekleviĝis, li diris: ‘Estas tempo reveni tien! Mi aŭdis, ke la okcidenta grafo bone nutras maljunulojn.’

Kie en la mondo estas bone nutrataj la maljunuloj, tien bonvoleculoj turnas sin, revenante. Kiam ĉe la farmodomo estas tereno vasta je kvin *muoj* kun morusarboj plantitaj apud la muro, se la dommastrino kulturis silkraŭpojn, sufiĉe eblas doni al maljunuloj vestaĵojn el silko. Kiam iu bredas kvin kokinojn kaj du porkinojn, se ne perdus la ĝustan tempon, tiu povas sufiĉe doni al maljunuloj manĝi viandojn. Kiam unu kamparano kulturis la kampon je cent *muoj*, ok buŝoj en la familio povas sufiĉe manĝi sen malsato. Do la okcidenta grafo bone nutris jen kiel – li establis la reĝimon de farmkampo kaj loĝloko, instruis la plantadon kaj la bredadon, kondukis edzinojn kaj gefilojn por ke ili nutru la maljunulojn.

Kvindekaj jaraĝuloj sen silkaĵo ne povas teni sin en varmo, sepdekaj jaraĝuloj sen viando ne povas satmanĝi. Sen varmo, sen satmanĝado, – tio signifas, ke oni frostiĝas kaj malsatiĝas. Ke el la popolo de la reĝo Wen ne troviĝis frostiĝantaj kaj malsatiĝantaj maljunuloj, tio signifas la supre menciitan.”

23 [7A23]

孟子曰：「易其田疇，薄其稅斂，民可使富也。食之以時，用之以禮，財不可勝用也。民非水火不生活，昏暮叩人之門戶，求水火，無弗與者，至足矣。聖人治天下，使有菽粟如水火。菽粟如水火，而民焉有不仁者乎？」

Mengzi diris: “Faru la farmkampon facile kultivata, la imposton malmulta, tiam la popolo povas ĝui la riĉon. La popolon manĝigu konforme al sezonoj, uzu ilin laŭ decreguloj, kaj la riĉaĵo estos ne forkonsumebla. La popolo ne povas vivi sen akvo kaj fajro. Se iu en vesperiĝo frapas la alies pordon, petante la akvon kaj fajron, al tiu rifuzas neniun, ĉar estas sufiĉe da ili. Kiam la sanktulo regas la mondon, li faras legumenojn kaj cerealojn abundaj kiel akvo kaj fajro. Se estas abunde da legumenoj kaj cerealoj, ĉu el inter la popolo aperus malbonvolecaj homoj?

24 [7A24]

孟子曰：「孔子登東山而小魯，登太山而小天下。故觀於海者難為水，遊於聖人之門者難為言。觀水有術，必觀其瀾。日月有明，容光必照焉。流水之為物也，不盈科不行；君子之志於道也，不成章不達。」

Mengzi diris: “Kiam Konfuceo supreniris la orientan monton, li vidis Lu-regnon malgranda; kiam li supreniris la monton Tai, li vidis la mondon malgranda. Tiel do kiu vidas maron, al tiu estas malfacile vidi akvon laŭ kutime; kiu envagis la pordon de sanktulo por lerni, al tiu estas malfacile aŭdi alies eldiron laŭ kutime.

Estas arkano por observi akvon. Nepre observu la ondon. La suno kaj la luno lumas, kaj la lumo nepre reflektas sur subtilaj faldetoj. Fluanta akvo ne iras antaŭen sen plenigi ĉiujn kavojn. Eĉ se oblulo strebus al la Vojo, li ne povus atingi la celon sen la irado kun ŝtupo post ŝtupo.”

25 [7A25]

孟子曰：「雞鳴而起，孳孳為善者，舜之徒也。雞鳴而起，孳孳為利者，蹠之徒也。欲知舜與蹠之分，無他，利與善之間也。」

Mengzi diris: “Kiu, ellitiĝante kun kokeriko, faradas diligente la bonon, tiu estas similulo de la reĝo Shun. Kiu, ellitiĝante kun kokeriko, serĉadas diligente la profiton, tiu estas similulo de rabisto Zhi. Se vi deziras scii distingon inter Shun kaj Zhi, ĝi estas nenio alia ol diferenco inter celoj de profito kaj bono.”²²²

26 [7A26]

孟子曰：「楊子取為我，拔一毛而利天下，不為也。墨子兼愛，摩頂放踵利天下，為之。子莫執中，執中為近之，執中無權，猶執一也。所惡執一者，為其賊道也，舉一而廢百也。」

Mengzi diris: “Yangzi teniĝis al egoismo nur por si mem, kaj eĉ se surkoste de lia unu hareto povus esti profiteble al la mondo, li ne volis fari por la aliaj. Mozi predikis la universalan amon, kaj sinoferante kun kapo kalviĝinta kaj kun kalkanoj disfrotitaj, li praktikis la amon por profiti la mondon. Zimo provis teni la mezon, li provis aliri al la temo, tenante por si la mezon. Ĉe la tenado de la mezo mankis ekvilibro, do li alteniĝis al la unu. Estis malbone alteniĝi al la unu, ĉar tio difektis la Vojon, t. e., li prenis unu kaj ignoris centon.”²²³

²²² Ĉi tie videblas troa idealismo de Mengzi. Plej multe da nunaj homoj devas labori de frua mateno por vivtenadi sian familion. Ĉu la laboro ne estas por gajni monon-profiton? Nenie oni povas vivi sen labori por gajni monon. Sed la devizo “fari bonon de ellitiĝo” estas arkano al ideala vivo en nuna tempo de kapitalismo.

²²³ Estas ne sciate, kiu estas Zimo 子莫. Laŭ la kunteksto li prenis la mezan pozicion inter Yang kaj Mo(利己·利他), t. e., ĉiuj tri pensuloj konstruis sian ideologion surbaze de ‘profito’, kritikata en la antaŭa teksto 7A26, kiel teorio de rabisto.

27 [7A27]

孟子曰：「飢者甘食，渴者甘飲，是未得飲食之正也，飢渴害之也。豈惟口腹有飢渴之害？人心亦皆有害。人能無以飢渴之害為心害，則不及人不為憂矣。」

Mengzi diris: “Al malsatiĝinto estas bongusta ajna manĝaĵo, al soifanto estas dolĉa ajna trinkaĵo. Ili ankoraŭ ne povas trinki kaj manĝi normale, ĉar malsato kaj soifo malhelpas guston. Ĉu nur buŝo kaj ventro ricevas la damaĝon de malsato kaj soifo? Ankaŭ ĉiu homa koro ricevas damaĝon pro tio. Kiu povas ne damaĝi sian koron pro malsato kaj soifo, al tiu jam ne necesas ĉagreniĝi pro la vivkondiĉo pli povra ol de la aliaj.

28 [7A28]

孟子曰：「柳下惠不以三公易其介。」

Mengzi diris: “Liuxia Hui ne ŝanĝis sian kredon eĉ postenigite je la plej alta rango de Tri Duko.²²⁴

29 [7A29]

孟子曰：「有為者辟若掘井，掘井九仞而不及泉，猶為棄井也。」

Kiu faras aferon, tiu similas al putfosisto. Se fosinte profunde je naŭ *renoj*, li ne atingis akvofonton, ankaŭ rezigni la fosadon de la puto estas la afero.”²²⁵

30 [7A30]

孟子曰：「堯舜，性之也；湯武，身之也；五霸，假之也。久假而不歸，惡知其非有也。」

Mengzi diris: “Yao kaj Shun havis ĝin laŭ denaska naturo, Tang kaj Wu havigis ĝin al si per sinkultivado. Kvin hegemoniuloj prunteprenis ĝin. Nur pruntepreninte ĝin dumlonge, ili ne revenis al si mem. Kiel oni scius, ke al ili fakte ne apartenis ĝi?”²²⁶

²²⁴ 三公 La plej alta posteno, asistanta la Ĉielan Filon, en Zhou-dinastio – 太師, 太傅, 太保.

²²⁵ Inter esploristoj troviĝas du diversaj opinioj pri la signifo de la lasta frazo. Multaj prenas ĝin kiel “Se ne daŭrigas la fosadon, li jam forlasas la celon ne atingitan.” Sed mi preferas traduki laŭ litere, konsiderante rilaton al determinismo. Vidu [7A2, 7A3]. *Ren* 仞, 仞 estis la antikva mezurunuo. Unu *reno* estis 7 *ĉioj* 尺 aŭ 8 *ĉioj*. Unu *ĉio* estis ĉ. 22.5 cm, do 8 *renoj* estas ĉ. 14.4m.

²²⁶ 之 estas potenco surbaze de 仁 bonvoleco. Ĉirkaŭ la lasta frazo estas diversaj opinioj. Zhuzi konsideras, ke io prunteprenita estas ne vere posedata. Zhaoqi opinias, ke se ili

31 [7A31]

公孫丑曰：「伊尹曰：『予不狎于不順。』放太甲于桐，民大悅。太甲賢。又反之，民大悅。賢者之為人臣也，其君不賢，則固可放與？」

孟子曰：「有伊尹之志，則可；無伊尹之志，則篡也。」

Gongsun Chou diris: “Yi Yin, dirante: ‘Mi ne volus kutimiĝi al malĝusta direkto’, forpelis Taijia, nepon de la reĝo Tang, al Tong. La popolano ĝojegis je tio. Poste Taijia saĝiĝis kaj Yi Yin igis lin denove reveni, la popolo ankaŭ ĝojegis je tio. Se saĝa estas la subulo, tamen la estro estas malsaĝa, ĉu tiam la subulo povas forpeli la estron?”

Mengzi diris: “Se kun la alta idealo de Yi Yin, povas. Sen la alta idealo de Yi Yin, tio estas ja la uzurpado.”²²⁷

32 [7A32]

公孫丑曰：「《詩》曰：『不素餐兮』，君子之不耕而食，何也？」

孟子曰：「君子居是國也，其君用之，則安富尊榮；其子弟從之，則孝弟忠信。『不素餐兮』，孰大於是？」

Gongsun Chou diris: “En *Poezio* estas dirite: ‘Oni ne manĝas sen labori’.²²⁸ Sed nobluloj manĝas sen terkulturadi. Kial?”

Mengzi diris: “Jen kial. Iu noblulo loĝas en iu lando kaj la landestro dungas lin. Tiam la lando iĝas paca, riĉa, respektinda, kaj prosperas. Tieaj filoj kaj fratoj, sekvante lin, havigas al si filan pietaton, respektadon de pliaĝuloj inter fratoj, lojalecon kaj fidelecon. Tio estas ja bonega modelo de la vorto ‘Ne manĝi sen labori’.”

33 [7A33]

王子墊問曰：「士何事？」

孟子曰：「尚志。」

曰：「何謂尚志？」

曰：「仁義而已矣。殺一無罪，非仁也；非其有而取之，非義也。居惡在？仁是也；路惡在？義是也。居仁由義，大人之事備矣。」

longe pruntprenis, neniŭ povus scii tion prunteprenita.

²²⁷ Taijia estas nepo de la reĝo Tang, surtroniĝis kiel la kvara reĝo de Yin-dinastio. Yi Yin, kiu asistis al Tang fondi la dinastion, ne estis kontenta je Taijia, malobeema al la vojo de Tang, do forpelis lin al la loko Tong, kie estis entombigita Tang.

²²⁸ Citaĵo el 詩經, 魏風, 伐檀.

Reĝido Dian demandis, dirante: “Kion faras vaganta klerulo, persono de *shî*rangulo?”²²⁹

Mengzi diris: “Strebas al alta idealo.”

Dian demandis: “Kio estas t. n. la alta idealo?”

Mengzi diris: “Nur bonvoleco kaj justo. Se mortigi eĉ unu senkulpan – tio ne estas bonvoleco. Se vi prenas tion, kio ne apartenas al vi, – tio ne estas justo. En kio oni devas loĝi? – En la bonvoleco. Laŭ kia vojo oni devas iri? – Laŭ justo. Vivi en la bonvoleco per justo, jen per kio ili akiras la kvaliton de la grandulo.”

34 [7A34]

孟子曰：「仲子，不義與之齊國而弗受，人皆信之，是舍簞食豆羹之義也。人莫大焉亡親戚、君臣、上下。以其小者信其大者，奚可哉？」

Mengzi diris: “Ke Chen Zhongzi ne ricevus eĉ la regnon Qi, se estas maljuste ricevi, tion kredas ĉiuj homoj. Sed lia justo estas tia speco, kia estas rifuzo de korbo da manĝaĵo kaj supo el legumeno. Por homoj nenia kulpo estas pli granda ol perdi la rilaton de parenco, de estro kaj subulo, de supro kaj subo. Kiel oni povas kredi la grandecon de iu persono, vidante la malgrandan konduton?”²³⁰

35 [7A35]

桃應問曰：「舜為天子，皋陶為士，瞽瞍殺人，則如之何？」

孟子曰：「執之而已矣。」

「然則舜不禁與？」

曰：「夫舜惡得而禁之？夫有所受之也。」

「然則舜如之何？」

曰：「舜視棄天下，猶棄敝屣也。竊負而逃，遵海濱而處，終身訢然，樂而忘天下。」

Tao Ying demandis, dirante: “Kiam Shun estas surtrone kiel la Ĉiela Filo, se lia patro Gusou farus krimon de hommortigo, kion farus Hao Yao kiel ministro de justico?”

Mengzi diris: “Li nur arestus lin.”

²²⁹ Dian estas kosiderata kiel la filo de la reĝo Xuan de Qi-regno. *Shi* 士 estas socia tavolo en la antikva Ĉinio inter superaj ŝtatoficistoj kaj ordinaraj popolanoj. Ili estis kleruloj aŭ militistoj. La kategorio estas simila al kavaliro en okcidento aŭ samurai en Japanio. Ĉi tie temas ankaŭ pri kleruloj, kiuj ankoraŭ ne enoficigitaj. Mengzi ignoras gajni profiton, do postulo de vagantaj kleruloj estas tro severa por la vivtenado.

²³⁰ 陳仲子 estis Qi-regnano, fama kiel honasta persono. Sed Mengzi ne taksas lin alte pro tio, ke li forlasis sian familion. Vd. [3B10].

Demandis: “Ĉu tiuokaze Shun ne malpermesus la areston?”

Mengzi respondis: “Kial Shun povus malpermesi? Tiel endas akcepti laŭ leĝe.”

Demandis: “Tiam kion farus Shun?”

Mengzi diris: “Shun vidas, ke forlasi la mondon estas same, kiel forĵeti eluzitajn ŝuojn. Do li, sekrete portante la patron, fuĝus kaj ekloĝus ĉe la bordo de maro. Kaj li vivus trankvile ĝis la morto, ĝuante kaj forgesinte la mondon.”²³¹

36 [7A36]

孟子自范之齊，望見齊王之子。喟然歎曰：「居移氣，養移體，大哉居乎！夫非盡人之子與？」孟子曰：「王子宮室、車馬、衣服多與人同，而王子若彼者，其居使之然也；況居天下之廣居者乎？魯君之宋，呼於埳澤之門。守者曰：『此非吾君也，何其聲之似我君也？』此無他，居相似也。」

Irante de la urbo Fan al la ĉefurbo de Qi-regno, Mengzi de fore vidis reĝidon de Qi-regno kaj susupiris, dirante: “La pozicio transdonas la atmosferon, samkiel la nutraĵo formigas la korpon. Kiel granda estas la influo de la pozicio! Ĉu ne tiaj estas ĉiuj infanoj de homoj?”

Mengzi daŭre diris: “Palaco, ĉaroj kaj ĉevaloj, vestoj de la reĝido multe samas kun tiuj de la aliaj, sed kio faras la reĝidon tia, estas la pozicio, okupita de li. Des pli granda estas influo de la pozicio, okupita de granduloj vaste en la mondo.”²³²

Iam la regnestro de Lu vizitis Song-regnon, li alvokis pordgardiston ĉe la pordo nomata Dieze. La pordgardisto diris: ‘Li ne estas nia reĝo, sed tamen kial lia voĉo similas al la voĉo de nia reĝo?’ Ili similas unu al alia pro la pozicio okupita de ili.”²³³

37 [7A37]

孟子曰：「食而弗愛，豕交之也；愛而不敬，獸畜之也。恭敬者，幣之未將者也。恭敬而無實，君子不可虛拘。」

Mengzi diris: “Doni al iu manĝi sed ne ami estas trakti tiun samkiel porkon. Ami sed ne respekti iun estas trakti tiun samkiel beston kaj animalon. Ĝentila respekto devas anticipi la donacon. Se al kiu mankas sincereco en la ĝentila respektado, tiu ne

²³¹ Tao Ying estas unu el disĉiploj de Mengzi. Hao Yao estis la ministro de justico ĉe Shun. Por Mengzi fila pietato estas pli grava ol la regado de la mondo. Tiele la fila pietato estas starigita kiel absoluta kriterio por la mezurado de personoj.

²³² La frazo 居天下之廣居者 signifas pozicion de Granda unicerso por bonvoleca grandulo, laŭ [3B2]

²³³ Dieze estas nomo de la pordo, situanta oriente-sude de la ĉefurbo de Song.

povas teni ĉe si noblulojn.”

38 [7A38]

孟子曰：「形色，天性也；惟聖人，然後可以踐形。」

Mengzi diris: “La korpo kaj vizaĝo estas denaska naturo ricevita de la Ĉielo. Nur sanktulo povas poste solidigi la korpon.”

39 [7A39]

齊宣王欲短喪。公孫丑曰：「為朞之喪，猶愈於已乎？」

孟子曰：「是猶或紕其兄之臂，子謂之姑徐徐云爾，亦教之孝弟而已矣。」

王子有其母死者，其傅為之請數月之喪。公孫丑曰：「若此者，何如也？」

曰：「是欲終之而不可得也。雖加一日愈於已，謂夫莫之禁而弗為者也。」

La reĝo Xuan de Qi-regno volis mallongigi la funebbron.

Gongsun Chou diris: “Okazigi unu-jaran funebbron estas pli bone ol nenion fari, ĉu ne?”

Mengzi diris: “Tio estas same, kiel vi tordas brakon de pliaĝa frato, dirante ĉu estus pli bone malrapide tordi. Rilate al tia homo estas preferinde instrui nur pri fila pietato kaj frateca devo.”

Patrino de iu reĝido mortis, lia guvernisto petis por li funebbron de kelk-monatoj.

Gongsun Chou diris: “Tiuokaze, kion fari?”

Mengzi diris: “Li dezirus plenumi la funebbron ne allaseblan. Se eblus plilongigi ĝin eĉ je unu tago, estus bone. Mia eldiro koncernas tiun, kiu ne plenumas ion ne malpermesatan.”²³⁴

40 [7A40]

孟子曰：「君子之所以教者五：有如時雨化之者，有成德者，有達財者，有答問者，有私淑艾者。此五者，君子之所以教也。」

Mengzi diris: “Nobluloj kreskas, edukate mem per kvin manieroj: unu transformiĝas mem kvazaŭ sub la favora pluvo, la alia fariĝas kompleta surbaze de sia virto, la tria disvolvas sian rezervitan talenton, la kvara ekzercas sin per la respondado

²³⁴ Al konfuceanoj nepre necesas tri-jara funebro por gepatroj, dum mohistoj pledis por mallongigo. La patrino de reĝido ne estis reĝa edzino, sed kromvirino, do al la neplenaĝa reĝido ne allaseblas plenumi la tri-jaran funebbron.

al demandoj, la kvina memlernas kaŝe admirante mastrojn. Jen la kvin manieroj, laŭ kiuj nobluloj estas edukataj.”²³⁵

41 [7A41]

公孫丑曰：「道則高矣，美矣，宜若登天然，似不可及也。何不使彼為可幾及而日孳孳也？」
孟子曰：「大匠不為拙工改廢繩墨，羿不為拙射變其彀率。君子引而不發，躍如也。中道而立，能者從之。」

Gongsun Chou diris: “La Vojo estas tre alta kaj bela, kvazaŭ supreniri al la Ĉielo, ke ŝajnus neatingebla. Kial ne faru ĝin iomete proksima, atingebla per ĉiutaga diligenta penado?”

Mengzi diris: “Mastro-metiisto ne ŝanĝas la mezurilojn por mallerta lernanto, pafarkisto Yi neniam ŝanĝis la gradon de fortika pafarko cedante al mallerta lernanto. Noblulo streĉiĝas sen relaso, plena je aktiveco, kaj staras celante por trafi la Vojon. Nur kapabluloj sekvas lin.”

42 [7A42]

孟子曰：「天下有道，以道殉身；天下無道，以身殉道。未聞以道殉乎人者也。」

Mengzi diris: “Se troviĝas la Vojo en la mondo, dediĉu sin al la Vojo; se ne troviĝas la Vojo en la mondo, kulturu sin mem por serĉi la Vojon. Mi ankoraŭ ne aŭdas iun flatanta homojn pere de la Vojo.”

,

43 [7A43]

公都子曰：「滕更之在門也，若在所禮。而不答，何也？」

孟子曰：「挾貴而問，挾賢而問，挾長而問，挾有勳勞而問，挾故而問，皆所不答也。滕更有二焉。」

Gongduzi diris: “Kiam Teng Keng, la reĝa frato, vizitis vin sufiĉe laŭ decreguloj, vi ne respondis al li. Kial?”

Mengzi diris: “Kiu demandas fierante pri sia alta rango, demandas fierante pri sia saĝeco, demandas fierante pri sia pliaĝeco, demandas fierante pri sia merito en kariero, demandas fierante pri siaj konatoj, al ĉiuj mi ne respondas. Teng Keng havas du el tiuj difektoj.”

²³⁵ Multaj esploristoj prenas tiun tekston kiel ‘Nobluloj instruas...’, sed mi prenas pasive.

44 [7A44]

孟子曰：「於不可已而已者，無所不已；於所厚者薄，無所不薄也。其進銳者，其退速。」

Mengzi diris: “Kiu ĉesas tie, kie ne endas ĉesi, tiu ĉiam ĉesas mezvoje. Kiu agas malzorgeme tie, kie endas agi zorgeme, tiu nenie ne malzorgas. Kiu iras tro haste antaŭen, tiu ankaŭ retiriĝas haste.”

45 [7A45]

孟子曰：「君子之於物也，愛之而弗仁；於民也，仁之而弗親。親親而仁民，仁民而愛物。」

Mengzi diris: “Rilate al vivestaĵoj, noblulo amas ilin, sed sen bonvolemo. Rilate al la popolo, noblulo estas bonvolema al ili, sed sen intimeco. Estu intima kun parencoj, kaj poste estu bonvoleca al la popolo. Estu bonvoleca al la popolo, kaj poste amu la vivestaĵojn.”²³⁶

46 [7A46]

孟子曰：「知者無不知也，當務之為急；仁者無不愛也，急親賢之為務。堯舜之知而不遍物，急先務也；堯舜之仁不遍愛人，急親賢也。不能三年之喪，而總小功之察；放飯流歎，而問無齒決，是之謂不知務。」

Mengzi diris: “Intelektulo, kvankam nenion ne povus scii, tamen urĝe okupiĝas je la nuna tasko; bonvoleculo, neniun ne povus ami, tamen urĝe plenumas la taskon por la parenco kaj saĝuloj. Yao kaj Shun ne etendis sian saĝon al universala afero, sed antaŭ ĉio plenumis urĝe la tujnecesan taskon. Yao kaj Shun ne etendis sian bonvolecon al universala amo de homoj, sed urĝe zorgis pri la parenco kaj la saĝuloj. Ne povante plenumi la tri-jaran funebro, esploradi skrupule pri funebro de tri aŭ kvin monatoj, manĝante voreme kaj drinkante ekscese, priatenti la maldecon je manĝetiketo de viando – tio estas nomata la konduto ‘ne scianta pri la tasko’.”²³⁷

²³⁶ Teksto estas tro lakona, ke malfacile estus kompreni la signifon. Sed temas pri disputo inter konfuceanoj kaj mohistoj ĉirkaŭ bonvoleco kaj universala amo. Ŝlosila vorto de mohismo estas ‘amo 愛’, tiu de konfuceismo – ‘bonvoleco 仁’. Vidu [3A5]. 物 laŭ Zhuzi signifas 禽獸草木. Mozi kritikis konfuceismon pro ‘別 aparta’ amo.

²³⁷ Ĉi tie estas kritikataj ne nur mohistoj, sed ankaŭ harfende detalemaj konfuceanoj.

《盡心下》

EL TUTA KORO (II)

47 [7B1]

孟子曰：「不仁哉，梁惠王也！仁者以其所愛及其所不愛，不仁者以其所不愛及其所愛。」

公孫丑問曰：「何謂也？」

「梁惠王以土地之故，糜爛其民而戰之，大敗，將復之，恐不能勝，故驅其所愛子弟以殉之，是之謂以其所不愛及其所愛也。」

Mengzi diris: “Kiel malbonvoleca estis la reĝo Hui de Liang! La bonvoleculo amas ion gravan pli ol ion malpligravan. La malbonvoleculo amas ion malpligravan pli ol la gravan.”

Gongsun Chou demandis, dirante: “Kion signifas via eldiro?”

Mengzi diris: “La reĝo Hui de Liang pro la teritorio igis la popolon vane morti kaj batali, kaj ege venkite, ripetadis la militon plu. Timante, ke la milito estu ne venkebla, li igis ankaŭ siajn amatajn filojn kaj fratojn batalmorti. Tio signifas, ke li preferis ami ion negravan ol la gravan.”

48 [7B2]

孟子曰：「《春秋》無義戰。彼善於此，則有之矣。征者上伐下也，敵國不相征也。」

Mengzi diris: “En la kroniko *Printempo-aŭtuno* ne estis ajna justa milito. Troviĝas nur, ke iu estis kompare pli bona ol la alia. La milita sankcio estas la punado, farata de la supro al la subo. Rivalaj landoj ne povus sankcii unu la alian.”²³⁸

49 [7B3]

孟子曰：「盡信《書》，則不如無《書》。吾於《武成》，取二三策而已矣。仁人無敵於天下。以至仁伐至不仁，而何其血之流杵也？」

Mengzi diris: “Se oni kredus tute je la *Libro*, estus pli bone, ke la *Libro* tute ne estu. Mi mem el la ĉapitro Wucheng prenas nur du-tri ekstraktaĵojn. Mi kredas, ke neniu en la mondo povas rivali kun la bonvoleculo. Se la plej bonvoleca atakus la plej malbonvolecan, tiuokaze kial okazus la sangverŝado, kiel eĉ ŝildegoj flosas

²³⁸ La punado 征 estas farata nur laŭ la ordono de la Ĉiela filo. Do Mengzi diras, ke maljusta estas la milito sen lia ordono.

sangoŝmirite?”²³⁹

50 [7B4]

孟子曰：「有人曰：『我善為陳，我善為戰。』大罪也。國君好仁，天下無敵焉。南面而征北狄怨，東面而征西夷怨。曰：『奚為後我？』武王之伐殷也，革車三百兩，虎賁三千人。王曰：『無畏！寧爾也，非敵百姓也。』若崩厥角稽首。征之為言正也，各欲正己也，焉用戰？」

Mengzi diris: “Estas iu, kiu diras: ‘Mi povas bone deploji soldatojn, mi estas lerta je batalo.’ Granda krimo! Landestro, ŝatanta bonvolecon, estas senrivala en la mondo. Se li turnas sin al sudo, la norda barbaro ofendiĝas, se li turnas sin al oriento, la okcidenta barbaro ofendiĝas, dirante: ‘Kial li prokrastas savi nin?’

Kiam la reĝo Wu batis Yin-dinastion, li mobilizis 300 militĉarojn kaj 3000 soldatojn. La reĝo diris al popolanoj de Yin: ‘Ne timu! Mi donos al vi ripozi, mi ne estas malamiko al popolanoj’. Ili lavange klinis kapojn surteren. Vorto ‘sankcii’ signifas ‘rektigi’. Se ĉiu volus esti rektigita, kial estus bezonata la milito?”

51 [7B5]

孟子曰：「梓匠輪輿能與人規矩，不能使人巧。」

Mengzi diris: “Metiistoj, kiel septfaristo, ĉarpentisto, radisto, ĉaristo, povas doni al lernantoj ĉirkelon kaj ortilon, sed ne transdoneblas la lerteco.”

52 [7B6]

孟子曰：「舜之飯糗茹草也，若將終身焉；及其為天子也，被袵衣，鼓琴，二女果，若固有之。」

Mengzi diris: “Kiam Shun manĝis sekigitan cerealon kaj herbojn, li sendis la vivon, kvazaŭ dumvive tio estus normala. Post kiam li fariĝis la Ĉiela Filo, li, vestite per broditaj vestaĵoj, ludadis tamburon kaj kotoon, kaj estis akompanata de du virinoj, kvazaŭ tia vivo estus al li propra kaj normala.

53 [7B7]

孟子曰：「吾今而後知殺人親之重也：殺人之父，人亦殺其父；殺人之兄，人亦殺其兄。然則

²³⁹ La *Libro* estas 尚書, citaĵo estas el 尚書, 周書, 武政. Sed nun ekzistanta 武政 estas konsiderata kiel falsaĵo. Laŭ Zhuvi vorto 杵 estas skribita en la alia libro per 鹵, kiu signifas ŝildon 楯.[朱熹 417] Multaj rigardas la opinion de Mengzi tro optimismeca, ĉar la sangoverŝado nepras en ajna milito, interalie laŭ mi. ene de la sama lando unuj mortigas la aliajn sub la preteksto de malamikaj ŝpionoj.

非自殺之也，一聞耳。」

Mengzi diris: “Mi nun kaj por ĉiam komprenis, kiel serioza estas mortigo de alies parenco. Se iu mortigis la alies patron, ankaŭ la lasta mortigos patron de la unua; se iu mortigis la alies pliaĝan fraton, ankaŭ la alia mortigos la patron de la unua. Tiel do, kvankam iu ne mortigus rekte la sian, tamen tio egalas, ke li mortigis la sian nur nerekte.”

54 [7B8]

孟子曰：「古之為關也，將以禦暴。今之為關也，將以為暴。」

Antikve la landlima bariero estis starigita por bari kruelaĵon. Sed nun la landlima bariero estas starigita por fari kruelaĵon.”

55 [7B9]

孟子曰：「身不行道，不行於妻子；使人不以道，不能行於妻子。」

Mengzi diris: “Kiu ne iras mem laŭ la Vojo, ties edzino kaj gefiloj ankaŭ ne iras. Se iu igas la aliajn iri ne laŭ la Vojo, tiu ne povas igi siajn edzinon kaj gefilojn iri laŭ la Vojo.”

56 [7B10]

孟子曰：「周于利者，凶年不能殺；周于德者，邪世不能亂。」

Kiu utile rezervas²⁴⁰ en la jaro de abundeco, tiu ne lasas homojn morti en la jaro de malsatego; kiu kompletas je virto, tiu ne lasas al al korupta mondo malordi.”

57 [7B11]

孟子曰：「好名之人，能讓千乘之國；苟非其人，簞食豆羹見於色。」

Mengzi diras: “Kiu estimas la nomon grava, povas cedi la regnon de mil milit-ĉaroj; kiu ne estas tia, ties avideco montriĝas en vizaĝo ĉe la vido de bovlo da manĝaĵo kaj supo.”

58 [7B12]

²⁴⁰ Ĉi tie estas uzata ideogramo 利 por pozitiva signifo.

孟子曰：「不信仁賢，則國空虛。無禮義，則上下亂。無政事，則財用不足。」

Mengzi diris: “Sen fidi bonvolecon kaj saĝon, la regno estas vanta; sen decreguloj kaj justo, la supro kaj la subo malordiĝas; sen politiko ĉe administrado, mankas la kapitalo.”

59 [7B13]

孟子曰：「不仁而得國者，有之矣；不仁而得天下，未之有也。」

Mengzi diris: “Troviĝas iu, kiu havigas la regnon al si sen bonvoleco, sed ankoraŭ ne troviĝas tiu, kiu sen bonvoleco akiris la mondon.”

60 [7B14]

孟子曰：「民為貴，社稷次之，君為輕。是故得乎丘民而為天子，得乎天子為諸侯，得乎諸侯為大夫。諸侯危社稷，則變置。犧牲既成，粢盛既潔，祭祀以時，然而旱乾水溢，則變置社稷。」

Mengzi diris: “La popolo estas la plej estiminda, la altaro de la tero kaj grenoj estas la sekva, kaj la estro estas la plej malpeza. Do kiu gajnas estimon de la popolamaso, fariĝas la Ĉiela Filo; kiu gajnas estimon de la Ĉiela Filo, fariĝas landestro; kiu gajnas estimon de la landestro, fariĝas grandoficisto. Se iu landestro endanĝerigos la altaron de la tero kaj grenoj, tiu estos anstataŭigita. Spite ke ĉe la oferfestoj estis kompleta la oferaĵo kaj estis purigitaj la ujoj por oferata manĝaĵo, se okazis sekego aŭ inundo, tiam estas anstataŭigita la altaro de la tero kaj grenoj.”²⁴¹

61 [7B15]

孟子曰：「聖人，百世之師也，伯夷、柳下惠是也。故聞伯夷之風者，頑夫廉，懦夫有立志；聞柳下惠之風者，薄夫敦，鄙夫寬。奮乎百世之上。百世之下，聞者莫不興起也。非聖人而能若是乎，而況於親炙之者乎？」

Mengzi diris: “Sanktuloj estas instruistoj por cent generacioj. Tiaj estis Boyi kaj Liuxia Hui. Aŭdante pri personeco de Boyi, obstinulo ŝanĝiĝas honesta, timemulo ŝanĝiĝas en personon, strebanta al la starigita celo. Aŭdante pri personeco de Liuxia Hui, facilanimulo ŝanĝiĝas prudenta, malgrandulo iĝas tolerema. Vekiĝintoj antaŭ cent

²⁴¹ 社稷 Sheji: 社 estis dio de la tero, 稷 estis dio de grenoj. Tio estis la ŝtata sanktejo kaj signifis la ŝtaton kaj la societeton.

generacioj povas nepre starigi aŭdontojn post cent generacioj. Se ne sanktuloj, ĉu iu ajn povus fari tion. Kiaj iĝas tiuj, kiuj rekte povas lerni ĉe la sanktuloj?”

62 [7B16]

孟子曰：「仁也者，人也。合而言之，道也。」

Mengzi diris: “Bonvoleco estas homeco. Se sintezi ambaŭ, oni diras tion la Vojo.”²⁴²

63 [7B17]

孟子曰：「孔子之去魯，曰：『遲遲吾行也。』去父母國之道也。去齊，接淅而行，去他國之道也。」

Mengzi diris: “Konfuceo, forlasante Lu-regnon, diris: “Mi foriras lante kaj lante laŭeble.” Ĉar tio estas la forira Vojo el la lando de gepatroj. Forlasante Qi-regnon, li foriris tuj subite kun rizo apenaŭ lavita. Ĉar tio estis la forira Vojo el la alies lando.”

64 [7B18]

孟子曰：「君子之居於陳蔡之間，無上下之交也。」

Mengzi diris: “Noblulo, kiel Konfuceo, suferis turmentite inter landoj Chen kaj Caj, pro tio, ke tie li ne povis proksimiĝi nek kun la supro nek kun la subo.”²⁴³

65 [7B19]

貉稽曰：「稽大不理於口。」

孟子曰：「無傷也。士憎茲多口。《詩》云：『憂心悄悄，慍于群小。』孔子也。『肆不殄厥慍，亦不隕厥問。』文王也。」

Mo Ji diris: “Pri mi oni ege klaĉas sen rezone.”

Mengzi diris: “Sen problemo. Elstara persono estas ofte malamata kaj priklaĉata multe. Estas dirite en *Poezio*: ‘Koro morne malĝojas, malamate de grego da malgranduloj.’ Ankaŭ Konfuceo estis tia. Estas dirite: ‘La kalumnio ne eviteblas, tamen

²⁴² Pri tiu teksto estas diversaj opinioj inter esploristoj. Mi sekvas Zhaoqi kaj Zhuzi. Zhuzi konsideras 仁 kiel rezonon kaj 人 kiel materion, ka rezono plus materio faras la Vojon 理+物=道.[朱熹 423] Estas la alia esploristo, kiu supozas, ke daŭre estus frazo 義也者宜也.

²⁴³ Diversas opinioj kie mankas la interkomuniko, inter Konfuceo kaj la supro-subo de la landoj, aŭ inter la subo kaj la supro en la landoj, aŭ inter la landoj.

li ne falis en la intervenon.' Tia estis la reĝo Wen."²⁴⁴

66 [7B20]

孟子曰：「賢者以其昭昭，使人昭昭；今以其昏昏，使人昭昭。」

Mengzi diris: “Saĝulo per sia luminiĝo lasas la aliajn lumini sin. Sed nun, estante mem obskura, oni provas lumini la aliajn.”

67 [7B21]

孟子謂高子曰：「山徑之蹊間，介然用之而成路。為閒不用，則茅塞之矣。今茅塞子之心矣。」

Mengzi parolis Gaozi, dirante: “Pado en monto, kiun oni uzas ofte, fariĝas la strato. Se ne uzate dumlonge, ĝi estos ŝtopita, kovrite de herbaĉo. Nun la herbaĉo ŝtopas al vi la koron.”²⁴⁵

68 [7B22]

高子曰：「禹之聲，尚文王之聲。」

孟子曰：「何以言之？」

曰：「以追蠡。」

曰：「是奚足哉？城門之軌，兩馬之力與？」

Gaozi diris: “La muziko de Yu estas pli alta ol la muziko de la reĝo Wen.

Mengzi diris: “Kial vi opinias tiel?”

Gaozi diris: “Pro konsumiĝinta tenilo de sonorilo.”

Mengzi diris: “Ĉu tio estas sufiĉa pruvo? Ĉu radsulkoj antaŭ la urba pordo estiĝis per la forto de du-ĉevala ĉaro?”²⁴⁶

69 [7B23]

齊饑。陳臻曰：「國人皆以夫子將復為發棠，殆不可復。」

孟子曰：「是為馮婦也。晉人有馮婦者，善搏虎，卒為善士。則之野，有眾逐虎。虎負嵎，莫之敢撻。望見馮婦，趨而迎之。馮婦攘臂下車。眾皆悅之，其為士者笑之。」

²⁴⁴ La unua citaĵo el 詩經, 邶風, 柏舟, la dua – el 詩經, 大雅, 縣篇. Esploristoj prenas la vorton 問 por 聞 honoro aŭ famo. Sed mi prenas ĝin por interveno de kalumniuloj.

²⁴⁵ 高子 estis unu el lernantoj de Mengzi, sed laŭ Zhaoqi li poste foriris al la alia.

²⁴⁶ Zhuxi diris, ke ne klaras la signifo de tiu teksto.[朱熹 426]

Okazadis malsatego en Qi-regno. Chen Zhen diris: “Regnanoj ĉiuj esperas, ke vi, Majstro, denove malfermos la grenejon de Tang por savi, ĉu tio preskaŭ ne eblus denove?”

Mengzi diris: “Tio estus la agmaniero de Feng Fu. En Jin-regno estis iu, nomata Feng Fu. Li lertis kapti tigrojn, poste fariĝis bona kavaliro. Iam homamaso estis ĉasanta tigron en la kampo. La tigro fuĝis en monta angulo, neniuj aŭdacis tuŝi la tigron. Vidante fore Feng Fu, oni kuris al li por venigi lin. Feng Fu, refaldante manikojn, descendis de la ĉaro. La popolanoj ĉiuj ĝojegis je tio, sed al kleruloj estis ridinda lia aŭdaco.”²⁴⁷

70 [7B24]

孟子曰：「口之於味也，目之於色也，耳之於聲也，鼻之於臭也，四肢之於安佚也，性也，有命焉，君子不謂性也。仁之於父子也，義之於君臣也，禮之於賓主也，智之於賢者也，聖人之於天道也，命也，有性焉，君子不謂命也。」

Mengzi diris: “Gusto al buŝo, koloro al okuloj, sono al oreloj, odoro al nazo, komforto al kvar membroj – tiuj estas naturo. Estas ordono, kiun nobluloj ne nomas naturo. Bonvoleco en rilato inter patro kaj filo, justo en rilato inter estro kaj subulo, decreguloj en rilato inter gasto kaj gastiganto, intelekto de saĝuloj, sanktuloj en la Ĉiela Vojo – tiuj estas ordono. La naturo estas tiu, kiun nobluloj ne nomas ordono.”²⁴⁸

71 [7B25]

浩生不害問曰：「樂正子，何人也？」

孟子曰：「善人也，信人也。」

「何謂善？何謂信？」

曰：「可欲之謂善，有諸己之謂信。充實之謂美，充實而有光輝之謂大，大而化之之謂聖，聖而不可知之之謂神。樂正子，二之中，四之下也。」

Haosheng Buhai demandis, dirante: “Kia persono estas Yuezhengzi?”

Mengzi diris: “Bona persono, kaj persono kun konvinko.”

Demandis: “Kio estas nomata la bona? Kio estas nomata la konvinko?”

²⁴⁷ Malfermi la grenejon por savi malsatiĝantojn estas konduto de la bonvoleco. Mengzi faris tion antaŭe, sed laŭ tiu teksto li ne volas denove konduti same. Eble, li jam malesperis konsilon al la reĝo kaj decidis forlasi Qi-regnon.

²⁴⁸ La lasta frazo 命也，有性焉，君子不謂命也 estas grava por karakterizi la pensmaieron de Mengzi, konsideranta la altan koron disvolviĝo de la denaska naturo. Ĝenerale la etika koncepto apartenas al ‘libero’ de persona konduto, sed Mengzi nomas tion ordono, samkiel devo de deterministo.

Respondis: “Povi deziri ion estas nomata la bona, havigi al si fidon je io estas nomata la konvinko. Kio estas plena je esenco, tio estas nomata la ‘bela’; kio estas plena je esenco kaj havas lumon-brilon, tio estas nomata la ‘granda’; kio estas granda kaj transformas ion, tio estas nomata la ‘sankta’; kio estas sankta sed neatingeble sankta, tio estas nomata la ‘dieca’. Yuezhengzi havas unuajn du en meza grado, sed lastajn kvar en malalta grado.”²⁴⁹

72 [7B26]

孟子曰：「逃墨必歸於楊，逃楊必歸於儒。歸，斯受之而已矣。今之與楊墨辯者，如追放豚，既入其苙，又從而招之。」

Mengzi diris: “Kiu fuĝis de Mohismo, nepre rifuĝas en Yang-ismo. Kiu fuĝis de Yang-ismo, nepre rifuĝas en Ru, Konfuceismo. Ĉi tiu lasta devus nur akcepti la rifuĝintojn. Tamen nunaj oponentoj al Yang-Mo, kvazaŭ alligus porkojn, fuĝintajn sed enirintajn jam en porkejon, altrudas ilin, por ke ili obeu.”²⁵⁰

73 [7B27]

孟子曰：「有布縷之征，粟米之征，力役之征。君子用其一，緩其二。用其二而民有殍，用其三而父子離。」

Mengzi diris: “Estas impost per teksaĵoj kaj fadenoj, imposto per cerealoj kaj grenoj, imposto per laboro. Noblulo postulas unu el ili kaj postmetas modere la du aliajn. Se postulate du el ili, estiĝas mortintoj pro malsato en la popolo. Se depreni tri, patroj kaj filoj disiĝas.”

74 [7B28]

孟子曰：「諸侯之寶三：土地，人民，政事。寶珠玉者，殃必及身。」

Mengzi diris: “Por landestroj estas tri trezoroj – tero, popolo, politiko. Se ili konsideras perlon kaj jadon trezoroj, tiam ilin nepre atakos la plago.”

²⁴⁹ Haosheng Buhai estas Qi-regnanto. Laŭ tiu respondo koneblas tio, kion Mengzi postulis de siaj disĉiploj krom bonvoleco kaj justo.

²⁵⁰ Iuj prenas la frazon 又從而招之 kiel ligi krurojn de porkoj. Sed mi tradukis laŭ litero. Mengzi ĉi tie kritikas konfuceanojn, kiuj tro zorgas konverti adeptojn de Mohismo kaj Yang-ismo. Ŝajnas, ke Mengzi memkonfidus, ke Mohismo kaj Yang-ismo estas jam tute venkitaj. Pri kritiko far Mengzi vidu [3B9] kaj [7A26].

75 [7B29]

盆成括仕於齊。孟子曰：「死矣盆成括！」

盆成括見殺。門人問曰：「夫子何以知其將見殺？」

曰：「其為人也小有才，未聞君子之大道也，則足以殺其軀而已矣。」

Pengcheng Kuo enoficiĝis en Qi-regno. Mengzi diris: “Pengcheng Kuo mortos!”

Oni vidis, ke Pengcheng Kuo mortis. Lernantoj demandis, dirante: “Kial vi, Majstro, antaŭvidis ĝuste lian morton?”

Mengzi diris: “Kiel personeco, li estas malgranda sed talenta, kaj ankoraŭ ne aŭdis la grandan Vojon por nobluloj. Do estas sufiĉe je la kaŭzo, kial li mortis.”²⁵¹

76 [7B30]

孟子之滕，館於上宮。有業屨於牖上，館人求之弗得。或問之曰：「若是乎從者之廢也？」

曰：「子以是為竊屨來與？」

曰：「殆非也。夫子之設科也，往者不追，來者不距。苟以是心至，斯受之而已矣。」

Mengzi iris al Teng-lando, loĝis en la domo de Supra Palaco. Estis metita unu paro da pajlsandaloj sur la fenestra bazo, la servanto de la domo serĉadus sed ne povis trovi ilin. Iu demandis lin, dirante: “Ĉu, eble, kaŝis ilin sekvanto de Mengzi?”

(Mengzi) diris: “Ĉu vi konsideras, ke ni venis por ŝteli sandalojn?”

(Iu demandinto) diris: “Apenaŭ.”

(Mengzi diris): “Mi fondis la lernejon, kun jena principo – ‘Ne postkuri la forirantan, ne repeli la alvenantan.’ Depende de tiu koro ĉiu ajn estas akceptita.”²⁵²

77 [7B31]

孟子曰：「人皆有所不忍，達之於其所忍，仁也；人皆有所不為，達之於其所為，義也。人能充無欲害人之心，而仁不可勝用也；人能充無穿窬之心，而義不可勝用也。人能充無受爾汝之實，無所往而不為義也。士未可以言而言，是以言誣之也；可以言而不言，是以不言誣之也，是皆穿窬之類也。」

Mengzi diris: “Ĉiu homo havas senton pri io neeltenebla preteratenti malfeliĉon de la alia. Se etendi la senton pri io eltenebla, oni atingas la senton de bonvoleco. Ĉiu homo havas senton pri io ne farenda. Se etendi la senton pri io farenda, oni atingas la

²⁵¹ Pengcheng Kuo estis unu el lernantoj de Mengzi, sed ŝajne foriris de li..

²⁵² En tiu teksto estas malfacile distingi, kiu diris kion al kiu. Estas alia trduko, ke diris la lastan frazon ne Mengzi, sed iu alia.

konscion de justo. Se homoj povus plenigi sian koron per sento ne malhelpi la aliajn, oni ne bezonus speciale uzi la vorton de bonvoleco. Se homoj povus plenigi sian koron per sento ne ŝteli aŭ rabi, oni ne bezonus uzi la vorton de justo. Se homoj povus plenigi sian realan konduton per respekto al la aliaj por ne 'ci-diri' maldece, oni ĉie kaj ĉiam ne povas ne fari juston. Se iu persono parolas, kiam li ne devus paroli, tiuokaze li intencas preni al si ian avantaĝon per tiu parolado; se li ne parolas, kiam li devus paroli, tiuokaze li intencas preni al si ian avantaĝon per tiu senparolado – ĉio estas la konduto simila al ŝtelisto-rabisto.”

78 [7B32]

孟子曰：「言近而指遠者，善言也；守約而施博者，善道也。君子之言也，不下帶而道存焉。君子之守，修其身而天下平。人病舍其田而芸人之田，所求於人者重，而所以自任者輕。」

Mengzi diris: “Bona vorto estas io simple dirita kaj enhavanta profundan signifon. Bona Vojo estas io simple komprenebla kaj vasta je la praktikado. Io dirita de noblulo entenas la Vojon proksime, ne malpli sube ol zono. La disciplino observata de noblulo estas kulturi sin mem kaj doni pacon al la mondo. Estas malsano, ke homoj emas sarki alies kampon, forlasante sian propran kampon, kaj emas postuli de la aliaj ion pezan, tamen de si mem la malpezan.”²⁵³

79 [7B33]

孟子曰：「堯舜，性者也；湯武，反之也。動容周旋中禮者，盛德之至也；哭死而哀，非為生者也；經德不回，非以干祿也；言語必信，非以正行也。君子行法，以俟命而已矣。」

Mengzi diris: “Yao kaj Shun kondutis laŭ sia naturo; Tang kaj Wu kondutis sinreflektante. En tuta agmaniero kaj vizaĝo estis dereguloj, tio estas ja la kulmino de plena virto. Plorkrii pri la mortinto kaj tristi estas ne por la vivantoj. Sekvi la virton sen devie estas ne por la salajro. La vortoj parolataj estas nepre fidindaj, tio estas ne por la ‘akurata’ irado. Noblulo, irante laŭ leĝe, atendas nur la Ĉielan ordonon.”

80 [7B34]

孟子曰：「說大人，則藐之，勿視其巍巍然。堂高數仞，榱題數尺，我得志弗為也；食前方丈，侍妾數百人，我得志弗為也；般樂飲酒，驅騁田獵，後車千乘，我得志弗為也。在彼者，皆我所不為也；在我者，皆古之制也，吾何畏彼哉？」

²⁵³ 不下帶 Ĉiuj esploristoj komprenas tiun frazon kiel bruston, sinon aŭ koron.

Mengzi diris: “Kiam vi konsilos al grandulo, imponu per via digno al li, por ke vi ne vidu lian majestecon giganta. Ĉe li la halo estas alta je kelk-*remoj*, la ĉevrono estas dika je kelk-*chioj*, kion mi ne povus havigi al mi kiom ajn mi deziregus. Ĉe li la manĝtablo estas granda je unu *zhang* kvadrato, da servantaj kromvirinoj estas kelk-cent, kion mi ne povus havigi al mi kiel ajn mi dezirus. Plenplena plezuro kaj drinkado de vino, ĉevalvetkurado kaj ĉasado, kun mil ĉaroj sekvantaj, kion mi ne povus havigi al mi kiel ajn mi dezirus. Kio apartenas al li, ĉio ne akireblas por mi. Ĉio, kio estas ĉe mi, estas antikva valorajo de kulturo. Do kion mi devus timi antaŭ li?”²⁵⁴

81 [7B35]

孟子曰：「養心莫善於寡欲。其為人也寡欲，雖有不存焉者，寡矣；其為人也多欲，雖有存焉者，寡矣。」

Mengzi diris: “Nenio estas pli bona ol nutri la koron en malgrandigo de avido. Inter tiuj, kiuj faras la avidon malgranda, troviĝas perdiĝintoj de koro, sed da tiaj estas malmulte. Inter tiuj, kiuj faras la avidon granda, troviĝas havantoj de koro, sed da tiaj estas malmulte.”

82 [7B36]

曾皙嗜羊棗，而曾子不忍食羊棗。公孫丑問曰：「膾炙與羊棗孰美？」

孟子曰：「膾炙哉！」

公孫丑曰：「然則曾子何為食膾炙而不食羊棗？」

曰：「膾炙所同也，羊棗所獨也。諱名不諱姓，姓所同也，名所獨也。」

Zeng Xi, la patro de Zengzi, ŝatis jujubon, sed lia filo, Zengzi, ne aŭdacis manĝi la jujubon. Gongsun Chou demandis, dirante: “Kiu estas pli bongusta, kebabo aŭ jujubo?”

Mengzi diris: “Kebabo!”

Gongsun Chou diris: “Kial Zengzi manĝis kebabon, sed ne manĝis jujubon?”

Mengzi diris: “La kebabo plaĉas al ĉiuj, sed la jujubo al aparta solulo, lia patro. Tiel same, oni evitas voki iun per la persona nomo kiel tabua, sed ne evitas la familian nomon. La familia nomo estas komuna, sed la persona nomo estas sola.”²⁵⁵

²⁵⁴ La frazo 說大人，則藐之 montras fierecon de Mengzi antaŭ altranguloj por teni digne la memstarecon. Laŭ mi, la frazo admonas, ke ne estu humilaĉa, nek flatema antaŭ potenculoj.

²⁵⁵ Zeng Xi kaj Zengzi ambaŭ estis disĉiploj de Konfuceo. Zengzi estas la aŭtoro de La sutro de fila pietato 孝經.

83 [7B37]

萬章問曰：「孔子在陳曰：『盍歸乎來！吾黨之士狂簡，進取，不忘其初。』孔子在陳，何思魯之狂士？」

孟子曰：「孔子『不得中道而與之，必也狂狷乎！狂者進取，狷者有所不為也』。孔子豈不欲中道哉？不可必得，故思其次也。」

「敢問何如斯可謂狂矣？」

曰：「如琴張、曾皙、牧皮者，孔子之所謂狂矣。」

「何以謂之狂也？」

曰：「其志嚶嚶然，曰『古之人，古之人』。夷考其行而不掩焉者也。狂者又不可得，欲得不屑不潔之士而與之，是獯也，是又其次也。孔子曰：『過我門而不入我室，我不憾焉者，其惟鄉原乎！鄉原，德之賊也。』」

曰：「何如斯可謂之鄉原矣？」

曰：「『何以是嚶嚶也？言不顧行，行不顧言，則曰：古之人，古之人。行何為踽踽涼涼？生斯世也，為斯世也，善斯可矣。』闐然媚於世也者，是鄉原也。」

萬子曰：「一鄉皆稱原人焉，無所往而不為原人，孔子以為德之賊，何哉？」

曰：「非之無舉也，刺之無刺也；同乎流俗，合乎汙世；居之似忠信，行之似廉潔；眾皆悅之，自以為是，而不可與入堯舜之道，故曰德之賊也。孔子曰：『惡似而非者：惡莠，恐其亂苗也；惡佞，恐其亂義也；惡利口，恐其亂信也；惡鄭聲，恐其亂樂也；惡紫，恐其亂朱也；惡鄉原，恐其亂德也。』君子反經而已矣。經正，則庶民興；庶民興，斯無邪慝矣。」

Wan Zhang demandis, dirante: “Kiam Konfuceo vagadis en Chen-lando, diris: ‘Mi revenu hejmen! Personoj de mia partio, naive fanatikaj, progresema, ne forgesas la unuan aspiron.’²⁵⁶ Kion pensis pri la fanatikuloj de Lu-regno Konfuceo, estante en Chen?”

Mengzi diris: “Konfuceo, ‘ne povante akiri irantojn de Meza Vojo, nepre probable serĉis strion de espero inter fanatikuloj kaj puritanoj! Kiu fanatika, tiu progresema; kiu purema, tiu iam intencas nenion fari.’²⁵⁷ Ĉu Konfuceo ne dezirus Mezan Vojon? Vidante tion tute ne farebla, li pripensis la duan.”

Demandis: “Bonvolu diri al mi, kiuj estas t. n. fanatikuloj?”

Respondis: “Tiu, kiel Qin Zhang, Zeng Xi, kaj Mu Pi, estis t. n. fanatikaj laŭ Konfuceo.”

Demandis: “Por kio ili estis nomataj kiel fanatikuloj?”

Respondis: “Ilia strebo estas grandega, ili diradis: ‘Ni estu kiel antikvulo, antikvulo.’ Kion simple ili pensas, tion ili praktikas malkaŝe.

²⁵⁶ Analektoj, la ĉap. Gongyechang 21.

²⁵⁷ Analektoj, la ĉap. Zilu 21

Se ne akireblas al li la fanatikaj, li deziris akiri personojn, kiuj abomenas malpuron – tiuj estas puritanoj, dezirataj kiel la sekva de la dua.

Konfuceo diris: ‘El pasantoj preter mia pordo, iuj ne eniras mian domon. Mi ne bedaŭras, ke ne alvenus tiuj homoj, t. n. provincaj hipokrituloj! Provincaj hipokrituloj estas perfiduloj de virto.’

Demandis: “Kiuj estas t. n. provincaj hipokrituloj?”

Respondis: “Kritikante la fanatikajn, tiuj diras: «Kial ili strebas fiere, parolas sen reflekti la praktikadon, praktikas sen reflekti la paroladon, nur dirante – Antikvuloj, antikvuloj?» Kritikante puritanojn, tiuj diras: «Kial ili kondutas dogmeme kaj memkontente? Se vi vivas en la nuna mondo, faru, kiel mondanoj. Estas bone fari tiel.» Eŭnuk-similaj flatemuloj al nuna mondo estas provincaj hipokrituloj.”

Wanzi diris: “Ĉiuj en la tuta provinco laŭdas ilin kiel bonulojn, kaj ĉie ajn ili agas kiel bonuloj, sed kial Konfuceo konsideris ilin perfiduloj de la virto?”

Mengzi diris: “Provu mallaŭdi ilin, sed nenio mallaŭdinda; provu riproĉi ilin, sed nenio riproĉinda. Ili vivas fluante same, kiel mondanoj, vivas konforme al malpura mondo. Ili tenas sin kvazaŭ lojalaj kaj fidelaj, kondutas kvazaŭ honeste kaj pure. Homamaso ĉiuj ĝojas je ili, kaj ili mem konsideras sin tiaj. Sed ili ne povas eniri en la Vojon de Yao kaj Shun. Tial do estas dirite, ke ili estas perfiduloj de la virto.

Konfuceo diris: ‘Mi malamas tiun, kiu, estante simila, ne estas vera. Mi malamas cinozuron, kiun oni povus konfuzi kun rizido, malamas flatulon, kiun oni povus konfuzi kun justulo, malamas ruzulon, kiun oni povus konfuzi kun fidelulo, malamas kanton de Zheng, kiun oni povus konfuzi kun la muziko, malamas purpuron, kiun oni povus konfuzi kun vermiljono, malamas hipokritulon, kiun oni povus konfuzi kun virtulo.’

Noblulo revenas nur al principo. Se la principo pravas, tiam la simplaj popolamasoj leviĝas; se la simplaj popolamasoj leviĝas, neniigōs la aĉaj kaŝaĵoj.”

84 [7B38]

孟子曰：「由堯舜至於湯，五百有餘歲，若禹、皋陶，則見而知之；若湯，則聞而知之。由湯至於文王，五百有餘歲，若伊尹、萊朱則見而知之；若文王，則聞而知之。由文王至於孔子，五百有餘歲，若太公望、散宜生，則見而知之；若孔子，則聞而知之。由孔子而來至於今，百有餘歲，去聖人之世，若此其未遠也；近聖人之居，若此其甚也，然而無有乎爾，則亦無有乎爾。」

Mengzi diris: “De Yao-Shun ĝis Tang pasis pli ol 500 jaroj, personoj kiel Yu kaj Gao Yao reale vidis kaj konis ilin. Tang aŭdis pri ili, tamen ne konis ilin. Se Tang ĝis la reĝo Wen pasis pli ol 500 jaroj, personoj kiel Yi Yin kaj Lai Zhu vidis kaj konis lin, sed la reĝo

Wen sciiĝis pri li, nur aŭdante. De la reĝo Wen ĝis Konfuceo pasis pli ol 500 jaroj, personoj kiel Taigong Wang kaj San Yisheng vidis kaj konis la reĝon, sed Konfuceo sciiĝis pri li, nur aŭdante. De Konfuceo ĝis nun pasis pli ol 100 jaroj, post la forpaso de la sanktulo la tempo pasis ne malproksime, kaj krome ni loĝas tre proksime al loĝloko de la sanktulo. Sed tamen postsekvas lin krom mi neniu – tiel do lin sekvas neniu krom mi.”²⁵⁸

²⁵⁸ Lai Zhu estis ministro ĉe la reĝo Tang, iu konsideras ke li estas Zhong Hui 仲虺, kiu regis 薛. Sanyi Sheng estis unu el kvar ministroj ĉe la reĝo Wen. Ĉirkaŭ la lasta frazo 無有乎爾 ekzistas diversaj opinioj inter esploristoj, do mi tradukis laŭ kuntekste. La ideogramo 爾 havas ĝenerale signifon ‘vi, ĉi’.

POSTPAROLO PRI MENCIO

En la libro, titolita “Mencio” 孟子, estas registritaj la eldiroj kaj la agado de Mencio, kiu estas honorata kiel la dua pleja sankta pensulo 亞聖 post Konfuceo. Granda estas la influo de Mencio al ĉinoj, koreanoj kaj japanoj, kiuj estis iam fervore lernantaj konfuceismon en diversaj epokoj. Kiu do estis la aŭtoro de “Mencio”?

Iuj konsideras Mencion mem la aŭtoro de la libro, titolita “Mencio”, kiel konstatis Sima Qian 司馬遷, k. a. La kialo estas laŭ kohera enhavo de eldiroj. La aliaj konsideras disĉiplojn de Mencio aŭtoroj. Han Tuizi 韓退之, k. a. La bazo de ilia argumento kuŝas laŭforme en tio, ke la nomoj de reĝoj estas skribitaj per la postmortaj nomoj kaj la nomo de Mencio – kun respekta sufikso “子-zi”. Ankaŭ troviĝas eklektikaj opinioj, ke iuj ĉapitroj estas verkitaj per propra mano de Mencio mem kaj la aliaj – per manoj de disĉiploj.

VIVO KAJ AGADO

Biografio de Mencio estas ege malklara pro tio, ke diversas datoj laŭ kalendaroj. Kelkaj skribas, ke li vivis en 391-308 a. K. (ĉefe laŭ Historio de ses regnoj en *Shiji* 史記 de Sima Qian), tamen multaj esploristoj nun supozas, ke Mencio naskiĝis la duan tagon de la kvara monato en 372 a. K. en Zou-lando 鄒, kaj mortis en 289 a. K. (depende de *La Bambua Kroniko* 竹書紀年). Mencio mem diris, ke li naskiĝis ĉirkaŭ cent jarojn poste de la morto de Konfuceo. Nunaj esporistoj inklinas al la dua opinio.

Estas dirite, ke familinomo de Meng devenis de Meng Sun, unu el filoj de la duko Huan (711-694 a. K.) de Lu-regno. Sed se juĝi laŭ la legendo de lia patrino, verŝajne, li naskiĝis kaj kreskis ne en riĉa altranga familio, sed en la familio de vidvino. Sima Qian skribis:

Meng Ke[Mencio] estas Zou-landano. Li lernis ĉe disĉiploj de Zi Si 子思. Post la ellernado de Vojo ekservis al Xuan, la reĝo de Qi-regno. La reĝo Xuan ne povis utiligi la kapablon de Mencio, do ĉi tiu foriris al la urbo Liang. La reĝo de Liang ne povis kompreni tion, kion diris Mencio. La reĝo konsideris lian opinion tro ĉirkaŭira, ne konformanta al realeco. Tiutempe, en la Qin-regno oni enkondukis la politikon de Shang Yang por la regna riĉigo kaj arma fortigo. La regnoj de Chu kaj Wei adoptis taktikon de generalo Wu Qi por venki en militoj kaj por malfortigi malamikojn. La reĝoj de Qi-regno, Wei kaj Xuan, dungis taktikistojn Sun Bing kaj Tian Ji, kaj landestroj turnis sin orienten subiĝeme al la Qi-regno. Oni en la tuta

subĉiela mondo klopodis nur por t. n. perpendikla koalicio aŭ vertikala alianco 合從連衡, kaj tiel rigardis la atakadon-konkeron sagaca. Sed Meng Ke predikis pri la virto de tri generacioj de Sanktaj reĝoj, Tang-Yu. Tial li ne konformis al la samtempa kuranta realeco. Eksiĝinte, li verkadis librojn kune kun siaj lernantoj, kiel Wang Zhang, prezentadis la ideojn de Zhong Ni, kaj komponis la libron de Mencio, konsistantan el sep ĉapitroj.²⁵⁹

Laŭ tiu priskribo, la ĉapitroj de libro “Mencio”, kiun legis Sima Qian, estis vicigitaj alie ol ni vidas nun, ĉar li rigardis la aŭdiencon de Xuan, la reĝo de Qi-regno, pli frua ol tiun de Hui, la reĝo de Liang. En la libro de Zhu Xi 朱熹 estas skribite laŭ Yang Xiong 楊雄:

La libro de Mencio postulas la rektigon de la homa koro kaj la kreskigon de la koro laŭ la denaska naturo, ne lasante interalie la koron agi arbitre libervole kiel 収其放心(Laissez faire). Parolante pri bonvoleco, justo, decreguloj kaj intelekto, li faras la korinklinon de kunsuferemo, hontemo, cedemo kaj distingo kiel gravan motivon. Rilate al malutilo de hereza pensmaniero, li predikas ĝian dangerecon de malbona influo al la politiko. Se temas pri la servado al estroj, nepre necesas korekti la eraron, se la koro de la estro misagas. Se la estro rektiĝas, la regno iĝas stabila.²⁶⁰

Mencio asertas, ke homo estas bona laŭ la denaska naturo, do li havas al si la firman konvinkon, ke ajna homo povas fariĝi bona. Sed li ne prenis la pozicion de Laozi-Zhuangzi 老莊, lasantan al homoj vivi libere laŭ la naturo. Yang Xiong skribis: “Sekvi la denaskan naturon estas vivi konforme al la Ĉiela rezono 天理.”²⁶¹ Post 13 jc., kiam Zhu Xi inkluzivigis la verkon de Mencio en la kvar librojn kaj la kvin sutrojn 四書五經, la ideo de Mencio havis grandan influon sur la orient-aziaj landoj. La penso kaj agmaniero de Mencio fariĝis la modelo de inteligencio, strebanta al la savado de popoloj.

PREDIKO-VAGADO DE MENCIO

Escepte de Historio de Qin-regno, ĉiuj libroj pri la historio de regnoj estis bruligitaj. Kaj en la libro de Qin estis skribite pri la datoj tre malklare. Sima Qian kompilis la tablon de Historio de ses regnoj, sed estas la diferenco de datoj inter fontoj: *Shiji* kaj

²⁵⁹ *Shiji* 史記孟荀列傳

²⁶⁰ 朱熹『四書集注(下)』東京、明德出版社、p72, 朱子学体系 8, 1972

²⁶¹ *Samloke* 73

Bambua Kroniko [Historio de Wei-regno ĝis la 20-a jaro(299 a. K) de la reĝo Xiang]. Aldone tiam la jaro komenciĝis de la unua monato en oktobro. Do ne eviteblas ekarto je jaroj. Nunaj historiistoj pri Mencio inklinas apogi sin sur la *Bambua Kroniko*. Laŭ ĝi la surtrona periodo de la reĝoj Hui kaj Xuan descendas je 20 jaroj ol laŭ *Shiji*. Kaj tio pli konformas al historiaj okazintaĵoj. Koncerne de la renkontiĝo de Mencio kaj la reĝo Hui, tio okazis en 322 aŭ 321 a. K. La renkontiĝo kun la reĝo Xuan de Qi-regno – en 319 aŭ 318 a. K. Diversas opinioj pri la tempo de lia servado en la lando Teng, (iuj supozas post la servado en Qi-regno).

- 402 a. K. Zi Si 子思, nepo de Konfuceo, mortis.
- 372 Naskiĝis Mencio en la lando, nomata Zou 鄒.
- 362 Wei-regno 魏 translokigis la ĉefurbon al Da Liang 大梁.
- 341 Filo de la reĝo Hui de Wei-regno 申 iĝis militkaptita en la milito Maling.
- 338 Shang Yang 商鞅 estis mortigita.
- 336 Komencis la predik-vagadon.
- 334 Hui, la reĝo de Wei, laŭ la plano de Huishi 惠施 renkontiĝis kun regnestroj, kaj nomiĝis Wang 王.
- 330 Wei-regno donis al Qin-regno la teritorion okcidentan de rivero.
- 328 Zhang Yi 張儀 fariĝis la ĉef-ministro de Qin-regno.
- 322 Zhang Yi fariĝis la ĉef-ministro de Wei-regno.
- 322 Tian Ying-zi 田嬰子 estis feŭdita en Xue 薛 de Qi-regno.
- 323 Chu-regno venkis Wei-regnon ĉe Xiang Ling.
- 321 Aŭdienco per la reĝo Hui en Liang 梁惠王. Su Qin 蘇秦 mortis.
- 319 Aŭdienco per la reĝo Xiang 襄 en Liang. Mencio iris al Qi-regno.
- 319 Aŭdienco per la reĝo Xuan 宣王 de Qi-regno. Revigliĝo de la rondo de pensuloj en la ĉefurbo de Qi-regno 稷下之学.
- 318 Vertikala Alianco de kvin regnoj 合從 estas venkita de Qin-regno.
- 318 Meng Chang-jun 孟嘗君 fariĝis ministro de Wei-regno 魏.
- 317 Zhang Yi denove fariĝis la ĉef-ministro de Qin-regno.
- 316 La reĝo de Yan-regno, Hui 噲, cedis tronon al Zi Zhi 子之.
- 314 Qi-regnaroj venkobatis Yan-regnon.
- 312 Iris al Song-regno, survoje renkontiĝis kun Song Keng 宋輕 en Shiqiu.
- 312 Yan-regnaroj ribelis kontraŭ Qi-regno.
- 308 La dukto Wen de Teng-lando renkontiĝis kun Mencio survoje al Song-regno.
- 306 La dukto Ding de Teng-lando forpasis. Ran You demandis pri la funebro.
- 304 Mencio pasloĝis en la supra palaco de Teng-lando.

- 303 La disĉiplo Yuezheng-zi estas postenigita je alta rango en Lu-regno.
 301 Mencio ne ricevis aŭdiencon de la duko Ping de Lu-regno.
 298 Qu Yuan 屈原 mortis.
 289 Mencio mortis. Zhuang-zi 莊子 mortis.

Instrui reĝojn-landestrojn kaj prediki al ili la konfuceisman politikan idealon pri la regado estas la plej grava celo de Mencio. Por kio li vagadis de landoj al landoj kun granda kolektivo de siaj disĉiploj kaj lernantoj.

Laŭ la vicordo de la libro, estas skribite, ke unue Mencio predikis al la reĝo Hui de Liang (Wei) pri graveco de justo en la regado. Post la morto de la reĝo Mencio forlasis la regionon, ne povante esperi al la sekva reĝo Xiang. Sekve Mencio estis invitita kiel la vizitanta ministro 客卿 en Qi-regno sub la reĝo Xuan, kun kiu troviĝas multe da konversacioj en la ĉapitroj de *Mencio*. Mencio esperis al Xuan kaj atendis la efektivigon de ideala politiko en Qi-regno. Sed kontraŭ la espero Mencio devis forlasi la Qi-regionon. Atendante ne nur de grandegaj regnoj, sed ankaŭ de malgrandaj landetoj, Mencio konsilis landestron de la lando Teng 滕, la duko Wen 文公, do estadis multe da enhavoriĉaj konversacioj inter ili. Mencio volus fari la landon Teng modelon por sia realigo de konfuceisma ideo.

Kun la duko Ping 平公 de Lu-regno Mencio ne povis renkontiĝi, malgraŭ ke la peranto estis lia disĉiplo. Interalie, Mencio ricevis monon de Song-regno, kaj de la lando Xue 薛, kie iam regis la fama Meng Changjun 孟嘗君.

Estas notinde, ke iom poste pereis ĉiuj regnoj kaj landoj, kiujn Mencio vizitadis: Song estis detruita de Qi en 286 a. K., Qi estis venkita de alianco sub la generalo Yue Yi 樂毅 en 284 a. K., Lu estis pereigita de Chu en 256 a. K. Pri la tempo de la servado al la reĝoj Xuan kaj Hui, multaj esploristoj, kontraŭ Sima Qian, prenas la servadon al Hui pli frue ol al Xuan.

EPIZODO PRI LA PATRINO

Pri la mortotempo de lia patro ankaŭ diversas opinioj. Laŭ *Biografio de elstaraj virinoj* 烈女傳 lia patro mortis, kiam li estis 3-jara, sed laŭ la ĉapitro Liang Hui 梁惠王 de *Mencio*, estas skribite, ke li plenumis la taskon de funebro por sia patro, kiel la rango de Shi 士 kavaliro. Ŝajnas, ke diversus la informoj pri la tempo de morto de lia patro. Sed estus nekredeble, se la aŭtoro de *Biografio de elstaraj virinoj* ne legus la libron de *Mencio*. Laŭ mia kompreno, la funebro de la patro plenumis la postlasita familio, t. e. patrino kaj trijara filo.

Nomo de patro estis 激公宜 Ji Gongyi, nomo de lia patrino estis 伋 Zhang. La patrino mortis, kiam Mencio estis grandoficisto de Qi-regno, do li funebris la patrinon pli lukse ol la patron. Sed pro tio kalumniis la asiduisto al la duko Ping 平公 de Lu-regno, tiel do sub tiu preteksto la duko malakceptis Mencion.

En la vivo de juna Mencio la patro restas en ombro de la patrino tiom, ke estas fidinda la informo, ke la patro mortis tre frue. Fama estas la epizodo 'Instruo pri trifoja translokiĝo far la patrino de Mencio. 孟母三遷' Tia decido estus nefarebla al ŝi sola, se vivus la edzo. Estas skribite en La Instruo pri trifoja translokiĝo jen tiel:

Familio de Mengzi loĝis najbare de tombejo, lia patrino vidis lin ludanta funebradon kaj ŝi pensis, ke tiu loko ne estas konvena por eduki la filon, do ŝi translokiĝis apud merkato. Tie ŝi trovis sian filon ludanta negacadon, kaj pensis, ke ankaŭ tiu loko ne estas bona. Do ŝi translokiĝis al la najbaro de lernejo. Tie ŝi trovis la filon ludanta riton kaj decregulojn, do ŝi finfine decidis tie kreskigi la filon.

La epizodo rakontas, kiel granda estas la influo de patrino, kaj kiel decida estas ĉirkaŭa kondiĉo en la formiĝo de personeco. En aziaj landoj oni lernas la gravecon de medio pere de tiu epizodo. Alia fama epizodo estas ke la patrino admonis sian filon daŭrigi la lernadon, rompinte la teksadon sur teksilo.:

Aŭdinte, ke la filo lernas malserioze, la patrino rompis la teksaĵon kaj diris al li, ke maldiligenta lernado estas sama, kiel perdo de laborprodukto mezvoje. Mencio profunde pentis sian maldiligentecon, kaj okupiĝis je la lernado pli serioze, kiel disĉiplo en la skolo de konfuceano Zi Si. (Epizodo pri la rompo de teksaĵo 孟母斷機)

Epizodo, ke la patrino disrompis teksaĵon 斷機, okazis dum la lernado de Mencio. Li mem konfesis, ke li ekmemlernis, respektante iun konfuceanon kiel sian instruiston 私淑. Estas skribite en *Shiji*, ke Mencio lernis en la skolo de Zi Si, la nepo de Konfuceo, do li lernis ĉe iu el disĉiploj de Zi Si. En la libro Mencio estas menciite pri Zengzi 曾子 multfoje. Tio signifas, ke Mencio apartenas al la skolo de konfuceanoj, heredintaj la skolon de Zeng Chen kaj Zi Si. Eble ekzistis privata lernejo, kie estis instruate ĉefe pri doktorinoj de la skolo. Aŭ la lernejo similas al Xiangxu xuexiao 庠序學校, proponata de Mengzi en la ĉapitro La duko Wen de Teng.

La epizodo de la patrino montras, ke la daŭrigo estas esence grava por fari la lernadon perfekta, kaj kiel grava estas la alta aspiro de la patrino al la infanoj. Virinoj

en orienta Azio, lernantaj la epizodojn pri la patrino de Mencio, strebadis eduki siajn filojn laŭ la severecco de la patrino.

Post kiam Mencio edziĝis, li iam volus divorci pro maldeca konduto de sia edzino. La patrino de Mencio deadmonis al sia filo, ke li mem estis kulpa je sia malprudenta konduto.

Iam edzino de Mencio estis sidanta sidvange rekte sur la planko kun kruroj malfermitaj. Enirante la pordon, li vidis ŝin tia, kaj diris al sia patrino: 'Al mia edzino mankas deco, permesu min divorci de ŝi.' La patrino diris: 'Kion ŝi faris?' Li diris: 'Ŝi estis sidanta glutee sur la planko kun kruroj malfermitaj.' La patrino demandis: 'Kial vi eksciis tion?' Li respondis: 'Mi mem vidis tion.' La patrino diris: 'Mankas deco ne al ŝi, sed al vi, ĉar estas dirite en decreguloj, ke, enirante pordon, unue demandu, ĉu estas iu ene aŭ ne; suprenirante la halon, nepre anoncu laŭte. Antaŭ ol eniri pordon, nepre atentu humile por ke ne hontigu la alian pro senpreteco. Nun vi iris al la edzino, kaj, enirinte senvoĉe, vidis ŝin sidanta kun kruroj malfermitaj. En tio, pro manko de decreguloj kulpas vi, sed ne kulpas via edzino.' Tiel do Mencio akuzis sin mem, kaj ne divorcis de la edzino. 韓詩外傳

Laŭ ĉi tiu epizodo, granda estis la influo de la patrino sur la filo eĉ je la hejma eduko de decreguloj. Mencio kutimiĝis al decreguloj dank' al sia patrino. Estas esploristo Cui Dongbi 崔東壁, kiu dubas la realecon de epizodoj, sed tiu epizodo pri la divorco de Mencio estis tiom fama, ke ankaŭ Xunzi 荀子 citas ĝin.

Estas la alia epizodo, ke la patrino kritikis sian filon, Mencion, pro ŝanceliĝo je decido pri sia retiriĝo pretekste de fila devo al la patrino.

Kiam Mencio loĝis en Qi-regno, li aspektis trista, apogante sin al pilastro. Vidante lin, la patrino diris: 'Kial vi ĉagreniĝas?'

Li respondis: '<...> 'Nun ne uzate bone en Qi-regno, mi dezirus foriri. Sed havante la patrino maljunan, mi ŝanceliĝas triste.'

Lia patrino diris: 'La decreguloj de virino kuŝas en la skrupula zorgado prepari kvin manĝaĵojn kaj aranĝi da vinoj kaj trinkaĵoj, kaj nutradi gebopatrojn kaj kudradi vestaĵojn. Do virino havas devon ene de la hejmo, ne havas deziron trans tia limo de konduto; ne havas scion de justo en la politiko, sed havas la vojon de trifoja obeo – t. e. en la juneco obeu la gepatrojn, post geedziĝo obeu la edzon, post la morto de edzo obeu la filojn, jen kio estas laŭ decreguloj. Nun la filo plenkreskis, kaj mi maljuniĝis. Vi iru, kaj ankaŭ mi faru la saman juston de mia

filo. Je kio do mi ĉagreniĝas, sekvante decregulojn de mia filo?' 烈女傳

La epizodoj transdonas al posteuloj, kiel granda estis la edukado hejme, t. e. la influo de la patrino al la formiĝo de virta personeco por filoj. Aŭ postaj konfucenanoj faris la epizodon de patrino gravega por kreskigi personecon kiel bonan konfuceanon. Mencio, kreskante en la senpatra familio, havigis al si memstaran devsenton helpi vidvinon. Epizodo de la patrino montras, ke la denaska naturo povas kreski nur per la severa hejma edukado far la patrino, kiu mem havas altan aspiron. La alta celo de vidvino nepre transdoniĝas al la filo, kies fila pietato sen la patro iĝas profunda devsentto subteni la patrinon. Tio, verŝajne, estis la fundamento de forta karaktero ĉe Mencio mem.

KRITIKO AL LA IDEOLOGIO DE YANGZHUISMO KAJ MOHISMO: NEADO DE PROFITAMO

Mencio starigis al si la taskon disbati tiamajn ĉefajn skolojn, kiel mohismon kaj Yangzhuismon 楊墨. Devizo de mohismo estas '兼愛交利' Universala amo kaj reciproka profitigo', kaj devizo de Yang Zhu 楊朱 estas ultraliberalismo kaj egoismo. Mencio rigardas ambaŭ skolojn similaj unu al al alia surbaze de la laŭdado de profito-utileco.

Mencio diris: "Yangzi tenis sin favore al egoismo nur por si mem, kaj eĉ se surkoste de lia unu hareto povus esti profiteble al la mondo, li ne volis fari por la aliaj. Mozi predikis la universalan amon, kaj sinoferante kun kapo kalviĝinta kaj kun kalkanoj disfrotitaj, li praktikis la amon por profiti la mondon." [7A26]

Bedaŭrinde restas neniuj skribita de Yang Zhu, krom unu ĉapitro en *Liezi* 列子, traktanta la disputon inter Yang Zhu kaj mohisto Qin Guli. Tie estas skribite:

"Movu vin mem laŭ via propra koro, ne kontraŭante al la naturo, kaj ne forlasu la ŝatatan de vi plezuron, kiu konformas al via korpo. Ne faru ion, instigate per nominala honoro. Ludadu laŭ via naturo, ne kontraŭante al ĉio."²⁶²

"Ne kontraŭi al la naturo" – tia divizo similas al la pensmaniero de Laozi 老子 kaj Zhuangzi 莊子. Mi opinias, ke la liberalismo de Yang Zhu similas al la ideoj de Laozi-Zhuangzi 老莊. Ke la pecoj de lia eldiro estas restigita en *Liezi*, tio atestas la

²⁶² *Liezi*, Yang Zhu2, p. 171 從心而動、不違自然、從性而遊、不逆萬物

apartenon al la skolo de Lao-Zhuang. Sed tia opinio, ke “oni devas kondukti sekvante sian koron”(從心), estas transsalto de taoismo al egoismo, ĉar la taoismo predikas la obeon al la naturo. Yang Zhu diras:

Sen la moralo de lojaleco-justeco, la supra kaj subo ĉiuj trankvile povas vivi kaj homoj mem unu la aliaj kune ĝuas profiton – jen tia estis la ideala ekzistado de la antikva societo.”²⁶³

La simileco de la pensmaniero de Yang Zhu al tiu de Laozi kaj Zhuangzi videblas ankaŭ en la suba eldiro. Yang Zhu predikas, ke oni lasu ĉion laŭ la naturo.

Homo, se naskiĝis, lasu sin laŭ la naturo, forĵetinte ajnan kalkulon, faru ĉion, kio deziras... ²⁶⁴

Tian pensmanieron oni povas vidi en *Zhuangzi*. Originala opinio de Yang Zhu estas en lia kritiko de mohismo pro ideo pri tutmonda profitigo:

Se homoj ne intencus viktimiti eĉ unu hareton por la aliuloj, nek profitigi la mondon, tiam efektiviĝus la vera paco en la mondo.²⁶⁵

La ideo de egoismo ĉe Yang Zhu aperis rezulte de la kritiko de la universala amo de mohismo. Kaj Mencio skribas, ke la adeptoj de mohismo transiris al Yangzhuismo.

Mencio diris: “Kiu fuĝis de Mohismo, nepre rifuĝas en Yang-ismo. Kiu fuĝis de Yang-ismo, nepre rifuĝas en Konfuceismo.” [7B26]

En la libro *Mencio*, ne estas menciitaj rekte la nomoj Laozi kaj Zhuangzi. Mi supozas, ke kritikante Yang Zhu, Mencio kritikis ankaŭ taoismon de Laozi-Zhuangzi. Esploristoj opinias, ke la ideologio de Yang Zhu estas ekstrema individualismo aŭ egoismo. Mi konjektas, ke lia pensmaniero similas al utilismo, konsideranta la personan liberecon plej grava. Se Yang Zhu povus disvolvi sian ideon, li atingus liberalisman ekonomikon surbaze de merkato kaj principo de *Laissez faire* (*Lasu fari*), similan al fundamenta principo en nuntempa kapitalismo. Sed tre bedaŭrinde perdiĝis lia ideo en la historio de

²⁶³ Samloke, *Liezi*, ĉap. 7, 17

²⁶⁴ Samloke, *Liezi*, ĉap. 7, 10

²⁶⁵ Samloke, *Liezi*, ĉap. 7: 11

Ĉinio.

Ankaŭ Mozi vidas profitigon grava, ne individuan, sed reciprokan(兼愛交利). Ideologio de Mozi estas rigardata kiel prototipo de komunismo kaj socialismo. Tial do Mencius kritikis Yangzhuismon kaj mohismon pro inklino al liberalismo, anarĥismo, socialismo kaj komunismo, kiel pensmanieron je la ignorado de patro kaj reĝo 無君·無父. Yang Zhu, aperinte post Mozi, pledis por la supereco de individua profito ol reciprokeco. Mencio severe kritikis ambaŭ Yan Zhu kaj Mozi jene:

La mondo iĝis plenigita per vortoj de Yang Zhu kaj Mo Di. Amasopinoj de la mondo apartenas se ne al Yang, tiam al Mo. Yang pledas por egoismo, tio implicas neniigon de suvereno. Mo pledas por universala Makroamo, tio implicas neniigon de patroj. Neniigi la patrojn kaj suverenon estas egale al rabobirdoj kaj bestoj. <...> Se ne ĉesas la Vojoj de Yang kaj Mo, ne elmontriĝas la Vojo de Konfuceo. Dum falsaj ideoj trompas la popolon, estas ŝtopitaj la bonvoleco kaj la justo. Se ŝtopitaj la bonvoleco kaj la justo, tiam oni lasus la bestojn formanĝi homojn kaj homoj manĝus homojn unuj la aliajn reciproke. Mi timas tion kaj gardas la Vojon de antaŭaj sanktuloj, kontraŭante al Yang kaj Mo, al arbitraj diboĉaj vortoj, por ke ne povu disvastiĝi falsaj ideoj. [3B9]

En ĉi tiu citaĵo estas dirite pri la rilato inter konfuceismo kaj Yan Zhu-Mozi, per la forta frazo. Mencio konstatas, ke sen konfuceismo la mondo estus forlasita en kaoso de bataloj, kie “homoj manĝus homojn.”

MOHISMO

Kiel ni vidas en *Mencio*, la ideo de Yang Zhu aperis post la ideo de Mozi. Mozi, kritikante Konfuceon, konstruis sian ideon de universala amo 兼愛(makroamo). Unue ekzistis la konfuceisma ideo pri aparta amo 別(mikroamo), distinganta diferencon aŭ diskriminacion inter klasoj. Mozi predikis la egalrajton inter homoj, estimante egalan homan valoron. Mencio konsideris la egalismecan ideologion de Mozi malhelpanta la konfuceanisman, laŭdantan obeon de la subo al la supro.

Yang Zhu siavice estimas la propran individuan valoron, eĉ insistas ekstreman egoismon kontraŭ la universala amo kaj reciproka profitigo en Mozi. Tiu egoismo memorigas nin pri la protagonisto en “*La Notoj el Subtera Kelo*” de F. M. Dostoevskij kontraŭ la racia egoismo en “*Kion Fari*” de N. G. Ĉernyševskij. Li krias: “Lasu la mondo eĉ pereu, estus bone, se mi povus trinki teon!”

Mencio retaksis la konfuceismon, tra la kritiko de Mozi kaj Yang Zhu, t. e. tra egalismo kaj tra egoismo denove al la ideo de bonvoleco kaj justo surbaze de fila pietato. Gravas, ke post la kritiko de Mozi kaj Yang Zhu estis predikita de Mencio ankaŭ lia egalismeca politekonomio, ekzemple, pri “naŭonaĵa reĝimo”(井田法), kaj la ideo de persona digno simila al individualismo de Yan Zhu, kion ni vidas en la fiera sendependa sinteno de Mencio al reĝoj. Tiel do Mencio provis, laŭ mia opinio, ne nur kritiki, sed, ĉerpante bonajn flankojn de antaŭirintoj, alte transpaŝi (aŭfhebi) ambaŭ ideojn.

Sed tamen, el la vidpunkto de Mencio, kaj egoismo de Yang Zhu kaj altruismo de Mozi estas la samaj je la fundamento, ignorantaj distingon inter la supra kaj la subo. Mozi konsideris la distingon de rangoj neeterna, dirante: “oficistoj ne ĉiam estas altrangaj, popolanoj ne ĉiam estas malaltaj” (官無常貴、而民無常賤) Konfuceismo prenas la ekziston de diskriminacio kiel la realan premison, kaj serĉas laŭjustan distingon de klasoj kaj ilian akordiĝon pere de decreguloj. Kritikis la distingon-diskriminacion la alia ideologo Zhuangzi 莊子, samkiel Mozi. Mencio, kvankam respektas la popolon, tamen konsideras la rilaton inter la subo kaj supra la bazo de firma societo, do apogas sin al la fundamenta instruo en “*Analektoj*”, pri la distingo de supra kaj subo:

You-zi diris: “Inter homoj, respektantaj gepatrojn kaj pliaĝajn fratojn, apenaŭ troviĝas da ofendemuloj al supra. Inter neofendemuloj al supra neniam troviĝas ribelemuloj. Noblulo klopodas por fundamento. Sur la firma fundamento naskiĝas la vojo. Fila pietato kaj respekto al pliaĝuloj estas ja la fundamento de bonvoleco, nomata Ren 仁(Bonvoleco).”[*Analektoj* 0102]

Konfuceismo kombinis la koncepton de fila pietato kaj respekto de pliaĝuloj kun ekzistanta tradicio de decreguloj. Rilate al decreguloj estas skribite en *Shiji*:

Decreguloj havas la originon en la homo mem. La homo havas denaske la deziron. Se estas io, kion oni ne povas havigi al si, tiam oni ne devas ne kolero je tio, rezulte, perdinte paciencon, kverelas pro la kolero, kaj finfine okazigas malordon. Antikvaj reĝoj malamis la kaoson, do establis decregulojn por ke oni estu edukita je sinregado de la deziro, por ke la provizaĵoj ne manku pro troa dezirego, por ke la aĵoj kaj la deziroj harmonie kreskas unu kun alia. Jen kio estas origino de decreguloj. Do decreguloj estas la nutrado de homoj.²⁶⁶

Laŭ *Shiji* (kaj laŭ *Xunzi* 荀子), decreguloj formiĝis por preventi aŭ mildigi la

²⁶⁶ *Shiji*, Decreguloj1 史記礼書 (第一)

klasbatalojn. Mencio konsideras la profitamon detruanta la societon kaj la regnon per la konkurenco inter homoj, inter regnoj. Do li starigis la filozofion, kiu ne lasas homojn obei al egoismeca profitamo, sed al kompatema “bona” denaska naturo kaj la denaska bonvolemo. Tiu vivmaniero eblas nur laŭ konfuceismo kun decreguloj. Se depende de Yang Zhu kaj Mozi ne deteneblas la ŝpruco de la klasbatalo, do Mencio severe kritikis la ideologion de Yang Zhu kaj Mozi, akuzante ilin aprobantaj ‘profitamon’ kiel la fundamentan motivon de la homa konduto.

El la vidpunkto de Mencio, la ideo de Mozi sub la nomo de universala Makroamo 兼愛 detruas la Mikroamon 別, t. e. la alligitecon al la propra proksima komunumo, kiel familio, societo, nacio. Laŭ Mencio, “la universala amo de Mozi mortigas patron 無父”, t. e. kontraŭas al la fila pietato. La universala amo ne estas facile praktikebla, ĉar ĝi estas pli abstrakta, ol fila pietato kaj obeemo al pliaĝuloj. La lasta estas pli konkreta kaj pli facile praktikebla, ĉar ĝi estas necesa por la bonordo en familio kaj societo, kvankam ĝi ofte restas limigita mikroamo (aparta amo) ene de malvasta sfero, kaj aldone ofte okazadas konflikto inter fila pietato en familio kaj obeo al la supro en societo kaj regno, kaj plue okazadas konflikto inter nacioj, ĉiu el kiuj havas apartan amon al si mem, t. e. naciismon. Disputo inter mohistoj kaj konfuceanoj, disputo inter universala makroamo kaj aparata mikroamo, daŭras por eterne ĝis nuna tempo, kiel disputo pri internacismo kaj naciismo. Mozi konsideris, ke universala amo kaj reciproka profitigo solvas konflikton inter homoj. Laŭ Mencio, konflikto inter homoj estas solvebla surbaze de la etendigo de fila pietato 孝悌 per bonvoleco, justo, decreguloj, saĝeco kaj fido 仁義礼智信. Decreguloj ne nur ludas rolon de firma kunligilo inter familianoj kaj societanoj, sed ankaŭ en la praktikado de decreguloj estas hardigata la konscio de persona digno. Homo fariĝas individua persono, respektante kaj respektate en sia ĉirkaŭanta sfero. Kaj la konkreta esprimo de la respektado estas formulita detale per reguloj kaj ritoj – tio estas ‘decreguloj’. Kaj infano fariĝas moraleca persono, nur kutimiĝante al decreguloj. En la ideologio de Mozi kaj Yang Zhu mankas tiu procedo por formiĝo de personeco. Do Mencio kritikis ilian ideon pro “mortigo de patro kaj reĝo”, kio estas pensmaniero de rabobirdoj kaj bestoj 禽獸.

Mi opinias, ke, kritikante antaŭirintojn, Mencio ne reĵetis fortan flankon de iliaj argumentoj, sed ekstraktis de ili kvintesencon de iliaj idealoj. De Mozi li heredis la pensmanieron de egalrajta sociordo surbaze de amo al la popolo, kaj de Yang Zhu – persona sendependeco-memstareco.

TEORIO DE MORALAJ SENTOJ

Argumento de Mencio pri kompatemo similas al teorio de morala sento ĉe Adam Smith. Adam Smith diris en sia verko pri morala sento jene:

Kiel ein egoismeca povas la homo esti supozata, en lia naturo evidente troviĝas iuj principoj, kiuj interesas lin pri la sorto de aliuloj kaj redonas al ili feliĉon, necesan al li, kvankam li ricevas nenion de tio krom la plezuro vidi tion. Apartenas al tiu speco de principoj – kunsuferemo aŭ kompato, la emocio, kiun ni sentas por la mizero de aliuloj, vidante ĝin aŭ devigite koncepti ĝin en tre viveca maniero.²⁶⁷

Samkiel Adam Smith, ankaŭ Mencio pledis por la kunsuferemo kaj kompato anstataŭ la egoismo la plej gravan homan senton, kiu faras homon moraleca, faras la societon firma, faras la landon paca. Mencio uzas por esprimi tiun senton la frazojn: “kvar virtoj de la koro” [四端心].

Mencio diris: “Ĉiu homo havas tian koron, kompateman, ke estas neelteneble vidi la alian suferanta. <...> – vidante infaneton nun falonta en puton, ĉiu ajn ekavertas por savi ĝin kun la pura koro kompatema, ne pro tio, ke tiu havus la rilaton kun gepatroj de infaneto, nek pro tio, ke li volus esti laŭdota de samvilaĝanoj aŭ amikoj, nek pro tio, ke li timus malbonan voĉon el lia societo. <...> La kompatema koro estas la komenco de bonvoleco, la koro de honto al malbono estas la komenco de justo, la humila koro de cedemo estas la komenco de decreguloj, la koro de distingo je praveco kaj malpraveco estas la komenco de intelekto. Persono havas al si tiuj kvar fontojn same, kiel kvar membrojn de korpo.”[2A6]

Mirinda estas la simileco inter Adam Smith kaj Mencio rilate al moralaj sentoj. Granda diferenco kuŝas en tio, ke la unua konstruis teorion de ekonomiko surbaze de profitamo, malŝatata de la dua, kaj tiel do Adam Smith, diference de Mencio, aprobas la profitamon en sia alia verko “*Riĉo de Nacioj*”, dirante:

“Ke ni manĝas ĉiutage estas ne dank’ al bonkoreco de vendistoj de viando, vino kaj panoj, sed al ilia intereso de profitoj.”²⁶⁸

²⁶⁷ Adam Smith, *The Theory of Moral Sentiments*. Edited by D. D. Raphael and A. L. Macfie. Oxford, Clarendon Press, 1926, p. 9.

²⁶⁸ Adam Smith, *Wealth of Nations*, book 1, chap. 2, p. 14

Mencio kritikis severe la teoriojn, baziĝintajn sur profito 利, kiel ni vidas en la kritiko de Mozi kaj Yang Zhu. Sed rilate al produktiva forto de profito Mencio ne ignoras la efikon, kaj taksas la kalkuladon de profito por eviti viktimon ĉe la malsatego.

Kiu kompletas je la kalkulado de profito, tiu ne lasas homojn morti en la jaroj de malsatego; kiu kompletas je virto, tiu ne lasas al al korupta mondo malordi. [7B10 周于利者，凶年不能殺]

Aldone, Mencio ne ignoras utilecon de merito 功, ekzemple, estas skribite jene:

Peng Geng diris: “Lignometiisto kaj ĉarmetiisto strebas de komence al gajno de manĝaĵoj, noblulo – al la Vojo. Ĉu ankaŭ li strebas al la gajno de manĝaĵoj?”

Mencio diris: “Kial vi rigardas la strebon grava? Kiam iu donas al vi meriton, se indas al tiu doni manĝi, donu manĝaĵon.” [3B4]

Ĉi tie videblas ŝajna kontraŭdiro je la taksado far Mengzi pri merito 功 kaj strebo 志. En la komenco de la 1-a ĉap. Mencio malestimas la serĉadon de profito 利. Sed li estimas la ekonomian meriton de interŝanĝo. Li taksas la meriton kaj la profiton. Li agnoskas la profiton en la naturscienca mondo.

La subĉiela lingvo estas laŭnatura, do nur gravas ja la kaŭzeco. La kaŭzeco faras profiton baza.²⁶⁹[4B26]

Eblus diri, ke Mencio akuzas “profitamon” severe, sed agnoskas certe “profiton” en la produktiva forto kaj la naturscienco, dum Adam Smith en *Wealth of Nations* konstatis ambaŭ flankojn kiel motivon de homa ekonomika ago. Mencio rigardas la denaskan homan naturon bona, do konsideri profitamon malbona signifas, ke la profitamo ne estas la denaska. Xunzi kritikis la argumenton de Mencio kaj deklaris la denaskan homan naturon malbona, ĉar laŭ Xunzi la profitamo ja estas denaska por la homoj. Al Mencio estus ege malfacile separi malbonan profitamon kaj rezonan kalkuladon de profito, kaj al Adam Smith estus tre malfacile kunligi la moralan senton de kompatato kaj la liberan serĉadon de profitamo, jen en tio estiĝas granda ekonomia problemo en

²⁶⁹故者以利為本 Esploristoj konsideras la literon 利 por 順. Vidu Zhuxi 朱熹 p.275 四書集注下第 8 卷)。

nuntempa kapitalismo. 2300 jarojn antaŭe Mencio trovis siavice la solvon por la problemo en la instruo de la konfuceismo kun decreguloj kaj fila pietato.

KRITIKO DE PROFITAMO ĈE LA REGADO

Mencio siavice proponas ekonomikon de sociala bonfarto, dirante: “Sen sekura proprietaĵo ne povas esti ia ajn sekura koro.”[1A7]. Sed, kritikante Yang Zhu kaj Mozi, Mencio malestimas profitamon, do la sociala bonfarto devas esti realigata de supre far la reĝo pere de la regna potenco.

Mencio ricevis aŭdiencon ĉe reĝo Hui de Liang. La reĝo diris: “Vi, maljuna Majstro, degnis ĉi tien veni de malproksime je apenaŭ mil *li*oj, ĉu vi konsilos ion profitodonan al nia lando?”

Mencio respondis: “Kian profiton Via Moŝto atendus? Estas nur bonvoleco kaj justo por atendi. Se iu reĝo ekdirus: ‘Kio profitodona estas al nia lando?’, tiam liaj grandoficistoj dirus: ‘Kio profitodona estas al nia klano?’ kaj oficistoj kaj popolanoj dirus: ‘Kio profitodona estas al ni mem?’ Kiam la supro kaj la subo konkure sekvos sian propran profiton, tiuokaze la lando estos endanĝerigita. [1A1]

Mirinde estas, ke Mencio klare vidas nepran konkurencon pro profitamo inter homoj, kaj diferencon de profito inter homoj, klasoj kaj lando, okaze de tio, se ĉiu serĉas sian propran profiton. La saman argumenton Mencio uzas ne nur al reĝoj sed ankaŭ al pacama pensulo Song Keng:

Mencio diris: “Via intenco, sinjoro, estas granda, sed via maniero de argumento estas ne bona. Sinjoro, vi predikos al reĝoj de Qin kaj Chu pri la malprofito, kaj se la reĝoj de Qin kaj Chu ekĝojus je la profito kaj ĉesigus sian triopan armeon ekmiliti, tiuokaze soldatoj de la triopa armeo plezuriĝus pri la evito de milito kaj ĝojus je la profito. Tiam kiel subuloj oni servos al sia estro celante la profiton, kiel filoj oni servos al sia patro celante la profiton, kiel junaj fratoj oni servos al pliaĝaj fratoj celante la profiton. Rezultos, ke estro kaj subuloj, patro kaj filo, fratoj pliaĝaj kaj junaj, finfine forlasos bonvolecon kaj juston, celante la profiton en la reciproka interrilato. Tiuokaze estos neniu, kiu ne pereos. [6B4]

Mencio vidas, ke la pensmaniero de profito detruas la rilaton inter homoj, disvolviĝantan surbaze de fila pietato, lojaleco, fideleco. Mencio trapenetris, ke el la

profitamo, laŭ Yang Zhu-ismo, rezultas la konflikto inter homoj, klasoj kaj landoj, kaj la reciproka profitigo laŭ mohismo aŭ Song Keng-ismo ne solvas la problemon de klasbatalo aŭ militoj kiel “homoj manĝas homojn”, sed nur agitas la formigon de blokoj kun la komuna profito. Per tio la regno nepre perdas pacan stabilecon. Ankaŭ en la unua ĉapitro estas skribite same:

Kiu preferas profiton al justo, tiu ne povas esti kontenta sen rabadi. Neniam okazas, ke kun bonvoleco estu malzorgataj la gepatroj, nek okazas, ke kun justo estu forlasita la reĝo. La reĝo devas paroli nur pri la bonvoleco kaj la justo. Kial povus nepre paroli pri profito?[1A1]

Sima Qian skribis, ke li, ege ŝokita per la teksto, ne povus daŭre legi plu post la konversacio inter la reĝo de Liang kaj Mencio. Por Mencio, la koncepto de bonvoleco kaj justo superas ajnan profitigon, ĉu la regnan, ĉu la reciprokan, ĉu la individuan.

KUNDIVIDO DE LABOROJ KAJ INTERŜANĜO DE SERVOJ

Mencio opinias, ke estas necesa la divido de laboro kaj la interŝanĝo de varoj. Kaj tio estas la komuna justo por la mondo. Estas skribite en *Mencio* jene:

Chen Xiang renkontis Mencio kaj sciigis al li jenan komenton de Xu Xing, dirante: “Lia Moŝto, la duko de Teng, estas vere saĝa reĝo, sed tamen li ankoraŭ ne atingis la Vojon-Taon. Saĝulo estas tiu, kiu mem terkulturas kaj manĝas kune kun la popolo, kaj li mem kuiras maten- kaj vesper-manĝon kaj samtempe okupiĝas pri la regado. Nun, en Teng-lando estas grenejoj kaj trezorejoj, kiuj por la popolo estas peza ŝarĝo, kvankam jam estas sufiĉe da rezervo por nutri la regnon mem. Kial oni povus nomi lin saĝa?”

Mengzi diris: “Ĉu s-ro Xu semas mem kaj manĝas grenon?”

Respondis: “Jes.”

“Ĉu s-ro Xu teksas mem ŝtofon kaj vestiĝas?”

“Ne. S-ro Xu nur vestas sin per kruda lano.”

“Ĉu s-ro Xu metas sur sin kronon?”

“Metas.”

“Kian kronon?”

“Silkan kronon”

“Ĉu li mem teksas ĝin?”

“Ne. Li ricevis ĝin interŝanĝe por greno.”

“Kial s-ro Xu mem ne teksas ĝin?”

“Ĉar tio malhelpas al li terkulturi.”

“Ĉu s-ro Xu kuiras per argila kaldrono? plugas per fera soko?”

“Jes.”

“Ĉu li mem fabrikis ilin?”

“Ne, li ricevis ilin kontraŭ greno.”

“Ĉu ricevi instrumentojn kontraŭ greno ne estas subpremi per peza ŝarĝo potistojn kaj forĝistojn? Ĉu, male, ricevi grenon kontraŭ iloj ne estas subpremi per peza ŝarĝo agrikulturistojn? Se tiel, kial s-ro Xu ne fariĝus potisto kaj forĝisto? Kial ne preni ĉion ĉi tion sur sin por uzi hejme? Kial li tiom ĝenplene interŝanĝas aĵojn kun cent metiistoj? Kial s-ro Xu ne evitas tian ĝenon?”

“Aferojn de cent metiistoj oni ne povas fari samtempe, okupante sin per la terkulturado.”

“Se tiel, ĉu oni povas regi la mondon, samtempe terkulturante? Estas ja la afero de grandulo, kaj estas la afero de malgrandulo. Unu homo estas ekipita per aĵoj faritaj de cent metiistoj. Se oni devus fari mem ĉion, kion mem poste uzos, laciĝus la mondo. Do estas dirite: iuj laboras per menso, la aliaj laboras per korpa forto; personoj de mensa laboro regas homojn, homoj de korpa laboro estas regataj; la regato provizas per manĝaĵoj, la reganto manĝas dank al homoj – tio estas la komuna justo de la mondo.” [3A4]

Tiel Mencio estimas la dividon de laboro kaj interŝanĝon de varoj. Estas notinde, ke Mencio komprenas la diferencon de merkata prezo kaj uz-valoro samtempe, kiel Aristotelo [384-322 a. K.].

Chen Xiang diris: “Laŭ la vojo de s-ro Xu, la merkata prezo de varoj ne disdistingas, kaj ne estiĝas falso en la tuta mondo. Kiam knabo malgranda je 5 *ch'ioj* estos sendata al bazaro, li ne estos trompata. Ŝtofoj de sama kvanto estos vendataj je la sama prezo, kanabo kaj silko, se kun difina kvanto, estos vendataj je fiksjaj prezoj; kvin cerealoj, se kun difina kvanto, estos vendataj je fiksjaj prezoj. Ŝuoj, se samaj je grandeco, estos vendataj je la fiksjaj prezoj.”

Mencio diris: “La diverseco de aĵoj estas la natura karaktero de aĵoj. Iu kostas duoble-kvinoble, la alia – dekoble-centoble, la tria – miloble-dekmiloble. Se vi egaligus ilin por fari ilin samaj, tiam malordiĝus la mondo. Se ŝuoj fajnaj kaj ŝuoj malfajnaj estus vendataj kontraŭ la sama prezo, kion farus homoj? La vojo de s-ro

Xu kondukas homojn al falsado. Kiel regeblas la ŝtato per tiu maniero?” [3A4]

Kvankam Mencio ignoras profitamon, tamen li penetras en komprenon pri la bazo de la ekonomika scienco, kiun Adam Smith disvolvis en 18 j. c.

Mencio konsilis, ke landestroj kaj kleruloj ne strebu gajni profiton. Sed tamen, ankaŭ kleruloj devas vivteni per mono. Unu el disĉiploj demandis al Mencio pri la merito de vaganta predikanto, komparante intelektan kaj fizikan laboron. Mencio respondis jene:

Peng Geng demandis, dirante: “Kun kelkdek da ĉaroj sekvataj, kun sekvantaro el kelkcento, nutrate de landestroj unu post la alia, ĉu vi ne konsideras tion ekstravaganca?”

Mencio diris: “Se ne laŭ la Vojo, oni ne devas ricevi de homoj eĉ unu porcion de manĝaĵo, se laŭ la Vojo, Shun akceptis de Yao la mondon – ĉu tio ne estas ekstravaganca? aŭ vi konsideras tion ekstravaganca?”

Peng Geng diris: “Ne. Sed ne allaseblas, ke nobla persono sen laboro manĝas.”

Mencio diris: “Vi ne komprenas meriton de reciproka interŝanĝo laŭ cirkulado, kompletigo de manko per superfluo, ekzemple, iam ĉe kamparanoj superfluas grenoj, ĉe vi superfluas toloj. Se vi povus cirkuladi varojn, tiam lignometiistoj kaj ĉarmetiistoj, ĉiuj akiras de vi manĝaĵojn. Supozu, estas ĉi tie iu persono, kiu, estante kun fila pietato interne de familio, kun fideleco al pliaĝuloj ekstere de la domo, sekvas la Vojon de antaŭaj reĝoj kaj poste fariĝis scienculo, sed ne povas akiri manĝaĵon ĉe si. Vi respektas lignometiiston kaj ĉarmetiiston, sed preterrigardas personon de bonvoleco kaj justo, kial?”

Peng Geng diris: “Lignometiisto kaj ĉarmetiisto strebas de komence al gajno de manĝaĵoj, noblulo – al la Vojo. Ĉu ankaŭ li strebas al la gajno de manĝaĵoj?”

Mencio diris: “Kial vi rigardas la strebon grava? Kiam iu donas al vi meriton, se indas al tiu doni manĝi, donu manĝaĵon. Ĉu vi donas al li manĝi pro la strebo? aŭ pro la merito?”

Peng Geng diris: “Pro la strebo.”

Mencio diris: “Por ekzemplo, troviĝas iu, kiu rompis tegolojn kaj petolskribis muron. Li strebis al la gajno de manĝaĵoj. Ĉu vi donos al li manĝi?”

Peng Geng diris: “Ne.”

Mencio diris: “Tiuokaze vi donas al iu manĝi ne pro la strebo, sed pro la merito.”
[3B4]

El la citaĵo montriĝas, ke Mencio vizitadis landestrojn kaj vagadis lukse kun multe da

ĉaroj kaj sekvantoj. Tia lukseco bezonatas, por ke li estu akceptata de landestroj kun taŭga respekto. Li devas kondukti aplombe en la rilato al landestroj. Ne nur la ideo de konfuceismo, sed ankaŭ luksa aspekto necesis ĉe aŭdienco de reĝoj. Ankaŭ Mencio devis ricevi monon por ke, lia vagado estu ekipita de riĉaĵoj. Ĉi tie videblas ŝajna kontraŭdiro je la taksado far Mengzi pri merito 功 kaj strebo 志. En la komenco de la 1-a ĉap. Mengzi malestimas la serĉadon de profito 利. Sed li estimas la ekonomian meriton de interŝanĝo. Ricevi monon estas rajto de predikanto, sed tamen li ne povas ricevi monon, ne konforman al decreguloj.

Chen Zhen demandis, dirante: “Hieraŭ en Qi-regno la reĝo donintus al vi cent *yi* da oroj, sed vi ne akceptis. En Song-regno vi ricevis sepdek *yi* da oroj, en Xie-lando vi ricevis kvindek *yi* da oroj. Se pravas la hieraŭa malakceptado, tiam ankaŭ la hodiaŭa akceptado ne pravas; se pravas la hodiaŭa akceptado, tiam ankaŭ la hieraŭa malakceptado ne pravas. Koncernante tion, sur kia unuopa pozicio vi staras?”

Mengzi diris: “En ĉiu kazo pravas. Kiam mi estis en la Song-regno, mi ĝuste estis irona foren. Vojaĝonto nepre bezonas adiaŭan donacon, ĉar oni diris ĉe la adiaŭo, ke tio estas ‘la donaco por la adiaŭo’. Kial do mi ne devus ricevi? Kiam mi estis en Xue-lando, mi havis antaŭzorgon. Ĉe la adiaŭo oni diris: ‘Ni aŭdis pri via antaŭzorgo’. Do tio estas por provizi la vojaĝon. Kial do mi ne ricevu ĝin? Okaze de Qi-regno, ankoraŭ neniu kialo troviĝas por ricevi. Sen ajna kialo, tio estas nura mono. Kial do la noblulo povus preni nuran monon?” [2B3]

Al la vaganta predikanto estas necese ricevi la monon por la vojaĝo, loĝado kaj nutrado de sekvantoj. Sed tamen li ne devas ricevi monon sen deca kialo. Laŭ Mencio, li devas teni sin fiera pri si mem antaŭ reĝoj.

KUNDIVIDO DE PLEZURO

Konkrete en kio estiĝos ĉe reĝo la bonvoleco kaj la justo? Laŭ Mencio la reĝo devas ĉiam dividi la ĝojon kun la popolo. Mencio diris: “Antikvuloj ĝuadis kune kun la popolo, kaj tiel kapablis ĝui”. [1A2]

Estas sciate, ke Mozi prezentis la argumenton kontraŭ muziko pro tio, ke la popolo, nur ekspluatate, ne povas ĝui la muzikon. Mencio, kvankam agnoskanta la grandan signifon de la muziko, tamen heredis la similan argumenton de Mozi kaj admonas al estroj, ke ili dividu la plezuron kun la popolo.

Mencio diris: “Kio estas pli ĝoje al vi, ĝui muzikon sole aŭ kune kun aliaj homoj?”

La reĝo respondis: “Kune kun aliaj homoj.”

Mencio demandis: “Kio estas pli ĝojiga, kun da homoj malmulte aŭ multe?”

La reĝo respondis: “Kun multe da homoj.”

Mencio daŭre diris:

Permesu min diri al Via Moŝto pri ĝuo. Nun ĉi tie muzikas por la reĝo, kaj popolanoj aŭdas la sonon ludatan por la reĝo per sonoriloj kaj tamburoj, diversaj blov-instrumentoj. Tiam popolanoj, kun kapoj dolore klinitaj, sulkigante brovojn, diradus unuj al aliaj reciproke: ‘Nia reĝo ŝatas la muzikon de perkut-instrumentoj, dum li lasis min fali en tian ekstreman mizeron, ke gepatroj kaj gefiloj ne povas vidi unuj la aliajn kaj disiĝis fratoj, edzinoj kaj infanoj unuj de la aliaj.’[1B1]

La maniero de argumento pri la muziko similas al tiu de Mozi, kiu ignoras la signifon de muziko, dirante jene:

La Majstro Mozi diris: “La afero de justulo estas serĉi la profitigon al la mondo kaj elimini la malutilon por la mondo, t. e., fari la mondon justa laŭ leĝo. Profitigu la homojn tuj, kaj tuj ĉesu malprofitigi la homojn. <...> ” al li (Mozi) ne plaĉas nome tio, ke oni, ne pensante supre pri la aferoj de sanktaj reĝoj, ne zorgas pri la profito de la tuta popolo. Tial la Majstro Mozi diris, ke estas malbone ludi muzikon. <...> Ĉu eblus doni al la popolo pacan vivon kun posedaĵo de vestoj kaj nutraĵoj, se oni sonorigas sonorilegojn kaj tamburojn, kord- kaj blov- instrumentojn kaj dancas kun ŝildo kaj toporo?²⁷⁰

Mozi ĉi tie argumentas pri muziko surbaze de profito-merito, kiun Mencio malŝatas. Sed Mencio, kvankam heredante la kritikon far Mozi pri la muziko, tamen, male al Mozi, admonas al la supro dividi la plezuon de la muziko kun la popolo. Ideo pri la kundivido de ĝojo estas etendita al la sfero de sociala bonfaro. Tiu pensmaniero de la kundivido estas etendata ankaŭ al alia sfero. Koncernante la akumuladon de riĉaĵoj, Mencio admonas al la reĝo de Qi-regno jenon:

²⁷⁰ *Mozi*, esperantigita de Sasaki, Zaozhuang, 2017, p. 157-158

La reĝo diris: “Mi havas makulon, ke mi ŝatas varojn.”

Mengzi respondis: “Antaŭe estis iu ŝatanto de varoj, nomata Duko Liu, en *Poezio* estas skribite: ‘Li akumulis, staplis, enpakis sekigitajn provizojn per diversaj sakoj, kun intenco certigis la sekurecon. Li pretigis pafarkojn kaj sagojn, ŝildojn, halebarojn, hakilojn kaj toporojn por ekiro al ekspedicio.’ Tial do al postfrontuloj estis la plenakumulita tenejo, al militirantoj estis enpakitaj provizoj, kaj oni povis ekiri al ekspedicio. Via Moŝto same ŝatas varojn, sed se ili estus dividitaj kun la popolanoj, kia problemo estiĝus por vi?” [1B5]

Kredante je la boneco de denaska homa naturo, Mencio ne subpremas la seksan deziron kaj monavidon, nur se ekzistas la justa kundivido de plezuro inter regantoj kaj regatoj. Tiun juston povas realigi la sankta reĝo, kiu staras justa observanto kaj mediacianto inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Do, la reĝo ne devas paroli pri la profito, sed nur pri la justo. Laŭ tiu idealo Mencio disvolvas sian ideologion pri la regno, nomata la regno de la reĝa Vojo 王道.

REGNO KUN SOCIALA BONO

En la libro *Mencio* estas prezentitaj kelke da polito-ekonomiaj proponoj, kiel impostoj, naŭonaĵa sistemo de kampo, publika lernejo, k. c. Gravas, ke la popolo havu sufiĉan proprietaĵon por vivi pace kaj dece. Mencio dividas homojn en du partoj – elstaraj personoj 士 kaj popolanoj 民. La unua estas libera en ajna ekonomia kondiĉo, la lasta dependas de sia ekonomia kondiĉo. Mencio diras:

Kapablas teni sekuran koron eĉ sen sia sekura proprietaĵo nur elstaraj personoj 士. Popolanoj, se ne posedante la sekuran proprietaĵon, ne povas havigi al si iun ajn sekuran koron. Sen la sekura koro ili diboĉadus, disipadus, nenion farante. Kiam ili foje ekpekas kaj ekkulpas, ili estas punataj – tio estas same, kiel faligi popolanojn en maŝkaptilon.” [1A7]

La homo estas observata ĉefe el du vidpunktoj: homo-ekonomika kaj homo-etika. Konfuceanoj vidas la homecon en la homo-etika, sed Mozi kaj Yang Zhu en la homo-ekonomika. Kiel supre menciite, Mencio dividas homojn en du partoj, kaj starigas du specoj de ideoj: unu – por elstaraj personoj, la alia – por popolanoj.

Laŭ Mencio ĉiu polito-ekonomia sistemo devas esti konstruita de reĝoj de supre, konforme al justo. Sed Yang Zhu aprobas memprofitigon kaj egoismon, kaj rifuzas ajnan

intervenon de la alia en la privatan vivon. Mozi vidas en la reciproka profitigo la ekonomikan agon de universala amo. Mencio konsideras la intervenon de la ŝtato nepre necesa por ke estu regeble kaj kontroleble mastrumadi je la ekonomiko de supre per la reĝa politiko laŭ la reĝa Vojo 王道. La reĝo ne devas apogi sin sur la ideo de profitamo, sed sur la justo, kiel senpartiema observanto.

Ekonomika politiko de Mencio estas por sekurigi al popolanoj la stabilan vivkondiĉon, kiu donas al popolanoj kondiĉon por disvolvi la denaskan bonan naturon. Kiel ni vidas en la epizodo pri patrino de Mencio en lia infaneco, la ĉirkaŭa medio estas decida en la formigo de la taŭga personeco. Eĉ por la elstara persono, la ĉirkaŭa kondiĉo estas grava por la disvolviĝo. Do Mencio predikadis al reĝoj la gravecon de la ekonompolitika sistemo, kiel “naŭona sistemo de plugkampo”, malpliigo de imposto, sistemo de publika lernejo.

Donu al la periferiaj kamparanoj la naŭonaĵan sistemon por pagi la imposton *zhu*, kaj en la centro de lando lasu pagi la imposton de unu dekono. Al ĉiu el ministroj kaj el la pli subaj altranguloj krom salajro nepre necesas la kampo por ritoj, nomata *gui*, je 50 *muoj*. Al ĉiu el la ceteraj viroj necesas kampo je 25 *muoj*. Eĉ ĉe la morto de familiestro kaj ĉe lia transloĝiĝo oni ne forlasas la vilaĝon, kie kampo estas uzata komune laŭ la naŭonaĵa sistemo. Oni amike interrilatas unu al la alia, defendas, gardas kun reciproka helpo, kaj helpas unu la alian je malsaniĝo, tiel do la popolanoj vivas intime kaj harmonie. [3A3]

Mencio rekomendas al reĝoj malpezigi impostojn. La konkreta sistemo estas nomata “naŭonaja sistemo”. Ok familioj konsistigas unuopan grupon de terkulturistoj en unu kampo, kiu estas dividita en naŭ parceloj, simila al ideogramo ‘put 圃’. La centra unu parcelo estas por la pago de imposto al registaro, ĝi estas kulturata komune de ĉiuj familioj. Ceteraj ok parceloj apartenas al ĉiu familio. Tio estas unika ‘agrokomuno’. Mencio diris:

Faru la farmkampon facile kultivata, la imposton malmulta, por ke la popolo povu ĝui la riĉon. La popolon manĝigu konforme al sezonoj, uzu laŭ dereguloj, kaj la riĉaĵo estos ne forkonsumebla. [7A23]

Malpezigo de impostoj estas unu el la plej gravaj politikoj por la regno. Tio estas ja pretigo de la libera merkato por vigligi la komercon.

Mencio diris: “Kie oni respektas la saĝan, uzas la kapablan, enoficigas la elstaran – tien ĉiuj kleraj personoj de la mondo ĝojege dezirus direkti sin kaj turni sin. Kie sur merkato oni imputas renton sed ne impostas al komercaĵoj, aŭ ekzistas leĝoj sed sen rento, tie ĉiuj negocistoj de la mondo ĝojege dezirus malfermi komercejojn sur la merkato. Kie ĉe la gardejo de landlimo oni inspektas sed ne impostas, tie ĉiuj turistoj de la mondo ĝojege dezirus vojaĝi la stratojn. Kie oni terkulturas helpe al la komuna terpeco por imposta devo sed ne bezonas pagi kroman imposton, tie ĉiuj kamparanoj ĝojege dezirus terkulturi sur la kampoj. Kie ne ekzistus impostoj, kiel rento, kapimposto kaj servuto, tien popoloj de la mondo ĝojege dezirus enmigri. Kiu povos efektiviĝi ĉi tiujn kvin politikojn, tiun la popoloj de najbaraj landoj rigardos kvazaŭ siajn gepatrojn.[2A5]

Laŭ tia pensmaniero, ĉu ne estus kontraŭdire al Mencio akuzi la profitamon de Yang Zhu kaj Mozi? Ĉar Mencio ĉi tie subtenas la kondiĉon de la libera ekonomika agado. Li pledas por bonvoleca politiko kiel la plej necesa ankaŭ por fortigo de armeo. Ne nur landestro, sed ankaŭ la suprujoj ĉiam devas trakti bonvoleme la subulojn por ke la armeo fariĝu forte unuigita, kaj por ke soldatoj batalu sen timo laŭ la supra ordono. Ĉiu suprujo devas esti fidata de siaj subuloj.

Se vi farus bonvolecan politikon, la popolo iĝus intima al la supro kaj preta je sia morto por siaj estroj. [1B12]

Mencio proponas diversajn konkretajn proponojn por bonvoleca politiko. Tio estas lia ideo de la reĝa Vojo, kiun Mencio volus efektiviĝi tra la kleraj reĝoj.

POPOLA VOLO KAJ MAJESTATENCO

Mencio rigardis la monarkismon bona por la regado de regno, sed li konsideris la popolon bazo de la regno. Li diris:

La popolo estas la plej estiminda, la altaro de la tero kaj grenoj estas la sekva, kaj la estro estas la plej malpeza. Do kiu gajnas estimon de la popolamaso, fariĝas la Ĉiela Filo; kiu gajnas estimon de la Ĉiela Filo, fariĝas la landestro; kiu gajnas estimon de landestro, fariĝas grandoficisto. [7B14]

Tiu vidpunkto, populocentrismo(民本主義) en monarkio, donas al Mencio unikan

traĵton. Mi nomas tiun 'porpopolismo', simila al rusa narodnikismo de 19-a jc. Iuj vidas en Mencio revolucionan ideologion. Mencio diris: "Tiranoj, Jie kaj Zhou, perdis la mondon, ĉar ili perdis la popolon." [4A9] Reĝo, perdinta la fidon de la popolo, fariĝas nura simplulo.

La reĝo diris: "Ĉu estas allaseble, ke la regato atencu la regnestron?"

Mencio diris: "Kiu ofendas bonvoleculon, tiu nomiĝas rabisto. Kiu ofendas justulon, tiu nomiĝas kanajlo. Kiu ofendas aŭ rabas homojn, tiu nomiĝas ununura ordinarulo. Mi aŭdis, ke iu ulo, nomata Zhou, estis akuzita, sed ne aŭdis, ke iu regnestro estus atencita." [1B8]

Tio, ke la reĝo Zhou 紂 estis batita de Wu, estis konsiderata, laŭ Mencio, ne majestatenco, sed punado de simpla kanajlo. Pro tiu pensmaniero oni rigardis Mencion revoluciemulo, kontraŭanta normalan monarkismon surbaze de absoluta lojaleco.

LA REĜA VOJO KAJ PERSONA DIGNO DE KONSILANTO

Mencio ekvagadis por prediko ĉirkaŭ je 41-jara en 331 a. K. Ĝis tiam ŝajne li okupis sin nur per la instruado kaj la lernado de konfuceismo. Ĝuste en tiu momento aktive agadis famaj oratoroj, kiel Su Qin 蘇秦 (382-284 a. K.), Zhang Yi 張儀 (-309 a. K.), Gongsun Yan 公孫衍 (360-300 a. K.), por perpendikla koalicio aŭ vertikala alianciĝo 合從連衡. Eble, tio stimulis Mencion ekagi kiel predikanton. Sed diference de Su Qin kaj Zhang Yi, kiuj agadis en la areno de diplomatio kaj internaciaj rilatoj, Mencio propagandis al landestroj la ideologion de konfuceismo, dirante ke tiuj famaj oratoroj-politikistoj ne estas tiel grandaj, sed flatemaj al potenculoj. Estas skribite:

Jing Chun diris: "Gongsun Yan kaj Zhang Yi estas vere grandaj personoj, ĉu ne? Se ili unufojon ekkoleras, landestroj ektimas tremante; se ili sidas en paco, la mondo ripozas."

Mencio diris: "Kial eblus konsideri ilin grandaj personoj? <...> Kiam iu sidas sur granda loĝejo de la mondo kaj okupas la ĝustan postenon de la mondo, tiu devas iri laŭ la granda vojo de la mondo. Se farebla estas via intenco, faru tion kun la popolo; se ne farebla, iru sola laŭ la vojo. Kiun ne povas devojigi la riĉo kaj la alta rango, nek povas ŝanĝi la malriĉo kaj la mizero, nek povas submeti la potenco kaj la forto, tiu estas nomata la granda persono." [3B2]

Malsame de praktikaj politikistoj-oratoroj, Mencio, starante favore al la popolo, strebis predikadi al landestroj la idealan vojon de bonvoleco, justo, decreguloj, laŭ la konfuceismo. Tia prediko ŝajnis al profitamaj reĝoj ĉirkaŭira aŭ malrealismeca. Sed Mencio daŭre ne ŝanĝis sian pozicion pledi por la Vojo de antikvaj sanktuloj, sekvantaj la popolan volon, kiel la Ĉielan ordonon.

Estas skribite en *Tai Shi*: ‘La Ĉielo rigardas, samkiel mia popolo rigardas, la Ĉielo aŭdas, samkiel mia popolo aŭdas’.[5A5]

Okuloj de la popolo estas okuloj de la Ĉielo, oreloj de la popolo estas oreloj de la Ĉielo. Volo de la popolo estas volo de la Ĉielo, kvamkam ĉi tie ne aldonita la fama frazo: ‘Voĉo de la popolo’. La popola volo estas decida ankaŭ por ekmiliti. Eĉ la volo de popolo en la malamika lando estas grava por la okupado de malamika lando. Kiam la reĝo de Qi-regno demandis Mencion, ĉu ataki la Yan-regnon aŭ ne, Mencio respondis:

Se la popolo de Yan-regno ĝojas je la okupado far vi, tiam prenu ĝin. Antikve estis ankaŭ ekzemplo, ke tion faris la reĝo Wu. Se la popolo de Yan ne ĝojas je la okupado far vi, tiam ne prenu ĝin. Antikve estis ankaŭ la ekzemplo, ke tiel kondukis la reĝo Wen. Kiam unu regno kun dekmil militĉaroj batis la alian regnon kun dekmil militĉaroj, la reĝa armeo de la unua estus akceptata kun korboj da manĝaĵo kaj kruĉoj da vino, <...> [1B10]

Tiu argumento memorigas nin, por ekzemplo, pri la okupado far alilanda armeo post la dua mond-milito, kio daŭras ĝis nun en diversaj landoj. Sed devas esti tre skrupule observi, ĉu la popolo vere bonvenigas la alilandan armeon, aŭ ne. Mencio distingas la vojon de vera reĝo kaj la vojon de hegemoniulo jene.

Mencio diris: “Kiu pere de forto ŝajnis sin bonvoleca – tiu estas superreganto, hegemoniulo. La hegemoniulo nepre posedas la grandan regnon. Kiu pere de virto faras bonvolecan regadon – tiu estas vera reĝo. Povas esti la vera reĝo sen granda teritorio, Tang ekregis sepdek *liojn* kvadrate, la reĝo Wen – cent *liojn* kvadrate. Kiu obeigas homojn pere de forto, ne povas igi ilin obei elkore, ĉar ne sufiĉas la forto. Kiu obeigas homojn pere de virto, al tiu ili obeas kun ĝojo elkore kaj sincere, samkiel sepdek disĉiploj, sekvantaj al Konfuceo. En *Poezio* estas dirite: ‘El okcidento, el oriento, el sudo, el nordo, troviĝas neniu, kiu ne volas obei.’[2A3]

Tial do Mencio konsideras la popolan volon kiel la Ĉielan, kaj ne timas diri sian opinion eĉ antaŭ potencaj regnestroj. Ideala regno estas tie, kie la reĝo estas respektata kiel la patro de la popolo. Kiel la reĝoj povas fariĝi gepatroj de la popolo? Mencio admonas al reĝo, ke la reĝo povu aŭskulti la veran opinion, sed ne aŭskulti kalumnion. Kaj la reĝo mem skrupule esploradi kvalitojn de siaj ĉirkaŭantoj, kaj ne hasti mortigi akuzatajn subulojn.

La reĝo diris: “Kiel mi povas scii sentaŭgulon, forĵetendan?”

Mengzi diris: “<...>Ne aŭskultu, kiam ĉiuj asiduuloj dekstre-maldekstre dirus iun neakceptebla, nek aŭskultu, se ĉiuj grandoficistoj dirus iun neakceptebla. Ekzameni lin post kiam ĉiuj regnanoj dirus lin saĝa, kaj nur poste se vi rigardas lin neakceptebla, tiam forlasu lin. Ne aŭskultu, kiam ĉiuj asiduuloj dekstre-maldekstre dirus iun mortigenda, nek aŭskultu, kiam grandoficistoj dirus lin mortigenda. Esploru post kiam ĉiuj regnanoj dirus lin mortigenda, kaj nur poste se vi mem rigardas lin mortigenda, tiam mortigu lin. Se tiel, vi povus esti rigardata kiel gepatroj por la popolo.”[1B7]

En tiu tempo estis malfacile al popola voĉo atingi la reĝon, kiu estis ĉirkaŭata de subuloj- kalmuniuloj. Mencio rigardas la kalmunion endanĝeriganta la regadon. Alie, la regno detruigas pro denuncoj. Mencio mem estis forigita per kalmunio.

Li pledas por la redukti laŭeble la hastan punadon, predikante pri la reĝa Vojo 王道, apoganta sin sur la bonvoleco kaj fila pietato. Li kredis, ke nur tiele estas fortigata la regno.

La reĝo devas fari la bonvolecan regadon por la popolo, reduktante la punadon, malpliigante la imposton kaj la servuton, stimulante profundan plugadon kaj sarkadon. Plenaĝuloj dum ripozsezono okupu sin per la lernado de devo je fila pietato kaj respekto de pliaĝuloj, je lojaleco kaj fideleco, hejme oni servas al patro kaj pliaĝaj fratoj, ekstere servas al pliaĝuloj kaj superuloj. Se tiel farate, pere de tiu disciplino oni povas disbati eĉ kun ligno bastono la firmajn kirasojn kaj la akrajn armilojn de Qin kaj Chu-regnoj.[1A5]

La eduko de reĝo estas la plej grava tasko por tiamaj ĉinaj pensuloj. Por tio nepre necesa antaŭ ĉio la sinperfektigo de instruistoj-mentoroj mem. Konfuceo mem malŝatis, ke liaj adeptoj servu al malbonvolemaj estroj. Ankaŭ Mencio heredis la instruon de Konfuceo.

Mencio diris: “Ran Qiu fariĝis intendanto ĉe la klano Ji, sed ne povas korekti la virton de Ji, kaj faris la imposton de grenoj duobla antaŭ kelkaj tagoj. Konfuceo diris: ‘Qiu jam ne estas mia lernanto, karaj miaj etuloj, vi devas kritiki lin kun tondrado de tamburo.’ Se observi el tia vidpunkto, kiu riĉigas la estron, ne farantan politikon de bonvoleco, ĉiu estas forĵetita de Konfuceo. Des pli instiganto de militoj. <...> Do inter subuloj de malbonaj estroj, tiu, kiu lertas je milito, indas je la plej alta punado. Kiu manovras aliancojn de regnestroj, tiu devas esti punata pro krimo de sekva grado. Malpli peze devas esti punata sekve tiu, kiu malfermas virgan terenon kaj disdonas ĝin.” [4A14]

Estas notinde, ke Mencio kritikis severe subulojn, helpantajn al malbonaj estroj. Vorto de Konfuceo estas en *Analektoj*, ĉap. Xianjin. Konfuceismo subtenas apartan amon al patrolando 別愛, sed deadmonas servi al nebonvolecaj estroj. Lojaleco kaj patriotismo ne estas la plej grava principo. Obeo al la supro ne estas absoluta normo ĉe Konfuceo kaj Mencio. Se al la supro mankas bonvoleco, konfuceanoj ne devas servi al tia supro. Do Mencio mem libere foriris de reĝoj, kiu ne adoptis lian konsilon. Tia nedankemo estis neallasebla por japanaj adeptoj de konfuceismo. Ili estis edukitaj, por ke ili dediĉu sin al sia supro dum la tuta vivo, eĉ postmorte, kia ajn estas la supro, bona aŭ malbona. Ankaŭ tio estas la ideo de Mencio, kiu taksas la sintenon de Shun rilate al la malbona patro Gusou.

EDUKO: RILATO INTER INSTUISTO KAJ INSTRUATO

Kvankam severe kritikis la libervolon de Yangzhuismo, tamen, Mencio kondukas kun forta memfido kiel memstara persono kaj laŭ digno de sia memo, ofte eĉ tre arogante antaŭ reĝoj kaj suproj. Por ekzemplo, riale al la reĝo Xuan 宣 de Qi-regno, kiam la reĝo petis, ke Mencio venu al la reĝa palaco, ĉar la reĝo malsaniĝis, Mencio rifuzis viziti la reĝon pro sia falsa malsano. Multaj esploristoj akuzas Mencion pro manko de decreguloj antaŭ la reĝo, sed japana konfuceano, Ito Zinsai (1627-1705) pravigis lian konduton, dirante: “Kiu faras la reĝon Tang aŭ Wu sia supra estro, tiu nepre konsideras sin kiel konsiliston Yi Yin aŭ la dukon Zhou.” Mencio konsideras sin kiel Yi Yin aŭ la dukon Zhou rilate al la reĝo. Tio signifas, ke konsilisto de reĝo nepre devas respekti sin je la personeco. Gravus ne absoluta obeado, sed fiero je digno de la asignita rolo. Tia estas ja la respekto de la persona valoro laŭ Mencio en konfuceismo.

Do kiu bezonas esti granda por la estro, tiu ne devas esti nura subulo alvokata, sed devas esti ja kompetenta por ke la estro konsultu lin. Povante estimi la virton kaj ĝoji je la Vojo, la estro sufiĉe povas kune fari la aferojn. Tang, rilate al Yi Yin, lernis ĉe li kaj poste faris lin ministro, tiel do senpene fariĝis la reĝo. La duko Huan, rilate al Guan Zhong, lernis ĉe li kaj poste faris lin ministro, tiel do senpene fariĝis unu el superegaj hegemoniuloj. [2B2]

Mencio substrekas la distingon inter la instruanto kaj la instruato. Li insistas, ke la persona valoro altiĝas ne nur per la disciplino de decreguloj sed ankaŭ per edukado, lernado, reflektado, kiuj donas al la denaska naturo plialtan kaj noblan kvaliton, kiel intelekton, saĝon kaj altan strebon. La vekiĝinta persono estas nomata klerulo \pm *shi*, estiminda specialisto, digna persono kun elstara kapablo. Instruisto estas respektenda persono, ĉar sen respekto de instruisto ne eblas ajna edukado, nek instruado.

Do, eĉ reĝo aŭ duko ne devas trakti sian instruiston kiel nuran subulon. Mencio skribis multe pri tiu temo. Se iu reĝo ne traktas lin dece, li rezignas servi al tiu reĝo. Tio estas digno de la instruisto. La konformeco al decreguloj estas nepre necesa por uzi subajn personojn. Reĝo devas komisi aferojn al specialistoj kaj konfidi ilin. Specialistoj devas altigi sian kompetenteco.

Nun supozu, ke vi havas ankoraŭ ne poluratan jadon, valoran je dekmil *yi*, vi nepre igos juveliston tajli ĝin. Koncernante la regadon de la ŝtato, se la reĝo dirus: ‘Vi dume flanklasu la lernitan de vi kaj sekvu min’ – tio estus nenio alia, ol instrui al juvelisto kiel tajli jaden, ĉu ne?’ [1B9]

En la politika ideo de Mencio la rolo de reĝo estas tre granda. Do kiu instruas la reĝon aŭ konsilas al la reĝo, tiu havas devon plenumi sian taskon sincere sen kompromiso, sen flatado. Mencio diras: “Kiu eduki-bredas la reĝon, amas la reĝon.” [1B5] Tial do, eĉ reĝo devas humiliĝi antaŭ la instruisto. Mencio postulas tion, ke la reĝo dece akceptu la instruiston laŭ necesaj decreguloj. La edukato aŭ instruato devas teni sin humila kaj respekti la personecon de instruanto, alie ne eblas eduki aŭ instrui. La instruisto de la reĝo devas teni sin aplomba. Mencio diras jene:

Mencio parolis al Song Goujian, dirante: “Ĉu vi ŝatas esti vaganta prelegisto? Mi preparolu al vi, kia devas esti la vaganto. Estu aplomba, kiam oni konas vin, kaj tenu vin aplomba ankaŭ tiam, kiam oni ne konas vin.”

Song Goujian demandis: “Kion fari por ke mi povu teni min aplomba?”

Mencio diris: “Respektu virton kaj ĝoju pri justo, tiam eblas esti aplomba. Forta

persono, eĉ se estante povra, ne perdas juston, se sukcesinte, ne forlasis la Vojon. En la povreco ne perdinte juston, li kulturis sin mem je la personeco. Ĉar en la sukceso li ne forlasis la Vojon, la popolo ne perdas esperon al li.” [7A9]

“Teni sin aplomba”[囂囂] signifas: “Ne estu superpremata de la vervo de kontraŭulo”. Instruanto devas havi pli grandan Qi-energion 氣 antaŭ la instruato. Pedagogio de Mencio celas la edukon de reĝoj kaj la kreskigon de altkvalitaj personoj, al kiuj povus akordiĝi popolanoj. Popolanoj faras sian superulon modela por sia vivmaniero. La klerigo de reĝoj estas samtempe la plibonigo de popolanoj, do tiu laboro devas esti taksata alte. Per tiu grava laboro al la vaganta predikanto estas necese ricevi la monon por la vojaĝo, loĝado kaj nutrado de sekvantoj. Sed Mencio iam aplombe rifuzis ricevi monon de la reĝo de Qi-regno. En la rifuzo oni devas vidi apartan kialon, ke Mencio staras sur la forkvojo, kiam li devas elekti moralecon, altan aŭ malaltan. Li diras jene:

Kiam estas alternativo: allaseblas kaj preni kaj ne preni, – se prenos, tio povos vundi vian honestecon. Se allaseblas kaj doni kaj ne doni, – se donos, tio povos vundi vian favordonemon. Se allaseblas kaj morti kaj ne morti, – se elektos morton, tio povos vundi vian bravecon. [4B23]

Rilate al la reĝo de Qi-regno, Xuan, Mencio prenis skurupulan sintenon, por ke sia konduto kaj eldiro restu en historio kiel modelo de la elstara konfuceano. Mencio diris:

Mi deziras vivon, mi deziras ankaŭ juston. Se mi ne povus akiri ambaŭ du kune, mi forlasus la vivon kaj prenis la juston. Spite ke mi deziras la vivon, mi deziras ion pli altan ol la vivon, do mi ne aŭdacas alteniĝi al la vivo. Mi ne ŝatas morti, sed estas io, kion mi pli malŝatas. Do mi ne evitas danĝeron. <...>

Supozu, unu bovlon da manĝaĵo, unu tason da kaĉo el legumeno, – kiu ricevis, tiu travivos, kiu ne ricevas, tiu mortos. Se donate kun maldeca vekrio, ajna vojiranto ne akceptus. Se donate per piedo, ajna almozulo malagrablus.

Sed donate salajron je dekmil *zhong*, oni akceptas la postenon, ne zorgante kiel tio konformus aŭ kontraŭus al decreguloj. <...> Tio estas nomata la perdo de la baza radiko en koro.” [6A10]

Por Mencio la digno de personeco estas multe pli grava ol ajna posteno kaj mono. Verŝajne, li vetis sian vivon por la afero en la Qi-regno.

LIBERA EDUKO KAJ DENASKA NATURO

J. J. Russeau estas konsiderata kiel predikanto de “libera eduko”. Epigonoj de tia Russoismo prenas la liberan edukon por devizo “Lasu lernantojn fari ĉion ajn kaj neniel limigu al ili konduton”, ĉar la limigo, laŭ ilia opinio, deprenus de infanoj kreivan volon. En lernejoj de tiuj epigonoj malaperis la distingo inter instruistoj kaj lernantoj kaj la lernantoj ne kapablas iam deteni sin je frivola konduto. Tie mankas la sankteco de la instruado kaj pululas libervolaj perfortoj. Tie lernantoj similas al konvolvuloj sen apogstango, florantaj nur sube surtere. Floras apenaŭ laŭ la denaska naturo, sed ne altiĝas. Kie estas perdita la sankteco de instruisto, tie estiĝas sakrilegio. En la klasĉambro malaperas la bona ordo. La fundamento de societo detruigiĝas, ĉar mankas decreguloj inter homoj.

Mencio, samkiel J. J. Rousseau, vidas en la homa naturo denaskan bonon, kiu estas kompto al aliaj homoj. Se etendi la denaskan naturon per decreguloj al la bona direkto, la personeco pliboniĝas kaj altiĝas. Mencio, vidante la denaskan naturon bona, tamen konsideras la firman apogstangon nepre necesa. La apogstango estas la praktiko de decreguloj kaj fila pietato. Nur per disciplino laŭ la decreguloj homo kreskas kiel memstara persono kun forta devseno – en la domo kiel fidelaj filoj kaj fratoj, en la societo kiel fidindaj membroj, en la ŝtato kiel fidelaj popolanoj. Kaj tiu devseno devas fariĝi kutimo pere de la disciplino laŭ decreguloj tiom, ke la kutimo senkonscie determinas la konduton de ĉiu persono.

Kiel konfuceisto, Mencio havas firman konvinkon, ke ‘reĝoj kaj altkvalita persono’ ne devas havigi al si la pensmanieron de ‘profitamo kaj utilismo’, sed devas teni sin bonvolema-justama kun decreguloj kaj persona digno. Koncernante la simplajn popolanojn, Mencio asertas, ke “sen konstanta proprietaĵo ne eblas teni konstantan koron”.

Jen en kio kuŝas la kerno de Mencia ideologio, por ke estu sufiĉa al popolo la sekura proprietaĵo, kaj samtempe, por ke kresku la forta persono ± rezistebla al adversa medio, al malfavora vivkondiĉo. Tio signifas, ke al popolanoj allaseblas la ekonomia ago por gajni profiton. Sed tamen Mencio nenion diris eksplicite pri la vivtenado laŭ profitamo de la popolanoj. La ideologio de Mencio estas direktita al du diversaj klasoj: unu – al popolanoj, la alia – al fortaj personoj, *shi*.

Reĝido Dian demandis, dirante: “Kion faras vaganta klerulo, persono de *shi*-rangulo?”

Mengzi diris: “Strebas al alta idealo.”

Dian demandis: “Kio estas t. n. la alta idealo?”

Mengzi diris: “Nur bonvoleco kaj justo. <...> Vivi en la bonvoleco per justo, jen per kio ili akiras la kvaliton de la grandulo.” [7A33]

Dian estas kosiderata kiel la filo de la reĝo Xuan de Qi-regno. *Shi* 士 estas socia tavolo en la antikva Ĉinio inter superaj ŝtatoficistoj kaj ordinaraj popolanoj. Ili estis kleruloj aŭ militistoj. La kategorio estas simila al kavaliro en okcidento aŭ *samurai* en Japanio. Ĉi tie temas ankaŭ pri kleruloj, kiuj ankoraŭ ne enoficigitaj. Mencio ignoras gajni profiton, do postulo de vagantaj kleruloj estas tro severa por la vivtenado.

PRAKTIKA FILOZOFIO POR MEMSTARA PERSONECO

Estas io disvolviĝanta en la homa personeco. Tio estas bona denaska naturo, kiel sento de bonvoleco. La bonvolemo kreskas inter homoj, antaŭ ĉio en la familio, kiel la fila pietato al gepatroj, ĉar gepatroj amas sian filon sen ajna rekompenco. En la respekto de gepatroj disvolviĝas la amsento de fila pietato. Mencio ne prezentas la etapon de la vekigo de memkonscio, senton de agrablo-malagrablo, sed rekte transiras al amo de gepatroj.

Diference de Mozi, kiu pledis por sendistinga universala makroamo, Mencio rigardas la distingon inter homoj nepra, kiel la distingon inter patro kaj filo, pliaĝa kaj malpliaĝa. Do laŭ Mencio la bonvoleco (respekto al homoj) estiĝas unue en la familio, kaj povas esti efektivigata antaŭ ĉio ene de la familio, kaj poste etendiĝas al la societo. La personeco disvolviĝas kun la devsentto antaŭ gepatroj kaj antaŭ pliaĝaj fratoj. La devsentto estas esprimata en la kadro de deca konduto, t. e. konduto laŭ la decreguloj 礼. Per disciplino de decreguloj la personeco hardiĝas, por ke la infano fariĝu unu el plenkreskaj membroj de la societo – en familio, parencaro, vilaĝo kaj la ŝtato. Kaj ankaŭ la respektata patro aŭ pliaĝa frato fariĝas memstara personeco, forta je zorgema devsentto al subuloj, tiel do ili kondukas kiel dignaj ĉefroluloj en la societo. Tiel disvolviĝas la sento de la persona digno. Interalie en Eŭropo estis rigardata la potenco de patro pli grava ol fila pietato. kaj tio estas nomata “paternalismo”.

Decreguloj postulas de ĉiu homo la distingon, al kiu klaso apartenas li mem kaj la alia. Iu pliaĝa, iu plialta je rango, iu plipotenca devas esti respektataj laŭ necesaj decreguloj konformaj al ĉiu klasdivido. Tiu kutimo de distingo inter la pliaĝa kaj la malpliaĝa estas edukata ene de la familio. Kiam Vasilij Eroŝenko alvenis Japanion, li estis akceptita de prof. Nakamura Kijoo, kiel la dua pliaĝa frato inter gefiloj en la familio. Eroŝenko skribis en sia taglibro:

Hodiaŭ matene je la sepa horo mi renaskiĝis. <...> Mia familio konsistas el patro, patrino kaj sep gefiloj (inkluzive min), kaj mi fariĝis la dua filo. Heredonto de prof. Nakamura estas la unua filo, kiun ni devas voki ‘plejaĝa frato [Ni-san]’.²⁷¹

En eŭropaj lingvoj koncepto de “frato” ne havas distingon de pliaĝa 兄 kaj malpliaĝa 弟, sed en orienta azio tiu distingo estas tre grava por la eduko de decreguloj. La familio estas la areno de mikro-societo por la civitaneca interrilato. Fila pietato kaj respekto de pliaĝuloj estas laŭ Mencio la plej gravaj decreguloj, kiuj disvolvas firman personecon kiel kvaliton de morale memstara civitano.

Persona valoro estas kalkulata per tio, kiomgrade la persono kondukas fidele al gepatroj, al pliaĝuloj, al supro kaj al la lando. Laŭ konfuceismo, forta personeco estas ellaborata unue ene de la familia vivo surbaze de la decreguloj inter patro kaj filo, pliaĝulo kaj plijunulo.

Laŭ mohismo – la personeco kreskas per strebado al universala amo, kaj kompreno de la Ĉiela Volo, laŭ Yang Zhu – per amo al la mia memo. Tial do por Mozi bezonatas religia kredo pri Dio kaj Spiritoj anstataŭ decreguloj. La Spiritoj, observante la konduton de homoj ĉie kaj ĉiam, laŭdas aŭ punas laŭ boneco kaj malboneco. Por Mencio, ia ajn arbitra libera volo, memamo kaj egoismo estas ekskluditaj kiel malbona ideo de Yangzhuismo. Ankaŭ la universala amo estas kritikata pro la ignorado de la aparta amo de familio aŭ la reĝo. Tiel do mohismo kaj Yangzhuismo estis severe atakataj de Mencio kaj Konfuceanoj.

Fila pietato kaj decreguloj ene de familio, laŭ Mencio, lasas homojn kreskigi la bonan naturon kaj kutimiĝi al bona konduto. La familio estas la plej grava bazo por konfuceismo, do la funebro de familianoj estas tre grava por la konkreta praktikado de fila pietato. Tial do Konfuceanoj insistas la luksan funebro, kritikante mohistojn.

LA ĈIELA ORDONO KAJ LA AGO DE SENDEPENDA PERSONO

Estas notinde, ke tiu Mencio, kondukanta fiere antaŭ la reĝoj, kompatas la popolon kaj parolas por teni la popolon en bonstato. Li malestimis hermitecan personon, kvankam sendependeman, kaj nomis tiun ‘vermo’. Gravas la ago por savi popolon, ne nur sia propra persona purigo. Legantoj vidas en Mencio la ĉarmon de sendependa persono, kiu staras fiere antaŭ reĝoj. Li heredis tiun dignon de personeco ne nur ĉe Konfuceo, sed ankaŭ ĉe la ties rivaloj, Mozi kaj Yang Zhu. En la konfuceismo la Ĉiela ordono estas tre

²⁷¹ 高杉一郎、『夜明け前の歌』Takasugi Iĉiro, *Kantoj de antaŭtagiĝo*, p. 11

grava koncepto, kiel ni vidas en la lasta frazo de *Analektoj*.

La Majstro diris: “Kiu ne scias la ordonon de la Ĉielo, tiu ne povas esti noblulo. Kiu ne scias decregulojn, tiu ne povas stari. Kiu ne scias vortojn, tiu ne povas scii homojn.”

Mozi prenis la ordonon de la Ĉielo en konfuceismo por fatalismo kaj kritikis ĝin kiel malestimantan la personan subjektan penadon. Kontraŭ tiu tendenco, Mozi konsideras la memstaran diligentecon grava, kaj fatalismo estas senrespondeca sinpravigo. En la ĉapitro “Kontraŭ konfuceanoj” de la libro *Mozi* estas skribite jene.

El ili [konfuceanoj] troviĝas fatalistoj, kiuj asertas, ke en la longviveco aŭ frua morto, paco aŭ danĝero, ordo aŭ malordo, estas iu nepra sorto, nome, la Ĉiela ordono, tial ne eblas laŭvole profitigi nek malprofitigi. Homoj ne povas propravole ŝanĝi la destinitan, kiel riĉon aŭ malriĉon, laŭdon aŭ punon, feliĉon aŭ malfeliĉon. <...> Konfuceanoj konsideras sian vojon la ĝusta vojo de moralo, malgraŭ ke tiu ĉi malhelpas al homoj en la mondo.²⁷²

Ŝajnas al mi, ke Mencio, restante fidela al la Ĉiela ordono kiel la grava principo por konfuceismo, ĉerpis ankaŭ de Yang Zhu kaj Mozi influon de subjekta libervola konduto. Mencio tamen interpretas sian sendependan konduton gvidata ne de la libervola elekto, sed de alimaniere kompreno de la Ĉiela ordono. Mencio diras pri la rilato inter sentoj, denaska naturo kaj ordono jene:

Mencio diris: “Gusto al buŝo, koloro al okuloj, sono al oreloj, odoro al nazo, komforto al kvar membroj – tiuj estas naturo. Estas la ordono, kiun nobluloj ne nomas naturo. Bonvoleco en rilato inter patro kaj filo, justo en rilato inter estro kaj subulo, decreguloj en rilato inter gasto kaj gastiganto, intelekto de saĝuloj, sanktuloj en la Ĉiela Vojo – tiuj estas la ordono. La naturon nobluloj ne nomas ordono.” [7B24]

Estas notinde, ke Mencio konsideras moralan koncepton ne libervola, ne denaska naturo, sed la Ĉiela ordono, nepreco. La lasta frazo estas grava por karakterizi la pensmaieron de Mencio, konsideranta la altan koron disvolviĝo de la denaska naturo. Ĝenerale en la okcidenta filozofio la etika koncepto apartenas al ‘libero’ de persona

²⁷² *Mozi*, Kontraŭ konfuceanoj, p. 180

konduto, sed Mencio nomas tion destino, aŭ ordono, samkiel deterministo. Jen en tio kuŝas specifiko de lia ideologio. Moraleco ne estiĝas nature el de sensorganoj. El tiu logiko eliras du supozoj. La ‘ordono’ ĉe Mencio estas akirata ne tra la sensorganoj, sed ekzistas apriorie en homo laŭ la Ĉiela ordono, do la bonvoleco estas imputita en homo denaske. Tial do la homa denaska naturo estas bona.

Sed la demando restas jena. Le termino ‘Ordono 命’ havas signifon, kiel la Ĉielan ordonon 天命, la nepran destinon. Se la bonvoleco estas la nepra, kial aperadas malbonuloj, kiel tiranoj Zhou kaj Jie, rabistoj Zhi? Laŭ Mencio, kun koncepto de denaska bona naturo, la sento de moraleco, kiel la bonvoleco, povas esti kaŝita per aliaj sentoj, ricevitaj poste tra sensorganoj. Nur tiu persono, kiu estas nobla je la aspiro, memstare preferas la bonon al tenta plezuro de sensorganoj. La moraleco devas esti edukata aŭ disciplinata pere de la lernado kaj sinreflektado, por ke tio iĝu la kutima konduto inter homoj kaj por ke tio ne kaŝiĝu en buskoj de diversaj pasiaj deloj.

Mencio diris: “Bonvoleco estas homa koro; justo estas homa pado. Forlasinte la padon, oni neniigas la sekvotan, forlasinte la koron, oni ne scias kiel serĉi – kia domaĝo tio estas! Kiam perdiĝas koko aŭ hundo, oni povoscias serĉi ilin. Kiam perdiĝas la koro, oni ne scias serĉi ĝin. La Vojo de la lernado estas nenio alia ol serĉi la perditan koron.” [6A11]

Ĉiutaga disciplino de dereguloj faras la konduton senkonscie kutima al moraleco. Do la bonvoleco laŭ Mengzi jam ne estas libervola elektado inter bono kaj malbono, sed nepra konduto, ordonita de la Ĉielo. Tio estas nenio alia ol la serĉado de perdita koro. Laŭ la logiko de Mencio, boneco denaske apartenas al la homa koro, sed okazadas, ke tiu boneco iam perdiĝas. Sciante la Ĉielan ordonon, la homo retrovas la bonon. Kaj la Ĉiela ordono estas natura leĝo, reganta ĉion, inkluzive homan naturon.

Mencio diris: “Ekzistas nenio sen la Ĉiela ordono, do oni devas humile akcepti ĝin ĝusta. Do, kiu scias la Ĉielan ordonon, tiu ne staras sub rompiĝema muro. Kiu mortas, ĝisfunde serĉante la Vojon, tiu ĝuste plenumis la Ĉielan ordonon.” [7A2]

Apogante sin sur nepreco, la nobla persono povas plenumi la taskon, trovitan sur la Vojo laŭ la Ĉiela ordono. Mencio diris:

Kiu ĝisfunde ekzamenas sian koron, tiu scias sian naturon. Kiu scias la naturon, tiu scias la Ĉielon. Ekzisti laŭ la koro kaj nutri la naturon estas ja la servado al la

Ĉielo. Kiom ajn mallonga aŭ longa estu la vivdaŭro, kulturadi dumvive sin mem je la personeco estas ja vivi firme laŭ la Ĉiela ordono.[7A1]

Koncernante la tekston, japana pensulo Yoshida Shoin lekcias, sidante en malliberejo, jene:

Ĉis funde ekzameni la koron 尽心 signifas fari laŭeble plej plene ĉion en la koro. Kiu havas kapablon levi 55 kg, levu 55 kg; kiu havas kapablon levi 75 kg, levu 75 kg. Se ne farus la plejon, oni ne povus scii la limon de sia forto. Farante la plejon, Yao regis la popolon, Shun servis al la patro, Konfuceo faris la Vojon klara. Ĉiu el ili faris laŭeble plej plene tion, kio estas ene de sia koro, ne ekster de la koro. Kiu malmulte kondukta, malmulte serveta kaj faras afereton, lojaleta kaj zorgetas je fila pietato, tamen dirus, ke plenumas la plejan eblon, tiu ege perfidas la sian koron.²⁷³

Laŭ Yoshida Shoin, la Ĉiela ordono kaj la naturo estas sciataj de iu persono nur tiam, kiam li faris ĉion, kio eblas. Komprenante ilin, li povas lerni la naturan leĝon kaj la realon, kiun li alfrontas. Lernantoj de Yoshida Shoin poste fariĝis gvidantoj de la nova japana registaro Meiji kaj transformis Japanion en civilizitan surbaze de realismo.²⁷⁴

Mencio per sia konduto montras, ke la ago laŭ la Ĉiela ordono ne estas pasiva obeo al fatalismo, sed aktiva penado por fari la plej eblan. Interallie, li mencias la Ĉielan ordonon, kiam li alfrontas ion nekonkereblan per sia forto. Ĉe sia ekziĝo de ministra posteno en Qi-regno, Mengzi respondis, ke tio estas la konduto laŭ la Ĉiela ordono. Ke la duko de Lu-regno ne renkontis lin, tion li rigardis ankaŭ la Ĉiela ordono.

Yuezhengzi vidis Mencion kaj diris: “Mi persvadis la regnestron, ke li renkontu vin. Sed la favorato, nomata Zang Cang, malhelpis, tial do li ne sukcesis veni al vi.”

Mencio diris: “Kio iras, tion lasu iri; kio haltas, tion lasu halti. Iri aŭ halti – tio ne dependas de homa kapablo. Ke mi ne renkontis la markizon Lu, tio dependis de la Ĉielo. Kiel do iu filaĉo de Zang-klano povus igi nin ne renkonti?” [1B16]

Ĉe konfuceismo estis traktata la determinismo en la aparta signifo, ke homoj ne

²⁷³ 吉田松陰『講孟筭記』全集 3 卷、368-369

²⁷⁴ Vd. 伊藤博文 Ito Hirobumi, 山形有朋 Yamagata Aritomo, k. a. adeptoj de la Shokason-lernejo 松下村塾.

povas malhelpi iun elektitan de la Ĉielo. Konfuceo diris, kiam Huantui atakis lin, ke tia homo, kia Huantui, ne povas damaĝi lin, Konfuceon, ricevitan la ordonon de la Ĉielo. Ankaŭ Mencio prenis al si la saman pozicion de la determinismo. Tiel do la determinismo en konfuceismo fortigas la aktivan volon en persono, gvidate per la firma konvinkiĝo.

La elekto, depende de la libera volo, estas la ideo de Yang Zhu kaj Mozi, kiujn Mencio kritikis severe. Okcidentaj esploristoj ofte opinias, ke en la ĉina antikva filozofio mankas la ideo de 'libera volo', sed tia ideo ekzistis en ideologioj de Yang Zhu kaj Mozi. François Julien, nuna franca filozofo, diras, ke en la ĉinaj ideoj ne troviĝas koncepto de *libera volo*, elektanta iun direkton ĉe forkvojo. Estas skribite de Julien jene:

“Ĉe la disvojiĝo sur vojforko estiĝas la heroa situacio de decida elektado, sed tio mankas en la ĉina ideo.”²⁷⁵

Julien vidas en ĉina pensmaniero mankon de la libervola elekto. Tia opinio, eble, estas preterlaso de ideologioj Yang Zhu kaj Mozi. Estas fama epizodo rilate al la forkvojo.

Iam Yang Zhu ekploris sur disvojo, dirante: “Ĉi tiu unu paŝo, se erarus, forkondukos al la loko, pli diferenca ol la alia je mil *lioj!*” Kaj pri tio li tristis plorkrie.²⁷⁶

De tiu forkvojo ja dependas honoro-malhonoro, paco-danĝero, postvivo-pereo, do endas ege tristi pro tio sur la disvojo. Tiu sama epizodo pri la plorado sur disvojo apartenas ankaŭ al Mozi.²⁷⁷ Spite la diferencon inter egoismo de Yanzhu kaj altruismo de Mozi, iuj konfuceanoj, kiel Mencio, inklinas trakti ambaŭ pensulojn sendistinge. Sed ambaŭ Mozi kaj Yang Zhu perdis la influon en la historio de Ĉinio. Tial do al Julien ŝajnas, ke mankas libervola elektado ĉe ĉinaj pensuloj. Tiun eblecon de libervola elekto havis nur despotaj reĝoj. En la fino de la epoko Militlandoj estis la tempo, kiam oni sopiris al forta gvidanto kaj preferis obeon al reĝoj. Tiam ne estis bezonata la persona liberalismo kaj sendependeco. Do legalismo akiris la fortan influon, kaj Yangzhuismo-mohismo perdis la influon.

Komparante kun Yang Zhu kaj Mozi, tute alie prenas Mencio la sintenon al la

²⁷⁵ François Jullien, *Fonder la morale*. Grasset & Fasquelle, 1996. La japana traduko, 講談社 2017. p. 190

²⁷⁶ *Xun·zi* 荀子 11:16

²⁷⁷ 呂覽疑似「墨子見岐道而哭之」賈誼新書審微「故墨子見衢路而哭」

decidita vojo, kiel ni vidis. Mencio ne plorkriis ĉe la forkvojo, sed akceptas la decidon, kiel la Ĉielan ordonon, sed ne kiel la rezulton de persona ago. Mencio konvinkiĝis, ke lia ideo ne estas la rezulto de lia libervola pensado, sed objekta vero de la Ĉielo. La vero estas, ke ĉio en la mondo estas penetrita de 'bonvoleco 仁'. Mencio diris:

Tio, ke tri dinastioj povis konkeri la mondon, estas dank' al bonvoleco. Ke ili perdis la mondon, tio estas pro malbonvoleco. Prospero-malprospero kaj ekzisto-pereo de regnoj dependas de la samo. Se la Ĉiela Filo estas malbonvoleca, la mondo ene de kvar maroj ne povas esti konservata. Se la landestro ne estas malbonvoleca, ne povas esti konservata la lando kun la altaro de tero kaj grenoj. Se la grandoficistoj estas malbonvolecaj, ne povas esti konservataj la maŭzoleoj de prapatroj. Se oficistoj kaj simplaj popolanoj ne estas malbonvolecaj, ne povas esti bontenataj la kvar membroj de la korpoj. Kiu, malamante morton, ĝuas malbonvolecon, tiu egalas al tiu, kiu, malamante postebrion, ŝatas drinkegi fortan vinon.[4A3]

La bonvoleco, laŭ Mencio, nestas en la kompatema koro de ĉiu homo, kaj aperas en la konkreta konduto de fila pietato, respekto de pliaĝuloj kaj prapatroj. Antaŭ ĉio, la kreskigo de la bonvoleca koro estas la tasko de ĉiu persono, kaj etendigo de la bonvoleca politiko al la tuta mondo estas la tasko de kleruloj kaj reĝoj. Pri la perfektigo de la personeco ni traktu poste, sed nun vidu la sintenon de Mencio al reĝoj.

ESPERO AL REĜA REGADO DE QI-REGNO

Mencio vidas sian taskon en la persvado de ekzistantaj reĝoj, por ke ili praktiku la bonvolecan politikon en sia regno. Li esperis, ke sub la bona influo de progresema reĝo la tuta mondo sekvos la bonvolecan politikon. Do li atendis de la reĝo de Qi-regno.

Nun Qi-regno jam posedas la tioman teritorion. Estas dirite, ke krioj de kortobirdoj kaj bojoj de hundoj, bredataj de popolo, atingas senĉese landlimojn de kvar direktoj. Nun unu Qi-regno jam regas la tioman popolon. Sen ekspluati nove terojn, sen kolekti nove popolojn, kiu ajn faras bonvolecan politikon, tiu fariĝos imperiestro, kaj nenio povos deteni tion. <...> Konfuceo diris: 'Virto propagiĝas tiel rapide, kiel poŝta kuriero.' Aparte nuntempe, se unu granda regno kun dek mil militĉaroj farus bonvolecan politikon, popoloj ekĵojegus je tio, kvazaŭ liberigite el de la pendigilo kun kapo malsupren.'"[2A2]

Mencio, samkiel Mozi, konsideras la akordiĝon al supro 尚同 decida, do la plej grava tasko de konsilanto estas stimuli reĝon je bonvolema koro, ĉar la subo sekvas la supron. Mencio diris:

“Se la reĝo estas bonvoleca, neniŭ iĝas malbonvoleca, se la reĝo estas justa, neniŭ iĝas maljusta, se la reĝo estas rekta, neniŭ iĝas malrekta. Se la reĝo estos ĝustigita, la ŝtato iĝos stabila.” [4A20]

La virto de noblulo estas simila al vento, kiun sekvas la virto de malgrandaj homoj, kvazaŭ herboj. Herboj nepre turnas sin al la direkto, kien blovas la vento. [3A2]

Mencio, eble, heredis la ideon de Mozi pri la akordiĝo kun la supro kiel la plej gravan motivon por klerigo de la ŝtato kaj la popolo. Do Mencio fervore okupadis sin antaŭ ĉio per la klerigo de reĝoj, kiel vaganta predikisto.

PRI MANIEROJ JE LA DEFENDO DE PATROLANDO

Koncernante la defendon, Mencio prezentas la planon konstrui la bonan interrilaton, por ke aliaj landoj helpu okaze de krizo, ĉar la tera avantaĝo estas malpli decida. Estas dirite:

‘La popolanoj en la teritorio estas sekure gardataj ne nur pere de landlimoj, la lando estas gardataj ne nur pere de krutaj montoj kaj valoj, la majesteco en la mondo estas akiritaj ne nur pere de avantaĝo je armiloj, sed pere de diversaj asistoj. Al atinginto de la Vojo estas donate plimulte da asistoj, al perdinto de la Vojo estas donate malmulte da asistoj. Ĉe plej malmulte da asistoj, eĉ parencoj spitas. Ĉe plej multe da asistoj, la tuta mondo omaĝas respektplene. Klara estas la rezulto, se tiu, kiun omaĝas la mondo, atakus tiun, kiun spitas eĉ parencoj. Do noblulo ne aŭdacus militadi, kaj se unufoje ekmilitas, nepre venkas.’[2B1]

Mozi kun liaj disĉiploj estis ne nur pensuloj, sed ankaŭ specialistoj de defenda milito, Do mohistoj mem gvidas batalon, reale partoprenante en la milito. Male, Mencio predikis alimaniere, la ideon plenan de idealismo. Por la konservo de regno, li citas la ekzemplon de la prapatro de la reĝo Wen de Zhou-dinastio.

Antikve la Granda reĝo loĝis en Bin. Kiam la tribo Di invadis tien, la reĝo translokiĝis al la piedo de la monto Zhi neeviteble sen alia alternativo. <...>

‘Di-anoj deziras havigi al si nian landon. Mi aŭdis, ke reĝo ne devas viktimitigi siajn homojn pro sia alteniĝo al nutrilo de homoj.²⁷⁸ Kio do ĝenos vin eĉ se ne estus reĝo? Mi nun foriros de ĉi-tie.’ Forlasinte la urbon Bin, li transiris monton Liang, kaj translokiĝis al la piedo de la monto Zhi. Homoj de Bin diris: ‘Li estas bonvolemlulo, do ni ne devas perdi lin’, kaj ili sekvis lin grandnombre kvazaŭ ili turnus sin al merkato. [Mencio diris:] Aŭ ankaŭ troviĝas iu, kiu diras: ‘La landon, heredatan de generacioj, mi mem ne povas perdi, eĉ se mi mortus, mi ne devas forlasi.’ Jen la alternativo, Via Moŝto, elektu unu el tiuj du.[1B14-15]

Se la landestro estas plena je bonvoleco, la popolo sekvas lin, kien ajn li translokiĝas. Do la lando-teritorio ne estas decida. Pli gravas, ke la estro kaj popolanoj estas ligitaj pli firme kun alta moraleco ol invadintoj. Se tiel, iam venos la tempo por fondi eĉ la dinastion, samkiel Zhou 周. La kerno de la patrolando estas la moraleco, bazita sur bonvoleco kaj fila pietato. Ŝajnas al mi, ke la instruo de Mencio estas ĝis nun heredata de ĉinoj, migrintaj en diversaj landoj de la mondo. “Familio” por la ĉinoj estas la konkreta areno por la eduko de firmaj patriotoj. Do komunumo de ĉinoj estas forta je solidareco eĉ ekstere de la ŝtato. Ĉu eblus tia daŭripova ligiteco per la ideologio de Mozi aŭ Yang Zhu?

PERSONA PERFEKTIGO

En la ideologio de Mencio la plej gravan rolon ludas la praktika filozofio, kiel kreskigi la fortan personecon. Li trovis la hejman familian vivon la bazo de la praktika filozofio.

Mencio diris: “La Vojo-Tao estas proksima, sed oni serĉas ĝin ie malproksime. La afero estas facila, sed oni serĉas ĝin en io malfacila. Ke homoj proksimiĝu unu kun la alia, kiel kun siaj gepatroj, homoj respektu la pliaĝulojn, kiel la siajn – jen de tio estiĝas la monda paco.” [4A11]

Esti bona filo – tio estas alfa kaj omega por ĉiu persono. Mozi vidis tiun pensmanieron malvasta, kiel aparta amo 別, limigita ene de la familio aŭ la nacio, kaj predikis la universalan amon 兼愛. Laŭ Mencio, rimedo por fariĝi bona filo estas facila, se nur

²⁷⁸ Nutrilo de homoj signifas ĉi tie la teron.

sekvas la deeregulojn, ĉar homo estas ‘denaske bona’. Sed, kvankam denaske bona estas la homa naturo, tamen la homa sento ofte estas kovrata de diversaj aĵoj. Mencio diras:

Membroj kiel oreloj kaj okuloj ne havas kapablon pensi, do ili, iam kovrite per aĵoj, iam intermiksita kun aĵoj, estas nur altirataj al aĵoj. Membroj de koro kapablas pensi, perceptas pensante, aŭ, ne perceptas, ne pensante. Tiu kapablo, donite de la Ĉielo al mi, staras supera je la grandeco, do io malgranda ne povas forrabi tiun kapablon. Jen kio faras la personon granda.” [6A15]

Persono granda je la kvalito disvolvas la koron kun alta aspiro. Bona ago de bonvoleco kaj justo estas la alta idealo, kiu kreskigas la denaskan bonon. Shun, la sankta reĝo, fariĝis vekiĝinta persono, aŭdinte bonan vorton kaj vidante bonan agon, Mencio diris jene:

Kiam Shun, loĝante en profunda monto, vivis kun arboj kaj ŝtonoj, ludadis kun cervoj kaj aproj, tiam li apenaŭ diferencis de sovaĝuloj en la profunda monto. Sed unu fojon aŭdante bonan vorton, unu fojon vidante bonan agon, li fariĝis tia persono rezoluta, kiel Changjiang kaj Flava rivero, ke nenio povas deteni la torenton kaskadegan. [7A16]

Fortigas la personecon iu adversa medio, ekzemple, malsano, soleco, k. c., Mencio diris:

Posedanto de virto, saĝo, arto kaj scio estas tiu, kiu ĉiam havis malsanon kaj suferon. Soleca subulo kaj bastardo, zorgantaj elkore pri danĝero kaj timantaj profunde pri malfeliĉo, atingas la alton. [7A18]

Laŭ Mencio, adversa kondiĉo, donata de la Ĉielo, estas lernejo por hardigi personecon.

Mencio diris: “Shun startis en la kampo inter sulkoj kaj irigacioj; Fu Yue leviĝis el inter terkonstruado; Jiao Ge leviĝis el inter fiŝado kaj salfarado; Guan Yiwu leviĝis el inter karceroj; Sunshu Ao leviĝis el inter maro, Baili Xi leviĝis el inter merkato. Al kiu la Ĉielo konfidas la grandan taskon, al tiu ĝi unue donas suferi je la koro kaj la strebo, labori kun muskolo kaj ostoj, donas malsaton en la korpo kaj haŭto, donas malplenen kaj mizeron en la vivo, obstaklon kaj perturbon en la praktiko de la agado. Tiel do kreskas la personeco, havanta aktivan koron kaj

paciencon kaj disvolvanta la avantaĝon konkeri ion ajn nefareblan. Homoj ĉiam misas kaj eraras, kaj poste kapablas pliboniĝi. Suferante en la koro, barite en la zorgado, kaj poste oni kreas ion.”[6B15]

Per la ekzemplo de Shun, Mencio montras, ke la filo, amanta gepatrojn, neniam perdas sian personan dignon, kaj povas konkeri ajnan adversan kondiĉon. Mencio kortuŝis japanon Yoshida Shoin per la kontraŭo al malfavora kondiĉo. Shoin skribis: “Nur tiu, kiu travivas en la malfavora kondiĉo, povas bone solvi problemon de ajna adversa kondiĉo”²⁷⁹.

Ankaŭ Adam Smith diris same: “Suferoj, danĝeroj, vundoj, malfeliĉoj, - estas nursolaj mastroj, ĉe kiuj ni povas lerni la ekzercon de tiu virto. Sed ili ĉiuj estas la mastroj, al kies lernejo neniu volonte igus sin turni.”²⁸⁰

Mencio ripete mencias, ke la reĝo Shun montris la modelon de la fila pietato, obeeme servante al sia obstina patro Gusou, kiu ne favoris lin. Kia ajn estas la patro, la familio devas esti la areno por la trejnado de dereguloj, por ke filoj ellernu konkretan formon de fila pietato.

Dum ne akceptate de gepatroj, li sentis, ke li ne povis fariĝi solida persono; dum ne akordante kun gepatroj, li supozis, ke li ne povis fariĝi solida filo. Do Shun pleje servadis al gepatroj laŭ la Vojo-Tao, kaj lia patro, Gusou, finfine ekĝojis. Kiam Gusou ekĝojis finfine, la tuta mondo transformiĝis. Per tio, ke Gusou ekĝojis, la tuta mondo iĝis stabila surbaze de la ĝusta rilato inter patro kaj filo, t. n. la granda fila pietato. [4A28]

Mencio insistas, ke, laŭ la ekzemplo de Shun, la familia rilato estas pli grava ol la reĝa trono.

FUNEBRO KIEL AGO DE FILA PIETATO

La funebro de gepatroj estas la provŝtono de la fila pietato. Mozi, el la vidpunkto de ekonomio de ŝparado, predikis, ke la funebro estu laŭeble malluksa. Do Mencio rigardis la mohismon nekunekzistebla al konfuceismo. Mencio diris:

Estas tre bone, ke oni faras sian plej bonan por funebri gepatrojn. Zengzi diris:

²⁷⁹ 講孟餘話 p. 23

²⁸⁰ *The Theory of Moral sentiments*, p. 153

‘Dum vivas gepatroj, oni servas ilin kun decreguloj; ĉe la morto oni funebras kun decreguloj; ĉe la festo oni festas kun decreguloj – jen kio estas nomata Fila pietato.’ Koncernante decregulojn de landestroj, mi ankoraŭ ne lernis, sed mi aŭdis iam pri tio – funebra servo daŭras ĝis la tria jaro post la morto, ĉeffunebranto vestas sin per kruda vestaĵo, manĝas kaĉon aŭ porigon, – jen tiel faradis en tri dinastioj kaj supre la Ĉiela Filo kaj sube simplaj popolanoj.[3A2]

En nuna tempo la opinio de konfuceismo pri la longdaŭra funebro ne estas praktikebla al ordinaraj homoj, do Mozi pravas en la kritiko de konfuceismo. Sed pli ol 2000 jaroj la konfuceismo estis reganta ideologio en Ĉinio kaj en foraj orientaj landoj. En la libro Mencio la mohismo kaj la Yanzhu-ismo estis severe kondamnita, sed Mencio mem ne donis al tiuj herezuloj sian konkretan analizon, kvazaŭ li evitintus la seriozan disputon. Jen li traktis unu mohiston, nomatan Yi Zhi.

Iu mohisto, Yi Zhi, dezirus renkontiĝi kun Mencio pere de Xu Bi. Mencio diris: “Mi volus certe vidi lin, sed mi estas nun malsana. Post kiam mi resaniĝos, mi iros vidi lin. Ne venu s-ro Yi al mi nun!”

En alia tago Yi Zhi denove petis de Mencio la renkontiĝon. Mencio diris: “Mi devus vidi lin nun. Se mi ne korektus lin, la vera Vojo ne videblus, do mi faros lin rekta. Mi aŭdis, ke s-ro Yi estas mohisto. Rilate al la plenumado de funebro, mohistoj konsideras la simplan konformanta al la Vojo. S-ro Yi pensas ŝanĝi la mondon laŭ la simpligo. Ĉu li ne rigardas tion malestiminda? Sed tamen li mem funebris siajn gepatrojn lukse – tio signifas, ke li konsideris la simpligon kiel malestimon je la servado al gepatroj.” [3A5]

Tiel do Mencio finfine ne akceptis la mohiston Yi Zhi, nur tra Xu transdonis la mesaĝon al Yi. Yi desapontite paŭzis kaj diris: “Tio estas la destino.”

ĈIRKAU LA DENASKA NATURO KAJ ĈJIO POR RADIKA ENERGIO

Post Mencio aperis Xunzi, la granda pensulo de konfuceismo, kaj severe kritikis Mencion. Xunzi asertas, ke la denaska homa naturo estas malbona, ĉar homoj denaske deziras profiton al si, do, rezulte, ili malamas aŭ envidias la aliajn. Se ili sekvas sian denaskan naturon, ne ĉesas bataloj aŭ ŝtelado kaj rabado inter si, kaj tiel ne eblas regi la mondon. Xunzi, kvankam konfuceano, akceptis la bazan vidpunkton por homa naturo de Yang Zhu kaj Mozi.

Mencio argumentis pri la boneco de la denaska naturo, uzante ekzemplon de iu kalva monto sub urbo.

Mencio diris: “Arboj en la monto Bovo (Njushan) estis iam belaj. Sed la monto situas apud la granda urbo, do oni hakadis per toporo la arbojn. Ĉu eblus resti belaj? Favorate kun la aero tagnokte, kun la pluvo kaj roso, nepre naskiĝas burĝonoj kaj ŝosoj, sed tamen oni paŝtas ĉi tie bovojn kaj ŝafojn, do la monto tute kalviĝis. Vidante ĝin kalva, oni pensus, ke neniam ĉi tie eskzistis arboj. Sed ĉu tia estas la denaska naturo de la monto? Se temas pri homoj, ĉu ili neniam havis la koron de bonvoleco kaj justo? Ke ili forlasis sian konsciencon aŭ bonan koron, tio similas la senĉesan hakadon de arboj per toporo. Ĉu eblus konsideri tion bela? Spite ke estis antaŭe la tagnokta spirado kaj matena kvieta *Ĉjio*, nun estas rare ke homoj estu proksimaj je la ŝato kaj malŝato unu al la alia. Tio estas ja la rezulto de ĉiama ago en matene kaj tage, tiel do homoj estas katenite pereantaj. Ili, kvankam katenite, tamen ripetadas, kaj vivas en manko de nokta *Ĉjio*. Vivante en la manko de nokta *Ĉjio*, ili fariĝas ne malproksimaj al birdoj kaj bestoj. Vidante homon bestiĝanta, oni konsiderus, ke li neniam posedis la kvaliton, sed ĉu tia estus la denaska homa sento? Kiun ajn oni povus nutradi sukcese, ĉiu ne povus ne kreski; kiun ajn oni ne sukcesus nutradi, ĉiu ne povas ne perdiĝi.

Konfuceo diris: ‘Bontenate, io ajn povas ekzisti, forlasite perdiĝas. Ne estas certe, kiam tio el- kaj en-iradas. Estas ne sciate, kie estas la hejmo.’ Tiu eldiro signifas la koron, ĉu ne?” [6A8]

Dum Xunzi konsideras la artefaradon bona, Mencio, kontraŭe, vidas en tio ankaŭ la kaŭzon detruantan la denaskan bonon. Estas notinde, ke Mencio trovas la *Ĉjion* grava por revigligo de la naturo. Ankaŭ lia samtempulo Zhuangzi konsideras la *Ĉjion* gravega, sed tra Mencio, konfuceano, tiu ideo estos akceptita de ĉinaj estontaj filozofoj, kiel Zhu Xi, Chengzi kaj aliaj. Mencio atentigis la samecon de homa naturo jen tiel:

Buŝoj gustumas la saman frandaĵon, oreloj aŭdas la saman belsonon, okuloj vidas la saman belecon je koloroj. Kial nur al koroj mankus la sameco? En kio kuŝas la sameco de koro? En t. n. rezono, justo. Sanktuloj unue komprenis ja la samecon je nia koro. La rezono kaj la justo donas ĝojon al nia koro, samkiel viandoj donas ĝojon al nia buŝo.”²⁸¹[6A7]

²⁸¹ Mi tradukis la vorton 理 *li* kiel rezonon, sed iu interpretas ĝin kiel principon, la alia – kiel ordon. Mi konjektas, ke 理 rilatas al la homa fizika flanko kaj 義 *yi* – la metafizika.

Predikante la bonecon de naturo, Mencio aldonas la vigligan agon de Ĉjio. Jen en kio kuŝas la kialo de granda influo al posteuloj. La ago de Ĉjio donas al la persono kuraĝon, persistemon kaj animan energion antaŭ potenculoj, kio videblas en la konduto de Mencio. Same, kiel la nokta spirado de Ĉjio donas al arboj la vigecon, la spirita energio de Ĉjio nutras en la persono la grandan vastanimecon 浩然之氣. Tiu ideo de Mencio donis la grandan influon al aziaj intelektuloj, strebantaj al la plibonigo de siaj patrolandoj.

ANSTATAŬ KONKLUDO

Mencio rimarkigis la dangerecon de la ideoj, subtenantaj profitigon 利 ne nur privatan 私利 sed ankaŭ reciprokan 交利. Li antaŭvidis la rezulton de tiu pensmaniero, ke “homoj manĝus homojn unuj la aliajn” 人將相食. Ankaŭ Adam Smith vidis tiun dangerecon en sia verko “*Teorio de moralaj sencoj*”, sed tamen li agnoskis la profitamon en la verko “*Riĉeco de Nacioj*”. Laŭ optimismeca ekonomia ideo de Smith la profitoamo inter diversaj homoj estas gvidata harmonie per la nevidebla mano. Sed kio okazas por profitamo inter diversaj klasoj kaj inter ŝtatoj?

La kritiko far Mencio al Mozi kaj Yang Zhu havas grandan signifon. Unue, tio montras la altan nivelon de ĉinaj klasikaj ideoj, ideoj de Mozi kaj Yang Zhu, ĉar iliaj pensmanieroj anticipis la estonton, ideojn de kapitalismo kaj socialismo.

Ĉinio, Koreio kaj Japanio adoptis longe la konfuceismon por teni la ŝtatojn kaj la societojn stabilaj. Ankaŭ tie okazadis konfliktoj inter klasoj kaj inter landoj, sed la ĉina civilizacio daŭras en la reala vivo ĝis nun, dum aliaj antikvaj civilizacioj restas nur en vestiĝoj. Soveto-unio frakasiĝis, sed Ĉinio disvolviĝas. Unu el kialoj kuŝas en la stabila strukturo de familio, societo kaj ŝtato. Restas en Ĉinio ankoraŭ la kutimo de fila pietato kaj decreguloj. Ideo de Konfuceismo kaj Mencio enradikiĝis profunde en la vivo de ĉinoj, kio faras la ŝtaton pli stabila.

Sed en Japanio, Mencio dumlonge estas rigardata kiel revolucia ideologo, noca por la imperatora dinastio, do eĉ estis legenda, ke ajna ŝipo, portanta la libron de Mencio al Japanio, subakviĝis pro la dieca ventego. Sed, tio ne estas vera, ĉar la libro de Mencio estas registrita en la bibliografio, kompilita de Huziŭara Sukejo en 891 p. K. Ankaŭ en Ĉinio ekzistas la sama legendo, estas skribite en iu libro en la epoko de dinastio Ming jene: “Japanoj-sklavoj ankaŭ estimas librojn de konfuceismo kaj kredas budhismon. Ili

Chengzi 程子 diris: “Kio estas ene de aĵoj estas *Li*理, kio regas aĵojn estas *Yi*義.”[朱熹『四書集注』 342]

aĉetas ĉinajn sutrojn kaj librojn kontraŭ alta prezo. Sed mankas nur la libro de Mencio. Kiu provis porti la libron al Japanio, ties ŝipo renversiĝis. Tio estas iu strangaĵo.²⁸² Kial oni rigardis Mencion revoluciema? Multaj opinias, ĉar li aprobis anstataŭigon de reĝoj kaj eĉ majestatencon de tiranoj, kiel Jie kaj Zhou. Tia ideo kontraŭas al eterneco de la tradicia tennoa reĝimo.

Mencio diris: “Se vi trovas iun farinta grandan eraron, admonu lin, sed li ne aŭskultas vin spite la ripetatan admonon, tiam vi devas eloficigi lin.”

La reĝo subite ŝanĝis la vizaĝkoloron.

Mencio diris: “Ne miskomprenu, Via Moŝto. Vi, kiel reĝo, demandis min, do mi, kiel via subulo, ne povas ne respondi rekte.”[5B9]

Mencio tenas neordinaran kuraĝon antaŭ potenculoj por eldiri sian opinion. En la epoko de revolucio Meizi japanaj adeptoj de Mencio ĉerpis la mirindan aspiron por la aktiva movado, eĉ devojiĝanta de la Mezeco 中庸. Mencio legas la tekston de *Analektoj* laŭ sia kompreno, taksant fanatikan konduton.

Wan Zhang demandis, dirante: “Kiam Konfuceo vagadis en Chen-lando, diris: ‘Mi revenu hejmen! Personoj de mia partio, naive *fanatikaj*, progresemaj, ne forgesas la unuan aspiron.’ Kion pensis pri la *fanatikuloj* de Lu-regno Konfuceo, estante en Chen?”

Mencio diris: “Konfuceo, ne povante akiri irantojn de Meza Vojo, probable serĉis strion de espero inter *fanatikuloj* kaj puritanoj!” [7B37]

Yoshida Shoin vidis en *fanatikulo* 狂士 aktivan aganton por reformi la regnon. En Japanio la filozofio de Mencio havis la grandan influon al intelektuloj en la dua duono de 19-a j.c. En la nova registaro de Meizi okupis gravajn postojn intelektuloj de Choshu 長州, kiuj estis instruitaj en la lernejo Shokasonzyuku 松下村塾, gvidata de Yoshida Shoin, la fervora adepto de Mencio. Li kompilis la verkon pri la lekcio de Mencio, kiam li sidis en la malliberejo. Li alvokis junulojn:

“Estas dirite, ke se matene mi aŭdas la vojon, mi ne bedaŭras, eĉ se mi mortus vespere. Kial diskutindas pri ia profito-utilo? Se nun vi havas altan aspiron, tiam vi povas fariĝi adepto de Mencio.”²⁸³

²⁸² 謝肇淪『五雜俎』卷4、地部2

²⁸³ 講孟筭記 p. 23

Legantoj de la libro de *Mencio* vidas en Majstro Mencio la idealan personecon, sendependan kun sia propra konvinko. Mencio mem per sia sentima konduto montras la modelon al personoj, aspirantaj la altan celon por la savado de popolo. La agmaniero de Mencio forte influis al progresemaĵoj intelektuloj en Azio. Por ili tio restas de longe la praktika filozofio. Mi rememoras, ke mi mem estis edukata en mia infaneco sub la influo de konfuceismo laŭ Mencio.

En nuna urbo Zaozhuang, t. e. antaŭa Teng-lando, kie Mencio predikis sian projekton de ideala ŝtato, mi havis la feliĉan ŝancon loĝi ses jarojn (2012-2018), do mi povis vidi pejzaĝon kaj inspiri la aeron de ĉina pensa historio. Tie mi imagis la bonvoleman planon de la komunumo, ellaborita de Mencio en la teksto [3A3]. Prof. Bak Giwan, korea fama Esperantisto, kaj lia edzino, montris al mi la hejmlokon de Mencio, kondukante la aŭton. Tio instigis min Esperantigi la tekston de *Mencio*. Ankaŭ s-ro Semio proponis al mi tiun laboron fervore. Dank' al lia admono, mi povis plenumi la taskon.